

MALBENO KARA

de
MARY WEBB

Tradukita de Grace Kirkwood
Editoris Donald Broadribb

Malbeno Kara

De Webb, Mary Gladys Meredith, 1881-1927

Tradukita el la Angla al Esperanto de Kirkwood, Grace

Editoris de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933-

Unue eldonita en la Angla kiel *Precious Bane: a novel* de Jonathan
Cape Limited (London), 1924. LCCN 82-224959.

Unue eldonita en Esperanto de Bookleaf Publishing, 1994.

Ĉi tiu traduko kopirajta © 1994 Donald Broadribb

Ĉi tiu eldono de Books Reborn, oktobro 2000

Vidu <http://www.netword.com/booksreborn>

251 p. ; 21 cm.

899.9923

La tradukon faris Grace Kirkwood. Parte postprilaboris ĝin Trevor
Steele kaj Niĉjo Nicholas. Finpreparis, finredaktis kaj eldonis
Donald Broadribb laŭ testamentaĵo de Grace Kirkwood.

ENHAVO

LIBRO UNU

Ĉapitro 1: Lago Sarn	5
Ĉapitro 2: Informi abelojn	9
Ĉapitro 3: Pru liveras invitilojn	19
Ĉapitro 4: Torĉoj ka rosmarenoj	22
Ĉapitro 5: Falas unua garbo	29
Ĉapitro 6: “Selu viajn revojn tal rajd’in”	36
Ĉapitro 7: Pomarboj ka ĵargonejoj	43

LIBRO DU

Ĉapitro 1: Rajd al foir	49
Ĉapitro 2: <i>Kruĉo da Cidro</i>	59
Ĉapitro 3: “Aŭ morti penante”	67
Ĉapitro 4: Sorĉisto de Plash	73
Ĉapitro 5: Ŝpinamfestoj	78
Ĉapitro 6: Ludo <i>Multekostaj Koloroj</i>	83
Ĉapitro 7: “Mestro ĉe’stas”	93
Ĉapitro 8: Alvoki Veneran	98
Ĉapitro 9: Konkroludo	103

LIBRO TRI

Ĉapitro 1: Dungfoir	114
Ĉapitro 2: Taŭroludo	123
Ĉapitro 3: Plej bona alta skribo kun ornamoj	131
Ĉapitro 4: Jancis forkuras	142
Ĉapitro 5: Libeloj	161

LIBRO KVAR

Ĉapitro 1: Rikolto hajmestas	169
Ĉapitro 2: Beguildy serĉas sepan infanon	184
Ĉapitro 3: Malbeno mortiga	199
Ĉapitro 4: Dum maja maten	209
Ĉapitro 5: Lasta konkroludo	223
Ĉapitro 6: Lago tremas	232
Ĉapitro 7: Malfermu pordojn ĉielvaste	242

<i>Listo de dialektajtoj</i>	246
<i>Proksimuma prononco de la anglalingvaj nomoj</i>	248
<i>Pri la traduko</i>	249

*Neniu miru
pri or en infer'; plej taŭga grundo
por malbeno kara.*

John Milton: *Paradizo Perdita* 1.690

AVERTO AL LA LEGANTO

En la anglalingva originalo ĉi tiu romano estis verkita en la dialekto de Shropshire en Anglio. En la traduko multaj dialektaj formoj troviĝas. Plejparte ilin klarigas piednotoj kiam ili unue aperas. Por listo vidu paĝon 246. Ĝeneralaj komentoj pri la traduko troviĝas sur paĝoj 249–251.

LIBRO UNU

Ĉapitro 1: Lago Sarn

Dum ŝpinamfesto mi vidis Kesteron unuafoje. Ka¹ s en nunaj ŝanĝavidaj tagoj kiam strangaj inventoj nin amase ĉirkas kiam m aŭdas diri ke maŝin uziĝas ie ka tie en land eĉ por falĉi ka tondi se hazarde legantoj de ĉiti'² ne scias ki stas ŝpinamfesto—i ĝustatempe scios. Kvankam estis ŝpinamfesto de Jancis Beguildy³—ŝ estis tiam tri-ka-dudek-jara ka m du men—tamen ti n estas komenco de histori' kiun m intencas rakonti.

Kester diras ke ĉiuj historioj ĉu veraj okazaĵoj aŭ elpenŝaĵoj fontas el tempo pli frua ol tagoj d infan' jes ja pli frua eĉ ol tide⁴ bebet en sia junka lulil. Eble vi nenjam dormis en litet el junkoj sed ni ĉiuj dormis tiel ĉe Sarn. Stis granda multo da junkoj ĉe Sarn k edzin d olda Beguildy bonege plektis in ĉirke rondajn barelringojn. Poste ŝ metis in sur balancilojn ka ti donis bele puran lulilon molan ka verdan bebo povas senti sin same bonfarta kiel raŭpeto (Kester nomas in buntaj papili'ĝontoj) dormanta en sia kokon'. Kester estas tre firmopinia pri tiaferoj. Nenjam l akceptas diri raŭpoj. Li diras "Estas multaj papili'ĝontoj sur niaj brasikoj Pru." Li n diras "Estas vintro". Li diras "Somer dormas". Ka n ekzistas burĝon' tiom nana aŭ mornkolora ke Kester ne nomus ĝin komenc de flor.

Sed temp ancor ne venis por paroli pri Kester. Rakonton pri ni ĉiuj ĉe Sarn Patrin ka Gideon ka mi ka Jancis (kiu stis tiom bela) ka Sorĉisto Beguildy ka dutri aliaj loĝantoj en tiregion' jen kion mi celas rakonti. Loĝis tie nur malmultaj k eble ĉiam tiel estos ĉar iom forpelas lok. Eble pro akvo plaŭdanta jaron post jar—kien ajn on

¹ Dialekta formo = kaj. Se sekvas vorto komenciĝanta per vokalo oni trovas nur k (ekzemple, k aliaj = kaj aliaj. Prononcu: kaliaj). Por listo de dialektaĵoj vidu p.248.

² Ĉi tio.

³ Pr. Ĝansis Bgildi. Por listo de anglalingvaj nomoj kaj ilia prononco vidu p.248.

⁴ Tiu de.

rigardas k aŭskultas jen akvo aŭ grandaj arboj atendantaj ka meditantaj dekstre ka live aŭ senspira sonmanko de loko kvaz kreita taŭ nur hor ka ja ne por ni. Aŭ povas esti ĉar grund estas tre malfekunda ka marĉa ka herboj feblaj ka sennutraj tiel ĉiam estas kie junkoj ka fragmitoj kreskas abunde ka floroj de pajglo. Eble vi nomas tion primol sed ni ĉiam nomis ĝin pajglo ki signifas ŝlosiloj de Ĉielo. Stis grandioza sperto vidi niajn kampojn ĉe Sarn dum florado de primoloj. I stis orumitaj tiel k'on opinius k'eĉ anĝelpiedoj ne meritis marŝi tie. Oni povis fari florbulon tal⁵ turdo dufoje aŭdigus sian kanton ĉar on b'zonis nur sidiĝi k ambemane pluki. En ĉiuj direktoj videblis nur oraĵoj krom ĉe Sarn kie komenciĝis arbar ka longe etendiĝanta griz'akvo glime tremetanta pro sunlum. Nek arbar nek akvo aspektis senlumaj en tibela printempa veter kiam folioj ekaperis ka troviĝis burĝonoj maizkoloraj ĉe suproj de betuloj. Nur en nia kverkarbar ĉiam aspektis kvaz jarfine ĉar tie novaj folioj tiom brunis. Tial ĉiam estis sent oktobra en nia maj. Sed agrable stis sidi sur kampoj ka rigardi al foraj montoj. Larikoj turis en verva verdo ka primolor ŝajnis penetri onian koron k eĉ Lago Sarn estis nur blua nebul en flava nebul el betulsuproj. Ka tiel sonĝetosis loko ke se pasis eĉ sovaĝabel—ja ne nur burdo—ĝ eksaltigis kvaz kriego. S Abel nun traflugas fenestron al mia vaz de keirantoj mi revidas ĉion en klaraj koloroj Lagon Plash sin etendantan sub sinkanta sun preter arbar kvaz akraranda fragmento de botelvitro. Lago Plash estis pli granda ol Lago Sarn ka nenju arbo staris apud ĝi do kie ne staris montoj maltaŭ ĝi on povis vidi transflanke nubojn radikigiĝintajn en akvo ka m emis pensi k'i smilas blankajn nimfeojn marĝenantajn Sarnon dum duon' de somer. Nenjo distingis Plashon de ĉiu alia lag aŭ riveretendaĵo. N okazis tie ti'akvotremado trovebla en Lago Sarn nek vilaĝo kun tintantaj sonoriloj troveblis sub plej profunda parto. Pravis ja kion on diradis pri Sarn ke tie sentiĝis i'mistera.

Ĉe Plash loĝis famili' Beguildy k en ĉities loĝej parte dom el ŝton ka parte groto mi ricevis perlibran instruon. Eble ŝajnas al vi strange ke virin kia mi kun humila origin' scias skribi ka literumi ka meti ĉiĉion en libron. K efektive kiam m estis junulin nemultaj

⁵ Antaŭ ol.

eĉ inter damoj sci's skribi pl'ol⁶ amleteron ka kelkaj sci's nur etikedi siajn konfitaĵojn "Jen cidonioj kun pomoj" k aliaj klopodigis sin por meti sian nomon en registrolibron de nuptoj. Multaj ade venis al mi por ke m skribu por i amleterojn k amara tasko ja stas skribi amleterojn d aliaj virinoj el propra brulanta kor.

Nur dank al Sinjor Beguildy mi povas skribi ĉiĉion. Li lernigis min legi ka skribi ka kalkuli. Ka kvankam on predikis kontre li ka l⁷ pretendis povi fari multon kion miakrede li nenjam povus ka kvankam l okupis sin je aferoj en kiuj ne decas homa sintrudo tamen mi nenjam forgesos danki Dion pro l. Ŝajnas al mi nun tre nekutima efiko de Lia potenco ke L metis en koron de Beguildy lernigi min. Ĉar sorĉisto n povus prave sti nomata servisto Lia sed nur un el servistoj de Lucifer. Beguildy n estis mava nur mankis al li bon kvaz ĉia justec estis elbruligita de flam de li'ardanta mens kiu insistis koni k enmiksi sin en misterojn. Rilate amon nu tivorton li n konis. Li sci's legi stelojn ka taŭdiri stontecon ka l pretendis esti elpelinta spiritojn. Iam mi demandis lin kie troviĝas tistonteco kiun li povas vidi tiel klare. Ka l diris "Ĝi kuŝas kun pasintec infan' en fon de Tempo". Oni nenjam povis superi Sinjoron Beguildy. Sed kiam mi rakontis al Kester kion li diris Kester n akordis. Li diris ke pasinteco k estontec estas du navetoj en manoj d Eternul kiu teksas Eternon. Kester mem estis teksisto ki eble pensigis lin tiel. Sed mi kredas ke ni n povas sc'i ki stas pasinteco k estonteco. Ni stas tr'etaj ka senpovaj sur ter kiu smilas lulilon el verdaj junkoj en kiu homar kuŝas sorrigardante al steloj sed ne sciante k'i stas⁸.

Tuj kiam mi sci's skribi mi faris libron kun kalikota kovril ka ĉiun dimanĉon mi skribis en ĝin pri ĉiu gajafer aŭ bona fortun spertita dum semajn ka tiel mi konservis in. Ka s okazoj stis malkvietigaj k amaraj al mi mi skribis anke tion ka konsoliĝis. Do kiam nia Parson⁹ sciante pri mensogoj rakontataj pri mi petis min

⁶ Pli ol.

⁷ Ka li.

⁸ Kio ili estas.

⁹ Pastro. (La vorto evoluis el la vorto "persono", t.e. la ĉefa persono en la socio.)

Malbeno Kara

skribi en libron ĉion memoratan ka registri tutan veron ka nur tion mi povis freŝigi mian memoron per kion mi skribis dimanĉon post dimanĉo.

Nu ĉi' jam transpasis nun ĝenoj ka loktado¹⁰. Nun stas kvieta veter smile al trankvila vesper post neĝofal kiam ĉiel' verdas ka ŝafidoj blekas. Mi sidas ĉe kamen' kun mia Bibli apude tr'olda virin ka laca kun tasko farenda tal adiaŭi ĉitiun mondon. Kiam mi rigardas tra mian fenestron ka vidas ebenaĵon ka vastan ĉielon kun nuboj sidantaj sur montoj m enmensigas densan vidkaŝan arbaron de Sarn ka ploradon de lago sub surkuŝanta glaci ka kiel akv eniris ŝrankon sub ŝtupar kiam ĝ altiĝis pro neĝo degelanta. Tie ne multa ĉiel' videblis krom tispegulata de lago sed ĉiel' en lago n estis vera ĉiel'. On vidis ĝin per spegul malhele¹¹ ka longaj ombroj de junkoj maldike k akre kaŝis glitantajn stelojn k eĉ sun ka lun povis estingiĝi tie ĉar fojfoje lun perdiĝis inter nimffolioj ka fojfoje arde' staris taŭ sun.

¹⁰ Luktado.

¹¹ "Per spegulo malhele" estas frazero el la Biblio, signifanta "neklare". Bibliaj citaĵoj estas tre oftaj en ĉi tiu romano.

Ĉapitro 2: Informi abelojn

Mia frato Gideon naskiĝis en jar kiam milito kontre francoj komenciĝis. Jen kial Patro insistis nomi lin Gideon ĝi ja stas militeca nom¹². Jancis diradis ke ti stas tre bona nom por li ĉar on ne povas kurtigi ĝin. On povas konverti plej multajn nomojn en etajn karesnomojn samkiel on povas pertonde nanigi mantelon aŭ robon por infan. Sed pri Gideon ti n eblas. Ka nom smilis homon. Mi sentis korinklinon al mia frato pl'ol plej multaj sed mi n povis n observi tion pri l. Se nenju vokas vin laŭ via nom verŝajne via nom bald estos elmensiĝinta. Ka plej multaj homoj nenjam eĉ vokis lin per lia krista nom¹³. I nomis lin Sarn. Dum Patro vivis temis pr'Olda Sarn ka Juna Sarn. Sed post morto de Patro Gideon ŝajnis identigi sin kun loko. Mi memoras lian eliron dum tisomera vesper ka l ŝajnis manĝi ka trinki lokon vorante ĝin perokule. Sed ne pro am al ĝi sed pro kion li povos akiri el ĝi. Li tre smilis Patron tiam ka pli smiliĝis lin ĉiujare k aspekte ka mense. Krom ke l stis men kolerema ka pli fikskutima li stis Patro enkarniĝinta. Patro koleriĝis terurrapide ka kiam kolera li stis ĉionvora leon'. Eble pro ti Patrino aspektis tutkorpedzinigita. Sed Gideonon mi vidis kolera ĝustadire kolera nur trifoje. Plejofte un okulĵeto sficis. Li kutimis rigardi murdeme k on tuj cedis al lia vol. Mi ja vidis hundon kaŭri ka jelpeti ĉar li timaniere rigardis ĝin. Sarnoj kutime havas grizajn okulojn—fride grizajn kiel lago dumvintra—ka Sarnviroj stas plejparte brunhaŭtaj ka silentemaj. “Silentaĉa kiel Sarn” estas ondir en tiregion'. On diras anke k estas i'stranga en famili ekde kiam Timothy Sarn estis trafita de forka fulm en epoko de religiaj militoj. Sarnoj loĝis ĉitie titempe ka ĉiam ekd' unuaj loĝantoj. Nu Timothy agis kontre sia famili ka konsiloj de Diservisto k aliĝis al malĝusta parti'—ki'ajn ĝ estis sed ti n gravas

¹² En la Biblio Gideon estis grava militisto.

¹³ En kristana kulturo oni donas personan nomon al la bebo dum speciala religia ceremonio, do nomas la personan nomon la “krista nomo”.

nun. Tial fulmo trafis lin ka l kuŝis kvaz morta. Iom poste li resaniĝis ka Diservisto konsilis lin apogi fidindan partion k eviti fulmon. Sed Sarnoj ja ĉiam obstinadas. Li restis en sia parti' ka revenante hajmen sub kverko li stis retrafita. Ka ŝajne fulm eniris lian sangon. Li taŭsci's kiam tempesto pretiĝas longe tal ĝi venis k on diris ke kiam ŝtorm ekis sovaĝa fajr fosforeskis ĉirke li tiel ke nenju povis proksimiĝi lin. Sarnoj havas fulmon en sang ekde lia epoko. Mi demandas min fojfoje ĉu ti stas veraĵ aŭ ĉu ĝ estas tro malnova por esti vera. Arbar ka bien ka kirko ĉe fora lim de lag estis ĉiuj tiom malnovaj kvaz apartenantaj al ies sonĝo. Lok estis anke hantata ka ĉar on timis iri tien post noktiĝo ka ĉar estis softa plaŭdo de fiŝoj saltantaj for de lagobordo ka ĉar boato de Gideon batetiĝis kontre ŝtupojn estigante frapetojn kvaz de person' ĉe pordo ka ĉar digoj etendis sin en lagon ĝis preter vidpov ekde iomete for de nia ĝardenpordo ĝis kie ĝ perdiĝis en akvo tial ĝ estis tre soleca loko. Multfoje dimanĉvespere dampita sonorilado tintis trans akvon. Ni kredis ke temas pri sonoriloj de vilaĝo subлага sed nun mi kredas ke temis nur pr'e'ado de sonoriloj en nia propra kirk. Ondire en kelkaj lokoj son batas kontre arbobarieron ka resaltas kvaz pilko.

Dum un el tidimanĉvesperoj kiam dampita sonorad akompanis niajn proprajn kvar sonorilojn ni senpermeso mankis en kirko jam duan fojon. Ĉar vesper estis tiom bela ka Patro ka Patrin okupadis sin pri svarmantaj abeloj n'interkonsentis preni hundforpermeson ka ĉe ĉerkopord atendi Jancison k instigi ŝin akompani nin. Olda Beguildy nenjam multinsistis ke ŝ ĉe'stu en kirko ĉar li mem n estis tre amika al parson'. Li forsendis ŝin kiam horloĝ indikis kvinan horon ĉiun kvaran dimanĉon—ĉar ĉe n'okazis¹⁴ diservo nur unfoje dum ĉiu monato parson' ja devis prizorgi kirkon en Brampton lia loĝvilaĝo k ancor alian ka sekve nia forvag estis des pli fia—sed ĉu ŝ alvenis frue tarde aŭ tutne li nenjam demandis des men li demandis ŝin pr'enhavo de prediko. Nia patro kutimis lastage en vesper pridemandi nin kiam ni jam estis en niaj dormovestoj. Patro sidis sur benka kanapo kun betula verg enmane ka kanapo kiu dum tuta semajn aspektis granda meblo

¹⁴ Ĉe ni okazis.

subite aspektis nana kvaz kanapo por pupo. Sur ki ajn Patro sidis l aspektigis ĝin nana. Ni staris nudpiede taŭ li sur fridaj ŝtonplatoj en neblankigitaj hajme ŝpinitaj dormoroboj kiujn nia patrin ŝpinis ka migra teksisto teksis supre en mansardo per teksil inter pomoj. Patro pridemandis nin ka kiam ni respondis malĝuste li faris markon sur kanapon ka ĉiu marko signifis vergobaton je fin de demandado. Kvankam Patro ne sci's legi li forgesis nenjon. Ŝajnis kvaz li ĉiam cerbumadis dum li laboris. Mi kredas ke l stis tre inteligenta sed ne havis s'fice da mensekzerco. Se l havus un el tiuj novmodaj teksmaŝinoj pri kiuj m aŭdas ti stus por li kontentiga sed tiepoke on ankor ne parolis pri tiaferoj. *Ni* stis liaj solaj maŝinoj ka n'tr'elkore¹⁵ deziregis ĉiun kvaran dimanĉon ka Kristnaskon ka Paskon esti gefiloj de Beguildy malgre ke nia parson' tiom malestimis lin k ofte predikis kontre l eĉ nomante lin.

M enmense havas kiam Patro vergis nin tre severe post longa prediko dum Paska Dimanĉo—Gideon estis sep- ka m kvin-jara—Gideon ekstaris en mez de kuirej ka diris “Mi volegas ka deziregas esti fil de Mestro Beguildy ka Diablo prenu mian animon. Amen.”

Patro koleregis tivesperon pri ti n estu dubo! Li teruralkri's Patrion dirante ke ŝ tre mave prizorgis siajn infanojn ĉar knabin portas sur si markon de Diablo ka nun ŝajnas ke knabon formis sama forĝisto. Tion mi scias ĉar Patrin rakontis ĝin al mi. M enmense havas nur ke ŝ ekaspektis tre nana k estante jam eta ŝ ŝajnis esti fein. Ka ŝ diris—“Ĉu mi devigis leporon transpaŝi mian marŝvojon? Ĉu mi devigis?” Sonis tre strange kiam ŝi ripetadis tion. Mi povas vidi nun tiĉambron se m fermas okulojn precipe se buked el primoloj apudas min. Ĉar Pasko venis tarde aŭ en periodo de varma veter tijaron ka primoloj stis tre maturemaj en senventaj lokoj tial ni jam plukis kelkajn. Ĉambro estis senluma kiel groto ka ruĝa fajr brulanta trankvile k atenteme smilis okulon d Eternul. Estis ruĝa okuleto sur ĉiu fajencaĵo sur bretar kie ĝi reĵetis brilon. Fojon post foj en postaj jaroj mi rigardadis tiruĝajn lumojn kiuj e'is fajron samkiel fantomaj sonoriloj e'is sonorilaron ka m pensadis pri kiel i stas parto d eksteraja de tiĉi mondo. Vic post vic de ruĝaj vervaj fajroj sed ĉi' nur ombroj de fajroj. Multa tintado de gajaj

¹⁵ Kaj ni tre elkore.

sonoriloj sed nur ombroj de sonoriloj nur sona sopir resaltanta de folibariier aŭ de vitrec'akvo. Okuloj de Patro same redonis glimon anke tiuj de Gideon sed ne de Patrin ĉar ŝi staris dors-al-fajre apud tablo kie stis primoloj kunigante trinkvazojn ka telerojn post vespermanĝo. Ka se ŝajnas strange ke tiel juna infan povas memori pasintecon tiel klare on devas enmensigi ke Tempo gravuras siajn bildojn sur memoron kvaz knabo ĉizanta literojn per sia tranĉil ka ju men da literoj des pli profunde li ĉizas. Tioma malmult okazis al ni ĉe Sarn ke ni nenjam povus forgesi. Voĉo de Patrin kroĉiĝas al mia kor kiel trenaĵoj de litpajlo kroĉantaj sin al pasanto sur kampa voj. Ŝia voĉ estis tre plendema ka softa. Ĉiu diraĵo ŝia ŝajnis signifi pl'ol vortojn mem ka fojfoje stis kvaz iu palpadas en mallum aŭ sobiras longan vojon laŭ nigraj tuneloj etendante un manon ĉiflanken k alian aliflanken ka tutsen lum. Jen kial ŝi diris "Ĉu mi devigis leporon transpaŝi mian marŝvojon—ĉu mi devigis?"

Je ĉiu sia diraĵ eĉ se ĝ enhavis nenjon gajan ŝ iomete ridetis samkiel on ridetas por malakrig'ies koleron aŭ s on vundetis sin sed ne volas montri tion. Tre dolora rideto ĝ estis ka konstanta. Do kiam Patro denove vergis Gideonon ĉar ĉiti deziris esti fil de Beguildy Patrin staris ĉetable dirante "Ho ne vergu Sarn! Detenu manon Sarn!" ridetante kvaz por kapti manojn de Patro per sia softa voĉo. Povra Patrin! Ho mia povra Patrin! Ĉu ni renkontos vin en postmorta mondo kar'aniam ka kompensas al vi pro nia neatentem?

Mi nenjam forgesis tiPaskon sed ŝajne Gideon forgesis ĉar kiam mi memorigis lin pri ĝ dirante ke ni certe n aŭdacu preni hundforpermeson li diris "Ne malfacile. Ni devigos Tivvyn de Sakristian' aŭskulti predikon por ni por ke ni povu respondi bone. Ka n estos tre grave al mi se m vergiĝos kondiĉe ke m povos trovi kelkajn bonajn konkajn por venki Jancison ĉar lastafoje ŝ venkis min."

Konkoj v eble scias estis de helikoj k infanoj traŝnurigis malplenajn ka ludis samkiel on ludas per kaŝtanaj ŝeloj. Ni'arbar estis bonega loko por helikoj ka Gideon konkursis perkonke kontre

knaboj el eĉ kvin mejloj for trans Plash. Li stis ĉie fama ĉar li ludis tre furioze ka tutne ludece.

Ĉiuj sonoriloj sonadis dum n'ekiris tijunian dimanĉon—kvar metalaj sonoriloj en kirko ka kvar fantomaj sonoriloj el nenje. Patrino helpis Patron pr'abeloj pretigante novan abelkorbon apud granda kaŝtano por enmeti svarmon. Tiuj jam taŭse ariĝis en mortinta grosarbusto ka Patrino diris kun sia stranga rideto “Nepre signo de morto”.

Sed Gideon kri's—

Bonvena maja svarm ka mono ven's al farm.

Prosper benos se svarm junie venos.

Ka l diris—

“Patrino dum abeloj restos ĉe ni stas plej bone al ni negrave kiu mortos.”

Ho ve! Mi timas ke Gideon havis spiriton tre *haveman* eĉ tiam. Sed Patro opini's lin prudenta junulo ka l ridis ka diris—

“Nu ni havas timulton d abeloj nune ke m esperas ke n mi devos inform'in s iu efektive mortos.”

“Kie stas viaj rosmarenaj branĉetoj ka Preĝlibroj ka puraj nazviŝtukoj?” diras Patrino.

Gideon esperis foriri sen tiuj sed nun li kuris in preni ka Patrino komencis aranĝi mian ŝalon sur miaj ŝultroj. Ŝi enmetis sian grandan broĉon kun nigra gem kiun ŝi havis kiam mortis Reĝo George Dua k enmetante ĝin ŝi ripetadis al si—“Kvankam ja ne gravas kiel povra infano stas vestita. Ho ve ho ve! Sed ĉu m devigis leporon transpaŝi mian marŝvojon? Ĉu mi devigis?”

Kiam ajn ŝi diris tion ŝia voĉo fariĝis tre funebreca ka m denove pensis pr'iu palpanta en nigra tunelo.

“Tentu Patrino! Tenu korbon dum m apogas branĉon” diris Patro “i svarmas tre base.”

Mi preferus resti ĉar mi tr'amis vidi grandan bulon d abelkorpoj brunan kiel Kristnaska kuko k aŭdi pezan zumadon.

Ni trairis pardon de ĝardenbarilo ka sekvis kanalpadon ĉar ĝ estis plej kurta vojo al kirko ka ni volis atingi Tivvyn tal ŝ eniros. Fulikoj jam estis sur lago k akvo estis lumkolora k en ĝ estis spikoj.

“Nun” diris Gideon “ni kuros savi nin!”

“Ki ĉasas nin?”

“Homoj el akvo.”

Do n’ekkuris “por savi nin” k atingis kirkon ĝuste kiam du lastaj sonoriloj komencis sian batan “*Ting tong! Ting tong*” kiu ĉiam enmensigis al mi betulan vergon.

Ni sidis sur plata tombo kie ni plejofte sidis por ludi *Konkrojn* ka ĉar kirk estis sur nana monteto ni povis rigardi dutri homojn venantajn tra kampoj. Jen Tivvy kun sia patro venantaj el Orienta Bosko ka Jancis en plataj apudlagaj herbejoj kie grandaj kratagaj heĝoj floris. Jancis estis eta n alta kiel mi sed on ĉiam vidis ŝin tal aliajn ĉar ŝajnis kvaz lum kolektiĝis ĉirke ŝin. Ŝia harar estis orflava k ombroj sur ŝia vizaĝo ŝajnis tinkturitaj per ĝia pala kolor. Mi kutime pensis ke ŝ smilas blankan nimfeon plenan de flava polen’ aŭ miel. Ŝi havis tre blankan haŭton kreme blankan sen kolor krom kiam ŝ ekscitiĝis aŭ embarasiĝis ka ŝia vizaĝo havis vangokavetojn k estis mola kun tutĝusta dikeco. Ŝi havis ruĝan ridetantan buŝon ka kiam ŝi ridetis vangokavetoj kuniĝis. Kelkfoje mi preske strangolis ŝin pro tirideto.

Ŝi venis al ni tre modesta portante florumitan korsajon ka bluan jupon ka grapolon da kratag en sia ŝal.

Kvankam ŝi havis nur du jarojn pl’ol mi stante samaĝa kiel Gideon ŝi ŝajnis multe pl’aĝa ĉar ŝi jam komencis rideti al knaboj k on diradis “Jancis de Beguildy bald amindumos.” Sed mi sci’s k olda Beguildy nenjam intencis ke ŝ ediniĝos. L intencis gardi ŝin kiel logilon por altiri junulojn ĉar plejparte homoj venantaj al li stis aŭ junulinoj sen mon aŭ olduloj kiuj deziris ke l damnu iun nemultekoste. Do titempe kiam li vidis kia blanka floranta virin ŝi fariĝas li kuraĝigis ŝin ornami sin ka sidi ĉe fenestro de Grota Dom atendante k’iu laŭiros padon. Ĝis festo de Sankta Nenjam on devus tion atendi ĉar Plash estis preske tiel soleca kiel Sarn. L anke faris laternon¹⁶ el farbita vitro kun kolor de ruĝaj rozoj ka dum Jancis sidadis ĉe ŝtona kadro de fenestro li pendigis ĝin super ŝi k en ĝ estis granda kandel el fremdio¹⁷ ne junklampro kian n’uzis. Li pensis ke s iu granda sinjora moŝto venos survoje al kermes aŭ kokbatal trans montoj l enamiĝos je ŝ ka Beguildy

¹⁶ Lanternon

¹⁷ Fremda loko.

planis tiam envenigi lin ka doni al li fortan elon ka paroli pri sorĉoj ka magiaĵoj ka finfine proponi persorĉe levi Veneran el morto. Ĉi stis skribita en un el liaj libroj k'on iru en senluman ĉambron ka donu al mag'isto kvin pundojn ka l diros sorĉaĵon k iom poste stiĝos roza lum k odor de rozoj ka Venera leviĝos nuda meze de ĉambro. Sed n estus Venera stus Jancis. Sed tigranda sinjora moŝto longe ne venis ka nura vir kiu vidis ŝin ĉe fenestro stis Gideon un vintran vesperon dum li revenis tivoje de bazar ĉar alia voj stis inundita. Li stis ĝisridinde impresita de ŝ ka paroladis pri ŝ ĝis m enuis li stis tiam deknauĵara — aĝo de stultec en junuloj. Taŭe li nenjam atentis ŝin ka nur diradis al ŝi tion k ion samkiel al mi. Sed poste li stis nur malsaĝplena rilate ŝin. Sed tivespere li stis nur deksepjara ka l diris nur “Prenu forpermeson de hundo Jancis ka venu kun ni serĉi konkrojn.”

“O” diris Jancis “mi volis ludi *Verda Gruzo Verda Gruzo*.”

Ŝi kutimis diri “O” taŭ ĉi' ka ti aspektigis ŝian buŝon kia rozon. Sed ĉu ŝ agis tiel ticele aŭ ĉar ŝ estis stulta ka timema tion mi nenjam povis decidi.

“On ja ne venkas en *Verda Gruzo*” diris Gideon “ni ludos *Konkrojn*.”

“O mi volis *Verda Gruzo*! Vi venkos min se ni ludos *Konkrojn*.”

“Ja's¹⁸. Tial ni ludos.”

Tivvy venis tra ĉerkopordon tiam ka n'diris al ŝi kion ŝi devos fari. Ŝ estis povra malsaĝa kreito ka fojfoje ŝ apen povis enmensigi eĉ sian nomon malgre ĝia strangecco des men predikon. Sed Gideon diris ke se ŝ memoros eĉ nur ereton de ĝ li povos elpensi ceteron. Ka l diris ke se ŝ ne memoros sfiĉon li detordos al ŝi brakon. Do ŝ ekploris.

Tiam ni vidis Sakristianon tre seriozan veni trans plugitan kampon kun sia longa baston' str'ita nigre ka blanke ka n'povis aŭdi dukoloran poneon de Parson klakklake troti laŭ pado do ni forkuris ka lasis Tivvyn kun ronda menton' tremanta ka buŝo tordita pro plorado ĉar ŝi sci's ke ŝ nenjam memoros eĉ vorton de prediko. Tivvy dum prediko ĉiam pensigis min pri nia hundo dum

¹⁸ Jes.

li stis lavata. Li kuŝiĝis ka lasis akvon flui sur lin ka ŝ agis same rilate predikon. Do m sci's ke katastrofo koviĝas.

Stis bela vesper kun hirundoj altaj en aer ka forta odor de kratago. Kiam sonoriloj ĉesis soni tiniaj ka ti aliaj n'iris rigardi en akvon por trovi ĉu n'povos vidi vilaĝon tie samkiel n'agis plej multajn dimanĉojn. Sed tie stis nur nia kirko renversita ka dutri toboŝtonoj ka krucoj en sama pozici' ka pone' de Parson paŝtanta sin dum ĝi staris sur sia kapo.

Dum someraj vesperoj kiam sun estis basa kelkfoje ombro de spajro venis tuttrans akvon ĝis nia loĝej ka m kredis ke ti stas kia fingr d Eternul direktita al mi. Ni subiris en marĉejon ka trovis multajn konkojn ka Gideon venkis Jancison ĉiufoje ki stis bona ĉar fine l diris ke l ludos *Verda Gruzo* k i ambaj kontentiĝis. Sed ni terure tardis ka preske n atingis Tivvyn.

“Nun rakontu!” diras Gideon. Do ŝ komencis plori ka diris ke ŝ scias nenjon pri ĝ. Li tordis al ŝi brakon ka ŝ elkri's “Forbruligitaj ekstermitaj per fajro!”

Ŝi certe diris tion ĉar ĝ estis un el teksteroj kiujn Sakristian' tr'amis citi ĉiam batante takton per baston'.

“Kion pli?”

“Nenjon.”

“Mi tordos al vi brakon ĝis ĝi forŝiriĝos se v ne memoros plion.”

Tivvy mienis ruze kiel Katinj en laktej ka diris—“Parson rakontis al ni pr'Adam k Eva ka Noa ka Ŝememkjaŝet ka Jesu en staltrogo ka tridek arĝentaj moneroj.”

Vizaĝo de Gideon mallumiĝis.

“N estas senc en ti” li diris.

“Sed ŝi ĉiakaze diris al vi. Nun vi devas lasi ŝin foriri.”

Do ni hajmoniris k ombro de spajr etendis sin tuttrans lagon.

Patro diris: “Ki stis teksto?”

“Forbruligitaj ekstermitaj per fajro.”

“Pri ki temis prediko?”

Povra Gideon elpensis rakonton el ĉi' dirita de Tivvy. Vi nenjam aŭdis tian elpenŝaĵon! Patro sidis tre kviete ka Patrin ridetis tre doloroplene starante ĉefajre kuirante lardon.

Subite Patr elkri's—

Informi abelojn

“Mensoganto! Mensoganto! Parson jam ĵus vizitis ka diris ĉu stas malsan pro ke nenju stis en kirko? Vi ne nur prenis forpermeson de hundo ka mensogis v anke ridindigis *min.*”

Lia jam ruĝa vizaĝo fariĝis purpura k elstaris vejnoj kiel nekuirita viand. Estis timiga vidaĵo. Poste l prenis ĉevalvapon ka diris—

“Mi vergos vin kiel nenjam taŭe mia knabo!”

Li venis tra kuirejon al Gideon.

Sed subite Gideon kuratakis lin ka kapfrapis lin ka per sia surprizatako tutrenversis lin.

Nu ĉu ĉar Patro jam manĝis tre multe post tago da peza labor pr’abeloj ĉu ĉar li tiom koleregis ka surprizis lin fal ni nenjam sci’s. Kial ajn li kolapsis. Li tutne moviĝis sed kuŝis surdorse sur ruĝaj ardezoj spirante tiom laŭte ka forte ke son plenigis domon kiel iu ronkanta dumnokte. Patrin malligis lian dimanĉan koltukon ka levis lin ka ŝutis fridan akvon sur lian vizaĝon sed tutvane.

Terura ronkado daŭris ka ŝajnis formanĝi ĉiujn ceterajn sonojn. I estingiĝis kiel junklampoj en vento. Ne plu stis tiktakado de horloĝo nek ronronado de kato nek siblado de lardo nek zumado d abel ĉefenestra. Ĝi ŝajnis formanĝi anke lumon k odoron de blankaj sovaĝaj rozoj eksteraj ka senton en mia korpo ka pensojn kiujn mi taŭe havis. Ni ĉiuj fariĝis nur parto de mallumeca ronkado.

“Sarn Sarn!” kri’s Patrin. “Ho Sarn povranim rekonsci’gu cin!”

Ŝi klopodis met’iom da Holanda inter liajn lipojn sed i jam stis rigidaj. Poste ronkado fariĝis stertor tre terura ka nelge ĝi ĉesis ka tiam fariĝis timiga silento kvaz tuta mondo fariĝis muta. Tutdume Gideon staris kvaz ŝton memorante vergon per kiu Patr intencis bati lin li diris poste. Ka kvankam li nenjam taŭe vidis mortanton kiam Patro silentiĝis ka dom sensoniĝis li diris per voĉo kutimeca sed iomete tremanta—

“Li mortis Patrin. M iros informi abelojn por ke ni n perdu in.”

Ni ploris longe Patrin ka mi ka kiam ni n povis plu plori etaj sonoj revenis rampe—horloĝo tiktakis ka pecoj de ligno falis el fajr ka kato spiregis dormante.

Malbeno Kara

Kiam Gideon revenis ni tri sukcesis levi Patron sur matracon ka vindi lin per pura tolaĵo. L aspektis bela bontrajta vir ĉar purpura kolor jam foriris de lia vizaĝo.

Gideon ŝlosis pordojn ka ĉirkeris inspekti bestojn ka kontroli ĉu ĉi' stas en ordo.

“Plej bone v enlitiĝu Patrin” li diris. “Ĉi' stas sekura ka bestoj stas en siaj ejoj. Mi raportis al ĉiu korbo d abeloj ka m povis vidi k'i kontentas ka volas ke m fariĝu mestro.”

Ĉapitro 3: Pru liveras invitilojn

Tiepoke stis nemulta tempo dum kiu funebrantoj povis pensi pri sia dolor ĝis post enterigo. Mult estis farenda. Funebra ceremoni' stis preparenda ka taŭ ti se teksisto n vizitis familion lastatempe ŝtof estis teksenda ka tinkturenda. Teksisto n vizitis nin jam delonge do al ni multe mankis ŝtofo.

Patrin diris al Gideon ke l'iru venigi oldan teksiston kiu loĝis en Lullingford apud montoj k eliradis teksu kontrakte potage aŭ posemajne. Gideon selis Bendigon ĉevalon de Patro ka kun stranga rideto prenis rajdvipon. Tuj post lia forir Patrin ka m komencis baki. Ne nur teksisto devos esti manĝigata sed anke virinoj kiujn n'invitos al porfunebra kudrad. I venos pro am ti stis kutima sed ni devos manĝig'in.

Stis solece tinokte sen Gideon. Li devis tranokti en Lullingford sed li revenis frue sekvan tagon ka m aŭdis sonojn de hufoj sur pavimŝtonetoj dum mi ŝpinadis. Ni forte laboris preparante teksfadenojn por oldul. Li venis rajdante post Gideon sur granda blanka ĉeval tr'osteca kiu pensigis min pri rajdanto sur blanka ĉeval en Bibli. Ĝis tempo de Sankta Nenjam vi n vidus pl'oldan homon. Li hopadis ti'n ka re'n kvaz pigo priserĉante ĉiun parton de teksil rigardante glitbobenon ĝuste kvaz pigo tre kontenta pr'ia brila trovaĵo. Mi devis sorporti liajn manĝojn al mansardo ĉar li n volis perdi tempon per manĝopaŭzoj. Stis tr'oportune ke n plu troviĝis pomoj tie tiel ke l povis hopadi en mansardo senbride. "Nun vi devas liveri invitleterojn por kudrado Pru" Patrin diris al mi.

"Ĉu m portu invitilon al Jancis Patrin?"

"Ne. Ni n elspezu pagante invitilon por Jancis. Sed ŝi rajtas veni k estos bonvena."

"M iros informi ŝin. Ŝi kudras tre bele."

"Sed ne tiel bele kiel vi mia kara. Negrave pri ki temas ci kudras bele rekte Pru."

Mi forkuris ege kontenta pro laŭdo kian malofte mi spertis. Mi renkontis Gideonon apud lago.

“Disdonante invitilojn?” li diris.

“Ja’s.”

“Ĉu Jancis venos?”

“Ja’s.”

“Nu kiam tie petu Beguildyn prunti al ni blankajn bovojn por funebro ĉu ja?”

“Por tiri Patron al kirko?”

“Ja’s. Ka post enterigo de Patro vi ka mi devos iom diskuti. Stas multo pripensenda pr’estonteco. Tiom d invitiloj vi ja povus mem skrib’in ka ŝpari kronon¹⁹.”

Mi demandis al mi kion li celas ĉar li ja sci’s ke m ne kapablis skribi eĉ un vorton sed mi sci’s ke l klarigos kiam li stas preta ka n taŭe ĉar tia li stis. Nenju kredus ke l aĝis nur deksep li ŝajnis kvin-ka-dudek-jara laŭ sia parolmanier abrupta ka rapida tamen tre kvieta.

Kiam m atingis Plashon Jancis sidis en ĝarden ŝpinante. Ŝi diris ke ni ja povas prunti bestojn kiuj laŭrajte stas ŝiaj ĉar i stis donaco de ŝi’Avinjo kvankam ŝi nenjam estis sfiĉe forta por regi bestojn taŭ ĉar’ nek por plugi per i kiel mi en postaj jaroj. Sed ŝi ricevis iom da poŝmon’ luigante in por mortofestoj se Beguildy n enpoŝigis ĉiom. I’spektis belaj kun floroj ka rubandoj post frotlavado.

M eniris paroli kun Beguildy.

“Patro mortis Sinjor Beguildy” mi diris.

“Ka do? Kiel ti koncernas min kara?”

Li stis tre stranga hom ĉiam tiBeguildy.

“Diru al mi ion ne jam sciatan infan” li diris.

“Ĉu v do jam sci’s?”

“Ja’s mi sci’s ke via pejtro forpasis. Ĉu l ja ne preterpasis min en ventotir lastan dimanĉan vesperon kriante malsonore ka malice ‘Vi ŝuldas al mi kronon Beguildy!’ Diru al m iaĵon freŝan knabin—novan ka strangan. Jen se v povus diri ke folioj ĉiuj defalis ĉititagone de juni ka miaj damsoj pretas por vendi aŭ ke lag

¹⁹ Arkaika monunuo brita.

elsekiĝis aŭ ke homoj ne plu avidas dolori sian amaton aŭ ke Jancis ne plu rigardadas sian vizaĝon en Plashflako—nu jen ja jes dirinde! Sed pri via paĉjo nenjom gravas. Tivir ne plaĉis min.”

Ka preninte sian marleteon li frapis vicon da silikoj ĝis ĉambro stis tutsorĉita. Ĉiu siliko havis propran voĉon ka l konis in kiel paŝtisto siajn ŝafojn ka l kutimis sonorig'in kiam konversaci' ne plaĉis al li.

“Mi venis demandi ĉu n'povas prunti bestojn por nia ĉarego. Jancis diris ke jes.”

“Pagdeventas.”

“Kiom Sinjor?”

“Samon kiel por mortofestoj un pencon por ĉiu. Do v liveras invitilojn ĉu? Nu kiun pagis via panjo por skribig'in?”

“Parson skribis in por ni ka Patrin metis kronon en almozujon.”

“Povrul! Ki'amara malŝpar! Mi skribus in tre klare ka bele kontre duonomo²⁰. Mi scias skribi altajn literojn ka nanajn rondajn aŭ kvadratajn ruĝajn aŭ nigrajn. Parson scias nur prajdik²¹skribon veran aĉaĵon.”

“Mi volegas sc'i skribi Sinjor Beguildy.”

“Ho vi!”

Li ridis laŭ sia tre stranga manier milde ka leĝere ĉe supro de kapo.

“Ĝi n estas por infanoj” li diris.

Sed mi multe pripensis ĝin. Mi pensis ke stus bele sidi ĉe kamen en kanapangul ka skrib'invitilojn k amleterojn ka foirfakturojn aŭ eĉ verson por tomboŝton' ka fari rondajn aŭ kvadratajn altajn aŭ etajn ruĝajn aŭ nigrajn k anke prajdikskribon se m emus. Mi pensis ke kiam iu kolerigus min per sia beleco kiel Jancis mi skribus ŝiajn literojn densaĉe tutsen ruĝo. Sed mi sci's ke ti stas fipens ĉar povra Jancis ne kulpis pri sia belec.

Poste Beguildy foriris kuraci kalojn d iu oldul ka Jancis ka m ludis geamantojn sed Jancis diris ke m ludas tre mave ka ŝ opinias ke Gideon ludus mult'pli bone.

²⁰ Duona kvanto (da mono).

²¹ Predik-.

Ĉapitro 4: Torĉoj ka rosmarenoj

Stis senventa rosa somera nokto kiam n'enterigis Patron. En nia epok estis ankore kutime en Sarn-region enterigi mortintojn nur dumnokte. En nia famili' on faradis tion jam dum jarcentoj. M estis okupata dum tuta tag ornamente ĉaregon per taksus' ka tiblanka floranta laŭro ki'odoras tiel trude ka dolĉe. Mi deŝiris ĉiujn blankajn rozojn ka dutri florantajn helruĝetajn ka kompletigis per lekantoj apartigitaj el fojnherbar. Plukante in mi pripensis kiom kolerus Patro vidi min tie surtretantan ĝin k apen m evitis turni min fojfoje por vidi ĉu l venas.

Post melkado Gideon iris venigi bestojn ka m metis nigrajn rubandojn ĉirke kolojn ka ligis taksusbranĉojn al kornoj. Mi devis zorgeme fari tion ĉar i stis de ras Longakorna ka s on kolerigas in i tuj mortpikas.

Muelist estis un ĉerkoportanto k alia stis Sinjor Callard de Valeto Callard ki'kultivis tutan teron inter Sarn ka Plash. Krome stis niaj du onkloj el transmonte.

Gideon ĉeffunebranto portis altan ĉapelon kun nigraj rubandoj ka nigrajn gantojn ka spiralan nigran bastonon kun rubandoj. Daŭris longe tal i sukcesis trapuŝi ĉerkon ĉar pordoj stis tre mallarĝaj ka ĉerko granda ka peza. Ĉiam stis tiel dum funebrojn en Sarn tamen ŝajne nenjam iun trafis pens plilarĝigi pordojn.

Sakristian' taŭis senĉapela ka portante grandan torĉon enmane. Sekvis lin ĉar' ka Muelistfil k alia junul kondukis bestojn. Sur ĉar' estis amasigitaj folioj ka branĉoj ka ĉiuj laŭdis min. Sed mi povis teni enmense nur ke povra Patro kutime ordonis min forpreni tifiajn herbaĉojn eldomen. Ka nun jen ni forprenas lin skuante lin pro ŝtonoj for de loko kie li stis mestro. M estis tutmaltrankvila pro ĉi'. Ŝajnis al mi vere malafable k anke senrespekte lasi povran animon tutege sola ĉe alia fin de lago. Min feliĉigis ke stis dolĉa junia veter ka n mallume.

Ni devis iri laŭ plej longa voj ĉirke lagon ĉar alia stis nura padeto. Elirinte gregejon preter sterkamas' ni troviĝis sur voj k

envicigis nin—Gideon sola maltaŭ ĉerko poste Patrin ka m en niaj nigraj kufĉapeloj ka ŝaloj tenante Preĝlibrojn ka branĉetojn de rosmaren' enmane. Onkloj ka Muelisto ka Sinjor Callard sekvis nin ĉiu kun torĉo ka branĉeto de rosmaren.

Ĝ estis bona voj ka pli glata ol plejmultaj—voj al Lullingford. Parson ofte diris ke ĝ estis farita de homoj vivantaj dum tagoj kiam vivis Savinto. Romianoj jen ties nom. I ja sci's tre bone fari vojon ne grave ki' stis nom. Ĝi situis nur iom pl'alte ol akv apud bordo de lago ka dum n'iris solene taŭen mi rigardis en akvon ka vidis nin tie. Stis malklara bildo ĉar sola lum tie venis de malkreskanta nebula lun ka de torĉoj. Sed eblis vidi en malhela akv ion moviĝi ka glimojn ka briletojn ka kiam lun trabrilis klare ni ricevis formojn kvaz ombrojn de fiŝoj glitantaj en profundaĵo. Videblis granda nigraĵo ti stis ĉar' ka bovoj smilis nubojn drivantajn tre base ka torĉoj aspektis akvenĵetitaj kvaz ni volis esting'in.

Tutdum ni marŝis ni povis aŭdi sonorilojn voki kadavron hajmen. I sonis tre strange super akv en dezerteca nokto k e°oj sonis eĉ pli strange. Unfoje blanka strigo preteriris tiel leĝere ka mole kiel blovata plum. Patrin diris ke jen spirito de Patro serĉanta sian korpon. Aŭdiĝis nenja son krom sonoriloj ka knarado de radoj ĝis parsonpone' paŝtanta sin en sia kampo vidis malklarajn formojn de foraj bovoj ka henis kredante mi spozas k'anke i stas poneoj ka ĝojante trovi en tisoleda nokto kelkajn siajn samspecianojn proksimaj.

Finfine knarado ĉesis ĉe atendopordo d enterigej. On elglitigis ĉerkon apogante ĝin sur stabloj ka meze de peza spirado de ĉerkoportantoj venis promesoplenaj vortoj—

“Mi estas la releviĝo kaj la vivo.”

I stis kvaz kvieta pluvo post sekego. Sed mi komencis demandi min kiaj ni revenos en releviĝo?²² Ĉu ni venos klare videblaj aŭ malklaraj kvaz en akvo? Ĉu Patro venos kolerega samkia kiam li mortis aŭ kun formo de knabeto kuranta al Avinjo kun bukedo da primoloj? Ĉu Patrin ridetos tisaman rideton aŭ ĉu jam trovinta lumon en malluma pasej? Ĉu m restos kaptita en korpo neplaĉa al

²² Laŭ kristana doktrino, kiam finiĝos la mondo, la mortintoj re?lev?iĝos por esti juĝitaj de Dio.

mi aŭ ĉu on donos al ni permeson tekxi korpon laŭ nia plaĉ el ŝpinado de niaj animoj?

Ĉerkon on movis sur alian stablon apud tombo ka kovris per blanka tuko. Nia plej bona tablotuko. Sur tuko staris granda stanaloja trinkujo plena de sambuka vin'. Patrin povis provizi nur tion ka stis oportune ke ŝ havis multon—sfiĉon por tuta funebra festo ĉar pasintjara rikolto de sambukberoj stis ege abunda. Ĝi strange aspektis en necerta lunlum starante sur ĉerko ni ja kutimis vidi ĝin sur tablo kun kolor de Jula Ŝtupo respegulata sur ĝi.

Parson paŝis taŭen ka levis ĝin dirante—

“Mi trinkas pacon de forpasinto.”

Tiam ĉiuj venis laŭvice ka trinkis je spirito de Patro.

Apud ĉerkofin estis nia nana stanaloja poto plena de vin ka kun ĝi pankrusto sed nenju tuŝis in.

Sakristian' paŝis taŭen ka diris—

“Ĉu ĉe'stas Manĝanto de Pekoj?”

Ka Patrin ekkri's—

“Ho ve ne! Ve al mi! N estas Manĝanto de Pekoj por povra Sarn. Gideon malpermesis.”

Ankor estis kutime titempe en nia region' doni al iu povrul monsumeton post morto ka ricevinte li prenis panon ka vinon pasigitajn al li transĉerken ka manĝis ka trinkis dirante—

Mi donas konsolon kaj ripozon nun al ci kara homo por ke ci ne marŝu tra la kampoj nek laŭ la vojetoj. Kaj por cia paco mi lombardas mian propran animon.

Ka trankvile ka gravmiene iris al sia loĝej. Mi'Avĉjo diradis ke plejparte Manĝantoj de Pekoj stis iamaj Saĝuloj aŭ ekzorciŝtoj k in trafis misfortun. Aŭ i stis malriĉuloj kiuj pro ia malluma ag estis eksigitaj el kompatema homa soci kun kiuj nenju pretas negoci kies sola manĝaĵ ofte stas pan ka vin pasigitaj transĉerken. Niatempe restis nenju tia en Sarnregion'. I preske ĉiuj formortis k on devis venig'in demonte. Ti stis longa distanco k i postulis altan prezon anstate fari ĝin senpage kiel en taŭa epoko. Do Gideon diris—

“Ni ŝparos monon. Kion bonan tivir farus?”

Sed Patrin ploris ka ĝemis tutan sekvan nokton. Ka kiam Sakristian' diris "Ĉu ĉe' stas Manĝanto de Pekoj?" ŝi ploris refoje tre kompatoveke ĉar Patro mortis dum kolerego portante ĉiujn siajn pekojn ka krome li mortis surhavante botojn ki stas tre maldeca k aŭguras mavon. Tial ŝi kredis ke l vere b'zonis Manĝanton de Pekoj ka ŝ estis nekonsolebla.

Tiam okazis i' stranga korskua.

Gideon paŝis alĉerken ka diris—

"Ja troviĝas Manĝanto de Pekoj."

"Kiu do? Mi vidas nenjun" diris Sakristian'.

"Mi stos Manĝanto de Pekoj."

Gideon levis stanalojan poteton plenan de mallum ka l rigardis Patrinon.

"Ĉu transdonos al mi bienon ka ĉion se m estos Manĝanto de Pekoj Patrin?" li diris.

"Ne ne! Manĝantoj de Pekoj stas damnitaj!"

"Kiel malutilus trinki gutaron de propra vin ka maĉeti kruston de propra pan? Sed se v ne volas tiel estu. Li foriru kovrita de pekoj."

"Ne ne! Lasu lin iri libera Gideon! Lasu lin povran ripozi! V estas vivanta ka juna sed li stas frida ka senpova regata de Satan. Li foriris kovrata de ĉiuj siaj pekoj en siaj botoj povrul! Se nenju helpos lia propra fil kompatu."

"Ka v donos al mi bienon Patrin?"

"Jes jes mia kara! Kiel valoras bien al mi? Vi povas ĉion preni al mi n gravas."

Tiam Gideon trinkis unglute vinon k engorĝigis kruston. Aŭdiĝis nenja son krom tide liaj dentoj dismordantaj ĝin.

Poste l metis sian manon sur ĉerkon starante alte en alta nigra ĉapel kun brilanta pala vizaĝo ka l diris—

"Mi donas konsolon kaj ripozon nun al ci kara homo. Ne venu laŭ la vojoj nek sur niaj kampoj. Kaj por cia paco mi lombardas mian propran animon. Amen."

Tiam ĉiuj suspiris ki sonis kiel vento tra sekaj herboj. Eĉ bovoj ĉe barilpordo ŝajnis al mi suspiri dum remaĉado.

Sed kiam Gideon diris “Ne venu laŭ la vojoj nek sur niaj kampoj” al mi sonis kvaz li diras tion kiel avertante senrajtan trudulon.

Nun estis tempo por ĵeti rosmarenojn entomben. Poste i mallevis ĉerkon ka ĉiuj ĵetis siajn brulantajn torĉojn sur ĝin tiel estingante in.

Finfine do stis finite ka n’hajmeniris laŭ plej kurta voj nur Gideon iris laŭ ĉefa voj kun ĉar’. Ni stis ja nemalmultaj ĉar ĉiuj ĉe’stintoj en Kirko revenis por funebra festen. Forĝisto ka bovpelisto de Plash-bien ka paŝtisto de Monto ka dungito de muelisto ka nemalmultaj virinoj krom kiujn mi jam menci’s.

Patrin jam petis Tivvyn atenti fajron ka prizorgi bolkruĉojn uzatajn por fari spicitajn elon ka laktovinaĵon ĉar aer trafis fride apudakve je tinokta hor.

Kiam n’alvenis hajmon anke Srin Beguildy ka Jancis estis tie. I jam faris bele saltantan fajron ka starigis sur ĝi nun pretan vazon d el’. Ŝ estis afablul Srin Beguildy sed tre malamata ĉar ŝ estis edzin de sorĉisto kontraŭpredikata vir. Oni nenjam invitis ŝin al nuptoj nek baptofesto. Sed ĉ’enterigo kiam famili’ jam s’feris missorton kian malutilon povus far’iu ajn? Srin Beguildy tre volonte vizitadis. Ŝin plaĉus loĝi en Lullingford ka prizorgi butikon ka partopreni dufoje en kirko ĉiudimanĉe ka kanti en or. Nenjom ŝi kredis je sorĉoj d edzo kvankam ŝi nenjam konfesis tion krom al mi ka dutri’ d aliaj konatoj. Iam longe post ĉituij eventoj kiam stis disputoj en Ŝtona Dom pri kiuj v aŭdos ĝustatempe kiam ŝi kverelis kun Beguildy mi hazard’eniris ka trovis ŝin kun botel de Dam Camperdine (l asertis ke l enboteligis spiriton de tioldulin) skuanta ĝin kvaz mismiksitan saŭcon tiom ke m kredis ke kork elsaltos ka krieganta “Mi lernigos vin! Mi lernigos vin! Dam Camperdine ĉu? Plash-akvo! Jen ki stas en ĉitiĉi botel. Plash-akvo ka nenj alia.”

Nur malofte on vidis Srinon Beguildy. Ŝ estis ĉiam ĉe kokoj aŭ anasoj aŭ fosadis en ĝarden aŭ fiŝkaptadis. Ŝi lerte fiŝkaptadis. Sen ti i malsatus ĉar Beguildy nenjam pripensis far’ion krom sorĉi. Ŝi jam bakis por ni aron da funebrokokoj por se ni n havos sfĉajn ka ĉar ŝ estis tiom bonkora ka plaĉaspekta bela kiel Jancis ka

ronda ka laktvinaĵo kiun ŝi faris estis tiom bona ĉiu eĉ Parson forgesis ke ŝi estis edzin de sorĉisto.

“Mi devas repreni bovojn kara” ŝi diris al Patrin “fojnrikolte ni multuzas in.”

“Ĉu jam komenc?”

“Ja’s. Ĉu v?”

“Mi komencos morgo” diris Gideon.

Ĉiu rigardis lin starantan alta en pordeĵ kun ia potenc en si. K al mi ŝajnis ke ĉiu iomete retiris sin kvaz for d i’ĉaŭgura.

Parson stariĝis por foriri.

“Jam estas morgo juna Sarn” li diris. “Atentu bonutiligi ĝin ka ĉiujn morgojn.”

“Morgo O morgel!” diris Jancis. “Ti stas vorto promesoplena.”

Ŝi oscedis ka preske tuj ŝia buŝ estis roz ka m sci’s ke m ne povas elteni ŝin.

“Un kanto!” Sakristian’ parolis tre solene. “Un sankta kanto tal foriri.”

Ni do stariĝis ĉirketable sur kiu dek du kandeloj balde finbrulos ka n’kantis—

Ter kouras vian kapon hom

Ter pezas sur via kor

Bonfarojn pekojn viajn sen escept

Juĝos nun Di-Sinjor.

Ĉar estis multpli da viroj ol virinoj kanto sonis basa kvaz abeloj en tiliarbo. Jancis ka Tivvy kantis tre klare k alte k ank senkore kvaz al i stis tutegale ke povra kadavro kuŝas fore akompanata nur de terbuloj.

Stis tretado ka ti’n-ka-re’n-irado k i ĉiuj eliris dum Patrin staris apud pordo disdonante funebrokojn. Tiuj stis bonkvalitaj spongokukoj ĉerkoformaj kun multe d ovoĵ ka volvitaj en paper kun nigra bordo.

Birdoj jam kantadis tre laŭte ka klare kun sonore°antaj vibroj. Niaj kamentuboj aperis en lago ki signifis ke sunleviĝas. Kukol estis en kverkarbar k unua kreks ekvoĉis el fojnherboj tr’estreme.

Gideon diris—

“Nun stas tro tarde por dorm. Jam stas morg. Iru en fruktoĝardenon. Mi volas diri al vi kion mi planas.”

Malbeno Kara

Malmulte mi suspektis dum mi sekvis lin en fruktoĝardenon kie troviĝis nek floroj nek fruktoj kion tiplanoj signifos por ni ĉiuj.

Ĉapitro 5: Falas unua garbo

Ni grimpis en malnovajn pomarbojn kie ni havis preferatan sidlokon inter branĉoj. Rigardante vizaĝon de Gideon inter helaj folioj mi pensis ke stas tre strange ke l portas ĉiujn tipekojn. Ekde kiam Patr estis bebeto krieganta ka batanta sian junkan lulilon tra tempo kiam li stis junul prenanta hundforpermeson el kirko ka poste kiam l'iris al kokbataloj k amindumis Gideon devas porti ĉiun lian mavan agon. Ĉiuj liaj furiozoj stis nun furiozoj de Gideon.

“Nu Pru” diris Gideon “aŭskultu kion mi diros al vi. Vi ka mi devos prosperi.”

“Ka Patrin?”

“Nu anke Patrin. Sed ŝ estas olda.”

“Sed certe ŝ volas prosperi.”

“Ti n gravas. Se ni prosperos ŝi prosperos. Vi ka mi devas labori Pru.”

“Mi n tim's laboron” mi diris.

“Nu da ti stos multe. Mi volas ĉerpi monon el bien—multon da mon. Post'en bona hor ni vendos ĝin. Ka tiam n'iros al Lullingford k aĉetos domon ka v alte tenos kapon inter plej bonaj k estos riĉa dam.”

“Ne grav's al mi tiĉi' sti riĉa ka teni kapon alta.”

“Do *stu* grave al vi. Ka m estos presbiter k ordonos al Paro'estro kion li faru ka decidos kiu iros en pilorion ka kiu almozejon ka kiu voĉdonos por parlamentanoj. Ka kiam knabin naskis aminfanon v iros skoldi ŝin.”

“Mia prefer stus ludi kun bebo.”

“Ĉiu ajn povas ludi kun bebo. Nur granda dam povas skoldi. Ka n'aĉetos imponan domon. M ancor ne vidis taŭgan sed ni havas tempon taŭ ni. Ankaŭ ĝardenon kun prizorgisto ka servistinojn ka dom stos plena de belaj mebloj k arĝentaĵoj ka porcelanaĵoj.”

“Mi tr'amas belan porcelanon” mi diris. “Ĉu n'povos aĉeti kelkajn el tinovaj tasoj ka subtasoj el Staffordshire kun homoj surdesegnitaj?”

“Vi povos aĉeti kion ajn vi deziras k oran fingringon ka ŝrankon da roboj krome. Sed vi dev’s helpi min unue. Necesos jaroj ka jaroj.”

“Sed ĉu ni n povus resti ĉe Sarn k aĉeti nur iomete da novaj mebloj ka porcelan’ ka kontenti sen tiomaj geservistoj?”

“Ne. Ne stas sfiĉe da homoj ĉe Sarn krom ĉe Foir ka ti stas nur unfoje en jar. Ki stas un foj en jar? Ka kiel utilas esti ĉefo se ĉefo de nenju? ‘Ĉefo inter dek miloj.’ Ti stas sonora teksto. Mi preferas sti ĉef inter dek miloj.”

“Eble stas fulm en vi” mi diris “kiu tiel sentigas vin.”

Mi ĉiam pensis ke l aspektas kvaz ĝ estas en li kiam i’ajn nekutima okazas. Liaj okuloj tutflagris sed ank estis fridaj. Ka l sentigis k’on volis kion li volis eĉ s on ne volis. Fojfoje kiam li volis serĉi melojn en arbar li kredigis min k’anke mi volas tion. Dum samtempe en propra kor mi volis pluki verisojn.

“Nu necesos multa fulm en sango por fari kion mi celas” li diris. “Bien ĉiam apen subtenis nin diras Patrin. Ka Patro lasis al ni nenjon—krom sfiĉe nur por pagi teksiston ka Sakristianon k aĉeti vakskandelojn ka gantojn kotope²³ por entombigo.”

“Kion do ni faros se ni taŭe havis apen sfiĉe” mi dubvoĉis “eĉ dum Patro laboris por ni? Ni nenjam amasigos monon knabo.”

“Mi faros kion li faris ka multon pli.”

“Vi nenjam povos.”

“Mi povas fari kion ajn mi celas. En mi stas tiom da potenc ke nur morto povos bridi ĝin. Ka per via helpo—”

Tiam l’iomete silentis plukis folion ka ŝiris ĝin. “Ĉar laŭfakte vi nenjam edziniĝos Pru.”

Mia kor batis feble ka morne. Ŝajnis tiom terure nenjam edziniĝi. Ĉiuj knabinoj edziniĝas. Edziniĝos Jancis. Edziniĝos Tivvy. Eĉ Polly de Muelisto kiu ĉiam havis erupcion aŭ favon aŭ tiaĵon edziniĝos. Ka kiam knabinoj edziniĝas i ekhavas dometon k eble lampon por lum kiam edzo hajmonvenas ka s i havas nur kandelojn stas same ĉar i povas met’in ĉe fenestron ka l pensas “Jen edzin ŝ ekbruligis kandelojn!” K iun tagon Srin Beguildy faros lulilon el junkoj por i k iun tagon estos beb en ĝi impone ka solene k on dissendos invitilojn por bapto ka najbarinoj venos ĉirke

²³ K.t.p.

patrinon de bebo kiel abeloj ĉirke reĝinon. Ofte kiam aferoj ne marŝis bone mi diris al mi “Ne ĉagreniĝu Pru Sarn! Venos tago kiam vi stos reĝin en propra abelkorbo.” Do m diris—

“M edziniĝos Gideon? Ho ja’s! Mi cert’edziniĝos!”

“M enkore kredas ke nenju petos vin Pru.”

“Ne petos min? Pro kial ne?”

“Ĉar—nu vi balde scios kial. Tamen vi povos havi domon ka meblojn ka ĉion ceteran se v helpos gajn’in.”

“Sed n edzon nek bebon en lulil el junkoj?”

“Ne.”

“Pro kial?”

“Stos plej bone demandi Patrinon pro kial. Eble ŝi povos diri al vi kial lepor transiris ŝian vojon. Sed mi ja kompatas cin Pru ka m igos vin riĉa dam k eble kiam ni jam akiris multe d or ni sendos por havigi kuracilon por vi. Sed ti kostos multe ka vi dev’s labori bone ka fari ĉikion mi diros al vi. Vi stas ja sfiĉe plaĉforma altstatura knabin Pru ka se n estus pro tiunsolaĵo knaboj kolektiĝus ĉirke vin samkiel ĉirke Jancison.”

Mi pensis pri ti kelkan tempon dum akvo frapetis lagobordon ĉe ĝardenfin. Poste mi diris ke m faros ĉion postulatan de Gideon.

“Vi devas tion ĵuri Pru solene ĵuri je Libro²⁴. Eble se ne v tediĝus ka balde rezignus. Anke mi ĵuros kion mi promesis.”

L eniris domon por alporti Libron. Mi sidis senmove k aŭskultis korvojn flugantajn al sia nestar maltaŭ dom preter ĝarden ka stakej. I revenis de sia matenmanĝ en kampoj apud Plash. Anke mi volis matenmanĝi ĉar negrave kiu mortis ni povraj mortemuloj malsatas. Ka dum m aŭskultis dormigan sonon de grakado ka batadon de flugiloj kiam i transiris malalte mi pensis ke stas nekomprenebla mondo kie on entombigas Patron dumnokte ka tuj ekpensas pri matenmanĝo ka domoj k or je unua tagiĝa lum kie on devas pasigi tutan vivon en damno ĉar povra stulta lepor rigardis patrinon tal on naskiĝis kie fil manĝante kukon ka trinkante vinon de sia Patrin ŝarĝas sian povran animon per ĉiuj pekoj de sia Patro.

²⁴ La Biblio.

Gideon revenis kure kun granda Libro enmane tre peza ka bukita per arĝenta agrafa.

“Deiru Pru ka ĵuru” li diris. “Nun tenu Libron.”

Mi demandis ĉu l stas certa ke Patrin permesas nin fari tion.

“Ĉu permesas? N estas ŝi’ afer permesi. Ŝi n rajtas malhelpi nin. Bien stas mia. Ĉu vi n aŭdis ŝin diri tion kiam mi transprenis pekojn?”

“Sed ĉu v devigos Patrinon plenumi tion?”

“Ĉu on lombardas animon por nenjo? Ĉu alies pekoj dolĉas en buŝo tiel ke m manĝas in sen pensi pri kosto? Bien stas mia poreterne ĝis mi decidis vendi ĝin. Nun ĵuru! Diru—

‘Mi promesas ka ĵuras obei mian fraton Gideon Sarn ka dungigi min de li kiel serviston sen pago ĝis fariĝos ĉi’ volata de li. Ka m stos obe’ma kiel metilernanto edzin ka hundo. Mi ĵuras tion je Sankta Libro. Amen.’”

Do m diris. Poste Gideon diris—

“Mi ĵuras resti fidela al mia fratino Pru Sarn k egale dividi ĉion kun ŝi kiam ni sukcesos ka doni al ŝi monon ĝis kvindek pundojn kiam ni vendos Sarnon por kuraci ŝin. Amen.”

Kiam ni finis mi sentis kvaz lago Sarn fluis tutsuper nin ka m tremis kvaz pro febro.

“Pro ki vi s’feras?” diras Gideon. “Plej bone v iru ka bruligu fajron s estas fride al vi ka pretigu matenmanĝon. Ni povos paroli dum ni manĝos. Patrin dormas. Ankor multo direndas.”

Do m eniris ka bruligis fajron k aranĝis tablon kiel eble plej bone ĉar ti ŝajnis ioma komfortig en malluma ej. Mi scivolis ĉu stus krudaĵo pluki kelkajn rozburĝonojn por meti ĉemeze. Ka pensinte ke n estas nedece manĝi ka trinki mi decidis ke stas en ordo pluki undu rozojn.

Kiam Gideon revenis de melkado ni sidiĝis ka l diris al mi ĉikion li havis enmense. Unue mi devos lerni fari fromaĝon samkiel buteron. Poste li faros kelkajn korbojn el salikoj por Bendigo ka ĉiun bazartagon li rajdos al Lullingford kun buter k ovoĵ fromaĝoj ka ĉelarmiel fruktoj ka legomoj k eĉ floroj.

“Nu tirozojn” li diris “tiujn vi povos enbukedigi k i kelkenspezigos.”

Kelkfoje ni havos kokidaĵon k anasojn kuniklojn fiŝojn k agarikojn.

“Vi vidos Pru ni gajnos multon” li diris.

“Sed kia vojaĝo! Tridekmejl²⁵ tage.”

“Mi plugos iom da ter por kreskigi maizon por Bendigo. Rilate min—mi nenjam lacas.”

Kiam ni jam iom ŝparis n’aĉetos trian bovinon. Ŝi naskos printempe sekve du bovinoj stos melkeblaj kiam alia sekiĝis. Tiel stos pli da buter por bazar. Poste n’aĉetos du bovojn por plugi ka turni draŝilon ka tiri sterkon ka n necesos lui bestojn de Beguildy. Kiam nia porkin naskos ni retenos ĉiujn idojn ka liberigos in en kverkarbar ka Patrin kunprenos sian trikaĵon ka gardos in. Tiel stos multa lardo por bazar krom kiam ni mem manĝos ĝin. Ni havis nur kvin ŝafojn sed Gideon diris ke pro ti ni retenos ŝafidojn do ni havos lanon por vendi ka grandan ŝafaron sekvajare. Patrin ka mi ŝpinu fadenojn tutvintre ka l vendos al drapist aŭ interŝanĝos por necesaĵoj ĉe butikoj kiaj sal por pekli viandon ka gisto ka suker. Sapon ni mem faros el lesiv. Anke junklumojn ni faros el gras ka grandaj sekaj junkoj. Sekalon ni havis k un nanan kampon da tritiko. Patro kutimis preni po kelkajn sakojn al muelej kie loĝis onklo de Tivvy.

“Mi kreskigos pli da tritiko akreojn da tritiko” li diris “ka portos ĝin al muelej per bovĉar. Kion ajn faros francoj tritiko ne malutilos. Ka kvankam ĝ estas nun nekara ĝi n estos tia s on impostos ĝin ka laŭ ondir ti stas pl’ol verŝajna. Stos pli bone multpli bone havi un akreon da tritik ol ludeti per dudek akreoj d aliaĵo. Ni kreskigos anke lupolon ka nenjam mankos guto da bona el’ ĉar kvankam mi laborigos vin Pru mi n malsatigos vin. Bonan simplan manĝaĵon kiom vi povos manĝi sed nenjom da frandaĵoj. Krudan mielon post kiam ni flankenmetis plej bonan por vendi ka fruktojn kiam malkaraj lardon ka terpojn²⁶ ka panon k ovojn ka buteron kiam vojoj tro kotplenos por iri bazaron.”

“Mi preĝpetos kotajn vojojn” mi diris.

Gideon rigardis min tr’akre sed vidinte ke m nur ŝercis li ridis.

²⁵ 50 km.

²⁶ Terpomojn.

“Bone sed necesos veter de Diablo mem por haltigi min.”

Li havis planon ke m lernu kalkuli ka teni kontojn ka skribi. Mi ĝojis ĉar mi vere amis ke m povos legi librojn k aparte Bibliion. Mi ĉiam ĉagreniĝis en kirko kiam Sakristian’ legis Bibliion ĉar negrave kion li legis ĉi’ sonis kiel abel en botel. Ne gravis kiam li legis—“Kaj li prenis al si edzinon kaj ŝi naskis al li Aminadabon...” ĉar ne gravis al mi ĉu l j’au²⁷ ne faris tion. Sed kiam frazoj stis legendaj kun sonor kiel vent en tremolarbo ŝajnis tre domaĉe²⁸ ke l tiel legaĉis pavante ĉar l entutsci’s legi. Mi volis mem povi legi

Ĝis disŝiriĝos la arĝenta ĉeneto

ka gustumi vortojn. Stus bele povi anke skribi ka noti ĉikion mi volas restigi enmense. Do kiam Gideon diris ke m lernu mi ĝoje konsentis.

“Sed se Sinjor Beguildy lernigos min kiel mi pagos?” mi diris.

“Vi povos elfosi terpojn por li ka helpi lin je fojnado ka fojfoje gvidi plugilon por li. Beguildy stas ĝisoste pigra ka tiom fiera ĉar li stas sorĉisto ke n estas eĉ manturn da labor en tihom. Nur revadas revade! Ungventon por ĉiu ulcer li havas sed ne por pigrem. Vi fortas. Vi pov’s fosadi presk sambone kiel mi. Pagu tiel. Ka se v volas vi surmetu nigraĵojn k iru peti lin jam ĉivespere.”

Li foriris al fojnkampo kun falĉil ka m eklaboris volonte k eĉ iom kantus sed mi memoris povran Patron. Ĝojigis min ricevi edukadon kvaz granda fenestro apertiĝis. Ka kiu scias kion eblos vidi tra tifenestron?

Kiam mi portis tagmezajon al Gideon irante tra korvej mi memoriĝis ke ni tutne informis korvojn pri morto ĉe ni. Stis malnovantikva kutim inform’in. Oni diris ke s on ne faras tion malkontento kovras in k i malankoli’ĝas²⁹ ka forgesas hajmonveni. Ka nelge jen ulumoj³⁰ kun nestoj ancor kvaz nigraj fruktoj en aer sed tutsilentaj ka forlasitaj. Ka kvankam korvoj faris multon malutilan stis tre misfortune perd’in ka dom forlasita

²⁷ Ja aŭ.

²⁸ Domaĝe.

²⁹ Melankoliigas.

³⁰ Ulmoj.

d i nenjam poste havos prispardon³¹. Do m memorigis Gideonon pri ti ka n'iris al korvej.

I stis plej grandaj ulumoj kiujn m iam vidis k ordinaraĵoj ka montaj. Sub i stis nur ombrece pro somerfolioj. Grundo verdigis pro fikari' kiu ĵus finfloris ka beladon' balde floronta. Folioj stis blankaj pro birdofek. Estis tre kvietaj varmega tago kun nur facila venteto skuanta arbobopintojn ka dormema grak ofte sobant'al ni. Plaĉis al mi veni al korvej je titagoj post vespermanĝo kiam mi finis lavi min. K aparte dum Festo de Ĉielir m emis veni por vidi ĉu i laboras. Ĉar on diris ke nenju korvo laboras dum Festo de Ĉielir. K efektive mi nenjam vidis in porti eĉ tigon je titago sed i 'spektis tre pensemaj ka piag mense ĉiu sidanta en sia arbo kiel Parson ĉe katedro.

“Ho korvoj!” kri's Gideon “Patro mortis ka m estas mestro ka m venis por diri ke v trankvile restos en via loĝej ka m gardos vin kontre ĉi' escepte de mia propra pafil k estas tre plaĉe al mi ke v restos.”

Korvoj sobrigardis lin de super nestorandoj ka kiam li finis estis subita klakado de flugiloj k i ĉiuj soris en bluan ĉielon kun granda klarionado kvaz pripensante diraĵojn. Nelge i revenis ka sidiĝis tre seriozaj ka kvietaj. Do ni sci's k'i'ntencas resti.

Kiam ni denove estis sur kampo Gideon iom ridis dum l akriĝis falĉilon ka l diris—“Mi ĝojas k'i'ntencas resti. Mi tr'egamas pastaĉojn³² el korvoj.”

Dirinte tion li svingis falĉilon tra herbar maldensa ka plena de lekantoj ka suspiranta per seka son. Ka ĉar herbar estis tiom maldensa eblis vidi falĉilon kiel ekbrilon de ŝtaleca lum tra staranta rikoltaĵo tal falis garbo. Ka ŝajnas al mi nun ke stis kiel mortiga vol de Di kiu ĉiam atendas maltaŭ ni ĝis venos hor por rikolti nin tamen ne kruele sed ĉar estas plej bone por ni ke n'ĉesu kreski en kampo ka ke n'portiĝu en Lian sekuran stakejon ka havu kiel varmigan tegmenton Lian ĉiaman korfavoron.

³¹ Prosperadon.

³² Pastaĵojn.

Ĉapitro 6: “Selu viajn revojn tal rajd’in”

Tuj kiam mi finis melki—Gideon ankore diligente laboris en paŝteĵo—mi soriris ka surmetis miajn nigrajn vestojn ka mian tutkapan ĉapon. Mi nenjam portis ĝin dumlabore por menigi lavadon k on opini’s min i’smila al pagan’ ĉar mi preske ĉiam stis sen ĉapo ka ŝuoj ka ŝtrumpoj irante nudpiede aŭ portante lignajn ŝuojn. Gideon kapablis tre bone ĉizi lignajn ŝuojn k i elstare taŭgis por timalpuriga laboro kiam mi faris. Krome mi faris por mi robon el sakŝtofo kiu atingis genuojn portatan dum mi purigis brutejojn. Mi sci’s ke ĉiuj nomis min greneĵporda sovaĝulin de Sarn. Sed memorante stontan belan domon en Lullingford ka florumitajn vestojn ka damaskajn kurtenojn ka porcelanon mi n tro vundiĝis.

Tre plaĉis min mia ĉehajme ŝpinita robo kun transversa korsajo ka nova tutkapa ĉapornamita per etaj volvaĵoj el silko tre novmoda. Do m faris buklojn en miaj haroj—un ĉiuflanke ka du dorse pendantajn ĝistalie.

M estis kontenta pensante ke n’akiros kuracplantojn por beligi min kvaz feidon. Dummelke mi pripensis tion ka dum mi purigis stalojn ka dum mi frotlavis ŝtonan plankon de kuirej.

Patrin plendetis informite ke m iros al Plash ĉar ŝ estis mizera ka malankolia pro restad en ombro de morto. Ŝi tiom kutimis trankviligadi kolere manojn ke ŝ sentis sin nun tiel malkvieta kiel on sentas sin fininte trikadon de dua ŝtrumpo el par. Ŝi sidadis sen son en angulo apud kament’ k aŭdeblis netruda ŝpinrada zumado simila al ti d eta mortobirdo. Subite ŝ ĉesis ŝpini ka kunfrotis manojn kiuj ĉiam pensigis min pri manetoj de kaptita talpo levitaj al Di. Ka ŝ diris “Dimanĉon taŭ semajn’ li n havis lardon por vespermanĝo! Dimanĉon taŭ du semajnoj ne bongustis al li pastobuloj ka nesurprize ĉar i stis terure aĝustaj Pru. Dufoje mi trobligis liajn ovojn dum tilasta semajn’ ka nova kitel Pru—”

Post ti ŝ ploradis.

“Mi prokristis ka prokrastis ĝin Pru tiel ke l mortis tal ĝ estis preta. Ho mi’kara se m pensas pri ti! Mankis nur ŝultropecoj ka

manumoj kun i ĝ estus plej bona kitel kiun m iam faris. Sed mi prokristis ka prokrastis ka l ne plu povis atendi. L aŭdis fortegan voĉon vokantan inter tieaj ulumoj ka l ne povis atendi sian kitelon povrul. Mia tuta kudrad estis vana.”

“Nu Patrin vi devas fini ĝin por Gideon” mi diris. “Ĝi bone taŭgos por Gideon ĉar li stas bela grandul kvankam men larĝa ol Patro. Sed li plilarĝiĝos. Je lia dek-oka naskiĝtago mi n dubas ke ĝ tre bone sidos sur li. Sekve rapidu.”

“Nu” ŝi diris “nu ti sencoplenas infan. Li transprenis pekon por porti ĝin tutvive. Kitelon li havos.”

Ŝi venigis pordimanĉan jakon de Gideon ka prenis kitelon el komoda tirkesto por mezuri ĝin.

Mi preĝis ke grand estu sfiĉa por kontentigi ŝin. Ka tiel stis ka ŝ retranskviliĝis ka rekomencis labori zumante kiel eta mortobirdo.

Sed ne daŭre. Ŝi ripete ekrigardis min dum mi surmetis gantojn ka diris—

“Bukloj stas ja belaj Pru.” Ka poste “Vi havas tre plaĉforman korpon infan.”

Ka post nur minuto ŝ kliniĝis super ŝpinradon k ekigis konatan lacan plendadon—

“Ĉu mi devigis leporon transiri mian marŝvojon? Ĉu mi devigis?”

“Aj Patrin Patrin!” Mi petegis ŝin “ĉesu plori pro ki n estas malfarebla. Mi ne povas elteni vian ploradon kara. Patrin! Tent! Al mi tutne gravas. Baj baj mi’ŝafideto!” (Tiel mi nomadis ŝin ĉar ŝi ŝajnis tiel eta ka perdita). “Baj ne mornu pri ti. Aŭskultu kion mi diras! *Al mi stas tutegale ĉu m havas leporlipon aŭ ne!*” Dirinte tion mi kuris el dom ka tra barpordon ka laŭ arbarpado ploregante.

Mi ploris tiom laŭte ke flugiloj ekzumis ĉiuflanke de m ka fore en valeto kunikl aŭdis min k ekstaris meze de voj kiel vera Kristan levinte un braketon tutsame kiel Parson donanta benon. Sed estis damno kion donis al mi lia kuz lepor.

Mi demandis al mi kial ĝi faris al mi tidamnon. Ĉu pro propra vol ka dezir aŭ ĉu pelis ĝin Diablo? Ĉu Di domaĉis cedi al mi edzon ka lulilon el junkoj ka tial Li kaŭzis ĝin? En postaj jaroj ja ofte ŝajnis strange ke m devis penegi labortagojn ka dimanĉojn por enspezi sfiĉon por ĝustigi kion malĝustigis stulta lepor. Ka m sci’s

ke multe kostos kuraci leporlipon. Stis i'amara ridaĉo kiam mi pripensis tion. Ĝ enmensigis nigretajn aŭtunajn vesperojn kiam tetroj eksoris el maldolĉa marĉo kaflugis inter velkintaj erikoj ka frosta ĉiel' ka ridis. Senkompataj olduloj ridas tiel pro fal de malamiko. Ka bonulinoj d urbo pufaj pro rigidaj fluorumitaj silkvestoj ka beboj pie koncipitaj tiel ridis maltaŭ siaj ventumiloj kiam i'ris vizite al prizon' por rigardi vipadon de bela putin. Kun tiamar ridus vir mortanta pro vundo s'ferita en batal por reĝo s iu enirus dum Parson laŭtlegas preĝon por mortantoj ka proklamus "Reĝo donas al vi graflandon ka sendas al v invitleteron al sia palaco."

A°! Timaniere ridas tetroj ka timaniere mi ridis en titagoj. Sed nun mi sidas tie ĉi inter kamen ka fenestro te infuziĝas por iu kiu venas hajmon taŭ noktiĝo ka nuboj staras sur monto ka kiam mi ridas mi ridas leĝerakore smile al peg en printempo. Ĉiam ĝ estas ridema pego ka ja 'lkore ridema. Ĝi flugas en ulumon ka ridas ĉar ti stas tiom verda. Ka ĝi flugas en fraksenon ka ridas ĉar ti stas tiom nuda kun nigraj burĝonoj nur ka senfolia. Ka poste ĝ flugas en kverkon ka ĝiskreve ridas vidante junajn brunajn foliojn. A° peg estas gaja ridanto ka ĝia ridad estas tiel dolĉa kiel nuks sendifekta. Se ni povos tiel ridi ĉefine de longa vivo ni n vivis vane.

Sed tivesperon mi ridis kiel tetroj ka mia kor ribelis en mi.

Tamen mi n povis n esti kontenta pensante pri skribad. Anke min faris kontenta ke ti donos al m ian potencon super Gideon ĉar se l stos tro severa al Patrino ka mi mi povos est'iom nekomplezema pri skribado. Mi kuris laŭborde d akvo sentante min leĝera ka senzorga en miaj plej bonaj sandalaj ŝuoj pensante kiom mi laboros por akiri substancon kiu beligos min kvaz feinson ka post ti bald alvenos amanto k on pendigos nuptanoncon en kirko ka ja post ti m sidos en mia propra domej kun piedo sur lulseĝo ka bebo dika ka solena sur mia genu' pli bona ol ĉiuj famaj vaksaj pupoj el Franci kiujn mi nenjam vidis sed tr'ege volis.

Min kontentigis vidi fulikojn naĝantajn kun ar da fulikidoj maltaŭ si tutkvaz kunligitaj per ŝnur. Ka m ridis vidante ardeon kiu havis edzinon ka neston tie starantan trans akvo ĝisgenue inter nimfeoj tutkvaz muta. En postaj tagoj mi vidis Gideonon aspekti ĝuste tiel ja ofte kiam l emis paroli al Jancis ka n povis

enmensigi eĉ un vorton aŭ kiam li surmetis sian plej bonan kravaton ka n povis aranĝi ĝin kontentige rigardante per spegul aĉetita per mon el dua lantondado vidinte Jancison en rozkolora lum.

Mi renkontis Jancison tal m atingis Ŝtonan Domon. Ŝi hajmenpelis bovojn ĉar on mendis in por foir k on venos frumatene in preni. Inter du blankaj brutoj kun un man sur ĉiu kun tutora harar brilanta ka vizaĝo kiel blanka roz ŝ aspektis kiel fantom de belulin mortinta taŭ longa tempo ka kiu revenas ĉiun somermezon ka fuĝas je kokokri’.

“O!” ŝi diris “v akiris buklojn Pru. Ĉu mi havu buklojn por Sarn-Foir?”

“Kiel vin plaĉas” mi respondis tr’abrupte. Ĉar ŝ estis bela jam sen bukloj ka ŝia buŝ pli rozeca ol iam taŭe. Mi pensis pri kiel imponaj aspektos tibukloj pendantaj kvaz maturaj flavaj grapoloj da blankaj riboj dense ariĝintaj sur branĉo ka jen ŝi diros “O!” ka knaboj volos kisi ŝin.

Kiam ŝi jam enŝlosis brutojn n’eniris domon. “Sinjor Beguildy!” mi kri’s “mi volas ke v lernigu min legi ka skribi ka sumigi ka ĉikion³³ vi scias. Mi pagos vin per labor. Gideon ka m riĉiĝos k aĉetos domon en Lullingford ka havos geservistojn ka florumitajn robojn por mi ka porcelanon—”

Beguildy rigardis min de super rando de granda medokruĉo. “Selu viajn revojn tal rajd’in knabin” li diris.

“Kion celdiras vi Sinjor Beguildy?”

“Respondo stas sub via ĉapo” diras li. “Se m ja lernigos vin okazu nenja displuad³⁴ estu sen demandoj ka sen respondoj. Mi diras diraĵon sed vi devas trovi signifon. Nu revenu al mi un semajnon post hodi’ ka diru al mi kion mi celis komuniki ka tiam por regaleti vin mi montros al vi botelon en kiu stas olda moŝta bienul olda Camperdine prapra’vo de nuna kiu ja revenis tiel verve dum ĉiu Rikolto-Festo ka plengorĝe elbuŝigis fikanton ie supre en orej sed nenju povis vidi lin do nenju povis kapti lin.”

“Escepte vin.”

³³ Ĉion kion.

³⁴ Disputado.

Beguilty ridetis. Li havis tre lante larĝiĝantan rideton kiu venis kvaz ringa ondo sur akvo ka restis longatempe.

“Ja’s escepte de mi. Mi ja sukcesis kapti lin.”

“Kiamiere?”

“Se m dirus al vi Pru Sarn vi sciuz tikiom³⁵ mi.”

“Sed nur diru kiel v enboteligis lin!”

“Mia Di! Vi forgesis interkonsenton. Nenaj demandoj.” Li levis martelon ka frapadis vicon da silikoj stigante melodieton. Je ti eniris Srin Beguilty samkiel dancistin en foir kiam on ektamburas. Ŝi havis trutojn en korbo ka paron da kokoj preparotaj por Festo kien bovoj iros. Ŝi portis malnovan botelverdan ĉapelon de Beguilty tre altan kian titempe amis vojrabistaj moŝtoj ka ĝ aspektis tr’ekstravaganca sur ŝiaj bukletaj grizaj haroj.

“Ĉu v aŭdis diri?” ŝi diris al mi.

Ŝi havis basan solenan voĉon ka ĉar ŝ estis tr’okupata por paroli ofte ĉi’ dirita de ŝ ŝajnis tre grava kvaz dirita de Vilaĝanoncisto staranta sur ŝtupar de bazar en sia pasamenta palto.

“M aŭdis ke Diabolo mortis” diris Beguilty “sed ti ne veras ĉar mi renkontis lin hier’ ka tr’ elegantparola li ja stis ka tre plaĉas al li havi vian Pejtron kiel kunulon Pru.”

“Ĉesigu viajn sensencaĵojn” diris Srin Beguilty tirante plumojn el kokoj po manplenojn tiel ke stis kvaze neĝoŝtorm enĉambre. “Ĉu v aŭdis diri Pru ke povra Johan Teksisto forvojvadis enarbare dum senluna nokto hiere k ekdroniĝis en Blackmere? Povranim ja mort estas tr’infekta.”

“Oj stis nur un hor taŭ mateniĝo kiam li foriris” mi diris.

“Temp sfiĉa temp sfiĉa. Stas obskure kiel en Egipti ti’enarbare.”

“Kiu anstatos lin?”

“On diras ke lia nevo metilernas. Sed li restos kontraktita metilernul dum ankor un jar aŭ du. I devos kontentiĝi per dungito mi spozas.”

“Ka stus pli bone tr’ege pli” ekkri’s Srin Beguilty “se vi farus tilaboron.”

³⁵ Tiom kiom.

Ŝi prenis stangon el fajrej ka lerte forbruligis lanugon restantan sur kol kvaz ĝ estus Beguildy.

“Virin min okupas pli gravaj pensoj ol teksti vestaĉojn por kovri mortantan korpon. Ĉu m ne kaptas animojn kvaz kuniklojn ka malebligas in ĝeni vivojn de homoj? Ĉu m ne povas beni ka ben efikas ka damni ka damn efikas? Ĉu m ne povas kuraci verukojn ka kokluŝon ka nekapablon naski ka reŭmamismon ka taŭdiri stontecon ka trovi akvon eĉ kiam ĝ estas profund’entere? Ĉu kokoj benitaj de mi n venkas ĉiujn aliajn en batal? A° ka se m dezirus mi povus fari vaksan figuron de ĉiu hom en paro° ka forkonsum’in ĉiujn vakson homojn ka ĉion. Ĉu m ne povas fari ĉiĉion virin?”

“Vi pretendas povi mi’kara.”

Srin Beguildy ĝustigis kokokrurojn ka trapikis per stangeto por ĉion firme ligi.

Vidante ke sorĉisto tre koleriĝas mi diris al li’edzin ke m estos lia lernanto ka l lernigos min literumi ka skribi.

“Ĉu via kapaĵ eltenos tion infan?” ŝi demandis. Ĉar ŝi ĉiam opini’s samkiel multaj homoj ke s i’misas en ekstera aspekto de hom nepre misas anke mens. Laŭ tijuĝmanier Jancis kiu stis tiel sensprita k’ofte ŝ ŝajnis presk idiota stus tr’inteligenta virin.

“Ja’s. Kapaĵo de Pru sfiĉe kapablas” diris Beguildy. “Kvankam estas tro da demandoj en ĝi. Sed el ŝi fariĝos bona lernant ja el Pru. Ni komencos posthodi’ un semajnon Pru. Jancis vi venigu tigaron ka balaetu mian ĉambbron. Arigu dutri librojn havigu al mi kelkajn skriboplumojn ka tr’ atente traktu ĉiujn miajn botelojn ĉar nenjam scieblas kiuj stas en i. Ni ne volas hantadon ĉitie. Ka jes estos bone forigi tiujn bufojn maltaŭ ŝranko i ĉiuj jam mortis.”

“Pru” diris Jancis kiam m eliris “se vi diros min kiel fari tiajn buklojn mi diros al vi kion signifas tienigmamaĉo³⁶ de Pejtro. Mi scias ĉar li re ka re diras ĝin ka m aŭdis lin diri respondon.”

“Mi volvadas in ĉirke fajrostangeton mi’kara” mi diris. “Ne tro varman ka bone purigu ĝin taŭe. Sed vi n b’zonas diri al mi respondon al enigmamaĉo ĉar mi preferas mem elpensi ĝin.”

Ros pluvis sur mian robon dum mi preterpasis arbustojn de sovaĝaj rozoj ĉe ligna barpordo verŝiĝante el florokoroj. Stis tiel

³⁶ Tiu aĉa enigmo.

kviete ke m povis aŭdi ŝafojn mordi herbojn trans angul de lag en bien ka fiŝojn alsurfaci en mezo k akvon plaŭdi kontre grandajn rigidajn junkofoliojn.

Mi sentis min dama promenante en miaj plej bonaj vestoj dum labortago. N ofte mi povis liberiĝi de labor k ekde nun estos multe menofte. Do min ĝojigis ke Gideon volas ke m estu studanto ĉar unfoje ĉiun semajnon m estos libera dum posttagmezo ka vesper.

Kiam alvenis venteto folioj sorbis silenton kiel langoj de trinkantaj bestetoj. Surĉiele troviĝis nuboj smilaj al punto sur edziniĝa robo de Patrin ka sobanta lun tiel verda kiel juna fagfoli'. Ka sub polurit'akvo troviĝis alia lun ne tutsame brila k aliaj nuboj ne tutsame puntaj k ombro de spajr tre pala ka fantoma montranta nin trans akvon.

Ĉapitro 7: Pomarboj ka ĵargoneloj

Patrin sorrigardis kiam m eniris. Ŝi kudradis kitelon.

“Vi ĵaspektas granda knabin envenante Pru” ŝi diris. “Ka v eĉ ne havas deksex jarojn!”

Mi demandis kie stas Gideon.

“Li falĉas en lunlum. Tian knabon mi nenjam vidis! Laboregas ka ŝvitas kvaz pelate.”

“Nu lun sobas maltaŭ kirkokampo Patrin” mi diris “do li nun nepre ĉesigos.”

M iris al kampo. Li jam falĉis kiom povas plenaĝul. Li frotpurigis klingon de falĉil per manplen da herbaĵo k akrigis ĝin por formeti ĝin dum mi venis transkampen. M opini’s ke sonis bele ven’inter malsekaj palaj garboj sed ank morne. Kiam mi memoris kiom da ŝarĝoj li prenis sur ŝultrojn mi kompatis lin.

“Venu fine por vespermanĝi Gideon” mi diris.

“Pro Di! V aspektas kvaz fantom kaŝirant’el sub obskura heĝo tutnigre vestite kun tiblanka vizaĝo.”

Post ti li ŝajne memorigis sin pri ĉi’ farenda. Li komencis informigi sin pri miaj taskoj.

“Enfermis kortobirdojn?”

“Ne.”

“Do rapidu. Ti devas jam fariĝi. Kontrolis kaptilojn?”

“Ne. Mi kredis ke vi.”

“Kiam mi falĉas mi pov’s nenjalion fari krom taskojn tro pezajn por vi.”

“N estas multaj tiaj.”

“Kiam vi jam prizorgis kortobirdojn ka kaptilojn metu dutri retojn en lagon. Mi plu devas segadi.”

“Necesos multega tempo ka m ne lertas pri retoj” mi diris preske plorante ĉar m estis jam laca k estis tarde ka komenciĝis jam nova labortago laŭŝajne.

“Ĉu v faris kontrakton aŭ n?”

“Mi faris Gideon.”

“Do agu laŭe.”

Ĉirkaŭvagante dum Patrino stis enlita ka Gideon en kampoj mi sentis solecon. Mi deziregis ke stu manier pli kurta por beliĝi kiel fein. Tiam subite venis al m'ideo. Mi miris ke ĝ ne venis taŭe sed taŭe ja ne ĝenis min leporlipo. Ŝajnas al mi k'on ofte mem rimarkas tiaĵon nur kiam aliaj homoj ĝin rimarkigas. Mi n dubas ke s Eva malfeliĉe havus leporlipon ŝi n rimarkus ĝin ĝis venus Adam rigardante ŝin dubeme k Eternul brovsulkante pro Sia fuŝita kreaĵo.

Do m'ide stis kial mi b'zoneganta kuracon ne faru samkiel malriĉuloj ĉe Sarn iam kutimis ka fojfoje eĉ nuntempe. Je trem d akvo ki okazas ĉiujare en aŭgusto mi paŝu en lagon taŭ ĉiuj ĉe Foir vestite per blanka kitel. On diris ke ĉititrem d akv estas sama kiel ti'en Betesda ka kvankam ĝi n havis potencon saman kiel tiakvo kiu kuracis ĉiujare ka por kiu nenja malsan stis tro malfacila ĉar ĝi situis en timirinda Sankta Lando kie mirakloj stas kvaz pan ĉiutaga tamen ĉiun sepan jaron ĝi laŭdire kuracis se malsano n estis tro mortiga. Oni devis sobi enakven fastinte ka kun multaj strangaj antikvaj preĝoj. Tiujn mi povos lerni kiam mi scios legi ĉar i stis en malnova libro kiun Parson havis en sakristi. Li n kredis ondiron nek entutmalkredis ĝin sed nur rekonis ke ĝ estas tre rara ka stranga.

Ki plej hezigitis min stis ke temis pri ago tiom publika. Mi devos esti tre senhonta por fariĝi tia spektaklo simila al putin en litotuk aŭ sorĉistin portita al trempotabureto. K efektive kiam mi timeme menci's al Patrino ka Gideon i nenjel aprobis.

“Kion?” diras Gideon “vi fariĝos ŝerco ka spektaklo taŭ tricent uloj? Pli bonus iri al Foir kiel granda dikulin ka tiel plene mokiĝi!”

“Sed mi n dikas” mi diris.

“Ti nenjom gravas. Vi fariĝus priparolata ekde Sarn ĝis Lullingford k ekde Plash ĝis Brampton. Sobi enakven kiel ĉiu malriĉulin kun plago ka sen eĉ ob'lo³⁷! Oni dir's 'Jen fratin de Sarn trempita enakven samkiel malriĉulinoj ĉar Sarn stas tro *malpagema* por venigi metiulon de kuracisto n'eĉ ne parolu pri kuracisto mem'. Ka kiam m irus al bazar i ridus ka fortunus

³⁷ Obolo.

vizaĝon. Nenjam vi faros timalhontaĵon! Stus pli bone multege ke v entreprenu fari mentokukojn ka spicitan elon tiam por Foir samkiel iamis Patrin. Tiel v almen enspezetus.”

“Jes mi’kara” diris Patrin “obeu Sarnon. Ti enspezetos iom ka v vidos ĉion videblan tie kion v alie ne pov’s krom se pro negocado ĉar stos apen du monatoj post morto de Patro. Ka cetere kiel kruele stus al malriĉa vidvin se timulto da homoj vidus k akuzus ke ŝ havas filinon kun leporlip!”

Ŝi komencis tordi siajn manetojn ka m sci’s ke ŝ balde komencos malnovan ĝemadon do m cedis.

“Vi devas promesi min ke v nenjam faros ion tian Pru” ordonis Gideon.

“Mi promesas ke ne dum ĉiĵar sed nur ne dum ĝi.”

“Vi hav’s damne fortan obstinon Pru sed kun aŭ sen tipromes vi nenjam faros tiagon nenjam en vivo!”

“Ka postmorte ne gravos al mi” mi diris. “Ĉar se m agos bone k iros Ĉielon mi tutrenoviĝos k estos tiel bela kiel nimfe sur lago. Ka se m agos mave k iros Inferon mi vendos mian animon milfoje sed m aĉetos belan vizaĝon ka m ĝojos pro ti kvankam m estos damnita.”

Ka m forkuris en mansardon ka ploris longe.

Sed tranvilec de loko ka ĝia solec finfine konsolis min ka m apertis ŝutron tra kiu videblis fruktoĝarden ka kiu subtenis grandan alfiksitan pirarbon ka m prenis trikaĵon el mia mansaketo. Ĉar stis sabato post ĉefmanĝo kiam mi parolis pri trem d akvo ka ĉar semajna labor stis jam preske finita mi portis mian bonan robon kun kongrua mansaketo. Sidante tie rigardante en verdajn arbojn dum odor de nia fojn venis freŝe per venteto miksiĝinte kun parfum de sovaĝaj rozoj k ulmari’ en enĝardena fosaĵo m aŭskultadis merlojn kantantajn apude ka fore. Kiam i stis tre for on apen povis disting’in de ĉiuj aliaj birdoj ĉar i stis granda grego turdoj ka regoloj sepkoloraj kanabenoj paruoj fringoj ka *skribmestroj*. Kvaz multfadena teksaĵo kun un mestra faden el puror tre konsol’aŭdaĵo.

Mi pensis k eble am estas tia—multaj koloraj fadenoj kun un mestra faden el puror.

Mansard estis proksima al pajla tegmento ka troviĝis multaj nestoj sub aleroj ka daŭra pepado de hirundoj. Mansarda fenestro stis en granda gablo ka tegmento je un flank etendiĝis ĝis teron k alta kamentubo staradis sur first. Ie inter traboj de mansard estis nesto de sovaĝaj abeloj k on povis aŭdi dormece softan murmuradon ka matene ka vespere on povis vid'in iri envice al lago por akvo. Do ĉar estis tre trankvile tie kie palaj ombroj de pomarboj enloĝis ĝardenon kiu stis senhoma kiel anke proksimaj kampoj ĉar Gideon stis en fora kampo farante garbarojn kion anke mi dev's fari venis al mi mi n scias el kie plej potenca dolĉec kia nenjam taŭe venis al mi. Ĝi n estis religia kia bonec de tekst aŭdata dum prediko. Ĝ estis preter ti. Stis kvaz ia staĵo konsistanta tutel lum subite venis el tre for ka ŝirmis sin en mi'sin'. Ĉi' alprenis belan dolĉan aspekton kvaz nov'aer staris super ĝi. Tiaspekto ŝajnas aperi kelkfoje dum brilaj matenoj post pluvo kiam on diras "Jen tago tiel bela ke kukol iras Ĉielon."

Sed nun n estis pro tago sed pro i'preter ĝi. Mi ne volis demandi ki ĝ estas. Ĉar kiam nuksrompul venas en sian arbon ĝi n volas demandi kiu plantis ĝin nek kian nomon homoj donas al ĝi. Arb estas ĉiomkontentiga por nuksrompul ka ĉiti' stis ĉiomkontentiga por mi. Poste kiam mi jam sci's legi librojn mi legis—

Kaj lia standardo super mi estu amo

Ka ti enmensigis tivesperon. Sed se v demandus "Kies standardo?" mi n povus respondi. K eĉ nun kiam Parson diras "Tio estis la potenco de l'Eternulo aganta en vi" mi n estas certa en propra mens. Ĉar stis nenjo kirka aŭ homa en ĝi nek preĝa nek adora nek peka nek penta. Ĝi rilatis al aferoj kiaj birdokantado ka dafodandiloj susurantaj kunfrapante kapojn envente. Ka ĝ estis tiel spontana venante ka forirante kiel venteto super tritik. Ank estis strange ke virinon kiu pasigis vivon vestite per sakŝtofo purigante porkostalojn ka brutodomojn vivante senkomforte priatentante ĉiun obolon subite trafis timirindaĵo. Ĉar kvankam ĝ estis tre kvieta ĝ estis granda miraklo ka ĝ ŝanĝis mian vivon ĉar kiam ajn poste mi havis nenjon por konsoli min mi kuris en mansardon ka ĝ estis kern de dolĉec en mult'amar.

Kvankam miraklaĵ okazis nur malofte ĝia gusto ĉiam restis en mansardo. Mi b'zonis nur rampi tien k aŭdi abelojn murmuradi ka

flari lignecan trodolĉan odoron de konservataj pomoj k aŭdi foliojn softe knaradi ĉefenestrokadre ka rigardi torditajn grizajn branĉetojn surĉielajn ka memori ĝin ka forgesi ĉion alian. Stis granda ligna riglil sur pordo ka m kutime riglis ĝin kvankam ti n estis necesa ĉar mansard estis eĵ' tiom forgesita ke venis al ĝi nenju krom vizitanta teksisto ka Gideon dum pomrikolto ka m. Nenjun trafus pens serĉi min tie ka ĝ estis ka salon' ka kirko por mi.

Tegment etendiĝis ĝis plankon ĉiuflanke ka ĉiuj traboj ka ĉevronoj stis kverklignaj ka planko malglatis kiel ŝtormakvo. Pomoj ka piroj havis sian lokon laŭspecie tra tuta ĉambro. Troviĝis kodlinoj k oraj renedoj ruĝbrunaj pomoj ka skarлатаj sovaĝpomoj cifinoj sen-egaloj ka reĝidinoj grandaj verdaj bakeblaj permajnoj ka ruĝstriaĵ. Ni havis anke multegajn pirojn ĉar en tiom malnova ĝarden ĉiam posedata de sama famili' ĉiu generaci' enplantis kelkajn arbojn. Ni havis Worcester-pirojn ka buterpirojn ĵargonelojn bergamotojn ka bon-kristanojn. Tuj post lasta rikolto mansard estis brila kiel kirkfenestro tutruĝa k ora. Ka fruktokoloroj ĉiam reportis al mi mian miraklaĵon eĉ kiam n estis pir aŭ pom en eĵ ĉar kolor stis ligita al odor kiu stis tie jam el tempo nememorebla. Ĉiuj el tiruĝaj rondaj pomvangoj ridetis al povra Pru Sarn sidanta inter teksil ka fenestro tutsoleca. Mi trovis malnovan ŝrankon jam fordonitan al musoj broslavis ĝin metis seruron sur ĝin ka gardis miajn inkon ka plumojn en ĝi ka mian libron ka Biblion kiun Patrin donis al mi ĉar nek ŝi nek Gideon sci's legi ĝin.

Iun vesperon en oktobro mi sidis tie kun junklamp ekzercante min je skribado. Lun plenigis fenestreton kvaz on ten's teleron tie. Laŭlonge de muroj pomoj stis amasigitaj kvaz homoj ĉe foir atendantaj mirindaĵon. Mi pensis k'i nepre dirus unuj al aliaj "Stu trankvilaj! Ĉesigu bruadon! Ne puŝu!"

M ekpensis ke tuta benitec de mansardo venis ĉar m estis damnita. Ĉar se m ne havus leporlipon por fortimigi min en mian solecan animon ĉiti' ja mankus al mi. Pomoj amasiĝus vane por vidi mirindaĵon ĉar mi nenjam ekkonus gloron kiu venas d alia flanko de silento.

Malbeno Kara

Eĉ dum mi pensis tion el nenje subite venis tibelajo ka nestis en mia kor kvaz sem el kern d am.

LIBRO DU

Ĉapitro 1: Rajd al foir

Rakontante ĉition mi nemulte atentis tempon. Ĉar kion signifas temp al kor premata? Nenjon. Ĉu nuptonto malsatinta je sia amatin jam dum longa temp aŭskultas voĉon de gardisto krisci'ganta rapidan pason de horoj? Ĉu al kiu mortas dum matena krepusko gravas hor kiam leviĝos sun kiu leviĝos ne por li? Ka kiam ni povrujoj rezistas tutan potencon d ekzisto strebante atingi nian pacon aŭ kion ni spozas nia paco kiam ni stas konfuzataj kiel turmentata brut en aren tiam ni forgesas tempon. Tiel kvar jaroj pasis ka kvankam mult okazis en ekstera mondo nenj okazis al ni.

Ondiroj venis pri transmaraj bataloj ka maltrankvil en hajmlando. Francoj iris al Rusi' ka nenjam revenis escepte de kelkaj.

Fine un oran vesperon ensomeran venis rajdanto ŝvitkovrita por anonci grandan venkon ĉe Waterloo. Sed plej plaĉa al Gideon stis inform veninta dum sama jar pr'imposto sur grenoj.

"Venigu al mi kruĉon da bier Pru" li kri's kiam l alhajmiĝis el foir ka sci'gis min. "Jen plej bona inform iam konita. Ni riĉos post dutri jaroj. Ni pergrene semu pli da ter. Mi ja *kredis* ke gren nenjam malprofitos sed mi n atendis ion ĉitian. Kiam Callard venis al mia budo kun inform rido superfortis min. 'Domne!' mi diris. 'Kion?' mi diris. 'Devigi framdulojn pagi pro porti siajn grenojn al ni?' 'Jes jen esenco' diras Callard. 'Ka ti rarigos ĝin vidu ka ti karigos ĝin vidu!' 'Nu kamrado jam delonge m esperas tion' mi diras. 'Sed mi tutne kredis k'i faros. Ka kion laŭ cia spoz mi faris Pru? Ek m invitis lin al *Kruĉo da Cidro* ka regalis al li drinkaĵon! Vi povas do kompreni kiom surprizita mi stis. Ka nun ni nur b'zonas taŭnenigi plugilon n'ambaj."

Do ni devos vivi pli strebe ol dum kvar ĵusaj jaroj kiam ni sklavadis de sunleviĝo ĝis noktiĝo k anke dumnokte per vaga lum de laterno. Por mi ti n estus nur por mon se m povus iom elspezi por plibeligi domon ka se Gideon fiere plibonigus bienon. Sed estis

nenjo tia. Nur ŝparado ka spitado por premi monon el bien k eskapi.

Mi kreskis maldika k alta kiel stang al kiu on ligas ŝnuron por sekigi vestojn ka Patrin montris anke pri ti pojnotordan nervezecon. Ĉar ŝi mem estis basa k anke Srin Beguildy ka Jancis ka plejparto de tieaj virinoj stis nanaj ŝajnis al Patrin ke virin devas esti basa. Tial kiam m ade kreskis k anke restis tre svelta (ĉar ja pro tiomaj labor ka nemulta tempo por manĝi ĉiu stus svelta) ŝi diris ke m smilas poplon en nemaldensigita arbustar aŭ trogranda junk en lago ka m kutimiĝis honti same pro mia grandec kiel pr'alia problem ĝis—sed mi n tro taŭensaltu en rakonto.

Gideon portis sian kitelon k aspektis bela en ĝi. Li nun aĝis duka-dudek jarojn plenkreska vir tre plaĉaspekta larĝaj ŝultroj solida bonforma figur. Dum lia korpo plifirmiĝis lia mens samritme plifirmiĝis pli dura ol dektaga glaci'. Li n emis okulumi knabinojn ĉe foir kvankam multaj el i rigardis lin. K iun fojon ĉefoire kiam li portis bluan palton de Patro kun latunaj butonoj filin de Skvir Camperdine (ne skvir en botel sed ties pranepo) preterrajdis lian budon k alridetis lin. Sed Gideon nur ridis kiam mi pridemandis lin ka l frotis mentonon ka rigardis min singarde. Stis nenja dubo ke l stis tre bonaspekta vir ka ŝajnis nejuste al mi ke m ka n Gideon naskiĝis post kiam lepor rigardis Patrinon. Ĉar Gideon povus kreskigi kion on nomas *mustaŝjo*³⁸ k aspektus tutbela ka nenju sciuss ke l havus leporlipon. Sed ĉe mi ĝ estis nekaŝebla.

Bien sfiĉe bone statis. Ni havis grandan ŝafaron tiel ke tondado daŭris pl'ol semajnon. Ni havis porkaron kiu laborigis Patrinon konstante dum glanoj haveblis ŝi prizorgis in en kverkarbar. En porpaŝta kamp apud fruktarbar kreskis tritiko sed ni n profitis ĝin dum unua jar ĉar tritiko sprosaĉis ambefine de spikoj pro tre malseka sezon.

Sfiĉa mon estis ŝparita por aĉeti du bovojn por plugado k aliaj malleĝeraj laboroj sur bien. Stante iom eksmodaj i n kostis multe. Gideon diris ke kiam l'iros aĉet'in mi darfos kuniri ka helpi pel'in hajmon. Ka m povos spekti montrofenestrojn de butikoj dum li marĉandados pri bestoj ka poste ni povos rigardi domon kiun l

³⁸ Lipharoj.

elkore deziras aĉeti kiam oni vendos ĝin. Sed Patrino devas ne scii pri domo por ke ŝi ne babilu al aliaj. “Ka ŝi kredus ke mi pripensas tion tiam ĉi menigus miajn prezojn ka duobligus siajn ka kiel ni status tiam?” diris Gideon.

Sendube vi jam divenis ke mi taŭĝuis plezurigi min ĉar mi preske nenjam estis for de Sarn ekde morto de Patro ka Lullingford ĉiam ŝajnis al mi grandioza loko.

Mi estis en grenkampo postrikoltante kiam Gideon diris tion li ĵus revenis de foir transpaŝante kampon en lasta vesperlumo ombroj de li ka de Bendigo stis etenditaj trans herbojn ekde fora barilo ĝis fruktarbaro dum mi rigardis in veni.

“Sed kiel mi iros?” mi demandis. “Pro ŝarĝokorboj mi ne povos sidi sur postkuseno.”

“Se vi postrikoltos iom pli mi losu poneon de mueloj kiam mi venontfoje alportos grenon por muelado. Ĉu vi iros al Plash por lecion’ morgo?”

“Ja’s.”

“Reirigu bestojn tien do ka mi iros kun greno sabate.”

“Sed mi jam elrikoltis ĝis apena spiko restas en ĉitokampo aŭ alia” mi diris.

“Petu Beguildyn permesi postrikolti alian. Mi vidis lin forportis sian grenon.”

“Sed Janciso ka Srin Beguildy—”

“Vi ja bone scias ke Janciso estas tro ĝismedole pigra por levi eĉ un spikon. Kvankam ŝi tre plaĉas al mi ka kiam temas pri belec—”

L ekstaris senmove kun manoj sur kolo de Bendigo rigardante al kie Plash brilis kiel hela mielo en oblikva lumo revante.

Nur malofte Gideon sidis senmove ka tre malofte li permesis sin pensi pri alio ol enspezoj. Sed nomo de Janciso ofte trankviligis lin ka kiam li eksilentis li pensigis min pri entranciĝinto kiun oni iam venigis al Beguildy por veko. Ka li ŝajnis al mi kiel meditanta somerlaboro dum senventa tago enpensiginta super akvo. Li similis al tutjare revanta taksus’ ĉe ĉerkopordo kaŝanta siajn revojn samkiel siajn ruĝajn fruktojn sub branĉoj. Gideon komencis enreviĝi tiel jam kiam li vidis Jancison sub rozkolora lumo. Foje li murmuris “Ne ne!” ka movis ŝultrojn kvazaŭ for de ŝarĝo ka viegligis sin ka pelis eĉ pl’ol taŭe. Ĉar Gideon stis tre pelema homo proprajn

familianojn li peladis. Ŝajnis al mi domaĉe ke juna vir stas rigideca ka n spertas plezurojn ĉar mi multamis Gideonon. Mi bone sci's kien l'iradis dimanĉe kiam li demetis kitelon ka surmetis botelbluan palton. Li ĉe'stis multe pli regule en Plash ol en kirko. Rozkolora lum komencis ĉtion sed verŝajn estus same eĉ sen ti. Srin Beguildy diris al mi ke l kutimis veni ka frapi ĉeporde ka Jancis kuris al pord en sia plej bona robo kun ruband aŭ flor enhance k alterne ruĝiĝis ka blankiĝis. Ka mi mem vidis kiam ŝi venis al nia dom kiel ŝ anhelis maltaŭ sia poŝtuko ka m demandis min kial. Ĉar al mi Gideon stis nur Gideon sed al ŝi li stis fajr ka tempesto ka printempo mem ka lia voĉ estis kvaz voĉo de potenca Di.

Li kutim'eniris senvorte laŭ Srin Beguildy ka sidiĝis ka Beguildy mienis amare ne volante ke Jancis edziniĝu. Li mienis el angul plej proksima al kamen ĉar li multe s'feris pro frido loĝante en tre malseka dom k estante hom malelirema. Ka Gideon responde mienis amare.

Jancis ruĝiĝis ka tremadis ĉe ŝpinrado ka ripete flankenrigardis Gideonon kvaz regol. Ka Srin Beguildy alprenis mienon silike rigidan k ekplanis elirigi sian edzon el kuirej. Al ŝi tre plaĉis rigard'iom d amumado ĉar al ŝi mankis pripensindaj diskutaĵoj. Ŝi krome volis fariĝi avinjo. Ŝi do pretis fari kion ajn por elirigi Beguildyn el ĉambro. Un fojon kiam Gideon pl'ol kutime mienadis ĉar li forte deziris kisi Jancison ĉar ŝi surhavis ian novan rubandon aŭ mi-ne-scias-kion ka kiam Srin Beguildy jam alvokis sian edzon ka revenis por kvereli lin ka r'eliris ka vokis lin—sed li plu sidadis kvaz kobold en ombroj de fajro—ŝ eĉ ekbruligis tegmenton de grenej. Jes ja tion ŝi faris! Ŝ estis tre fortkaraktera virin. Ka ŝ devigis povrulon kiu malemas far'ian ajn permanan laboron kuradi ti'n ka r'en kun siteloj tutvespere. Kiam li presk estingis en un loko ŝ ekbruligis en alia dum li ĉerpis akvon el lago.

“Mi zorgis ke siliko ka tindro restu vere varmegaj mi'kara” ŝi diris al mi. Ka ŝ ridegis! Mi nenjam vidis virinon ridi pli senbride pri propra far ol ŝi pri ti. Ŝi diris ke ŝ gvatadis tra fenestron nur por instigi ŝin ka ŝ povis vidi tra travideblajn vitraĵojn inter botelvitreroj k'i sidis un apud alia sur kanapo.

“Tutĝuste ka celinde!” ŝi diras ka kuras r'en al sia labor.

Alian fojon ŝi liberigis porkinon ka ĝ kuris rekte en nian kverkarbaron pro ke ŝ paŝtadis ĝin tie jam pli frue. Beguildy amis lardon ka porkin certigis pri multaj lardodonaj porkidoj do pro tim ke ŝ endanĝerigis li bastonenmane sekvis ŝin multe sakrante. Post kelka tempo l eksuspektemis ĉar ĉiu katastrofeto trafinta lin trafis dimanĉe ka l ŝatis ripoztagon kvankam li ja stis pagan'. Do l diris al Gideon "Vi n alportas bonan sorton. Kiam vi venas damaĉo pretiĝas. Forrestu."

Do li devis ne plu viziti! Poste li logadis Jancison en arbaron ka m vidis lin iri laŭ ombraj vojetoj—ne gravis ĉu dumpluve aŭ -froste—ŝi kun vizaĝo brilanta kiel blanka roz ka li rigardanta ŝin ameme ka kolera ĉar amema. Dum i stis enarbare Srin Beguildy ĉiam tiom interesiĝis pri boteloj de sorĉisto kun fantomoj ene (laŭ li) ke l apen povis respondi al ĉiuj ŝiaj demandoj. Ka ŝ ĉiam donis al li tian manĝon ke ĝ daŭris preske ĝis tard'en vesper. Tamen l eksci'ĝis. Li scivolis pri kial subite Jancis inklinas tiom al Tivvy ĉar laŭ ŝi ŝ vizitadas Tivvyn. Ka ĉar li n povis demandi al Sakristian' pro intermalamego li sekvis ŝin un vesperon sekrete. Ka kiam ŝi re'stis enhajme li vipis ŝin tiom ke ŝiaj okuloj stis ruĝaj dum semajnoj poste ka ŝ kuris al Gideon tramalsekiĝinte per larmoj. Li furioziĝis kontre Beguildy ka l diris al Jancis ke l volas nupti kun ŝi sed nur kiam li jam stos riĉa. Ĉar kiel li povus sukcesi li diris kun tiom senkapabla Jancis alkroĉiĝinta al li ka kun tribo d infanoj verŝajne. Sed li stis mishumora ka maltrankvila ĉar li malofte povis viziti Jancison pro vieglem de Beguildy. Mi pensis ke'ble plan montri al mi domon kiun li deziris celis konsoli lin ka plifortigi volon ĉar li timis eble rezignaci'. Li ja volis rezignaci' sciu ĉar li kore deziris Jancison sed li stis nefleksebla ka kiam li stis nefleksebla li n povis permesi al si rezignaci' malgre ĉiuj tentoj.

Montriĝis ke m ne povos pruntepreni poneon de muelisto ĝis post pl'ol kelkaj semajnoj ĉar ĝi lamiĝis. Do rikolto jam stis taŭ longe finita vintro venis ka Kristnasko proksimiĝis kiam i sendis mesaĝon ke ni povos prunti ĝin por Kristnaska bazar ĉar i ĵus aĉetis oldan ĉevalon de Lullingford-Silverton diliĝenc-kompani' k i mem uzos tiun por veturi al bazar. Mi diru k'al mi tre plaĉis ebl ekskursi ka tre maltrankvile m atentis veteron ĉar minacis neĝi.

M ellitiĝis je kvara hor bazarmatene ordigis domon por Patrino ka kunigis ĉion por bazar. D ovoj ka preparitaj kortobirdoj ni havis multe ka d legomoj ka pomoj k iom da buter. Dum mi poluris pomojn en mansardo trankvil eniris min samkiel ĉiam en tilok ekde tiam pri kiam mi jam rakontis. Dum junkolum flagris en frid'aer ka musoj forfuĝis mi staris ĉe aperta fenestro kiu stis kvaz oblong el nigra paper. Nenju son envenis. Nenj ekstere moviĝis. Eĉ lago jam glaci'ĝis ĉerande tiel k'anaso devis glitkuri ĉiumatene tal atingi akvon. Mond estis penetre kvietas preske kiel voĉ ekkrianta. Ja ŝajnis al mi ke kiam mond estis tiel kvietas stis kvaz on apudestis iun tre bone konatan a° kvaz apud amata konato.

Malsupre en senluma grenej koko kri's feble ka dolĉe k al mi ĝ ne sonis kiel surtera birdo sed eble mi sentis tiel ĉar m estis en mansardo kie ĉi' stis ĉiam nova. Al vi eble stas strange ke virin kia mi pensas tiaĵojn ĉar mi ĉiam laboris permane je humilaj krudaj taskoj ka v atendus tiajn pensojn inter delikataj damoj sidiĝintaj por brodi. Sed m estis tre soleca ka havis multegan tempon por pensado ka pro ti ka perlibra instru kiun mi ricevadis ĉiaj pensoj kreskis en mia mens kvaz florantaj junkoj ka neforgesuminoj florantaj en malfekunda marĉa loko kiu havis nenjon alian. Ka m tutne povas kredi ke ti multe malutilis ĉar pensoj malofte venis al mi krom enmansarde k i nenjam revigis min dum mia labor.

Do nun aŭdinte klaran sonon de nia koko bonveniganta tagiĝon kiu tamen stis du horojn for mi sobkuris rapida kiel estingiĝo de latern por prepari matenmanĝon. Kiam Gideon envenis ĝ estis jam preta ka granda fajr brulegis ĉar nenjam mankis al ni ligno ĉe Sarn—pro ki on devis esti dankema ĉar en titempo multaj malriĉaj familioj en Angli devis kungregiĝi ses aŭ sep en un dometo por boligi sian akvon super un fajro. M estis ĉiam dankema pro ni'abunda ligno kiu kostis nenjom nek okupis Gideonon tro ĉar se m bruligis pl'ol li hakis ja mi povis mem haki ĝin.

Ni stis tr'ege komfortaj sidante en gaja fajrolum dum ruĝardo briladis sur ardezojn ka fajencaĵojn ka ŝpinradojn en angul. Plaĉis al mi ke Patrino ne restos soleca ĉar mi petis Tivvyn veni por resti kun ŝi ĉar mi nenjam povis esti feliĉa s amat estis soleca aŭ morna. Skuante tablotukon ekster pordo post taglumiĝo mi vidis ŝian

ruĝan mantelon iri sub ombraj arboj ĉar pro ke Tivvy nenjam faris nek pensis ion ajn direblas ke ŝia temp estis tutlibera sekve ŝ tardis por nenjo.

Gideon jam kombis Bendigon ka poneon de muelisto dumnokte do ĉar ĉi' stis preta ka sun ĵus leviĝis n'ekiris.

Tutlag estis plena de ruĝaj lumoj kvaz nia bien brulis ka reflektiĝis enakve. Nigraj pinoj staris kun brakoj etenditaj gutantaj je prujno tutblankaj tiel ke pintoj de kliniĝantaj branĉoj smilis fingrojn levitajn el sapŝaŭm. Korvoj stis tre kontentaj grakante softe k agrable kvaz sciante ke matenmanĝ estos preta tuj kiam degelos iom niaj plugitaj kampoj k en stakej sonis granda murmurado de sturnoj.

“Reportu al mi bazaraĵon!” krias Tivvy de trans akvo.

Gideon mienis malagrabla ka m sci's ke sola bazaraĵo kiun l'intencis reporti stos por Jancis. Do m krias—“Mi ja ki ĝ estu?”

“Pec da ĉerizkolora silko por ligi miajn harojn” ŝi krias. Ĉar kvankam ŝ estis plejparte malsaĝa ŝ sci's tre bone ke ŝ havis belajn buklojn helbrunajn ka densajn. Ŝi ĉiam flirtigis tiujn kiam Gideon ĉe'stis ka profitis ĉiun okazon por mallaŭdi Beguildyn—kvankam ŝi n aŭdacis paroli kontre Jancis pro ke Gideon ekflamos. Sed ŝ estis sfiĉe lerta pri ti ĝuste kiel stulta knabin kiam enamiĝinta ka ŝ ĉiam kapablis spozigi ke stas tre malinde ka malkonvene ami filinaĉon de sorĉisto ka ke stas grandioz'afer ami sakristianfilinon kies paĉjo povas eldiri bibliaĵojn samrapide kiel sorĉisto povas eldiri sorĉojn.

Stis bonega maten herboj kraketis subpiede ka ĉirkeflugis erikejbirdoj aparte fajfanaso. Ni rajdis al montetoj. Aliflanke de foraj arbaroj ka preteraj sovaĝejoj ka plugitaj kampetoj ie ka tie ka frostaj stoplejoj kie pedrikoj forkuris pro trotbruado videblis montetoj bluaj kiel violoj. Promesplenaj montetoj laŭ mi. Okazis klakad en bosko ka grego da palumoj sin levis ka forflugis flugiloj brilbluis en sunlum direkte al samaj montetoj. Stis kvaz i'mirinda troviĝis ti'eble saniga put aŭ alia miraklaĵ aŭ sanktul kiel en antikva tempo.

Mi diris tion al Gideon sed li rigardis transŝultren al Plash ka longa spajr el blua fumo leviĝanta el Ŝtendom. L ekfajfis subspire ĉar li nenjam fajfis laŭte eĉ kiam li plej ĝojis sed ĉiam silentece k al

siaj pensoj. Do m ne plu parolis k iom poste nia malnova voj ĉesis ka n'eniris ĉefvojon kie veturad estis malfacila — ĉar negrave ki'ajn stis veter tivoj' farita de romianoj ebligis facilan veturadon eĉ pli facilan ol laŭ pagvoj'. Iom poste ni preterpasis muelejanojn kiuj veturis sobre ka poste dutri aliajn ka balde ni soriris monteton en urbeton ka pluvioj ĉirkekriadis per siaj vintraj voĉoj.

Do ni rajdis al Lullingford por vidi revon. Ĉar dom kiun ni vidos enteksiĝis en vivorevon de Gideon. Dom k anke geservistoj baloj ka bankedoj kun nobeletar ĉe *Kruĉo da Cidro* dum voĉdonperiodoj.

Kiam n'iradis tra vadejon ĉe malsupra parto d urbo Gideon diris —

“Ho ke Jancis estu rajdanta kun mi!”

“Nu tiel estos” mi diris “ĵam venontfoje. Kial ne ĉiufoje?”

“Pro Beguildy”.

“Ho Beguildy! Mi haltigos lin per liaj propraj sorĉoj ka magios lin per liaj propraj magiaĵoj” mi diris ka m ridis dum ni soriris mallarĝan straton — tiel ke kapoj aperis en fenestroj ie ka tie por vidi ki okazas.

“Ĉit knabin!” diras Gideon. “Ridu softe. Ne kiel sovaĝa numeni’.”

“Sed numeni' stas bona kamrado ka pl'agrablan voĉon mi malofte aŭdis ka plaĉas al mi via komplimento knabo!”

Efektive plaĉis al mi mondo ka ĉi'. Ĉar i'Lullingforda ĉarmis min kvaz malsama vento blovis tie ka sun estis pli brila ka taglum pli sekura. Kialon mi n sci's. Ĝ estis trankvila loko kvankam nenjel tiom kvieta kiom nun. Oni foriras al urbegoj nuntempe sed kiam m estis juna on kuniĝis de ĉirke trans mejlojn en nanajn bazarurbojn. Malgre ti ĝ estis kvieta ka tre trankvila kvankam ne kiel silentis Sarn kiu stis foje preske morteca. Stis un plata strato de nigraj ka blankaj domoj kun duaj etaĝoj elstaraj ka gablitaj ka kun rondaj butikfenestroj teretaĝe. I staris fone de nanaj ĝardenoj. Stratkape stis kirko longa ka basa kun altega tur bone ĉizita k okulplaĉa. Sub ombro de kirko staris granda komforta tavern kies ruĝa ŝildo montris altan bluan cidrokruĉon. Ĝi havis ruĝajn kurtenojn ĉefenestre ka fajroluman brilon vintre ka ĝ ŝajnis diri pro sia proksimec al kirko ke konscienco de gastejestr estis pura ka lia el'

fidinda ka ke nenju tie ricevos pl'ol konvene. Sed pri tilasta promes m iom dubas.

Dimanĉe on pendigis pecon de blanka tol taŭ butikfenestroj kvaz taŭtukan vestaĵon ki aspektis tre pia ka respektinda. Stis tre malmultaj butikoj ka nur un el ĉiu spec d'oni ne povis kuri d un al alia komparante prezojn.

Troveblis Verda Kanistro kie on vendis mangaĵojn ka bobenojn ka potojn ka patojn anke maltej ka buĉej ka bakej ĉar Lullingford estis tre progresema ĉar ne ĉiu urbo povis fiere havi bakejon en epoko kiam preske ĉiu bakis panon enhajme. Ka jen anke ledej por botoj ka jungilaroj ka tajlorej kiu stis aperta nur vintre ĉar somere tajlor vojaĝadis tra kampar laborante po-pece. K anke forĝej kie knabetoj amasiĝis post lecionoj ĉiun vintran noktigon petante permeson varmigi manojn ka rosti kaŝtanojn ka terpojn. Stis agrable rigardi ardantajn fajrerojn sori ka senti ĉirke si komfortan brilon kiu varmigis ĝis kor sen postul k'on faru aŭ pagu ion samkiel ĉe am. Apud forĝej stis vico de dometoj inter kiuj loĝis teksisto. Samkiel tajlor li migradis tra kampar somere ka kelkfoje al vilaĝo vintre se veter favoris. Sed dum mava veter li restis en sia komforta dometo k aŭskultis venton muĝi de super montoj nordaj al montoj sudaj. Mi nenjam komprenis kial tidomet altiris min eĉ ekde m'infaneco. Ĝi havis mallarĝan ĝardenon ka vojeton el ruĝaj brikoj kverkan palisaron ka lavendarbustojn ambeflanke de vojeto. Tri bone blankigitaj ŝtupoj kondukis al pordo ka troviĝis fenestro el multaj nanaj paneloj n el botelvitro. Supre stis alia fenestro. Maltaŭe ĝardena terpecet etendiĝis ĝis kampoj ka troviĝis dua fenestro ĉe salon tra kiun on alrigardis tiĝardenon ka kampojn ĝis montoj. Tion mi sci's ĉar iam m iris tien kun mesaĝo dum tempo d olda teksisto. Ĉe taŭo de dom estis vito tr'olda ka tordiĝinta. Ti stis raraĵ en loko de tiel fridaj vintroj sed urbon ŝirmis montoj ka dom de teksisto frontis suden do vito prosperis ka kvankam en fridaj jaroj vinberoj ne ĉiam maturiĝis tamen kelkjare i maturiĝis tre bone. Pro vito ka lavendo k agrablaj ombroj sur verda gazona stri ka pro siringo kiu staris apud pordo ka pro granda teksil en salon' kiu stis tre komforta ka fajrolum brilanta sur latunajn ka kuprajn ujojn ka tre bonaranĝita pro ĉiĉi' mi nenjam povis preterpasi ĝin sen sopirem. M envi's dikajn turdojn

saltantaj sur gazon'. Ĝi tiris min kiel Ĉiel tiras povran pekinton laciĝintan pro si'enkota vagado.

Tial kiam ni preterrajdis mi diris—

“Gideon ki malsmiligas tidomon disadise d aliaj?”

“Ĝi n estas malsmila.”

“Sed jes! Ĝ estas malsmilega kvaz struita el alimondaj ŝtonoj!” m elkri's. “Malsmilega kvaz traboj falis en arbaroj de Pli Bona Mondo.”

“Je kukol knabin vi freneziĝas” diras li. “Ĉit alie pedel enkarcerigos vin.”

Do m ĉitis ka n'venis al *Kruĉo da Cidro* ka metinte niajn bestojn kun ceteraj ni bonordigis niajn varojn en bazar.

Ĉapitro 2: *Kruĉo da Cidro*

Bazar troviĝis subĉiele sur pavimita plac apud kirko. Ĉiu havis sian standon k on stakigis fromaĝojn inter standoj. Ar d oldulinoj portis konvenajn ŝalojn ka katunajn kufojn vendante samajn aferojn kiel ni buteron k ovojn ka kortbirdojn. Stis stando por zingibrokokoj k alia por sekfruktaj tortetoj. Stis stando por sunkufoj ka stando por ludiloj k alia por strasaĵoj kiaj koralĉenoj ka porcelanaj katoj ŝubukoj k amuletoj ka bidaj mansaketoj. Stis gaja sceno pro hele brilaj ileks ka visko fromaĝoj flavaj en sunlum ka zingibrokokoj tiel bruna ka glua kiel kaŝtanaj burĝonoj.

Buĉisto staris ĉe sia pordo kiu frontis al bazar krioferante sian viandon k alte tenante longan brilantan tranĉilon timaniere k'on kredus ke francoj atakas. Virin vendis varmegajn terpojn ka porkohepatojn ka potist aŭkci's siajn varojn ka je ĉiu hor li rompis kelkajn ki distris rigardantojn. Poste venis aktoroj ka bele amuzis nin k en angulo bestkuracist eltiris dentojn po un penco ka rigardigis homamason. Pro ke ĉiuj kriadis k aktoroj deklamadis siajn rolojn ka rompataj porcelanaĵoj bruadis ka bestoj muĝadis ka blekadis el apuda foir ka horloĝoj tre dolĉe elsonoradis duonhorojn ja kredu ke bruad estis gaja.

Kiam ni jam forvendis niajn varojn n'eniris *Kruĉon da Cidro* por manĝeti. Dek aŭ dekdu' d olduloj sidis ekstere kvankam aer tiom fridis k'i certe malsatis. Ĉiu tenis grandan stalojn trinkpoton ka plenavoĉe kantis

La Eternulo estas mia paŝtisto mi ne timos.

Ĉiu kantis individue laŭ propra melodi' ka m pensis kiom kolerus Sinjor Beguildy se l aŭdus in krei tian senharmonian bruon ĉar li stis tre precizema rilate al sia ar da silikoj ka frapante in li maltrankviliĝis s i n sonigis ĝustan tonon.

Sed kiam n'aliris tiantikvulojn ĉiu ektenis sian drinkpoton senmovi kie ĝ estis ka ĉesis kanti ka tiel sidis kun aperta buŝo k okulfiksitis min. I smilis al novmodaj pupteatraĵoj kun pupetoj kiuj sammomente ekhaltas kiam marionetist elmanigas in. Tie i sidis

kun gastej maltaŭ si ka frosta sunbril sur oldaj ruĝaj vejnmontraj vizaĝoj k iel timaj mienoj. Dum ni preterpasis benkon ĉiu kapo turnis sin lante ka dudek' aŭ pli d okuloj fiksrigardis oblikve trans suprojn de potoj samkiel strigidoj fiksirgardas ka turnas kapon okulumante de maltaŭ sia plumar.

Trairante senluman pordejon kies pord estis najlumita smile al prizonpordo k enirante gastejan salonon kie sidis pli delikataj homoj mi trovis k'ank i fiksis sur min okulojn sed pli ĝentile. Bienistoj ka virinoj ka dutri aliaj venis per frua diliĝenco ka ripozis ĉitie ka skvirofil kiu stis parson' en Silverton ka rajdadis hajmen celebri Kristnaskon tie ka manĝetis en gastej pro ke lia ĉevalaĉo perdis hufumon i ĉiuj levis kapon sensone ka singarde sed tre scivole rigardante min. Subite m eksci's ke ĉiuj tihomoj eminentuloj en dom k olduloj ekster ĝi rigardadis mian leporlipon. I pensis laŭ siaj rango k edukiteco—

“Jen stranga kuriozega kreitin!”

“Tiu virin estas el cirko mi certas!”

“Junulin kiu ŝanĝiĝas en leporon dumnokte.”

“Stas sorĉistin malbela leporlipa fisorĉulin.”

Eble dum miaj dutri taŭaj vizitoj al Lullingford i same fiksrigardis sed tiam m estis nur infan ka n rimarkis.

M aŭdis oldulojn eksterajn graki kiel korvar k un diras—

“Vi ne trinku dum ŝi apudaĉas. Venenos vian inteston.”

K alia—

“Vi ne rigardu hominaĉon. Ŝi perokule fisorĉos vin. Vi senhalte mortados.”

En drinkej on interŝanĝis rigardojn ka m sopiris morti. Malgre morda frido ka mia maldika robo ka longa distanc inter ni ka kamen mi ŝvitegis. Ĉar vere m amis miajn kunhomojn ka volis k'i amu min ka m sentis amikecon al brutistoj k altsocioj ka gastejestro ka li'edzin. Ĉar i stis parto de mi'ekskurs ka parto de Lullingford ka de mondo kiu ĉiam kaptis mian koron per siaj manoj samkiel infan tenas birdeton kiu ka timas ka konsoliĝas pro titeniĝo. Mi prefereĝus elrajdi por renkonti novajn homojn novajn vojojn novajn vilaĝojn infanojn ludantajn sur fremdaj vilaĝherbejoj nekonatajn de mi kvaz gefeoj venintaj tien el mi-nescias-kie-nek-kiel kantantaj ka malaperantaj en krepuskon

oldulojn laŭrantajn padojn tra paŝtejon pri kiuj mi scias eĉ ne nomon de posedanto cele inter arboj kirkojn kies sonoriloj tintadas sonigate de homoj kiujn mi ĝis tiam nenjam vidis. Ho tion mi volegis vidi. Sed nepre ĉefe stu k'olduloj afable rigardas min dum mi preteriras k infanoj ridetas aŭ ĵetas floron al mi ka kiam m atingas gastejon aŭ drinkejon on diras "Proksimiĝu al fajr karulineto ĉar nokto profundiĝas." Ho mi volegis sperti tion!

Despli do m sentis ŝokon kiam reala mondo tiel traktis min ĉar vivante tiom fore de ĝ mi taŭe nenjam vere sentis mian triston. Sed nun mi sci's ke katenas min mizer ka fer kiel diras Libro. Jes malliberigita maltaŭ pordo tia ke granda najlumita pordo de gastej ŝajnis konstruita el nur paper!

Dum mi klinis min super mia teler por ke mia kufo kaŝu larmojn dam eniris. Ŝi ja stis verdire belega. Ŝi stis tiel supla kiel vergo ŝ estis vestita per longa skarлата rajdmantel ka konforma ĉapel de vojrabisto ka ŝiaj kaŝtankoloraj haroj stis ligitaj per rubanda banto. Ŝi havis nigrajn okulojn el kiuj radiadis nenja homanim sed anstate briletis kiel okuloj de kato dum frosta nokto. Kun gantoj sur manetoj spronoj sur botoj ŝ eniris ridante pr'interparol kun olduloj sur benko.

"Ilon por balai gastejestro!" ŝi diras. "Ni b'zonas ilon por balai ĉitie."

Ĉiuj ridetis k iom rikanis. Mi bone sci's kion ŝi celas diri ĉar iam dum konversaci' Patrin diris al mi ke s on komencas paroli pri balailoj mi foriru ĉar timaniere i diras ke m estas sorĉistin.

Sed Gideon tutne rimarkis ĉar sen aflikto smila al mia li nenjam pensis pri tiaj aferoj ka ĉar li jam kutimiĝis al mi nenjam venis en lian kapon k'aliaj homoj eble ne tiel kutimiĝis. Ka l jam enprofundiĝis en sindemandadon ĉu l preferus Jancison aŭ grandan domon kun geservistoj do ĉiĉion li n rimarkis.

Dam kuris al fil de Skvir ka frapetis lian ŝultron pro ki li sulkigis frunton pro sia digno ka ŝ diris—

"Vi do bonule venis kristnaskadi! Kiu estas la virino kun leporlipo?"

Li mansignis por averti ŝin paroli softe ka tr'ete kapklinis direkte al Gideon.

“Nu jenas juna Sarn el Sarn!” ŝi diras iom ruĝigante k alirante lokon kie sidis Gideon tre belaspekta en sia blua palto kun latunaj butonoj ka nigra brakbendo memore al Patro k okuloj malhelaj pro pensoj pri Jancis. Mi kubutumetis lin ka l stariĝis ki eĉ plibeligis lin ĉar li havis imponan staturon.

Ŝ etendis al li manon ĉar etnobelar stis ĉiam afabla al bienistoj despli kiam proksimiĝis elektoperiodoj kiam on voĉdonos ka ŝ albrilis lin per nigraj okuloj ka diris—

“Baldaŭ oni voĉdonos kaj Patro havas laboron por vi Sarn. Do estos bone se vi vizitos nin iun tagon por manĝi se via amatino permesos.”

Ŝi rigardis min malice. Ŝajne ŝ kredis ke Gideon stis sen gefratoj ka tial ŝi decidis rigardi min lia konatin aŭ eble ŝ decidis moki lin—por peli lin en sklavecon al ŝi per mokado.

Nu Gideon opini’s tutsame kiel Skvir pri politiko pro imposto je grenoj sed post amara pripensado l ankore ne decidis ĉu rezignaci’ ĉion tian ka kontente famili’ĝi kun Jancis k amas’ d etuloj ĝis in apartigos morto. Li do iom hezitis ka ĉar ŝi n kutimis al prikrast-prokrastado fare de bassocia vir ŝi koleriĝis “Nu! Nu! Vi ne havas tempon Sarn. Vi ne havas tempon, mi komprenas” ŝi diras. “Vi dancados sur Diablul-Monto, venontan Tomasfeston, sendube. Ho vi aspektos bela Sarn, vi kun via edzino, dum ĉirkaŭe estos balailaro kaj la luno brilados.”

Ŝia ridado smilis tintadon d aĉfunkciaj sonoriloj ka Gideon ekkomprenis kion ŝi diris. Li ĉiam komprenis lante sed klare. Ho terure klare—

Tiu stis un foj kiel mi jam diris kiam mi vidis Gideonon koleri. Lia vizaĝo malheliĝis ka liaj okuloj aspektis kvaz lago flu’s maltaŭ i fridamare frida. Li desupre rigardis ŝin tiel ke ŝ paliĝis ka l diras tre lante—

“Moŝtin jen mia fratin. Se m emos danci sur Diablul-Mont apudapude kun sorĉistinoj do m dancos. Ka se m emos danci supre en ĉasistbal kun nobletuloj tion mi faros. Sed mi n invitos *vin* kundanci. Ka m anke kredas ke m ne voĉdonos por Skvir ĉar ĉu povos estri landon hom kiu ne povas estri siajn virinojn ka lasas sian flinon konduiti kiel cerbomanka kriaĉulin? Li b’zonas pl’ ofte vergbati vin moŝtin.”

“Dorabella!” kri’s ŝia frato tr’embarasate pro ke ŝ faras tian kverelon.

I eliris ka Gideon sidiĝis ka plu manĝis. Ka malgre ĉi’ lia manĝoĝu’ restis sama kvankam mi mem apen povis preni mordeton. Do tuj kiam li foriris por aĉeti bovojn mi rapidis eliri tiun ejon. Multaj taskoj stis farendaj ĉar necesis aĉeti malton ka sukeron ka teon ka botojn por ni ĉiuj ka donacon por Tivvy ka iom da ‘bako³⁹ por Gideon ĉar li nenjam aĉetis tion por si li stis samavara kontre si mem kiom kontre ni. Kiam ni jam finis k ank aĉetis dutri kromaĵojn por kristnaska festo ka jam metis ĉion en korbojn Gideon pretis rigardi domon. Bovoĵ plaĉis al li. Longakornuloj brunaj kun kolorstrioj i stis ka tre fortaj. Ĉar tre malmultaj homoj ancor uzis bovojn por kampotaskoj tial i stis multmen kostaj ol taŭe. Do l ĝojis ka nek tiam nek iam poste li ŝajnis trista pro mi’dolor. Ja kiel li povus sc’i ke mia kor sangas pro Fraŭlin Dorabella k olduloj sur benko? Li koleris pro ke l trovis hontige al si k’on mokas leporlipon d an de lia famili ka krome aludetas al sorĉado. Sed pri mi li n pensis ne pl’ol se m estus un el ĵus aĉetitaj bovoj kiun iu preterpasanto puŝpikis. Li fajfis apen aŭdeble dum ni laŭiris vojeton kondukantan al dom kiun li volis posedi. Mi nenjam taŭe iris tivojon ĉar ĝi troviĝis ekster urb apud voj aliflanka ol nia ka kutime kiam n’iris al urbo ni n havis multan tempon por promenado. Balde ni forlasis vojon de diliĝencoj ka troviĝis en vojetto kun profundaj glacikovritaj sulkoj k altaj heĝoj tutblankaj pro prujno.

Jam iomete noktiĝis sed Gideon diris ke n gravas ka ke ni regos bestojn senpene ĉar stos taghele kiam lun leviĝos. Lin tr’ekscitis dom tion mi povis vidi do m konsentis je ĉiu lia dir ĉar nenjam mi volis menig’ies plezuron. Di scias ke plezur maloftas en mondo ka Gideon ĉiam seriozis pri vivo. Do kiam mi sci’ĝis ke l planis regali min poste en *Kruĉo da Cidro* ka diskuti kun mi pri ĉiuj niaj planoj ki n eblis kiam Patrino ĉe’stis mi diris nenjon kontre ti kvankam mi sentis ke stus preferind’eniri faŭkon d Infer ol sti denove en tigastej. Sed Gideon volis paroli dum li sentis sin en feria humor tal li resubmetos sin al silentega etos’ de Sarn. Ĉar stis

³⁹ Tabako.

tutne'ksplikeble tamen vere k'on ne povis elkore esprimi sin ĉe Sarn ka m nenjam sci's ĉu tiel stis pro grandaj senĝoje meditantaj arboj ĉu pro peza reŭmamismeca sento kaŭzata de troa proksimec al akvo ĉu pro malnova antikva dom plena de memoroj pri malnovaj antikvaj homoj ĉu i'mava stis aŭgurata. Do Gideon n eldiris siajn pensojn sed ruladis in en sia mens kvaze neĝbulon ĝis fine neĝbuleg estis tiom peza ke ses viroj ne povus movi ĝin preske sfiĉe granda por mortigi homon.

Ni trairis aperturon en baril en aleon smilan al voj por kaleŝo. Ĉe fin stis alia trairej kun ĝloboj sur kolonoj tre impona. Intern estis kurba turnej por kaleŝoj ka florbedoj tre kare prizorgataj.

Tie ni staris rigardante tra forĝferan trairejon al dom pri kiu Gideon diris ke ĝ estos nia. Ĝ estis nova konstruita post morto de Reĝin Anne ka terure granda dom tre solida kun po kvar fenestroj ambeflanke de pordo ka super pordo stis ŝtona balkon. Super ok fenestroj stis ancor ok ka super i gablofenestroj pri kiuj Gideon diris k'i stas fenestroj de loĝoĉambroj de geservistoj. Ŝtupoj sorkondukis al pordo k anke ŝtupoj kondukis al ŝtona plataĵo kie on surĉevaliĝis k unflanke troviĝis ĝarden kun muroj ka ronda kolombej.

Nenju lampo brilis ka dom aspektis malankolia tro kvieta tro senluma ĉirkate de senlumaj trokvietaj arboj.

“Mi preferas ke stu lamp” mi diris.

“Ej ej lamp? N estas mallume je nuna hor ne verdire mallume. Kial on b'zonu lampon? Dommastrin ja povas ŝpini en lum de fajr k oldul povas sidi en kamenangul ka pripensi plibonan mondon sen malŝpari sebon ja nek vakson!”

Laŭ parol ŝajnis kvaze Gideon jam transprenis administradon ka m ne povis ne ridi.

“Ŝajne vi tre deziras ke povrul pripensu plibonan mondon” mi diras.

“Mi ja sed ne tro balde. Malhelpus s oldul foriĝus kvaz estingita latern tal n'amasigis sfiĉan monon. Post ni diru dek jaroj.”

“Li do mendu sian ĉerkon post dek jaroj povrul.”

“Vi stas tr'akralanga hodie Pru” li diras. “Sed iam li forpasos ti stas certa. Do ni b'zonas nur atendi.”

“Li stas praonklo de Frin Dorabella ĉu n?”

“Ja’s.”

“Ĉu l do ne preferos doni ĝin al juna Sinjor Camperdine?”

“Nenjele! Tiu volus palacon d episkopo.”

“Nek tamen al sia kuz?”

“Tutne! Li nenjam akceptus resti longatempе en unsama lok ne tijunul. Ruliĝanta ŝton li stas vera strangul. Cert’on aŭkcios ĝin post kiam oldul forpasis ka v ka m dev’s zorgi ke ni havu sfiĉan monon.”

“He rigardu lumon” mi diras.

“Kie?”

Mi vidis ĝin tutklare grandan palan lumon sobvagi de fenestro al fenestro ka poste sorgliti en longa fenestro kiu ŝajnis desupri laŭ ŝtupar ka rekomenciĝi sur supra etaĝo. Jen un fenestro brilis dumminute ka poste nigriĝis jen ali’ekbrilis. Ĝ aspektis tre stranga nekontenta tiel vagante. Stas nenjo pli kontentiga ol senmovа lum sed flagranta lum iranta ti’n-ka-re’n en nenj estas tristiga vidaĵo. Tiel ĝ agis dum longa tempo ka frido pl’iĝis. Estis nenja son. Ni staris tie kvaz almozuloj taŭ enirej ka malkvieta lum vagis en mallum. Subite ĝ estingiĝis.

“Ho ĝ estingiĝis!” mi diras. “Ho ve ho ve!”

“Pro ki veo?” diras Gideon.

“Mi volis ke ĝ senmoviĝu ka restu en fenestro k elsendu kuraĝigan brilon” mi diris. “Sed jen ĝ estingiĝis.”

Tre afliktis min ĝia estingiĝo tial mi kunfrotis miajn frostajn manojn sed kial mi sentis tiom da dolor mi n scias.

“Stis nur dommastrin serĉanta siajn trikilojn aŭ olda Camperdine serĉanta sian flar’bakujojn. Ka trovinte i estingis lampon. Ka tre prudente.”

“Ne!” mi diris. “Ne! Estis am knabo kiu volis senmoviĝi ka brili. Sed dom superfortis ĝin. Mallum nun venkis. Lum estingiĝis.”

Ka m komencis plori ki stis stult’ago. Sed Gideon ne tiom koleris kiel atendeble ĉar li stis bonhumora pro bovoj ka dom.

“Vi malsanas pro i” li diris “ĉar vi n estas plorema Pru. Venu nun al via vespermanĝo ka m rakontos al vi ĉikion mi planas. Mi havas multon por diri ĉar tiulinaĉo Camperdine ŝanĝis por mi mian intencon do m devas diri al vi ka novajn ka taŭajn planojn.”

Malbeno Kara

Ni forturnis nin de fermita enirej silentaj kiel ŝtonoj ka n'forlasis ĉiujn dudek kvar senlumajn fenestrojn ka senlumajn arbojn sen plejeta venteto kuŝantaj en vastec de nokto.

Ĉapitro 3: “Aŭ morti penante”

Okazis tutne tiom mave kiel mi timis ĉe tavern ĉar olduloj jam foriris kun siaj brutaroj ka Camperdineoj jam vespermanĝis. Ofte tiel stas s on forte timas ion tamen frontas ĝin ka jen! ĝ estas nenjo. Gastejestro ka lia Srin taksante nin sensignifaj sendis servistino por servi nin—timantan simplan kreitaĵon smilan al Polly de Muelisto ka tutne timindan. Ni solaj okupis salonon ĉar on frue hajmoniras el Lullingforda foir dumvintre pro stato de vojoj eĉ nun. Mi ĝuis ruĝan fajron ka vaporvarmegan teon post tristo de tidom kun sia morta lum.

Gideon komencis paroli post iom da tempo tre lante ka kvaz vortoj kostis oron.

“Nu Pru mi havigis multon direndan ka se ni n volas tranokti mi plej bone komencu. Vi scias ke m ka Jancis n’enamigigis ja sincere?”

“Ja’s.”

“Mi ne kredis enamiĝ’ian ulinon kiom tiknabinon Pru. Kaptas onian internon ŝi. Mi tutn’ intencis pl’ol ludeti. Mi ne celis nupti nek amori. M intencis juste trakti Jancison ka dum ni povis kunesti dimanĉvesperojn ĉi’ stis bona. Kiam nenjo kontraŭas ne brulas sango. Kontraŭu ka jen sango fajras. Tal olda Beguildy sci’ĝis pri ni ni sfice kontentis ka stis senkulpaj kiel du diantoj sur tigo.”

“Ka plu stas” mi diras.

“Ja’s.”

Li rigardis min iom strange dummomente poste diris—

“Vi povas kvaz sorĉe sc’i nia Pru.”

“Ne. Nur iomete sagaci.”

“Nu ekde oldul adiaŭis min mi malsatas ka soifas Jancison preske tiom kiel tidomon ka monon koce ki kunestas.”

“Ne pli?”

“Jadi ne!”

“Do vi n amas Jancison sincere Gideon. Vi nur amoras ulinon laŭkorpodezire.”

“Jadi! Povus esti Parson predikanta! Tiel efikaĉas librolernad al virin.”

L iom ridis nelerteme ka komencis plenigi pipon per ,bako. Sed mi sci’s ke se m havas sagacon ja ne librolegado donis ĝin al mi sed nur kvieto de mansardo.

“Nu ĉu aŭ n kun longaj vortoj ne gravas” li diris. “Mi volas. Mi volas ŝin tiel forte ke m preske decidis foroferi ĉion ka porti ŝin al Sarn ka mendi lulilon el junkoj de Srin Beguildy. Do por venki sopiradon mi planis montri al vi domon ka paroli pri ĝ k eble aĉeti kelkajn meblaĵojn kiel komencon.”

“Por plidurigi vian koron.”

“Ja’s. Ka m planis ricevi edukiĝon de vi nelge k arigi al mi subtenantojn j’elektotempoj k esti tiom aprobata ke m povus eĉ aspiro filinon de skvir.”

“Frin Dorabella!”

“Jes ja! Ki ŝ stas krom virin? Ŝi n havas pl’ol i’alia virin ka kion vir eĉ Estro de Bienego farus por ŝi ol gravedigi ŝin?”

“Ĉit! On aŭdos vin en kuirej ka koleriĝos pro tisenbrida parolado.”

“Veroplena parolado.”

“Eble veroplena. Sed pro ti nenju plimulte aprobus ĝin.”

“Ekde kiam ŝi ĵetis al mi tiunuan impertinentan rigardon m enmensigis tiel. Ŝi kolerigis min ka samtempe plaĉis min. Do m pensis ke se tiel mi ja povus sendeziriĝi Jancison—ĉar mi dev’s aŭ forlasi Jancison aŭ mi dev’s senpensiĝi pr’alia—k eble poste Jancis ekpreferos Sammyn de Sakristian’.”

“Ti preske mortigus knabinon Gideon ka Sammy ne taŭgas por virin ka krome li plenmensiĝas per lernado de sanktaj tekstoj.”

“Nu li prenis ŝin se m lasus. Ŝi kolerigas lin per sia kapricem ka pro ke ŝ estas filin de sorĉisto koce. Mi vidas emon en vizaĝo de Sammy foja-foje. Edziĝi ŝin ka bridi ŝin jen kion farus Sammy.”

“Sed ti stus krUEL Gideon.”

“Nu tion mi planis kiam n’ekiris Foirin. Mi planis ĵeti Jancison al lia kapo kiel mi ĵetas paneron al Towser⁴⁰ ĉar mi dev’s elekti unun aŭ alian. Ka ŝ stus sfiĉe kontenta kiam ekiĝus infanoj.

Kvankam helpu in Eternul! I naskiĝus kun grimaco de Sammy ka buŝoj plenaj de citaĵoj. Sed ŝi kredus in perfektaj. Nu ĝustemalĝuste tiel m enmensadis.”

“Jadi kia Di plenpotenca!” mi diras iom mokante kvankam mi sci’s ke l j’agus tiel se l volus. Li ĉiam stis fortul ka ti foje stas preske sama kiel vir kun nemulta tempo por kompato. Ĉar s on haltas por kompati on devas ofte deflankiĝi de voj. Do kiam on parolas al mi pr’iu eminentul aŭ pr’alia eminentul mi demandas al mi al kiu mankas ĝoj pro lia glori? Kiom d olduloj k infanoj pereis sub liaj kaleŝradoj? Al kiu nuptofesto mankis lia kanto k al kiu funebranto liaj larmoj dum li dediĉis sian tempon al altiĝado?

“Sed nun” diris Gideon “mi decidis ka m n aliel decidiĝos. Mi ne fordonos nek Jancison nek ĉidomon en Lullingford mi havos ambajn. Ka m aperigos Jancison en robo kiu mem elegantos kun mamoj senkovraj kiel de dam ĉe ĉasistbal taŭ Frin Dorabella. Ka nek nur ti ne. Sed kiam vi ka Jancis estos ĉe glora dom ka nobelar vizitvenados en siaj kaleŝoj—”

“Ka Patrin! Vi ne menci’s Patrinon!”

“Ka m eminenta pli respektata ol eĉ Skvir k ancor n olda nek presk olda—”

Li silentis longatempe pensante.

“Nu Gideon” mi diras “ka ...?”

“Nu do se Dorabella Camperdine renkontos min kun tinigrokuloj ka tiruĝa rideto ŝ mem protektu sin! Mi posedos ŝin. Ka senedziniĝan ja pro kion ŝi diris al vi k al mi hodie. Ka kiam povra filin de sorĉist estos mia laŭleĝa edzin per mi tifilin de Skvir estiĝos putin.”

Dirante tivorton li perpugne frapegis tablon tiel ke trinkpoto d el’ rulfalis sur plankon.

“Se v tiel fikse decidis” mi diras “pl’ol poto d el’ disverŝiĝos karul mia.”

“Vi parolas kiel oldege olda virin Pru. M estas kia mi naskiĝis. Nenju povas kontrediri tion.”

Ankor mi povas aŭdi Gideonon diri tion krude k abrupte kun son de disŝirita kor. Kvaz li pagus ĉion por estiĝi kia li n povas esti

⁴⁰ Hundo konata de Gideon kaj Pru.

kvaz li'anim en timomento fore de Sarn ka ĉities antikva potenco loktis forte por liberiĝi. Eble vi vidis libelon elkokonigi. Ĝi loktas ka baraktas kvaz viv mem stas atencata. M eĉ vidis in transkapensalti pro sia dolorego. Ĉar liberiĝ'i devas ka doloreg estas tiel forta kiel naskodolor tre kompatiga vidaĵo. Sed en nia Gideon ĝ estis eĉ pli doloriga vidaĵo. Li sidis apud agrabla fajr k elverŝita bier glimis sur planko kiel malhela sango ka l diris eĉ ne vorton dum pl'ol hor. Mi sci's ke tiom da tempo pasis ĉar kiam l entranciĝis m aŭdis tavernmastrinon voki al servistin ke ŝ turnu rostostangon ka rapidigu viandon ĉar manĝ estos servenda post hor. Poste stis silente ka m sidis kun manoj interplektitaj fojfoje vidante malhelan vizaĝon de Gideon kiam fajr ekflametis. Mi restis silenta kiel vintra merlo. Ŝajnis al mi ke potenca man premas lin baraktante kontre li por devigi lian animon ŝanĝiĝi animon kiun donis al li Patro k Avĉjo ka ĉiuj prapatroj ĝis Timothy kiu havis fulmon ensange. Mi povis vidi en mia mens Novan Domon de Lullingford ka lumon vagantan kvaz ĝi volis stabiliĝi ka brili. Mi volegis ke Gideon kvietiĝu ka ke l prenu Jancison ne por venĝo sed pro am ka ĉar ŝ estis kandel' de li'okul ka li'amata konato ka n voluptocele. Ka m volegis ke l pensu pri Patrino ka pri mi ke m n estu kiel hund aŭ aĉetita sklavo lia.

Post longa forpas' de tempo m aŭdis voĉon eksteran diri—

“Ĉu ĉi' finiĝis?” K alia voĉo respondis “Ja's ĉi' pretas.” Ti sonis solena kvankam mi sci's ke nur vespermanĝon i priparolas.

Gideon movis sin ka murmuris al si.

“Aŭ morti penante” li diris.

Do m sci's ke ni ĉiuj ekiris sur senluma voj Gideon ka Patrino ka m ka nun Jancis.

Ni eliris ka selis ĉevelaĉojn ka rajdis hajmen tra mondo rigida kiel roko pelante bovojn taŭ ni. Mutec denove premis Gideonon. Ekskurs finiĝis. Frostitaj flaketoj sur vojoj stis nun solidaj kiel fero. Ka heĝoj stis tutkiel forĝferaj bariloj de Nova Dom en Lullingford. Estis mezo de nokto kiam ni preterpasis Lagon Sarn ka vidis ke glaci etendiĝis eĉ pli foren ka kovris frostitajn nimfoliojn.

“Nun jen ja tre multkosta tago” diras Gideon “ka m esperegas ke v plene ĝuis ĝin.”

Mi sci's k'elspezi multe dolorigis knabon. Kutime stis nur krust enpoŝe ka trinketo d akvo dum foirtagoj. Do m elmensigis oldulojn ka Frinon Dorabella ka diris nur —

“Ja's stis bonege k elkoran dankon Knabo.”

“Ka vi konsentos pri ĉi?”

“Ja's ĉu m n ĵuris?”

“Sed tal pri Jancis.”

“M akordas pri Jancis. Sed stus same eĉ se ne.”

“Ne se v rifuzus labori.”

“Ho mi laboros. Nenjam mi timis laboron.”

Subite dolĉa disa fajfad ekfalis el obskura lunluma ĉiel'.

“Skultu!” li diras. “Sep Fajfantoj.”

Sed mi diris opini' ke stas nur kelkaj pigoj ĉe ekstrem de lago kiujn ni bruĝenis ĉar mi ĝismorte timegis pensi pri tialiaj fantomaj birdoj.

“Ne” li diras. “Ne. Tutcerte Sep Fajfantoj. Aŭguras mave.”

Strangaj vortoj de Gideon ĉar li kutime priridis signojn k aŭgurojn ka m nur povis pripensi tion poste en mansardo.

Patrin ka Tivvy maldormis atendante nin ka ŝajne Patrin vidis en tefolioj nin dronintajn en Sarn. Ŝi ne kredis je ni dum longa tempo ka nur ploradis ka tordis manojn ka diris “I n estas realaj. Nur stas *spekto*.” Mi devis doni al ŝi un el miaj kristnaskaj donacoj por konsoli ŝin. Ŝi restis enkore nur infan nia kara Patrin. Ŝ estis tiom naiva ka fidema ke m ĉiam kredis ke stus egalfie vundi ŝin kiel bebon en vindaĵoj aŭ povran tineon flirtantan krepuske. Kiom mavege stus Diabla fifar perfidi tifidoplenan koron titremantajn petantajn manetojn!

“Mi volas dormi viaĉambre Pru” diras Tivvy. “Feliĉigus min ĉar fridas kuŝi sola dum nigra frosta veter.”

Ŝi rigardis oblikve Gideonon ka m povis vidi ke ŝ preske freneze ĵaluzis je Jancis. Ka vere Gideon belis kun vizaĝo froste ruĝa k okuloj brilantaj pro agoj dumtagaj. Li b'zonus nur kapjeseti ka Tivvy sekvus. Sed li nenjam emis ŝanĝi celon k en lia mens plan estis firma do m sciis ke devas esti Jancis aŭ nenju. Mi n volis Tivvyn en mia lito ĉar ŝi ronkadis ka rankadis dormante. Do m atendis ĝis ŝi profunde dormis ka tiam mi prenis laternon ka malnovan ŝafpeltan palton de Patro kiu kovris min ĝispiede koce

Malbeno Kara

ka m iris al mansardo ka skribis en mian libron. Ĉiam mi kutimis kiam i'tristigis aŭ gajigis min plene skribi pri ĝi. M anke multe b'zonis pacon en mansardo post tiamara dozo de mondo preter Sarn. Ĉar mi n havis amanton mi volis ami mondon—tiom da mondo kiom mi povis atingi. M estis kiel junulin staranta ĉe renkontiĝo de vojoj dum Majtago kun bukedo donota al kiu ajn rajdanto transpasos. Ka jen! Ĉevalisto transpaŝas min kiel anke bukedon en koton.

Ĉapitro 4: Sorĉisto de Plash

Kristnasko pasis nin ka nenjo ĝenis trankvilon krom s on tiel nomu mortigon de porko. Nenju venis kristnaskumi ĉar ekzistis nenje el kiu i venus ka nenjo por ki'i venus. Patrino malsanetis pro tusado k enlitiĝis do m n iris por lecion ĝis Novjar. Sed je unua tago de Nova Jar m iris ka pro ke m ĉiam preferis taŭpago mi tuj kondukis bovojn al kampo kiun mi plugadis por Beguildy. Li plene malamis plugi do por ĉiu lecion mi plugis aron da sulkoj. Mi povis plugi presk egalbone kiel plejmultaj viroj kvankam ne tiel bone kiel Gideon. Li faris plej rektan sulkon kiun m iam vidis. Li tutne povis ion fari mave. Kion ajn li faris negrave ĉu on vidos ĝin aŭ n ĉ'unfoje por ĉiam aŭ ĉiutage li faris kvaz lia vivo dependas de ti. Li n toleris improvizaĵojn. Li pajlsegmentis stakojn kvaz konkursante por Tegmentista Medal eĉ s on tuj eltranĉos pecojn. Laborante tutsola en kampoj heĝante aŭ ligante garbojn dum observis nur altajn nuboj k arboj flosantaj sur somernebul li tamen laboris kiel vir montranta sian kvaliton en dungiĝfoir. Kelkfoje mi kompatis lin pro ke l nenjam akceptis ripozi. Ka kelkfoje m imagadis popolamason observantaj farmistojn juĝiston kiu sidis en sia ĉar' aŭ trotis ti'n-ka-re'n sur sia ĉeval. Mi povis presk aŭdi murmuradon mokadon kiam Gideon fuŝis ion aklamon kiam li bone faris ka juĝiston diri laŭtvoĉe "Mi donas premion al Gideon Sarn plej lerta heĝanto grenliganto ka pluganto".

Poste m elvekiĝis ka vidis nur altajn nubojn kiuj tutne moviĝis altajn heĝojn kun ulmari' sube arbaron ka montetojn ka dolĉan bluan aeron en kiu alaŭdoj pendis kvaz ĉieluloj sobigis in per ŝnuretoj ka kiuj tiom skuiĝis per sia ĝojplena kantado k'i kvaz pretis rompi ŝnuretojn. Tutne gravis al i kiu gajnis premion nek kiu el i kantis plej bone aŭ plej laŭte se nur ĉiuj kantis s al nenju mankis nest aŭ plena kropo ros por trinki ka spac por kanti.

Tion mi pensis dum mi plugis kvinakrean kampon ĉe Plash per blankaj bovoj kiuj aspektis flavaj kontre mortblanko de prujno

kuŝanta kvaz mortotuko sur ter kiu tamen n estis tro dura por plugado.

Dum soko taŭneniris ruĝeca sublevita hum briladis ka frugilegoj sekvadis ĉar i stis povre malsatoplenaj dum i majeste promenis en sulkoj.

Nelge Jancis kuris el dom kun sia patrin preske delire por sci'gi min pri sia fianĉiniĝo kun Gideon ka pri kiom koleris Beguildy. Jancis ver'aspektis bela kiel fein pro siaj rozkolora vizaĝo k oraj bukloj. Srin Beguildy postvenis spiregante ŝia taŭtuko svingiĝadis ka ŝ estis plena d inform kiel un el francaj fregatoj pri kiuj on parolas.

“Sed ni n malsatu ĉitie kiel frugilegoj” ŝi diris. “Ja envenu por trinketo da te. Sarn eĉ aĉetis por mi funtkanistran.”

Mi sci's ke l nepre profunde enamiĝis se l aĉetis pl'ol kvaronfunton sed mi nenjam diris nur finis mian sulkon ka malligis bovojn.

“Ni povas malkaŝe paroli ĉar Patro okupas sin en sia ĉambro kuracante Polly de Muelisto” diras Jancis.

“Ki misas en Polly?”

“Ki *ne* misas en t'infan?” diras Srin Beguildy.

“Unue ŝ s'feris de kokluŝ ka nun de darto. Ĉiam ŝi s'feras d i'. Li sidigis ŝin en seĝon ka ĉirkekolumis ŝin per rostitaj cepoj ka m ja eligis kvartojn da larmoj preparante in. Nenjam stu edzin de sorĉisto Pru. Stas kiel dirite en Bona Libro ka m deziregas povi viziti kirkon kristane por aŭdi ĉar diriĝis ‘Mi estas mortigata ĉiutage’. Ja stas tiel por edzin de sorĉisto. Se ne cepoj do i alia. Kredu ke m preske rompis al mi kolon alportante likenon el kirksonoriloj por ĝuste t'infan por kuraci varicelon mestro estas tro ĝisoste pigra por mem alporti ĝin.”

“Ne ĝenu vin Patrin kiam m edziniĝos mi prizorgos vin” diras Jancis.

Mi n povis ne suspiri pensante kiom da planoj i ĉiuj faras ka ĉiu plan distranĉas gorĝojn d aliaj. Mi metis bovojn en stalejon k eniris domon. Jen agrabla fajr ka plaĉodor de te ka m ne povis ne ĝoj'iomete pro ke Polly stis tiel malsanema infan kvankam pens *ja* stis kruela ĉar mi sci's ke Beguildy b'zon's multan tempon por kuraci ŝin. Patrin ĉiam diris ke muelistinfanoj stis malsanemaj ĉar

akvoŝeĉo en laĝeto sub muelrado perokule sorĉis patrinon taŭ naskiĝo sed Gideon diris ke stis ĉar i manĝis farunon kiun ratoj difektis ka Srin Beguildy diris ke stis ĉar on sendis in al Beguildy por kuraciĝi.

“Dozon da sulfur ka melas’ jen kion ŝi bzonas k iom da bona nutraĵ. Sed Muelej n estas loko kun bona pan samkiel farm n estas loko kun bona buter ĉar ti enspezigas ka famili’ ĉiam manĝas nur restaĵojn.”

En timomento Beguildy trudis sian kapon enĉambren ka reveme rigardante sian edzinon diris—

“Mi volas iom da maja buter.”

“Maja buter! Vi pov’s egale postuli oron. Kial vi kred’s ke m havas majan buteron aŭ junian aŭ julian ĉar ni tuj vendas ĉiun pecon de buter preske jam tal ĝ eliris kirlilon ka n’mem nenjam gustumas ion krom porkograson?”

“Mi devas havi majbuteron por sukcesigi sorĉon” diras Beguildy per sia raŭka voĉo.

“Por ki vi volas ĝin?”

“Por friti ŝelon de sambuko ka kuraci kokluŝon.”

“Vere se ŝ atendas ĉitie buteron ĉu majan ĉu decembran ŝi verŝajne mortos pro kokluŝo!” krias laŭte Srin Beguildy. Tuj n’aŭdis laŭtan krion el interna ĉambro ĉar povra Polly kredis proksimiĝi pordon de morto.

“Iru legi viajn libraĉojn por trovi plifacilaĵon” diras Srin Beguildy. “Mi b’zonas pripensi pli gravajn aferojn ol sorĉojn.”

“V arogegas virin. Vi planas vidi nian Jancison edzinigitan k enlitigitan ka rondiĝintan pro nepo tuj dum laternbrileto. Sed m avertas vin ke n ĉiu gefianĉiĝo finiĝas en kirko nek ĉiu ringo signifas edziniĝon nek ĉiu nuptul prenas sian virginon ka m n aprobas parigon! Olda Sarn ankor rifuzas al mi tikronon eĉ kvankam li nun stas kie mon aĉetas nenjon. Ka m diras al vi ke juna Sarn naskiĝis sub tripenca planedo ka nenjam posedos monon. Krome li dormas survizaĝe. Ka kiu faras tion dronas. Mia ‘nabin n estas por Sarn. Sobtretu mian ordonon laŭvole. Dissendu invitojn por amŝpinado jen tutbone. Tamen m atendas pli profitan proponon. Ĉar ŝ estas blanka kiel dam ka sanoplana kiel matura terpo! Nenju skvir nek eĉ nobel rifuzus kuŝi apud ŝi.”

“Sed n edzinigi ŝin!”

“Ĉu gravas? Li pagus ĉu n?”

Nun anke Jancis kriploradas krom Polly. Beguildy malaperis en sian ĉambron ka n’klopodis konsoli ŝin. Ni apudiĝis fajron kun nia te ka planis ke m skribu invitleterojn por amŝpinado.

“Anke kukvendado” diras Srin Beguildy. “On enspezegas per kukvendo. Ka teksisto restos dutri tagojn por elfari ŝtofon el nia ŝpinaĵo.”

Jancis kunfrapis manojn.

“Ho! M amegas Feston” ŝi diris.

“Anke mi.”

“Tamen kukvendado stas plej bona. Ho! M amegas Gideonon pro ke l petis min edziniĝi.”

Dum ni paroladis ni povis aŭdi povran Pollyn kiu tuis ka kokluŝis dolorege ka Beguildy krias—

“Silentu do! Ĉesigu bruon mi diras! Damne! Vi jam stas sana!”

Srin Beguildy petis min tuj skrib’inviton por k’i rigardu ĝin. Mi faris tion k i admiris ĝin eĉ kvankam i n povis legi ĝin pl’ol du papilioj en heĝo povas legi mejloŝtonon.

“Skribu” diras Srin Beguildy “ke Jancis sola filin de Sinjor Feliks Beguildy ka Hepziba li’edzin stas promesiĝinta fianĉin de Sinjor Gideon Sarn bienposedanto loĝanta sur propra bien ĉe Sarn. Ka skribu k’i nuptos plejeble frue ka ke Jancis invitas al amŝpinado.”

“Ka skribu” diras Beguildy kiu denove entrudis kapon “ke v estas stultular ka ke ĉitinnupto n okazos ĝis lago Sarn sinkos en teron el kiu ĝi venis. Mi vidas per spegul malhele junan skviron kiu rajdas ĉitien kun poŝoj plenaj d or.”

Poste Polly foriris tusegante samkiel taŭe ka m eniris alian ĉambron por mia lecion. Mi karestuŝetis ŝultron de Jancis ĉar mi kompatis infanon. Ŝ eĉ pl’ol taŭe smilis al petal de kratago kiam falas frida pluvo.

“Nu nu” diras Beguildy. “Sendube vi jam multe plugis?”

“Ja’s.”

“Nu kion mi lernigos al vi?”

“Lernigu min skribi Ĉiel mem faras edziĝojn Sinjor. Ka kiujn Di kunigis homoj n apartigu.”

L iomete subridis.

“Lertulin! Lertulin! Sed vi n venkos min. Pli bone ke v skribu *Ne intermiksi vin en gravajn aferojn*. Ĉu sorĉisto kiu scias sortojn de paro^o ne taŭscias ki stos plej bona por propra filin?”

“Lasu tion Sinjor! Sufiĉ afliktas povran infanon Sorto k obstinaĉa Gideon. Se v intermiksos vin eble vi faros mison kiun vi n povos ripari.”

“Ne plu! Ne plu! Mi parolis. Ne lacigu min.”

Li frapetis sian muzikilon k’indikis ke lia pacienco finiĝis. Dum sonado m komprenis ke pli da displuad estos senutila. Ĉar samkiel troviĝas nek forto nek dolĉec en lia flinta muziko kiajn on trovas en tiu de harpo ka violon tiel stis nenjom en li’anim. Li n havis kompaton samkiel li n havis fortecon. Ne febluloj ka virinoj plej bone kompatas sed fortaj mastremaj viroj. I penas forpeli ĝin kiel mia frato Sarn. Tamen iam ĝ atakos in ka ju pli longe i neis ĝin des pli forte ĝi frapos in. Ja’s! Eĉ povas esti k’angor devigas viron abomeni sian propran vivon.

Ĉapitro 5: Ŝpinamfesto

Prepar por Event okupis longan tempon pro ke ĝ estis anke kukado. Nemalmultaj religiemaj homoj opini's kukadojn fiaj ĉar i stis efektive vetludoj. Sed por ni virinoj kies vivoj stis tiel perditaj-ka-forgesitaj i stis iom d amuziĝo k eĉ edzin de Sakristian' akceptis partopreni ka kunvenigi Tivvyn. Ŝi konsentigis Srinon Beguildy organizi ĝin dum tago kiam Sakristian' iros kun Parson al loko tre fora por esplori aferon pri adultulin. Ŝi sci's ke Sakristian' restos ĝis plenfin ka n reven's ĝis frumatenaj horoj. Eĉ se l sci'ĝus li stus tiom kontenta pro puniĝo de pekulin k'eble li nur grumble kolerus.

Nom *kukad* estis ĉar ni kartludis por kukpremioj. Laŭ sopra ver ĝ estis vera vetludado. Virin kiu okazigis Eventon faris multajn safrankuketojn aŭ riĉajn spongokuketojn ka vendis in al gastoj po un pencon. Por kuketoj ni kartludis ka malvenkintoj devis aĉeti pli multajn lerta ludanto povis foriri kun granda korbo d i aŭ ŝi povis vend'in al malvenkintoj po du pencojn.

Patrinon ni nek povis postrestigi nek lasi ŝ insistis veni. Gideon promesis plenumi niajn taskojn titagon do n'ekiris frue. Ni planis forpasigi tutan tagon ĉar ni ŝpinos matene ka post tagmezpaŭzo ni komencos kartludi.

Stis bele freŝa maten ka humida vento portis parfumon el niaj stakoj. Nenju alia odor smile alportis someron dum vintro. Kiam mi nun flaras ĝin mi vidas longajn glimajn ondojn de herbaĵo kiel verdan silkon ka grandajn ruĝajn florbulojn de trifoli ka kreksojn kaŭre kurantajn tra densa herbaĵo malhelajn pro ros.

Sed en titempo ĉefe enmensiĝis nur kiom da labor ni devis fari por kreskigi ĝin ŝvitante ka strebante en lunlum k ellitiĝante denove tal ni povis eĉ sonĝi por denove ŝviti ka strebi. Tamen ĝ odoris plaĉe k anke heĝotondaĵoj kiuajn Gideon bruligis ka dika tapiŝ el folioj en arbar ka pinarboj kie ĉiam paruoj pepadis ka ludadis.

Patrin bonaspektis en siaj kufo kun rando ka pelerin kun krispoj kvaz brilkolora birdo pro siaj vieglaj brunaj okuloj ka ruĝaj

vangoj. Ni kunprenis nur nanajn ŝpinradojn ĉar ni ŝpinos nur linon ka kanabon ka n lanon. Lag ancor kazeiĝis glacie ĉe norda rando. Sed evidentis ke printemp alproksimiĝis eĉ kvankam februaris ĉar akvoturdoj amindume ludis ka niaj frugilegoj jam grakante konstruis siajn nestojn. Verdaj langoj eliĝis el loniceraj branĉetoj tiel helaj k'i memorigis min pri disirantaj langoj kvaz el fajr kiuj venis el Ĉiel⁴¹. En timalhela sezon i stis tiel vivaj ka freŝaj ke m bonvenigis in eĉ pli ĝoje ol ĉiujn lonicernajn florojn dum somer.

Dum ni marŝis tra kverkarbar Patrin glatigis siajn mufgantojn ka diris—

“Hodie mi n gardas porkojn. Hodie m estas dam.”

“Verdire ti v estas” mi respondis. Ĉar m elkore ĝojis ke ŝ estas gaja. Mi diris ke sendube ŝ gajnos sficajn kukojn por manĝigi nin ĉiujn dum naŭtaga semajn.

“Ĉu Jancis estos bona filin por mi kredas vi kara?”

“Tutsen dubo Patrin” mi diris.

“Ĉu ŝ lasos al mi mian propran sidejon apud fajr ka parolos milde?”

“Mi scias ke jes. Sed n estu maltrankvila ĉar pasos multaj tagoj tal i anonciĝos enkirke.”

“Mi preferas ke ne. Mi preferas esti avinjo Pru. Ĉu v opinias ke bebo smilos Gideonon aŭ ŝin?”

Mi diris ke m ne povas profeti sed mi kredas ke ĝ samos-smilos sian paĉjon.

“Ebleble. Stus pli bone multege ke ĝ smilu nin ol Beguildyojn. Stas mave se bebo havas kontrepredikatan avon.”

“Nu en Beguildy stas nek malic nek bon” mi diris. “Li stas nur plaĉa bunta montraĵo samkiel malplena ovŝel.”

“Mi ĝojas ke l forestos hodie.”

Srin Beguildy sendis mesaĝon pere de Gideon al sia kuzin en Lullingford por peti ŝin inviti Beguildyn titage por kuraci

⁴¹ Laŭ la Biblio, post la morto de Jesuo Kristo liaj disĉiploj kungrupiĝis kaj subite langoj el fajro venis el la ĉielo kaj trafis ilin. Tio donis al ili specialajn kapablojn, i.a. la kapablon paroli kaj kompreni ĉiujn lingvojn en la mondo.

dentodoloron d edzo. Ĉar ŝajne l'eltirigis un denton fare de bestkuracisto ka l tiel malfacile ellasis ĝin ke bestkuracisto kiu stis mizerega homo kiam l ekscitiĝis malfiksis tutan dentaron eltirante tiun' denton. Sekve li s'feris dentodoloron laŭtkriege ka tr' amuzis Beguildyn iri kuraci ĝin. Li ĉiam fieris pri sorĉo kiu komenciĝas—

“Petro sidis plorante sur marmora ŝton”

Ka l multfoje ripetis ĝin ĝis s'feranto kripetis kompaton. Poste li surmetis sakplendon da sal varmega kiel fajr ka ĉu pro sal ĉu pro sorĉo paciento preske ĉiam diris esti kuracita.

“I restigos lin ĝistarde por ke l ne haltigu nian amuziĝon” diras Patrin kunfrapante manojn kiel infan.

Ni atingis senarbajn kampojn ka m opini's ke nenju tag iam aspektis tiel bela sed mi n sci's kial. Montetoj ĉe Lullingford estis bluaj kiel somera ĉiel' profunda promesoplana blu ka tuta mondo brilis riĉece k aspektis luksa kiel dirus nia Parson. Jen ruĝaj plugitaj kampoj k orflava stoplaĵ en sunlum ka lageto Plash vitreglime blua ka ruĝa tegmento de muelej en val. Tuta herbej stis helverda smile al verd en kirkfenestroj aŭ al monteto tre fora kie kreskas trifoli de Kalvari. Eĉ somera tago malofte povas atingi tian belecon kiam neĝ apen malaperis ka lagoj ne plu stis katenitaj de glaci ka mondo klare brilis supre ka sube. Stis evidente k'io nekutima okazas ĉe Ŝtona Dom pro granda flamego de fajrlum en fenestro. Jancis venis kure al pordo ka riverencis al Patrin tre gracie. Ni stis unuaj post Polly de Muelisto ka ŝia patrin. I ĉiam stis unuaj ĉar i diris ke hor fore de hajm stas hor en Ĉiel. I rifuzis pl'ekspliki sed s on insiste pridemandis ĉu pro kial Muelistar aŭ akv aŭ ki? I tiam diris “Muelisto.” Ka s on demandis kial ki ĝenas in? I diris “Ĉu on iam vidas lin eĉ rideti por ne paroli pri ridado?” Ka fakte sola respond ebla estis “ne”. Ka l anke havis difektan parolpovon ka pro tidu faktoj loĝado kun li stis tre malagrabra. On absurde anke diris ke l amindumas kun akvofein ka ke kiam li nuptis ŝi malbene silentigis lin.

Srin Muelistin stis povra kreitaĵo kiel farunraŭpo sed ĉiam mildparola. Sakristianedzin stis tutmala. Ŝi ĉiam pensigis min pri ĵus farbita veturil granda ka larĝa sur vaka ŝose' ka hupo sonanta laŭte ka gaje ka rapideganta. Ŝiaj roboj stis buntaj kiel plumoj de

sepkolora kanaben ka s *eblis* al ŝi surmeti plian ŝalon aŭ falbalon aŭ broĉon ŝi faris tion. Ŝi surportis tiom da subjupoj ke stis mirinde ke ŝe eĉ povis marŝi kiam Tivvy diris al mi ke rigardi patrinon senvestigi sin stis kvaz senŝeligi grandan cepon ĝis kor. Tivvy nestis ŝercema do tikompar montras kiel amuza stis tia senvestiĝo. Mi mem pensis kiam mi vidis ŝin kune kun Sakristian' ke ŝe smilas grandan faskon da tinkturita lan ka l stas maldika nigra ŝpinbaston' sur kiun on volvas ĝin. Kiam ŝi ka Tivvy alvenis ni fariĝis ok ka niaj radoj agrable zumadis en varma ĉambro dum ni parolis. Bovpelistedzin el Plaŝbien sekvis kun du altaj filinoj tre kvietaj ka humilaj malgre si'alto. On diris ke patro ligis in al bovjungil ĉiun sabatan nokton ka vipis in por atentig'in pri konduto. I ĉiam stariĝis kiam patrin alparolis in ka klinis longajn kolojn kiel humilaj cignoj. Dekdua stis edzin de paŝtist el erikej preter Plash. Ŝe estis stranga sed bonaspekta sfiĉe por salivigi virojn. Ŝiaj ŝultroj stis oblikvaj ka koksoj longaj ka ŝiaj haroj nigraj kiel flugiloj de merlo. Ŝiaj okuloj stis helverdaj ka vizaĝo rozkolora kiel matura persiko ka ŝe subridetis sekrete kiel fein. On diris sed ĉu aŭ n vere mi n scias ke paŝtisto pagas nenjom por lui erikejon kiu apartenas al tavernestro en Silverton sed ĉiun somermezon li'edzin Felena iras al rokegoj ĉesupre de monteto ka pasigas nokton kun tavernestro. K on aŭdigis ankore pli strangajn rakontojn k'iu vidis ŝin danci tutnuda en lunlum interne de ringo de bovoj ka ŝafoj ka ke vila kreitaĵo kun kornoj de virŝafo ka kiu sendube stis Satan venis ka dancis kun ŝi kun vizaĝo grimaca ka grimoca dum ĉirkantaj bestoj mallaŭte muĝis. Sed al mi ŝe ŝajnis agrabla senofendul kiu tre lerte plenumis ĉion farendan.

Mi povis vidi ke bovgardistedzin malemis ke filinoj ŝpinu apud Felena. Ŝe estis tiel respektinda ka diskreta ke s eble ŝe nenjam parolis pr'io 'kazanta inter nuptanonco ka bapto k ignoris junajn parojn dum ti'ntervalo. Ŝi diris nenjon al Felena sed Patrin diris ĝentile—

“Vi ŝpinas kiel fein Srin Felena.”

“Mi havas nenjan alian okupon sur monto” diris Felena per basa harmonia voĉo “krom ŝpini matene tagmeze ka nokte.”

“Escepte de Somermeza Nokto knabin” abrupte diras Sakristianedzin “ka m aŭdas ke v tiam stas agoplana!”

Felena skarlatiĝis ka klinis kapon ka Moll ka Sukey diris eksplode kvaz i jam de multaj jaroj sopiris tion diri—

“Ho Srin Felena ĉu vere ke v kuŝas kun tavernestro ka dancas tutnuda sur rikejo?”

Nejam mi vidis virinon tiom koleran kiel tipatrin. “Sukey ka Moll!” ŝi diras.

“Pardonon patrin?” i diras tutkonfuzite.

“Aletendu manojn!” ŝi diras.

Ka ŝ kliniĝis ka deprenis sian sandalon kiun ŝi portis por festo ka sandalbatis in ĝis i laŭte muĝis.

M aŭdis poste k’un edziniĝis kun farmisto k alia kun emerita kaleŝisto k ambaj sekve bone sukcesis ka certe manko de pun nenjam misfortunigis in.

I daŭrigis ŝpinadon kvietaj kiel musoj snufante super radoj. Srin Beguildy ĉagreniĝis ĉar etos’ fariĝis morna. Do m petis al Jancis ke ŝ kantu *Verda Gruzo* por ĝojigi nin. Ni ĉiuj kunkantis eĉ Polly kuntusadis. Felena kantis per frideta voĉo ka Sakristianedzin kantis tre laŭte ka Patrin tremetkantis ka Srin Muelisto kiel birdo ĵus eskapinta el kaĝo.

Pro kantado ka radzum kuirej smilis arbon plenan de sturnoj. Kiam alproksimiĝis hor por ĉesigi ŝpinadon Patrin diris ke ni kantu—

La Eternulo estas mia paŝtisto

ka poste mi petis—

Li enkonduku min en vindomon

Kaj lia standardo super mi estu amo

Ka ĝuste dum ni kantis tion ka radoj zumadis kiel strigoj leĝera paŝo sonis el ekstere k eniris blovo de freŝaer ka longa sunradi’ falis de pordo ĝis al mi ka l staris tie en sunlum rigardante nin.

Mi diras “li” kvaz vi tuj rekonus lin el tuta mondo samkiel mi.

Li staris sur sojl ka m stariĝis el mia seĝ en ombro ĉe maltaŭo de ĉambro kvaze li stis mia propra invitita gasto.

Ĉapitro 6: Ludo *Multekostaj Koloroj*

Kiel l aspektis? Kia li stis? Ĉu l stis bela? Malfacilas diri.

En am aspekto ne gravas. N estas form kiam on amas nek ekstera aspekto nek atent al trajtoj. Kiam on estas nur tine' en kandel de li'okul e'ebblas detalumi lian staturon aŭ ĉu l stas brunhara aŭ blonda? Ĉu Magdalena kiu smilis al Felena sci's kiam ŝi kuŝis ĉe piedoj de sola vir kiun ŝ iam amis kvankam nenjam amis⁴² ĉu fil de ĉarpentisto⁴³ smilis al Sia patrin aŭ n ĉu Li stis grand'aŭ nana laŭ statur? Ĉu ni scios kiam n'aperos taŭ Tiu Kiu faris nin kia stas Lia korpaspekto? Ne. Nur niaj koroj tremos en lum. Mi nenjam povus rakonti kiel l aspektis starante tie sed mi povas diri kiel aspektis virinoj kiuj gapis lin.

Tivvy ka Polly gapis pro mirego kun fingro surlipe. Moll ka Sukey kliniĝis taŭen kiel on kliniĝas al fajro vintre ka patrin ĵaluze tiris in al si mem. Sakristianedzin malvolvis siajn falbalojn ka Jancis ruĝiĝis ka diris "O!" k ordiĝis buklon ka diris "O!". Patrin ridetis al li ka Felena—nu okuloj de Felena falis sur lin kiel bruna strigo falas sur sian predon.

Mi tiris min pli foren en mian angulon k emis sveni. Ĉar jen mi'amato ka mia mestro sed jen! m estis leporfrapita!

Ĉambro estis tiel kvieta k'on povus aŭdi akveron guti de tegmento.

Subite l ekridis ka sendube ja stis komike vidi nin senmovaj kiel musoj kiam Katinjo preterpasas ka je un moment aŭdi nin laŭtvoĉaj ka sekvan tutsilenti.

Li demet's ĉapelon ka riverencet's al ni ĉiuj ka diras—
"Sarvisto srinoj! Teksisto se plaĉas al vi."

⁴² T.e. amis sed neniam amaris.

⁴³ Laŭ la Biblio, Jesuo Kristo estis filo de ĉarpentisto. Jesuo mortis per krucumiĝo. Lia patrino Maria staris antaŭ la kruco kaj rigardis. Alia virino, ankaŭ nomata Maria, ankaŭ ĉeestis. Tradicio diras ke ŝi estis eksputino kiu amis Jesuon sed neniam koitis kun li.

Se plaĉas al ni! Kvaz ne plaĉus nin ki ajn d'rita de li. Do jen teksisto! Nu tutne gravis min. Se li dirus ke l stas Reĝo de Felanda aŭ murdisto ĉasata de spurhundoj ti stus egala por mi.

“Kester Woodseaves se *vin* plaĉas Srin” li diras kun ia gaja mokado rigardante Srinon Sakristian kiu stis plej granda ka laŭ altec ka laŭ rondoco.

Srin Beguildy venigis lin al fajr ka manĝigis ka trinkigis lin. Sed mi tenis min aparta nevidata.

“Ĉu vi deven's de fore sinjor?” demandas Felena laŭ sia lanta maniero. Ŝiaj lipoj stis ruĝaj k afablaj sed mankis bonvol.

“Lullingford Srin” li respondis pervide taksante ŝin. “Nek proksima nek fora.”

“Proksima kiel flugas korvo” ŝi kvazpledas.

“Sed ni n estas korvoj Srin.”

“Mi loĝas sur tiea monto” ŝi diris “multege pli proksima al Lullingford ol tiuj ĉi.”

“Longeta rajdo.”

“Ne tre! Ĝ estas survoje al—presk ĉie.”

Mi pensis “Ŝi diras kion mi volas diri.”

“Verdire Srin ja ne survoje al Infer” li respondis.

I smilis loktantojn sed ni n konis kverelon.

“O! Mi ĝojas ke v teksos mian nuptan tolaĵon ka n hida dungito” diris Jancis.

“Do v edziniĝos infan?”

“Jes. Al Gideon Sarn Sinjor. Ĉu v konas Gideonon?”

“M aŭdis pri li.”

Mi deziris sc'i kion l aŭdis pri Gideon. Subite gravis al mi ke l aprobu Gideonon ka Patriron ka min pl'ol ke m povu bone legi Apokalipson ki ankora venkis min pro siaj strangaj vortoj ka malrekta manier de rakonto. Mi jam prilaboris ĝin longan tempon ka strebo metas ĉion proksima al koro. Pli ol tion mi volis koni menson de Johan⁴⁴ ĉar li stis soleca sur insulet en mar kiel ni ĉe Sarn ka havis tiom da pensoj ka profundaj ka brilaj. Iu kia Tivvy

⁴⁴ Laŭ tradicio, la aŭtoro de parto de la Biblio, la “Apokalipso”, nomiĝis Johano kaj loĝis sur malgranda insulo en la Medi?teraneo. Lia verko konsistas el strangaj vizioj, plejparte pri la finiĝo de la mondo.

tutne havis pensojn k estis lacige rigardi en tutmalplenan pelvon. Ka Patrin havis du pensojn aŭ eble tri ka Gideon du. Tial allogis min mens de Johan pl'ol ies taŭe sed nun Apokalips estis nur blovita pajler kompare al pens de tiĉi vir.

“O Sinjor Woodseaves ĉu v venos al mia nupto se Pru skribos por v inviton?” demandis Jancis.

“Eble ja” li respondis rigardante ŝian patrinon kvaz por diri ke ŝ laŭvole povus malpermesi. “Ka kiu stas Pru kiu povas skrib'invitojn?”

M ege ŝvitis sed ĝuste kiam Jancis intencis kaptosalti ka treni min el mia kaŝej Sukey ka Moll kiuj ne kapablis silenti longatempe ekkri's—

“Bonvolu Sinjor ĉu v ven's ank al niaj nuptoj?”

K i subridegis ka kunmetis kapojn skuis buklojn ka klinis longajn kolojn. Poste i metis manojn taŭ buŝojn ka kuris trans kuirejon al li k un flustris en un orelon k un en alian ka poste i rekuris al sia benko sin klinante pro ridego. Jancis kiu sidis proksime aŭdis Sukeyn flustri “Mi preferegis vin kiel edzon.” M esperis ke patrin n aŭdos ka denove sandalos in ĉar i helpis min nevidiĝi. Mi ne povus fronti liajn okulojn pro tim ke l fride rigardus min aŭ malestimus. Mi preferus subresti kiel dafodandil timanta vintrecan veteron. Se ŝ tr'avide soras dezirante sunon ŝi nur povas stari ka tremi en senkompata frostoj ŝirate de mordantaj ventoj. Tiel ŝi perdas varmĝon ka maltrafas someron.

“Sinjor! Ĉu v estas edzo?” demandis Felena ka ŝia voĉ estis sinue glitema kiel herboserpento.

“Al ti 'ne' Srin.”

“Nek mandoninta?”

“M opinias ke v iam estis advokato” li diras “ka puŝis demandojn kiel pikstangojn en povrulojn tal sens'ferig'in.”

Ŝi n ofendiĝis ka nur diris—

“Vi n estas el ĉiregion'. Vi ven's el for.”

“Ho jes li ja stas el ĉitiregion' Srin Felena” Patrin pepis birdete. “Li revenis plenmeti'ĝinte post eldroniĝis onklo. Li'onklo teksis funebrajn vestojn post morto de mi'kara mestro s'feranta pleksion ka mortanta en siaj botoj dum Santago⁴⁵ kiam ludadis abeloj.

“Ka ĉar li jam mortis ka vi’onklinjo mortis vi loĝas tutsola ĉu?”
diras Jancis.

“Nu jes ka n.”

“Jadi Sinjor ĉu v havas konkbinon?”

Demandis Felena.

“Viaj pensoj bidpendas d un ŝnureto” diras Kester.

Tiam Sukey ka Moll eksplodis—

“Kiu kuiras por v?”

“Kiu bala’s por v?”

“Kiu surkudras viajn butonojn por v?”

“Kiu trikas viajn ŝtrumpojn?”

“Mi mem faras por mi karaj ka miaj pensoj stas miaj kunuloj.”

Li ĉirkerigardis tre kontente ka m komprenis ke l stas tre dankema ke nenju el tivirinoj rajtas transpaŝi lian sojlon.

“Nu dankon pro mi Srin” li diris ka metis sur tablon siajn poton ka teleron. “Nun ek al labor. Teksil stas enmansarde m spozas?”

“Ja’s mi montros. Ank tie stas lito. Vi ne finos taŭ du tagoj aŭ tri. Stas abunda labor por vi. Sed sobvenu por vespermanĝi kun ni ĉar ne ĉiun tagon ni havas mozulon⁴⁶.”

Kiam ŝi revenis jam ĉiu lang okupiĝis. Sukey ka Moll disputis pri kiu el i s i povus plenumi siajn dezirojn ka labori por li verŝus lian vesperan elon ka plenigus lian pipon. Stis sfiĉe por ridigi strigon.

“Afabla junul” diras Sakristianedzin “ka sincere religia mi n dubas se nur virinoj lasos lin.”

Ka ŝ trafe rigardis Felenan.

Sed Felena stis en profunda medito.

“Mi preferas lin ol Gideonon multege eĉ kvankam Gideon ja stas via frato Pru” diras Tivvy.

Srin Muelisto parolis unuan fojon.

“Li malsmilas” ŝi diris “malsmilas Mueliston kiom povus vivanto!”

Ti stis de ŝ plej granda laŭdo.

⁴⁵ Dimanĉo (<sankta tago).

⁴⁶ “Gaston”. Formita el pravorto “almozulo”, kiu tamen perdis sian malestiman sencon.

Ludo Multekostaj Koloroj

Polly laŭte tusegis kvaz por montri konsenton.

“Tamen tempo pasas k eĉ dentodolor saniĝos finfine” diris Srin Beguildy. “Do ni komencu kukadon tal mia mestro revenos. Elkoran dankon pro ŝpinado. Ni faris sfiĉon por okupi tijunulon supre dumlonge.”

Ŝ alportis grandan kun surpentrita salikdesegno teleron sur kiu amasiĝis kukoj safranaj kuketoj ka spong-fingraj biskvitoj ka zingibrobejoj kiuj stis nanaj homformoj el zingibroko kun okuloj el riboj.

Sukey ka Moll ĝoje kriegis vidante in.

“Ne gravas min aliaj se nur mi gajnos zingibrokan viron” diras Sukey.

“Mi gajnos ses” diras Moll. “Ses ribaj bejoj por mi!”

“Vi b’zonos pli d iniciatem ol vi havas” diras Sakristianedzin “ĉar n ekzistas ludo pli malfacila ol Multekostaj Koloroj. Mi jam ludas ĝin ĉe ĉiu kunven ekde mia junec ka m vetas ke samas pri via Panjo ka Srin Sarn ka Srin Muelisto. Tamen por ni ĝ ancor estas nefacila. K al vi kiuj malofte aŭ nenjam ludis ĝin ĝ estos ne nur malfacila sed vi perdos ĉiun kukon.”

“Diru al i kiel ludi” diras Srin Beguildy “vi havas tian kapon.”

Kvankam ŝi diris tion tutmorne ĝi ridigis min. Verdire kapo de Sakristianedzin stis mirinda ŝiaj oleumitaj haroj elstaris en volvaĵoj ka buloj ka strioj ka rubandoj k alta kombil ka vasta ĉapo super ĉi’.

Ŝ iris trans kuirejon kiel kaleŝ kun ses ĉevaloj k ekstaris apud fajr informante nin pri reguloj de ludo Multekostaj Koloroj—pri poentoj k atutoj ka pri *prial* ki stas tri kartoj el un emblem *Multekosta* signifas kvar el un emblem ka k’on rajtas *mogi* ki signifas ŝanĝi oniajn kartojn ka pri duoj ka Fantoj ka “Du por liaj kalkanoj” ka ke s on povas tutnenjon fari el sia kartar ti nomiĝas nesto de virkoko ka tikaze on devas disdoni po un kukon al ĉiu.

“Mi ne povas kompreni eĉ un vorton” diras povra Tivvy.

“Nek mi” diras Polly.

Do i fortiris sin ka n’restis dek sed ni b’zonis nur ok por plenigi du tablojn. Do m proponis min fortiri.

“Sed v estas plej bona ludanto” diras Jancis. Ka patrin de Sukey ka Moll decidis—

“Fortiru vin knabinoj. Ludu *turnu-pleton* kun Polly ka Tivvy. Sed sen bru!”

I ekploris ĉar i volis gajni kukojn. Sed patrin demandis ĉu i volas pli da sandal do i eksilentis. Ŝ aĉetis por i po zingibrokan viron ka promesis pli je fin.

Felena ka m prolote sidis ĉe sama tablo. Efektive ĝ estis porkmortiga benko sur kiun metiĝis tabul ka blanka tuko ĉar i posedis nur un tablon.

“Nenju el ni virinoj rezignus je zingibroka vir ĉu n Pru Sarn?” ŝi diras. “Sed ni tr’oldas por kukoj do n’imagu ke ni ludas por anim de teksisto ĉu?”

“Laŭ via vol” mi diras. “Sed ŝajnas al mi ke ti ne koncernas nin.”

“Verdire Pru Sarn v estas blanka kiel mortotuk un momenton ka ruĝa kiel peoni’ postan k okuloj brulas! Ki stas al vi?”

Mi koleris sed estis konsoligo ke ŝ taksis min simila al si ka n sen partopren en amludo. Mi spozis ke ĉar on suspektis ŝin rilate dancadon kun Diablo ŝ simpati’s al mi kiu laŭdire praktikas sorĉadon. Eĉ tiam on komencis diri ke m aliformiĝas en leporon dum mallumaj senlunaj noktoj ka galopas trans montetojn k uzas kaveton sub tombej. Unue on parolis tiel fantazie aŭ petole aŭ por timiĝ’infanojn sed poste en solec de malnovaj bienoj plenaj de knarado ka ĝemoj dum ventoplenaj noktoj rakontoj kreskis. Nenju povis diri ki fariĝos el i finfine nek damaĝon kiun i faros. Mi ne multamis aŭdi lian nomon sur lipoj de Felena ĉar ĝi subite stis al mi kara. Ka m tiam sentis kiel m ancor sentas ke l n estas vir pri kiu on parolu frivole. Rigardante lin el mia mallumo maltaŭ kanapo m opini’s ke lia koler smilus al pluvtorento kvankam lia ridet estis varma printempa tago plena de keirantoj.

Felena tiris min plifor d aliaj.

“Vir” ŝi diris “kian mi taŭe nenjam vidis nek survoje nek en foir. Aliaj stas nenjaĵoj kompare kun li. Ĉu v vidis koloron de li’okuloj?”

“Ne.”

“Ank ne mi. Liaj palpebroj tiel rekte duonkaŝas in ka kandel de li’okul stas tiel granda ka nigra k’on ne povas vidi koloron. Mi deziras apudesti por vidi.”

Ŝia vitreverda okul nebuliĝis ka ŝ aspektis svenonta.

Ludo Multekostaj Koloroj

“Vir porvetludinda” ŝi diras.

“Sidiĝu! Sidiĝu! Tranĉu kartojn por unua disdon’ en ludo Multekostaj Koloroj!” kri’s Sakristianedzin.

Dum mi sidiĝis m enmense disputis vortojn de Felena ka m diris en fundo de mia kor—

“Ne vir por kiu on vetludas. Vir por kiu on volonte mortus.”

Ni dediĉis nian atenton al ludo ka ĉar kvar knabinoj stis senditaj en korton ĉambro stis silenta kiel sonĝo.

Mi povis aŭd’in kanti *Horde-Briĝo* tie.

Piedojn levu kuru lerte

’taŭ kandeloj hajmen certe.

Malfermu pordojn ĉielvaste

Lasu reĝon alrajdi gaste.

Post iom da tempo kantado ĉesis ka m scivolis kiun petoladon i planas. Sed por mi sfiĉ estis farenda ĉar mi firmintencis venki Felenan ka ĉar Sakristianedzin stis ŝia kunludanto ka Srin Muelisto mia mi sci’s ke mia task estis malfacila.

Fajr kiu bruligis pinlignon eligis bonan dolĉan odoron ka varman lumon sfiĉe por ludado. Ĝi lumigis murojn ka gluecajn zingibrokukajn virojn sur blua teler ka Jancison kiu ’spektis bela kiel figur el puror sur altar en longe forpasinta tempo. En trankvil kun kanto *Horde-Briĝo* en mia mens ia sendorma sonĝo venis al mi.

Mi vidis amason da homoj apud tremema akvo de Sarn. I’aj vestoj stas feribuntaj sed vizaĝoj malicaj. Ka rajdanto sur alta ĉeval venas inter in ka lia vizaĝ estas vizaĝo de teksisto. Virin venas taŭen el homamaso. Ŝi portas kolĉenon el verdaj vitraj bidoj ka ŝiaj verdaj okuloj flamegas. Ŝi krias—

“Mian korpon! Mian korpon por rajti rajdi sur via selo!”

Sed li flanketurnas sin de ŝ al alia kiu staras kaŝita leporfrapita vestite per disŝirita mornkolora robo.

Rajdanto klinas sin al ŝi por diri—

“Jen mi’kara konato!”

Ka ŝ donas al li branĉeton de rosmaren’. Ŝi diras nenjon ka kredas ke l preterrajdos. Sed li brakumas ŝin ka levas ŝin taŭ sin sur selon ka lia dekstra brako forte ĉirkas ŝin. Tiel i forrajdas ka bru de starantoj formortas ĝis ĝ estas men laŭta ol zumado de

kuleto ka restas nur odor de rosmaren ka varma sun ka ĉeval plilongigas siajn paŝojn monten el kie venas matenzefir.

“Du por lia surkolaĵ!” kri’s Sakristianedzin. “Vi disdonu Pru!”

Do m faldis miajn krurojn sub benkon nefacile pro ŝiaj falbaloj ka ludis neŝanceleble. Ka m diru ke Srin Muelisto ka m gajnis absolute ki miregigis ŝin ĉar ŝajne ŝ opini’s venkon ŝiaflanke impertinentaĵo kontre Sakristianedzin.

“Vi ludis kiel demon’ Pru Sarn” diris Felena.

Stis tarde do Jancis apertis pordon k alvokis “Manĝo!” ka kureniris kvar bubinoj kiujn mi rigardis kiel infanojn kvankam m estis presk samaĝa. I eksplodeme rakontis siajn agojn kvankam estus pli bone k’i silentu.

“N’iris en mansardon.”

“Ni sidis sur lito!”

“Li scipovas fajfi kiel turdo!”

“Li teksas fulmrapide.”

“Li havas verdan palton por dimanĉoj ka Bibliion kun bildoj ka l scipovas legi Bibliion.”

“Li havas horloĝeton ka pipon kun arĝenta stri ka l gajnis loktomedalon ĉe Silverton.”

“Li n povas toleri taŭroludojn nek kokobataladon nek senhontajn virinojn.”

“L amas bonan kanton ka modere drinkatan hajmfermentaĵon ka danci sur paŝtej ka sonon de sonoriloj.”

“Li havas dikan muskolaĵon sur brako smilan al frostita neĝobul.”

“Ni mezuris lin kontre pordo de mansardo ka trovis kolorojn laŭ teksista mezuril.”

“Tridek ok kolorojn ĉirke tali’ ka kvin futojn dek kolorojn alta.”

“Li havas paron da ĝisgenuaj botoj sed li n multe port’s in ĉar i taŭgas nur por nobel k estas domne malfacile purig’in.”

“Li diris ‘domne’ ne ni.”

“L amas infanojn ka hundojn ka trankvilan vivon.”

“Li volonte havus propran edzinon se ŝ estus obe’ma sed ĝis nun li n vidis indan virinon.”

“Liaj okuloj stas klor bluaj kiam i videblas malgre nigraj mezaĵoj ka haroj.”

“Ka se l hav’s fratinojn li preferus k’i smilu al Sukey ka m.”

“Di benu!” diras patrin de Sukey ka Moll ka m povis vidi minacan sandalon “Di benu eĉ ne mil sturnoj inter fragmitoj tiom bruaĉas.”

Stis feliĉe por knabinoj ke patrin gajnis.

“Jam tuj surmetu skarpojn” ŝi diris.

“Alvoku lin Jancis” i petegis.

Do ŝ vokis lin al manĝo. Son de pediloj⁴⁷ ka bato de lato ĉesis ka l sobvenis.

Sukey kuris al li ka metis ion en lian manon. I riverencis ka diris—

“Dankon pro mi” ka sekvis sian patrinon.

Sed Sukey denove enpuŝis kapon enĉambren ka subridetis ka flustris—

“Mi don’s al li mian zingebrokan bebon!”

“For knabinoj!” ordonis patrin k i forkuris kun latern por lumigi vojon ka bovstango por defendi sin kontre embuskantoj.

M eliris al pajlej por ke Kester Woodseaves ne vidu min ka kiam mi revenis li jam resoriris al mansardo. Felena foriris frue kun alloga rideto ka salut al li.

“Se v venos nien Sinjor m instruos al vi rakonton pri Adam k Eva.”

La par el muelej kvankam malvolante finfine foriris k anke ni preparis nin por hajmeniri.

“Vere sukcesa kukado” diras Srin Beguildy. “Mi profitis kukojn sfiĉe por pagi teksiston ka n’multe ŝpinis. Ŝpinamfest estas granda savil. Do nun diru al via fil Srin Sarn ke ka novelzin k anke tolaĵ estos pretaj kiam li petos pretigi liton.

Beguildy reven’s kiam n’eliris. Li stis gajeta sed n ebria. Li diris ke l renkontis kuzon de Frin Dorabella ka kuzo rifuzis kredi ke l scipovas alvoki Veneran. Do li petis lin veni por mem vidi.

“Venera? Kie troviĝas tiŝiaĵo?” diras lia edzin. “Kiel vi povos alvoki ŝin se ŝ n estas ĉitie?”

⁴⁷ “Pedaloj”.

Sed li nur kantas—

“Petro sidis plorante”

ka ludis tre tintope siajn flintetojn.

Ĉapitro 7: “Mestro ĉe’stas”

“Nu Sarn” diras Patrin post nia reven’ hajmon “ni multe ŝpinis ka bonamuzis nin ka nun viaj nuptaj litotukoj stas sur teksil.”

Gideon aspektis iom kunpleksa⁴⁸ ka diris ke pasos multaj tagoj tal li havos sfiĉan monon por pagi.

“Nia Pru gajnis ĉe sia tablo.”

“Ĉu ja? Brave!”

Li povis kompreni ka respekti tion ĉar ank al li stis plaĉe gajni.

“Sfiĉajn kukojn por naŭtaga semajnl!” diras Patrin.

“Ŝi celis enspeziĝon mi n dubas.”

“Ja ne Patrin” mi diris.

“Do pro ki?”

“Mi n scias. Mi nur volis—Multekostajn Kolorojn Patrin” mi diras iom stultece.

“Sed kiel valoras se ne por akiri kukojn?”

Mi diris ke verŝajn’i n utilas sed malgre ti mi volis in—Multekostajn Kolorojn.

“Ŝi dormemas” diras Gideon “jen kiel stas alie ŝ parol’s inteligente. Plejbone v ambaj enlitigu.”

“Ĉu mi n atendu ŝafidojn?”

Ĉar en sezon’ de ŝafnaskado mi kutimis maldormi kelkajn horojn ĉiunokte por ke Gideon povu iom dormi. Sed li diris ke n ke m jam bontagis do m egalbone pasigu nokton.

“M estis pigra kiel nobel tuttage” li diras “devante resti apude por plenumi tasketojn.”

Li stis bonkora knabo malgre ĉi’ ka kiam li preterlasis okazon komplezi ti stis nur ĉar li n pripensis aŭ ke l atentis nur un aferon. Ka kelkfoje kiam li stis senkompata k on rimarkigis lin pri ti li forte pentis kvankam ofte nur post longa tempo.

“Do al lito Pru!”

⁴⁸ Perpleksa.

Patrin ĉirkesaltetis kun sia stango kvaz reŭmamisma rubekolo.

“Stis bonega tago. Tago pripensinda ka priparolinda. Ka senkulpa ĉar kvankam ni ja ’nkor portas funebrajn vestojn ni tamen faris komplezon. Ti n estas kulpeca. Ĉu m bone konduitis Pru?”

“Jes Patrin sendube!”

“Ĉu m ŝpinis laŭdinde?”

“Vi ŝpinis tre kapable.”

Ŝi ĉiam demandis tiel kvaz infan kanke kvaz infan ŝi volvis sin ĉirk onian koron.

“Ka tr’agrada junul stas titekstituto Sarn! Vir kian ĉiu virin volus kiel filon.”

“Ĉu temas pri Woodseaves?”

“Ja’s.”

“Brava loktist on diras. Ka neatendeble multedukita. Skvir proponis al li profesi’ skribiste ĉe Domego sed li n volis. Diris ke l preferas labori permane ka l ne povas toleri politikadon ĉar ti stas nur mensogoj ka l preferas esti honesta. ‘Mi preferas teksti blankan tolaĵon ol nigrajn mensogojn’ li diras k’olda Skvir tre koleris. Li volis eksigi Woodseaves el ties dometo sed ĝ apartenas al li testamentita de lia onklo.”

Patrin demandis ĉu teksisto plaĉas al mi.

“Mi pensis ke ne kara ĉar vi n parolis k iris maltaŭ kanapon.”

“Plaĉas?” mi diris. “Ho...ĉu plaĉas?”

“Pru vi dormas surpiede” diras Gideon. “Alliten ĉar se n vi n povos labori morgo.”

Tamen mi n estis dormema nur demandoplena. Ĉar stas strange vere strange kiam mestro ĉe’stas k on preferus bonvenigi lin ka doni al li ĉion plejbonan freŝan buteron ka fromaĝon sur grandaj teleroj ka novan lakton eĉ ĝis supro de plej granda pelvego ka surmetinte sian Sanktagan robon kun bukedo rideti al li jesante ĉiun lian peton ka jen! Ĉi’ fuŝas ĉar on estas leporfrapita malbenita per sorĉado.

“La Mestro ĉe’stas kaj vokas vin. La Mestro ĉe’stas...”

Tutnokte en mansardo m povis aŭdi tivortojn triumfajn sed mornajn. Ka kiam mallumo maldensiĝis ka formoj komencis aperi

el nigrec k odor de tagiĝ envenis ka nia virkoko kokerikis laŭte ka dolĉe ĉar printempo komenciĝis m ancor aŭdis tivortojn en kiuj stas amesprim ka tremeto de tim—

“*La Mestro ê*’*stas!*”

Vortoj tiom murmuradecis ka dolĉe penetris ke m skribis in en mian libron. Da ĉikion mi planis skribi pri Ŝpinamfesto ka ludo Multekostaj Koloroj ka li’alveno mi skribis nemulte. Tamen kiam mi apertas libron ka vidas titri vortojn kiujn mi skribis laŭ mia plej bona alta manskribo ĉi’ rememoriĝas klare kvaz okazis hodie.

Mi rigardis teksilon ka vidis lin tie teksanta. Mi rigardis mian skriblibron ka demandis al mi ĉu l scipovas altan manskribon ka basan ruĝan ka nigran simplan k ornamoplenan. Ka m estis tre certa ke l scipovas in ĉiujn k eĉ pli.

Sekvamatene Jancis venis kurante laŭ vojeto ka m volis diri “Ĉu li bone fartas?” Ĉar ŝajnis al mi k’io ajn povus okazi al li dum mallumaj horoj. Sed mi povis diri nur “Kiam foriros teksisto?”

“O morge” ŝi diris kvaz tutne gravas.

Post ti ŝ ploris ka petegis min helpi ŝin ĉar Beguildy insistis aperigi Veneran por konvinki junan Skviron okazu ki ajn.

“Ka ja mi dev’s esti Venera! Ho ve! Ho ve! K okazos postmorge. Ka m timegas Pru. Ĉar se Sarn eksciis ke m aperis tutnuda en rozkolora lum en ĉambro ka taŭ nekonata vir li n plu parolus al mi.”

“Vere” mi konsentis ĉar mi bone konis Gideonon.

“Ka li certe sci’ĝus pri ĝi”.

“Ja’s povas esti.”

“Sed Pejtro fervoras pri ĝ. Alvoki Veneran. Li diras ke juna Sinjor Camperdine tiom ridis ka frapetis lin sur ŝultron ka diris ke l donos al li kvin pundojn se l faros ka n grav’s *kiun ajn* l aperigos. Kvin pundojn Pru! Ka kiam mi rifuzis li batis min. Ka l diris ke se m ne faros ĝin li devigos min labori en kampoj ka batos min ĉiun sabaton dum plena jar. O Pru kion mi faru?”

“Kiel l ebligos ĝin?”

“O m estos en kel’ sub lia ĉambro ka klapopord estos aperta ka ŝnur estos sub miaj akseloj ka trapasos pulion en plafon’ ka Patrinstos en kel’ por bruligi fumaĵon ka ligi ŝnuron ĉirke min ĝuste. Pejtro tiros ŝnuron en kuirej sub pordo ka m leviĝos lante sub ruĝa

lum. Li diras ke stos tr'obskukure por vidi mian vizaĝon sed ti ja ne konsolas min. Gideon n akceptus tian pretekston.”

“Ne. Ĉu vi tr'amas Gideonon Jancis?”

“A° m amas.”

“Ĉu vi konas titekston ‘La Mestro ĉe’stas?’”

“En Bibli? Ja’s mi konas.”

“Ĉu v sentas timaniere pri Gideon?”

Bela kolor revenis en ŝian vizaĝon.

“O jes ja Sarn stas mestro”.

“K alia...foriros morgo ĉu?”

“Ki’alia?”

“Nu Sinjor Woodseaves.”

“O li foriros morgo.”

“Do atentu Jancis m anstatos vin.”

“Vi?”

Ŝia buŝ estis tiel ronda ka tiel ruĝa pro mirego ke m volis bati tiknabinon.

“Jes mi! Mi scias ke stus strange se m estus Venera” mi diris amare.

“Sed Pejtro scius.”

“Vi diras ke l stos en kuirej.”

“Ka junul?”

“Vi diras ke l ne vidos vian vizaĝon. Stos okskure ka m flankenturnos min. Ka m prenos muslinon forde ribarbustoj ka metos ĝin sur mian kapon por ke l ne vidu mian brunan hararon. Li vidos kion li venis por vidi scivolaĉul nudan virinon. Poste li pagos monon ka v estos libera.”

“O Pru v estas bona! M amas vin Pru! M iel rekompencos vin. Plej bona part estas ke ne gravos al vi ĉar vi nenjam havos amanton.”

Tiel senintence kruelaj stas homoj. Jen rekompenc pro mia bona far. Sed malpravas kiuj diras ke bonaj faroj ricevas rekompencon.

Mi volis strangoli ŝin pro tivortoj. Kolera sango muĝis en miaj oreloj.

“Foriru nun” mi diris. “Morgo ni plue parolos. Sed foriru rapide nun!”

“Mestro cê’stas”

Ka kun konfuza ka timem’aspekto ê foriris.

Ĉapitro 8: Alvoki Veneran

Seriozmensaj homoj devos preterpasi ĉitiaperigon de Venera sed mi plejeble kurtigos ĝin. Kiam m ekiris vespere al mi ŝajnis ke stis hontiga tasko montri min tutnuda. Kvankam mi sci's ke Frin Dorabella k aliaj grandaj damoj demetis suprajn partojn de siaj roboj vespere ka venis duonnudaj ka n opini's tion hontinda tamen virinoj el nia klas pl'emis sin kovri.

Dum m eniris laŭ ĝardenvoj' tra pordon sur malsupra nivel por ke nenju vidu min mi forte tremis ka nur mizerec de povra Jancis devigis min plenumi mian promeson. Ni povis aŭdi Beguildyn ĉirkemoviĝadi supre apertante klapopordon ka pretigante ĉion. Mi pensis ki'absurda oldul li stas ĉar li spozas k'iu kredas liajn majludojn. Poste n'aŭdis ĉevalon de Sinjor Camperdine k okazis piedmovado supre ka Beguildy tiris ŝnuron por sci'gi ke ĉi' stas preta.

Ofte stas pli facile morti pro am ol ridindiĝi pro am. Tiel mi pensis dum m estis sorigata en obskuran ĉambron en nubo de fum kiu devigis min spasme spiri dum m etendis manojn por eviti puŝiĝi kontre flankojn de klapopordo ka n sci's ĉu ridi pro absurdec de ĉiĉi' ĉu plori pro mizerec de ĉitidramajeto kiu mokis min. Ĉar jen mi ŝajnigis ke m stas plej bela virin kiu iam ekzistis eĉ di'n ka m estis malbenita kiel vi scias.

Ĉi' malklarecis en ĉambro. Apene mi povis vidi formon ĉe fora flanko. Beguildy kantadis ian strangan sorĉadon en kuirej ka ĉeval de junul stamfis ka skuis bridon ekstere.

Dum mi leviĝis tra klapopordo ka pendadis en rozkolora lum juna skvir klinis sin taŭen en sia seĝo k etendis siajn manojn kiel infan en kukobutiko. Sed mi sci's ke l solene ĵuris ne moviĝi el sia seĝo. Mi pensis ke devas esti strange trapasi vivon inter viroj etendantaj manojn ambeflanken ĉiam esti kuk en fenestro kiun on avide rigardas. Subite m aŭdis moviĝon aliflanke de ĉambro ka kiam mi turnis min tidirekten mi volis elkri' ĉar tie sidis Kester Woodseaves.

Ĉu iam Fato tiel petolis? Ĉar el tuta mondo ĉitie stis sola vir de kiu mi devis kaŝi min ĉar mi jam amegis lin do devis nenjam vundi lin per mia dolor. Ka l stis tie tiel proksima en nana ĉambro ke du paŝoj alportus lin al mi. Li taŭenkliniĝis samkiel juna skvir ka komencis etendi brakojn sed retiris sin suspirante. Mi nun sci's ke dezirego tiam ekscitis lin. M ekkomprenis tiam ĝojege ke m mem ka nenj'alia instigis lin etendi brakojn. Ĉar en tiloko li n povis vidi mian malbenitecon li povis vidi min nur pale glimi kiel iu ajn virin. Poste m ofte demandis min ĉu l tiel ekscitiĝus se Jancis tie pendus nuda krucumita anstatate mi. Ĉu stis nur karna dezir samkiel en juna skvir aŭ ĉu mi'anim kiu ĝemelis kun lia eĉ tiam tiris lin k allogis lin konsolante lian koron k alvokante lian amon? Ĉar mi vere kredas ke spirit intense okupas sin enkorpe ka traspiras ĝin ka ĵetas vualon sur ĝin por fari ĝin pli bela ol ĝi mem estas. Ĉar ki stas nura karn? On povas vidi nuran karnon ka senti nur abomenadon. On povas vidi ĝin stranĉitan en viandovendej aŭ ebrian en defluil aŭ en ĉerko mortintan. Ĉar mond estas plena de karn kiel plena de laternoj stas breto de vendisto je komenco de vintro. Sed on ne spertas komforton de latern ĝis on hajmonportis ka lumigis ĝin. Ka m ĉiam rimarkis k'al virinoj kun belaj rondaj vangoj ka mamoj kiaj rondaj montetoj kie dancis Felena mankas anim por en si ridi aŭ plori k i n allogas virojn. Tikiuj allogas virojn al si po dutri dudekojn ka centojn kiel homoj kuntiriĝas al lumigita kirko kiam Pasko-Manĝ estas preta ofte stas personoj kiuj ne trotaksas valoron de siaj korpoj.

Jen fakto stranga kiel ofte stas ver sed ne tiel stranga kiel ruzem k alvoko de virin difektita ka malbenita al kiu on diris "Vi nenjam havos amanton". Du viroj amorus min tinokte se m tiel volus. Ka kiam mi vidis ŝultrojn de skvir taŭenkliniĝi pro pezo de lia voluptem m unuafoje ekkonsci's ke ki'ajn stis mia vizaĝo tamen mia korpo ja stis bela. De piedo ĝis ŝultro m estis tiel belaspekta kiel bela povas esti virin. Sub ruĝa lum mia karn smilis al rozpetaloj ka mia form estis kia laŭondire stas tid akvofein supra k amiga.

Ne multe ĝenus nek konsternus min mia partopren en tistulta ludo taŭ nekonato. Sed nun m estis unsola ruĝiĝo de kapo ĝis piedoj ka frida kiel glaci anke. Ĉiu sekund estis hor ka m hontis

kvaz mi putinis. Tamen mi n povis ne ĝoji ĉar mi tiel donis mian korpon al okuloj de tikiu stas mestro en dom de m'iestajo por ĉiam.

Mi tiris muslinon sur mian vizaĝon ka rigardis oblikve timirindaĵon. Ĉar ja vere li stis por mi mirindaĵo tiam ka ĉiam ne pro si'aspekto nek pro i'farita sed pro silenta potenc de sia estaĵo potenc akumuliginta en li granda kiel montego kontre ĉiel' kiun on ne povas mezuri nek nomi sed nur senti.

En maldensiĝanta fum mi povis vidi lian vizaĝon formiĝi per ŝoko d amor ĉar negrave ĉu aŭ n li poste amos min li min amis en tihor ka montris tivunditan mienon ĉiam videblan sur vizaĝoj de viroj inter komenciĝo de volupt en okuloj ka ĝia satiĝo.

Skribad okupas longan tempon sed m estis enĉambre nur dum Srin Beguildy povis kalkuli ĝis sesdek. Beguildy timis k'i trovos veron se l permesos al i tro longan tempon tutne konsciante povra naivul ke nenju el i kredis eĉ un vorton de lia fanfaronado. Dum m ancor stis svenema pro ŝoko vidi Kesteron Woodseaves Beguildy kri's el kuirej—

“Nu nu sinjoroj ĉu m gjajnis miajn kvin pundojn?” “Jesja jesja!” diras Sinjor Camperdine kiu avide rigardis min “ka pli ka pli!”

Beguildy komencis kanti alian stultan rimon ki stis signal ke m pretu sobi. Nenjam virin eniris kelon pli volonte ol mi. Mi surmetis miajn vestojn plejeble rapide ĉar ni povis aŭdi skviron displuadi kun Beguildy en kuirej.

“Ki do? Ki do? Paroli kun ŝi?” Beguildy diras. “Kiel on povas paroli kun Srin Venera jam mortinta taŭ mil jaroj? Mi revenigis ŝin por vi tra pordego de morto por kvin pundoj kontantaj sed mi n povas reteni ŝin. Ŝi venas marŝantante sur aer en nubo dum on povas kalkuli ĝis sesdek ka tuj tiam ŝi foriras. Ĉar ŝi stas nur bela fantom komprenu! K on devas retrigi ŝin en kandellum.”

Okazis laŭta ekrido pri ti ka dum Sinjor Camperdine eliris al sia ĉeval li krias—

“Mi denove rigardos Veneran iam Beguildy. Jadi ŝ havas tr'agrablan formon venu ŝ el kie ajn.”

Dum mi rampis hajmen sub densa reto de vintraj branĉoj mia kor bategis kiel tide novedzin kiam unuafoje ŝi'amanto rigardas ŝian belecon. Sed m anke hontis malĝoje ĉar mi n estis novedzin

tamen gapis min k amoremis min nekonata vir k ank alia kiu stis por mi mondo ka ĉi' kvankam mi jam vidis lin nur un fojon.

Kun mir mi konstatis kiam sekvan tagon mi plenumis miajn en- k ekster-domtaskojn sklavante kvaz vir farante virtaŭgan laboradon m estis en mia propranim novedzin de teksisto. Dum kun Gideon mi plugis frostitan teron ka dum mi purigis brutejon vestite per sakŝtofo ka botoj ka dum mi staris en kotplena kortbirdej donante manĝaĵon al anasoj ka kokoj aspektante kiel vir pl'ol virin ka kiel birdtimigil pl'ol vir tutdume m pensadis ke m estos edzin por li loĝante en lum de liaj okuloj ka varmiĝante per lia rideto ka lia standardo super mi stas am. Dum mi paŝis nur duonsulkon maltaŭ Gideon mi kuŝis tremante enbrake de mi'amanto sveneme kiel ĉe Beguildy. Kvankam miaj manoj stis harditaj ka fendetiĝintaj ka mia vizaĝo ruĝigita ka bruligita de veter mi pensis pri mi'amato kiu stas flor ka petal de flor. Ĉar am estas Majros kiu povas ŝanĝi eĉ plej banalan virinon en ian Jancison. Ka kvankam mi posedis nur ombron jes! nur ombron d ombro kiel kiam on vidas speguliĝon de nimfe en lago ne kvieta sed ondetanta tiel k'eĉ speguliĝ estas distordita ka n tutfidebla tamen ĝi faras mondon tutnova.

Mi demandis al mi ĉu i'kazos en mi'ekstera vivo tal denove nimfeoj venos kuŝantaj laŭ lagorandoj kvaz grandaj gutoj de pala vaks. Nun troviĝis nur imitaĵo ĉar inter frostitaj folioj kuŝis lilioj el glaci. Tamen kiam mi pensis pri Kester Woodseaves ka kion l eksignifis mi kvaz aŭdis ka vidis ĉiufanke en obskurarbar sonon ka glimon de proksimiĝanta printempo. Jen flutalvok el kvarkarbar ekpurpuriĝ en arbosuproj tenera flaviĝo de fikarioj en korvej. Kiam m eniris mansardon printempo jam stis tie taŭ mi kvankam tiom fridis ke miaj manoj apen povis skribi. Tamen mi skribis en mian libron vortojn "Unua tago de printempo". Ka m skribis tion per plej bona alta manskrib ornamita. Tiel mi ĉiam povos r'enmensigi duan fojon kiam mi vidis lin kiun m amas k unuan fojon kiam li vidis min. Li n nur rigardis min li rigardis kun favor ka sopir ka kvankam mi sci's ke tiel stis nur ĉar ver estis kaŝita forde l tamen mi ĝojis pro kion mi havis kiel ĝojas en vintro birdeto kiu venas al man por ricevi paneron kvankam kiam abundos manĝaĵo ŝ mokante kantos de plej alta branĉo.

Mi prenis mian paneron ka jen! Ĝ estis Sinjormanĝo⁴⁹.

⁴⁹ La Sinjormanĝo estas ĉefceremonio en la Kristana kulturo. Ĝia oficiala nomo estas "Eŭkaristio". Dum ĝi, pano kaj vino konsekriĝas kaj, laŭ onia kredo, mirakle fariĝas la korpo kaj sango de Jesuo Kristo, kiun oni manĝas por liberigi sin de pekoj.

Ĉapitro 9: Konkroludo

Matene plugante foran kampon kun Gideon mi vidis flavajn nuksamentojn en heĝo ka hajmonportis in ka metis in en vazon sur mia ŝrank en mansardo. Mi plukis in frue ka ligis faskon al ĉiu korn de bovoj tiel ke dum tituta tago da mornaspekta veter blankaj bovoj ti'n ka r'en laŭiris ruĝan kampon de kiu kelkaj partoj stis blankaj tiel k'i aspektis flavaj kun tremantaj oraj tufoj sur kapoj kvaz êe foir' Dum ni maljungis Gideon diris—

“Kion celis v ornamente brutojn?”

“Hodi stas Majtago” mi diras.

Gideon aspektis kunpleksa sed li diris ke nu sendube m amas ŝerci ka l ne plendas se nur mi bone laboras.

“Kiam ĉititeda plugado finiĝos Gideon?” mi diris ĉar el ĉiuj taskoj mi plej multe malamis ti'n ne pro plugado mem sed ĉar ĝi tutetendiĝis super niajn vivojn ĝis n ekzistis spaco por i'alia. Li plugis febre. Tagiĝon ka noktigon en frosto ka pluv li stis sur ter laboregante k ofte li pli damaĝis ol maldamaĝis teron. Tutbien estu tritika. Tutgrenuj stu plenplena de tritiko. Ni nur kreskigu sfîce da gren li diris ka n'stos riĉaj tal konstati tion. Mi ne povis elteni tinovan leĝon kiu tiom profitigis tritikumadon.

“Tuj kiam ni sfîce profitis foren n'iros Pru ka nenjam denove vidos ĉilokon” li diris.

“Mi n povas kompreni tion Gideon” mi diris al li. “Se v fierus pri bien mi komprenus. Sed ja ŝajnas tre strange ke v elspezas vian tutan tempon ka forton por bien kiel patrin por infan sed n amas ĝin. Stas kvaz patrin n amas sian infanon sed nur celas vendi ĝin.”

“Ja's jen tiel Pru. Domne mi n amas teron. Nek m amas monon. Ne monon mem.”

“Nu kion vi ja'mas?”

“Meti miajn dentojn en ian duraĵon ka meĉi⁵⁰ ĝin. Konkroludi ĝis ne restos er nek konk aliol mia. Sti reĝo de tuto ka sola pom sur branĉo.”

“Sed pro ki Gideon?”

“Ĉiam vi demandas ‘pro ki’. Ĉar mi naskiĝis tia ka m ne povas ali’ĝi.”

Ĉiam ni reven’s al ti.

“Gravas restigi ĝustajn regantojn por k’on ne ŝanĝu leĝon tal n’akiros sfiĉan monon.”

Stis kvaz land estis lia pupo kiu komplezu lin ka metu monon en lian poŝon.

“Kiuj stas ĝustaj?”

“Kiuj daŭrigas altan prezon de tritiko.”

“Sed malriĉuloj senmanĝaj volas malaltan prezon.”

“I ridetu k eltenu. I laboru. Mi laboras ĉu n?”

Jadi li laboris! Li konsistis el nur ostoj ka muskoloj ka kvankam li stis senkompata li taŭ ĉi’ stis senkompata al si mem. Mi diris ĉu l subtenos Skviron dum elektotempo malgre kion diris Frno Dorabella.

“Ja’s mi n dubas ke m dev’s. Li havas multe da tritiko-kampoj nenjam li permesos malaltiĝon de prezoj.”

“Ka kiam vi ĉesos plugi?”

“Ne tal n’aĉetis domon ka krome havas monon enbanke.”

“Sed kiam n’elplugos tutan bienon escepte de herbej kiun ni b’zonas por bestoj vi nepre devos ĉesi.”

“Ne. Se ni n havos sfiĉe da mon mi komencos plugi arbaron.”

“Ho ve ve ve!” mi diras ĉar mi volis plori. Li n povus pli tristige pensi ol pr’arbar. Ĉar nun stos nenjam ripoz por ni ĉar tutarbar ĉirke bien apartenis al ni ka tie troviĝos labor senfina. Larmoj ruliĝis sur miaj vangoj ka m sentis in fridaj ka lantaj kiel frida krespuska mallumiĝo.

“Ki ĝenas cin?” diras Gideon. “Plor? Benu min jen kia virin! Komprenu knanjo ni laboras por stonteco.”

“Mi malfidas stontecon” mi diris. “Ĝ estas kia branpasteĉo kiun on donas al infanoj en Lullingford je Kristnasko. On eble ricevas

⁵⁰ Maĉi.

ion sed plejofte nur moton. Ka s on ja ricevas ion veteblas dek kontre un ke ĝ n estas kion on volas ĉar kion on volas n estas en pasteĉo.”

“Jadi! Ki’araĉo da sensencaj vortoj! Stontec estas kia on faras ĝin.”

“Tutne!” mi diras. “Ĝi smilas bluan pejzaĝon kiun veturanto vidas je tagiĝo ka l ne scias ĉu ĝ estos agrabla kun bienoj kiuj sorigas fumon kiam sun sobas ka kun manĝo s on petas aŭ ĉu ĝ estos sovaĝa erikej kie l mortos pro malsato ka frido taŭ maten.”

“Do jen” diras Gideon “vi malsatas profride jen via problem. Vi b’zonas tason da forta te ka grandan teleron da terpoj ka lardo. K aŭskultu! Patrin domne batas pleton.”

Povra Patrin amis vesperon ĉar ŝi sopiris kompanojn. Ŝi diris ke tagoj lantegas en silenta dom ka ŝ estis timema ŝin timigis folifal aŭ knar de pordo. Ŝi multfoje petegis min forlasi plugadon ka rest’iom da tempo kun ŝi. Sed mi dev’s plenumi volon de Gideon do m elpensis komfortigajn rakontojn por ŝi pri tago kiam ni stos riĉaj kun geservistoj ka kuireja knabin ka sen porkoj. T’iomete feliĉigis ŝin sed balde ŝ suspiris ka skuis kapon.

“Malbaldege malbaldege Pru. Eble mi n ĝisvivos. Mi preferas ke nuna vivo plifaciliĝu kara. M abomenas gardi porkojn enarbare. Miaj povraj kruroj doloregas ka kiam mi sidiĝas reŭmamismaĵ atakas min. Ka porkoj senĉese disvagadas en akvo ka sekve miaj piedoj ĉiam malsekas. Mi preferas men da geservistoj stontece ka men da porkoj nuntempe. Mi preferas men da kompanoj tiam k iom pli nun. Ti okazos tre malbalde ka nenjel pli kontentigos ol loĝejoj en Paradiz. Ti’diru lin Pru. Diru al Sarn mia fil ke m preferas kelketon nun ka men en venontaj jaroj.”

“Ja’s mi diros al li Patrin ka v pensu pri tempo kiam ni ĉesos plugadi.”

“Sarn nenjam ĉesos plugadi. Aŭ se jes tamen li trovos alian laboron. Tia li stas li n povas ripozi. Li smilas viron pri kiu m aŭdis kiu rajdis senhalte trans landon por liveri timigan informon eluzante ĉevalojn k aĉetante novajn sole kun pens atingi celatan lokon. Ka l atingis ti’n ka diris informon sed lia mens estis jam fiksita ka l ne povis halti ka rajdadis senĉese senripoze kaŭriĝinte ka vipante ĉevalon tage ka nokte nenjen irante kun nenj’inform.

On diras ke l ankore rajdas. Mi diras al vi Pru ke stus pli bone multpli bone por ni k anke por li se mia fil Sarn stus naskita idiota ka ludus per koloraj ŝtonoj ka tredus fadenon tra lekantojn.”

Ŝ aspektis stranga starante tie en gregej kun siaj longa stango ka ruĝa ŝal ka buŝ tremanta k okuloj brilantaj kiel de profeto ka grandaj malgrasaj porkoj gruntadis ka fosadis ĉirke ŝ ka lago Sarn stis fon kvaz bluvitro ĉirke figur en kirkfenestro. Mi demandis min ĉu iam troviĝas porkoj en kirkfenestraj bildoj pri Erarinta Fil ka m ne povis n iomete ridi komplete pensante ke jen Erarinta Patrin⁵¹ ka kiom ni ĝojus s anke Gideon stus iomete malavarema.

“Pro kial vi ridas?” ŝi diras.

“Nur pens ke v estas Erarinta Patrin.”

“Mi n komprenas. Mi n povas kompreni n eĉ un el mi’aj du infanoj. Ho ve! Sed stas kruele Pru ke v ridas dum mi ploras.”

Povra Patrin! Fojfoje ŝ prave parolis. Ŝi trovis vortojn por mia propra plendo pri mondo kiu ridas kvankam mi ploras.

“Nu nu mi diros al Gideon” mi diris.

Jen un el strangaj cirkonstancoj de nia vivo ke m estas peranto kiu portas mesaĝojn de Patrin al fil. Ŝi n kuraĝis ekparoli nek fronti lian fridan ŝtalan rigardon.

Sekvamatene mi parolis kun Gideon. Kiel ĉiam li stis en kampo taŭ mi. Stis froste ka nebule tiel ke plugita ter smilis senbrilan spegulon aŭ lagon kiam ĉiel’ stas nube kovrita glima sed ne solida. Kie froste stis ka sun brilis kampoj stis poluritaj kiel akvo de lago glimanta.

Gideon ka bovoj marŝadis lante aspektante nana solida obskura bildo en solecaj kampoj. Ti enmensigis en mi nigrajn figurojn el kverkligno ĉizitajn sur gablo-pintoj de kelkaj domoj en Lullingford ĉiam aspektantaj tre malhelaj kontre ĉiel’. Spiraĵo de bovoj ka vapor el korpoj staris ĉirki k enfermis in tiel k’irante ti’n

⁵¹ Unu el la rakontoj atribuitaj al Jesuo en la Biblio temas pri la “Erarinta Filo”, junulo kiu antaŭprenas sian heredaĵon de sia patro kaj forvojaĝas sendiskriminacie elspezi ĝin. Poste li revenas al sia patro kaj pardonpetas pro sia mis- kaj fi-agado. Lia patro ne nur pardonas lin sed ankaŭ honoras lin ĉar la “perdita” troviĝis. En la angla lingvo la nomo de tiu rakonto “Prodigal Son” fariĝis sinonimo de “senrespondeculo”.

Konkroludo

ka re'n i 'spektis ronda k aparta bildo pr'iu moviĝanta en kampovasto.

“Gideon!” mi diras “Patrin mave fartas. Ŝi b'zonas ripozon. Dungu knabon por prizorgi porkojn en arbar.”

“Knabon! Domne kknabon?”

“Eble Tim de Muelisto. Li stas nur sepjara sed li povus gardi porkojn ka m donus al li manĝojn.”

“Ki! Manĝigi grandan sepjaran knabon ĉiutage en semajn escepte dimanĉojn? Ĉu v frenezas Pru?”

“Patrin stas tre trista ka nebone fartas. Ŝi b'zonas ripozon ka kompanojn dum taŭmortaj jaroj k iom da komforto.”

“Ĉu mi n laboras por ti? Ĉu ŝ n havos geservistojn ka ĉion bonan ka benkon en kirko ka veran porcelanon?”

“Ja's! En stontaj jaroj se ŝ ĝisvivos. Sed eblas ke n. Urĝas jam nun.”

“De nenjo ŝ s'feras. Ŝi povas tutsenĝene vivi. Ŝi spiras bonan aeron dum ŝi gardas porkojn ka ŝ povas klini sin super fajr vespere por mildigi reŭmamismon.”

“Sed ŝi mornas knaĉjo. Ŝi volas min pl'ofta en hajm.”

“Nu v estos tie post fin de plugado.”

“Tre longa tago. Sed okazu ki ajn vi dev's dungi knabon por prizorgi porkojn.”

“Dev's dev's? Kiel vi rajtas diri tion al mi? Mi stas mestro de Sarn.”

“Vi ne rajtas peli Patrion al morto kiam ŝ estas olda ka s'feranta.”

Gideon celigis al mi tivelkigan rigardon.

“Eble” li diras tre lante k amare “eble v akceptos edziniĝi ka tiel estigi knabon por gardi porkojn. S iu akceptos cin.”

Li prenis tenilojn de plugil ka laŭiris sulkon. Longa rest en mansardo necesis por ellavi tivortojn sed potenco tiea ellavis in fine. Mi pardonis Gideonon ĉar li maldormis dum tiom da noktoj pro ŝafnaskiĝoj. En noktonigrec dum plejmallum de jar kiam koboldas li devis maldormi ka laboradi tutsola. Dum nebul ĉirkas lin kiel mortotuko ka frostaj ventoj kiel mortofrido ka neĝo flustras k aŭdiĝas kri ĉiflanke d arbar k ulul aliflanke ŝafgardisto devas maldormi kvankam plaĉaj agoj de tag estas jam falditaj k

enŝrankigitaj ka komfortigaj sonoj k okupiĝ en dom ka gregej kvietiĝis ka fantomoj stas fortaj k amasigas sin per orienta vento ka norda ka nenju povas kontr'in. Do kiam Gideon amare parolis al mi mi nur pasigis pli da temp enmansarde. Stis agrable tie dum printemp alproksimiĝis k estis teler da primoloj surtable ka varma vent enblovis. Kiam venis april n'ankor plugadis ka m tiom kutimiĝis al ti ke m ne plu laciĝis ka m ĝuis ĝin ka plugante kantis al mi. Stis plaĉege laŭiri ruĝan sulkon dum soko forte entrancis rigidan teron k arĝente brilis. Stis bele rigardi blumontetojn de Lullingford k inter i ka mi vidi kverko- ka lariko- ka salik-arbarojn burĝonantajn kvaz varma vento blovis el tie k elvokis foliojn. Ank estis agrable rigardi frugilegojn laŭvice sekvi miajn kalkanojn kvaze poluritaj per morelobros' ka denove vidi foririntajn birdojn k aŭdi turdon kanti sovaĝe ka dolĉe ka vanelojn ŝanĝi sian vintran krion kontr i'pli varma. Nun stis violoj eltirendaj por vendi ka dafodandiloj en angul sub hederheĝo ka falditaj ruĝetaj burĝonoj kiel pugnetoj de beboj en pomarboj.

Patrin iom gajiĝis k iun tagon dum ni trinkis teon apud fenestro kun bukedo da kierantoj sur tabl ŝi diris —

“Ni venigos teksiston.”

Mi spasme spiretis ka singultis. Patrin demandis ki ĝenas min.

“Nenjo nenjo. Sed kial ne dungiton de teksisto? Stus men koste.”

“Mi ŝatas plej bonan teksadon.”

Mi enreviĝis ĉar se Kester teksos por ni li devos veni en mansardon paŝi ti'n ka re'n ĉirke teksokadron rigardi tra mian etan fenestron alproprigi al si lokon tiel ke m poste havos lin tie por ĉiam. Tamen m ankore ne povis toleri penson ke l vidos min ka m argumentis por venigi dungiton de teksisto ĝis Gideon kredis ke m amas lin kvankam on diris ke l stas stulta ka krom ti li havas dek kvar infanojn. Sed Patrin surmetis siajn okulvitrojn ka rigardis min ka sorŝovis in ka rerigardis min ka metis in en ĝustan pozicion por rigardi trian fojon.

“Ni venigos teksiston” ŝi diris ka ti stis definitiva.

Sekvan tagon Jancis enkuris tutafiktite por diri ke Beguildy 'ntencas irigi ŝin al dungfoir je Majtago krom se Gideon povos malebliĝi tion. Ŝ eniris laktejon kie mi faris buteron ka ŝ diris —

“O Pru juna gentleman’ revenis ka min l obstine deziregas tamen pli vere vin!”

Ŝ iomete subridis en mez de plorado.

“Ka Patro diras ke stu l aŭ dungfoir. Por tri jaroj Pru. Mi devos kontrakti kiel melkistin aŭ kuireja knabin tri jarojn se Gideon ne proponos edzinigi min nun.”

“Ne Gideon kara l obstinas pri plugado. Nenjo formovos lin de ti.”

“Sed mi n haltigus ĝin.”

“Vi stus plia buŝo por manĝigi. Ka se v malsaniĝus—”

“Ne mi. Mi stas pli forta ol m aspektas.”

“N eblas taŭsc’i Jancis. Kiam on edziniĝas on komencas Blindulan Ludon kiu finiĝas on ne povas taŭsc’i kie. Ka s ekestos etuloj ki okazos pri mon kiun Gideon insistas nepre akiri?”

“Ho ve! Mi n povas elteni Pru. M elkore amas Gideonon k apartiĝ estos eble sama kiel nenjam renkontiĝi.”

“Nu diskutu kun Gideon.”

“Ka ĉu v enmetos vorton saĝece?”

“Ja’s m enmetos vorton. Sed kion li n farus por vi sia kara konato li n farus por mi kiu stas nur lia sklavigita fratin.”

Ĝuste tiam Gideon transpaŝis gregejon por preni buterlakton por porkoj.

Li staris en pordo de laktej ka laŭ mi’opini stis ne mirige ke ŝ amas lin ĉar en sia kitel ka kulot el ledo ka nigra kapo senĉapa k okuloj brilantaj al Jancis li stis pli bela vir ol on renkontus en eĉ dek komunumoj. Ka m pensis ĉirkerigardante laktejon ke ĝ estas kiel eble plej dezirinda loko por edziĝpeto. Sun enbrilis oblikve kvankam dum plimulto de tago laktej stis en ombroj. Malseketaj ruĝaj plankŝtonoj ka grandaj brunaj pelvegoj donis multan koloron al loko ka flavaj krem ka buter ka stakoj da fromaĝoj stis brilaj kiel ranunkoloj ka primoloj. Jancis bone harmoni’s kun i pro sia bela flava harar ka vizaĝo ruĝiĝanta kiam ŝi vidis Gideonon. Ŝi smilis rozon en sia ruĝeta rob. Eksterfenestre en ruĝete burĝonanta majarbusto turdo kantis. M enmensas ĉion tutklare ka stus tiel eĉ se ĝ n estus skribita en mia libro.

“Vi fru’s” diras Gideon.

“Ka bonvena?”

“Ho ja’s! Certe vi stas bonvena.”

Ŝi rigardis min petoleme kvaz petante permeson ka staris sur siaj piedpintoj por ke Gideon kisu ŝin.

“Mi havas informon” ŝi diras. “Bonan informon aŭ mavan laŭ vi’opinio.”

“Mia?”

“Ja’s Sarn Pejtro diras ke m dev’s—”

Ŝi rigardis min kvaz senhelpa.

“Beguildy volas vend ĉi’nfanon Gideon. Kial ne rekte paroli? Li volas vendi ŝin al juna Camperdine por ties plezur.”

Jancis kaŝis vizaĝon enmane.

“Ka se ŝ rifuzos ŝi devos iri kiel kuireja knabin al Majferi k esti metiligita tri jarojn.”

“Ki! Vendi mian knabinon? Beguildy vendos mian knabinon? Domne mi volonte dronigos lin pro ti.”

“L ancor ne vendis ŝin Gideon.”

“Des pli bone por li.”

“Sed ŝ estos ligita tri jarojn laŭkontrakte en fora loko preter Lullingford.”

Gideon klinis sin ka fortiris ŝiajn manojn ka rigardis furioze ŝian vizaĝon.

“Ĉu v estas fidela al mi?” li diras. “Domne se v perdis vian himenon per juna Camperdine mi hakbuĉos lin. Ja’s! Ka vin mi strangolos!”

“Ne ne Sarn! Mi ne mi ne” ŝi krias. “Mi stas fid’la al vi Sarn ja vere.”

“Sed kion ŝi faru Gideon? Se ŝ n estos amoranto de junul ŝi devos foriri.”

“Mi ne pov’s toleri foriri.”

Ŝi denove ekploris. M’ atendis por ke Gideon parolu sed li diris nenjon.

“Ekzistas alieblo Gideon.”

Mi parolis kaĵole ĉar mi sci’s ke l dev’s decidi ne nur por si sed anke por ŝi. Eblis al li ĉitage elekti bonan vojon por ambaj. Alvenis un el oportunoj en vivo de Gideon kiam li povus elekti sian benon vojon d am ka feliĉaj tagoj kie kreskas paggloj ŝlosiloj de ĉiel’ aŭ

vojon de strangaj serpentumoj kie troviĝas terura malben malbeno kara kielsuĉas vivsangon.

Anke Jancis ŝajne rekonis ke vivoj iel dependas de ĉitimomento. Ŝi klinis sin ka kisis lian manon ka diris per milda raŭka voĉo—

“O estu mi’amanto Sarn!”

Gideon eligis ian ĝemon.

“Mi scias kien vi trenas min Pru” li diris “kun okuloj tiel fikse turnitaj al mi. Vi sobtrenas min al malriĉo ka perdo de ĉi’ pri ki mi rev’s.”

“Mi laborus duoble knaĉjo” mi diris.

“Kiel utilis? Vi ja bone scias ki okazus. Ĉu vir povus agi alie kun tibelulin kiel edzin? Buŝoj plenigendaj! Buŝoj plenigendaj! Nenjam nenju luksa domego nek geservistoj nek benk en kirko. Nenjom da mon por vi. Nenju ĉasbal por Jancis. Nenja saluton-mi-ĝojas-revidi-vin inter junkroj por mi. S iam ni gajnus monon ti stus nur post jaroj ka jaroj. Ni perdus domon ka lante laborus ka formangus ĉion lukritan. Vir kun edzin ka famili nenjam prosperas. Li dev’s taŭe gajni monon.”

“Sed knaĉjo ĉu v n pli bone laborus se v estus feliĉa k anke Jancis feliĉus?”

“Nu ne. Feliĉo ka pigrem ĝemelas. S on volas labori on dev’s esti nek morna nek gaja. On dev’s pensi nur pri labor ka nenj alia. Plue se m nun prenis Jancison spite de dezir de juna Camperdine li mem kontrestarus min k incitus junkraron kontre min. Ne grave ki tiel amfrenezigis tiviron ti nun stas fakto ka n’dev’s gardi nin.”

Li rigardis Jancison suspektete ka ŝ perokule petegis min klarigi ĉion. Sed tion mi n povis. Mi faris multon por Jancis sed ĉiti’ stus troa. Ĉar mi timis ke se m ion dirus rakont atingus Kesteron Woodseaves. Jancis jam promesis ke nenju scios krom s urĝe necesos informi Gideonon. Do m silentis ka m ne povis kredi ke gravis ĉar parol nur prokrastus agojn ka Beguildy jam decidis pri Jancis ka se n estus juna skvir stus aliul. Stis plej dezirinde ke Gideon decidu unfoje por ĉiam ka s l ĝuste elektos li ka Jancis povos nupti ka Beguildy ne plu povos fari aliajn planojn.

“Vi nur kurtan tempon prokrastus riĉiĝon Gideon” mi diris.

“Ne. Ni prokrastus ĝin por ĉiam. Plej bon’estos prokrasti nupton. Ni ’tendos trijare. Ti donos al ni tempon por ŝanĝi ĉion. Kvankam mi n volas prokraston.”

L eksilentis ka rigardis Jancison. Mi povis vidi sopiron en lia vizaĝo ka l forte tremis. Stis strange vidi tian fortegulon tremi kiel virin kiu ĵus vidis fantomon.

Li komencis paŝi al Jancis ka m komencis eliri ĉar mi kredis ke l ĉirkebrakumos ŝin ka ĉi’ stas bona. Sed subite li murmuris—

“Ne ne!” ka retiris sin. Post ti li diris—

“Vi n havus robon el saten por danci ĉe ĉasbal Jancis. Vi tion b’daŭrus.”

“Ja’s.”

“Nu se v estos melkistin aŭ i’alia vi sopiros ĝin samkiel mi. Trijar n estas longa. Taŭ trijar plugter produktos bone por rikolti kion ni semis.”

“Ke kara Di malpermesu!” mi diras.

Gideon ekfuriozis kvankam mi nenjam povis diveni kialon k ekkri’s—

“Kial ti do? Kial ti? Mi plene kontentas rikolti kion mi semis.”

“Sed ne malbenon Gideon? Ne se temas pri malbeno kara pri kiu mi legis en libro pruntita al mi de Vikari’. Knaĉjo vi n volas inter tritiko *tion* ki kreskas en infer?”

“*Ki ajn ĝ estas*” li diras “se m semos ĝin ka ĝ portos al mi kion mi volas mi bonvenigos ĝin.”

Venis softa plorsingulto de Jancis ka kiam mi rigardis ŝin mi vidis preter ŝi’ora kapo printempan tagon tutnubkovritan ka dornarbon batigi de subita vento.

“Plejbonus hajmoniri mia kara” mi diras.

“Pretigās tempesto.”

“Mi venos dimanĉe ka diros al via paĉjo kion m opinias pri li” diris Gideon.

“Ne ne kolerigu lin!”

“Kial gravas al mi lia koler?”

“O!” ŝi kri’s “ĉi’ stas kiel mi n volas. Kial on ne povas vivi trankvile ka pacame? Kial vi dev’s tiom obstini Sarn? Aŭdu venton leviĝantan! Mi taŭsentas mavon.”

Ŝi denove ekploris kaŝante vizaĝon per taŭtuko.

Konkroludo

“O mi volis elsendi invitojn k esti anoncita en kirko” ŝi diris samkiel taŭe ŝ kutimis diri “O mi volis ludi *Verda Gruzo*”.

Gideon subite ĉirkeprenis ŝin ka kisis ŝin sed li n ŝanĝis sian decidon. Kiam li decidiĝis nenjo povis ali’gi lin.

“Mi devas foriri” ŝi diris. “Venu por adiaŭi min Sarn.”

Dum i eliris mi vidis ŝin tordi manojn k aŭdis ŝin diri—

“O mi vidas senluman vojon kiu sobas en lagon. Ka sun estingiĝas. O Sarn ne d’vigu min laŭiri tivojon!”

Ka post minuto ŝ malaperis kiel fantom en sovaĝan senluman ŝtorman arbaron.

LIBRO TRI

Ĉapitro 1: Dungfoir

Je Majtago ĉar ni havis grandan kvanton por foir mi denove pruntis poneon de Muelej k ekiris kun Gideon tre frue dum purpuraj floroj ka verdaj folioj de siringoj stis ankore grize nebulaj. Taŭan vesperon mi plukis iom da siringo por vendi do ni rajdis ĉirkataj de ĝiaj suspirado ka belodor. Stis tre kvietan maten. Nenju venta spireto movis junajn ruĝajn kverkofoliojn k eĉ arĝentaj betuloj kiuj moviĝas ka tremas en ĉiu briz kiel ank akvaj plantaĉoj apud lag estis senmovaj kiel plantaĉoj profunde subakvaj kien nenjam venas ondeto. Krom niaj hufbatoj sur malseka silika voj aŭdiĝis nenju son nek el grizaj kampoj ambeflankaj nek el akvo arbar ĉiel'. Tiel serene! ĉajnis al mi ke miraklo povus okazi dum tia tago. Tagiĝo ne povus pli deteni spiron se Fina Juĝ okazus tivesperon ka mortintoj leviĝus. Kiam venis kolor en heĝojn veronikoj kiuj tie abundis rigardis nin tre simple ka senkulpe kvaz miloj da bluokulaj infanoj rigardantaj nian preteriron. D ulumoj kiuj franĝis vojon pendis flavaj amentoj. Pretere staris safiraj montetoj kiel en Nova Jerusalemo⁵² en serena veter sub ĉiel' sur kiu troviĝis eĉ n un nubo. Nek birdo nek faden el fumeca nebul movetiĝis sur tutebenaĵo. ĉajnis al mi rajdanta senparole apud Gideon dum li faltis brovojn malplezure pro pensado pri Beguildy ke smilis al granda aperta libro kun belaj paĝoj kiujn ĉiuj povas legi. Tamen manskrib estis sekreta kiel en kelkaj libroj de Beguildy kiujn li nenjam forŝlosis sciante k'i stas sekuraj. Ĉar verdire ĉiu arbo k arbusto ka floreto ka muskotig ajna herbo dolĉa aŭ amara birdo sulkiganta aeron ka vermo traboranta teron ĉiu besto peze strebanta efektiviĝi sian vivon al ni stas enigmo sen solvo. Ni n scias kion i faras. Ka tuta ĉitiverso kiu ŝajnas tutkvietan smilas dormantan turbon kiu ŝajnas senmoviĝa pro sia

⁵² En "Apokalipso" estas detala priskribo pri Nova Jerusalemo kiun Dio konstruos post la finiĝo de la mondo.

rapidego. Sed kial ĝi rotacias ka kion ni ka ĉiuj kreitoj faras en ĝia kapturna firmec tion ni n scias.

Mi diris al Gideon ke smilas al libro.

“Libro?” li diras. “Ne mi n vidas libron. Sed mi vidas abundan bonan grundon neuzatan el kiu povus kreski tritiko.”

Do ni vidas en skribo de Di kion n’emas vidi ka nenjon alian.

N’atingis sovaĝan pirarbon kiu frue floris ka ĝ enmensigis en mi Jancison.

“Nu mi demandas al mi” mi diris “kie Jancis dormos ĉinokte?”

“Ĉe Grimbleoj.”

“Kiel vi scias?”

“Mi scias ĉar m ordonas. Srin Grimble konstante ŝanĝas melkistinojn ka m aŭdis ke ŝ bezon’s novan ĉijare.”

“Stas fore Gideon.”

“Des men mave ĉar ŝi stos for de juna Camperdine.”

“Ĉu estos ege solsentata.”

“Vi skribu por mi leteron al ŝi de temp al tempo.”

“Volonte. Sed kiel ŝi respondos?”

Gideon parolis triumfoplenece.

“Ĉe tiom granda bien on dungas teksiston ĉiun-un-aŭ-dumonate. Teksisto povos skribi por Jancis.”

“Ki?” mi diras spasmospire sciante ke m diros tinomon. “Ki? Sinjor Woodseaves?”

“Nenj’ alia.”

Nu! Jen stranga sortopetol! Mi skribos leterojn kiujn legos mi’amato ka l skribos leterojn kiujn mi legos ĉiujn kelksemajnojn. Mi lasis poneon iri laŭplaĉe ka n’postiĝis ĉar Muelejpone smilis al Muelejhomoj ka ĉiam kondukis morne ka kviete kvaz multe senkuragiĝita.

Dum somerotagoj venos leteroj skribitaj laŭ liaj propraj manier ka parolturnoj. Lia man lante re- ka re-moviĝos sur ĉiu paĝo dum li rigardos literformojn per tilongaformaj bluaj okuloj kiuj traboras al kern de kor. Kompreneble i stos leteroj al iu alia d iu alia ka ĉi’ stos renversita ĉar liaj leteroj stos por Gideon en nom de Jancis ka miaj al Jancis en nom de Gideon. Ĉi’ stos konfuzoplena ka tordita ka renversita kiel nimfeombroj en lago malgre mia vol ke ĝ estu klara ka reala. Tamen mi povos malkaŝe paroligi mian koron. Mi

povos diri kion mi nenjam aŭdacis diri. Mi povos nudigi mi'animon taŭ li tikiom taŭe mian korpon ĉar nur liaj okuloj legos miajn leterojn. Mi'animo n indis fanfaronadon tamen m ege deziris montri ĝin. Jen vere stranga tamen ĉiam trovebla sinten de geamantoj. Mi n povis ne ridi pensante kiel ridinda Gideon aspektos vestita per mi'animo ka kiom senkomprena pro mireg estos Jancis aŭskultante erojn el leteroj de Gideon kiujn nenju anĝel aŭ diablo povus devigi lin diri ka ke ŝ faltos frunton ka demandos al si ĉu Teksisto mokas ŝin ka poste ŝ pensos "Nu on n estas kiel kutime kiam skribante". Mi ridadis pri ĉiĉi' kiam m ekaŭdis Gideonon kri'—

"Tent! Tent! Kien v iras? Pone metos piedon en foson ka rompos kruron krom ĉiujn ovojn en via korbo. Ki stas al vi ĉu sonĝas?"

Tro lastamomente l avertis min. Pone ka mi grimpis el fosaĵo senhelpe ka pluiris iom honte ka tre malfiere ka zorge. Subite trafis min pens ke m vidos menson de Kester en tileteroj malkaŝan kiel ĉiel'. Mi konos lin kvaz mi loĝas kun li. Ĉar ne pro kiom parolas sed per kion signifas parol on konas personon. Samkiel ne longo ka larĝo de vestaĵo varmigas sed kvalito de ŝtofo. Mi trovos lin en ĉi' skribita. Ĉar on ne povas skribi eĉ vorton sen montri sin— per vort elektita ka formo de literoj ka per ĉu skrib estas alta aŭ basa simpla aŭ ornamita. Stas kia ludo *Mi vidas...* ka n troviĝas kaŝej. Mi pensis ke Sinjor Woodseaves marŝos hajmon kontenta ĉar li komplezis ka tre kontenta malŝlosi propran pardon bruligi propran fajron ka teni sin al si. Tamen senscie li jam montris sin al mi permesis min eniri domon de lia mens invitis min sidiĝi apud fajr de lia plena komplezo.

Li enkondukis min en noblan domon

Kaj lia standardo super mi estis amo.

"Pru!" kri's Gideon. "Domnu knabinon! Ja domnu knabinon! Pone metis piedon inter rimenojn ka dentojn en herbaĵon ka jen mi deviĝis retroveni duonan mejlon. Ka ja stas foirtago! Ki stas al vi? Ĉu v misfartas? Jadi! On spozus vin amanta!"

Post ti Pone ka mi stis tre'tentemaj. Ni pensadis nur pri voj ka foir ka ĉar on ĉiam venas finfine al loko pri kiu on pensas n'atingis Lullingfordon ka trovis ke Dungfoir ĝuste nun komenciĝis.

Longa vico da gejunuloj k aliaj ne tre junaj alvenintaj por esti dungitaj komenciĝis apud nia stando. Ĉiu portis signaĵon de sia meti'. Kuiristin portis grandan lignan kuleron ka kiam junuloj stis tro impertinentaj ŝi batis in sur kapon per ĝia plato. Brutpelistoj portis vipojn heĝistoj hokegojn ĝardenistoj fosilojn. Bovgardistoj portis brilajn stanajn laktositelojn pajlsegmentistoj pajlfaskojn. Forĝisto portis hufferon en sia ĉapel ka ĉe'stis dutri d i ĉar kelkaj grandaj bienoj kune dungis forĝiston porjare. Ŝafistoj portis hokbastonojn k intendantoj laternojn por montri k'i atentos forĉasi rabistojn tarde en nokto. Kvankam kiel diris Gideon havi laternon ne pli promesas k'on elmetos eĉ nazon eksteren de litkovriiloj dum mallum ol promesas vir kiu dimanĉe akordas kun teksto "Ne deziru domon de via proksimul" ke dum aliaj tagoj de semajn li n strebas akiri ĝin. Ki ja stis cel de Gideon mem.

Ĉe'stis tajloroj ka teksistoj lankardistoj k anke ŝuffikistoj ĉar bienposedantoj kuniĝis por dungi ank in. Lankardisto havis buklegon da tinkturita lan ka tajloroj petoladis kurante laŭlonge de vico da junulinoj al kiuj i minacis tonde kurtigi jupojn.

Jancis ridis kun aliaj sed mi povis vidi ke ŝ taŭe ploris. Ŝi vere stis belaspekta en desegnokovrita robo ka kufo ka portante tabureton de melkistin. I stis alloga grupo da junulinoj domservistinoj kun balailoj surŝultre lavistinoj kun kirlostangoj. Stis ne mirige ke kelkfoje juna farmisto kiu b'zonis nek kuiristinon nek melkistinon restis tie k ekpensis ke l b'zonas edzinon.

"Jen Grimble" diris Gideon. "M estis certa ke l venos pro taŭroludo. Laŭondire li havas novan hundon ferocan kiel fajro."

Preske ĉiam okazis taŭroludo post Majfoir ka m tutne povis elteni ĝin. Mi rigardis kien Gideon fingromontris ka vidis Sinjoron Grimble vir kun longa nazo kiu aspektis kvaz li puŝas ĝin en ĉies aferojn k okazigas malagrablون.

"Ĉu jen li'edzin?" mi diris.

Gideon rigardis virinon kiu smilis pupon el zingibrokkuko maldika ka pale bakita kun okuloj el riboj. Li diris ke ŝ estas tiu.

"Tr'avara ka severa" mi diris.

"Nu Jancis b'zonas multan severon. Belulinoj ĉiam stas pigraj. Ka ŝ kutimas malsati enhajme. Ŝi certigos ke ŝ ne tro malsatos."

Li ŝajnis tutmaldomaĉa.

“Ŝ estus multege pli kontenta ĉe nana bien kie bonkoraj homoj milde traktus ŝin” mi diris. “Por kial vi volas ŝin ĉe Grimbleoj?”

“Pli da mon. I pagas pli multe ol men riĉaj uloj. Ni dev’s plejatenti tion.”

“Malben!” mi flustris. “Malbeno kara!”

Ĉar vere ĉitiparolado pri mon komencis tedi min kiel konstante ripetata kanto ekdekomence malamata. Gideon jam parolis al Skvir Grimble pri Jancis do ĉar ŝi nenjam kuraĝis kontraŭi lin ŝi geste alvokis Beguildyn ka diris—

“Edzin de Sinjor Grimble dungos min Pejtro se v permesos.”

“Ho ŝ ja ĉu? Ka kiom vi pagas al mi por trijar da knabin?”

“Dek ok pundojn.”

“Diru dudek ka v havos ŝin.”

“Ne ne jen tro.”

“Ŝi scias labori kiam ŝi volas. Ŝi fortas. Se v pagos dudek mi permesos bati ŝin se ŝ obstinos.”

“Se v metos fingron sur mian knabinon vi b’daŭros” diris Gideon. “Ka ŝ ricevos monon ne vi Beguildy!”

“Aŭdu aŭdu! Ĉ on iam aŭdis tian parolon? Ul naskita sub tripenca planedo ka dormas survizaĝe ka finfine dronos!”

Gideon ekfuriozis ka bategis lin per manplato ka Beguildy kri’s

—
“Mi repagos! Mi repagos pro ti! Damniĝu vi! Preciza kopi de via patro v estas. ‘Vi ŝuldas al mi kronon’ li diras rajdante preter min sur ventobloveto. Ka vi n scias lasi trankvila min nek mian familion. Damniĝu vi! Dum semado ka rikoltad. En paŝtejoj ka daŭmoj⁵³. Per fajr ka per akvo! Vaksan viron! Mi faros el vaks vireton ĉinokte ka nomos ĝin Sarn. Lante lante ĝi konsumiĝos— Sarn pekmanĝanto!”

Gideon rigardis lin senmove. Ĉe’stantoj iomete fortiris sin timante i n scias kion. En timomento puŝkubutumis sin tra homamason juna skvir nevo de Sinjor Camperdine.

“Mi aŭdis” li diras al Beguildy “ke Venera venis al la Dungfoiro. Mia onklino bezonas servistinion por la provizejo kaj mi venis por vidi ĉu Venera—”

⁵³ Domoj.

“Se v serĉas Jancison Beguildyn sinjor” diras Gideon rapide parolante “ŝi jam stas kontraktita.”

“Kion? Tiom frue?”

“Ja’s al bienisto tre fora.”

Li rigardis fikse Sinjoron Camperdineon ka Sinjor Camperdine egalfikse rigardis lin.

“Tio multe ĉagrenos” diras Camperdine “mian onklinon.”

“Via moŝta onklin sinjor” diras Gideon tre seke “balde trovos alian servistinon. Nenjam ŝi long’emas al iu ajn—pardonu mian klaran diron—ne via moŝta onklin sinjor!”

Juna skvir faltis brovojn sed kiam li ĉirkerigardas li vidis nur Jancison malaltan ka grasetan do li spozis ke dezirata knabin jam foriris ka tial plia displuado nur malŝparos tempon. Li suspiris ka diris al si—

“Sekve malaperas Venera!” ka foriris. Ka tre ĝoja stis mi vidante lian dorson.

Beguildy ka Jancis iris al tavern kun Grimbleoj por subskribi metilernan kontrakton kiu ligos Jancison tri jarojn. Ŝi foriros kun i tinokton. Ĝis tiam ŝ estos libera ka Gideon diris ke pro ke ŝ laboros cele Lullingfordan Novan Domon ŝi nepre vidu ĝin. Do i foriris ka mi restis por prizorgi standon.

Mi jam preske finis ĉar pro ke plac estis pli plena d aĉetantoj ol kutime varoj vendiĝis rapide. Vicoj da gejunuloj jam kurtiĝis ka restis nur kelkaj kiujn nenju volis. Kelkaj laŭ ondir tro amis drinki aŭ naskis bastardon aŭ s’feris pro nekuracebla malsan aŭ n bone konstatis ki stas propra ka ki apartenas al aliuloj. M iam demandis al mi pri sento de tiaj povruloj kiam i retrenmarŝis vespere al siaj loĝejoj. Feliĉigis min ke mi hajme laboras ka n b’zonas iri por dungiĝi ĉar tutcerte nenju elektus min. Ja jen amara pens.

Vendej rapide dezertiĝis ĉar on volis manĝi taŭ taŭroludoj. Sed ankore restis al mi kelkaj vendeblaj dafodandiloj ka n plaĉos al Gideon s i’reiros hajmon. Do m sidis kviete en trankvila taŭvesper rigardante laŭlonge de malplena strato kie ombroj de siringoj k orpluvarboj kuŝis tre malhelaj k agrablaj. Mi rimarkis k’anke Srin Grimble restis. Ŝi pakis siajn varojn ka kiam ŝi remetis buterbulon

en korbon ŝi rigardis ĝin kvaz intencante poste riproĉi ĝin pro ĝia nevendigo. Nelge ŝ transvenis al mi.

“V estas fratin de fianĉo de mia nova melkistin ĉu n?”

“Ja’s.”

“M esperas k’i seriozas?”

“Ho ja’s!”

“Do bone. Mi preferas ke miaj knabinoj jam seriozas kun knabo tal i komencas labori ĉe ni ka knab estu fora. Mi havas filojn do stas multpli senriske. Ka dum knab estas fora ka n atingebla labor ne s’feras. Nu mi foriros nun. On liberigos unuan hundon kontre taŭron post un hor ka m b’zonas unue tason da te. Mi nenjam povas ĝui nek eĉ atenti kiam mi malsatas. Ĉu nupto ĉu akuŝ ĉu taŭroludo ĉu Sinjormanĝo mi n povas vere ĝui ĝin se m ne jam metis en min unudu pajntojn da bona forta te. Nu bonan tagon. Domaĉe ke ci havas tian aflikton.”

Ŝi reiris al sia stando por kunpreni siajn korbojn.

Jen do! Nenjam mi povos resti trankvila. Nenjam mi povos forgesi mian misformon. Jen mi sidanta laŭeble plej trankvila ĝis ŝi venis ka diris tion. “Tian aflikton”. Tal ŝi diris tion mi forgesis ĝin do m ne s’feris pro ĝi. M estis ekster kaĝo ĝis ŝi re’nmetis min. Pro ĉagren larmoj plenigis miajn okulojn.

Subite laŭlonge de kvietaj voj tra ombroj ka tra nebul sur miaj okulharoj mi vidis alvenanton. Viron. Ka s ekzistas signifo kiun mi n pripensis en tivorto legantoj enmetu ĝin. I enmetu forton ka potencon bonkorecon ka paciencon firmecon ka majestan virton de ĉiuj bonaj viroj en tivorton por ke l portu ĝin. Jen li mem Kester Woodseaves mestrol!

Li venis senhaste tamen kvaz pritraktonte ion gravan. Mi vidis ke l portas sian plej elegantan vestaĵon—nigran kastoran ĉapelon verdan jakon florman veŝton ka ĝisgenuajn botojn.

“Teksisto teksisto!” vokis Srin Grimble. “Kiam vi denove teksos por mi?”

Li sorrigardis ka venis nidirekten.

Kion mi faris mi kiu sci’s ke lia ridet estas mia somer? M ekstaris tiel haste ke m renversis dafodandilojn. Mi forlasis ĉiujn niajn korbojn ka buterdrapojn ka konservopotojn por floroj ka m forkuris kvaz ĉasata. Sed pro ke plac estis ĉe fin de strat en

senelirej mi povis rifuĝi nur en oficejon de bazarestro senluma ĉambro ĉe maltaŭ' de placo kun nana senvitra fenestro kiu vidigis standojn. Tial mi n povis n aŭdi tutan interparolon.

“Ho rigardu ci!” Srin Grimble kriaĉas kiel gakanta kokin “forkurinta kvaz v estas plag aŭ Eternul aŭ intendantoj. Ki stas al knabin? Plejofte mi vidas in *alkuri* ka n *forkuri* kiam aperas junul.”

“*Kiu* ŝ estas?” demandas Kester.

Lia voĉo ĉiam estis eksterordinara. Kiam li parolis estis kvaz son de lia parolado novigis mondon por si ka malgravigis malnovan. Ĝi smilis larĝan florantan kratagarbon dum varmega tag en frua Juni. On povis sidiĝi sub ĝi por ripoz. Ka ĝ smilis trankviligan hajmfajron dum vintra nokto kiam Edric⁵⁴ estis en arbar k on kuntiris kurtenojn estingis kandelojn firme ŝloŝis pordojn ka mestro jam hajmestis.

“*Kiu* ŝ estas?” li diras. Ka kvankam temis nur pri pasanta penseto ka tri vortoj m estis flor kiu konas sunon.

“Nu ŝ estas fratin de Sarn el for apud lago. Pru Sarn. Virin kun leporfrapita lip. Ul tre stranga. Sed komprenu strangigas in naskiĝi tiaj. Iuj diras ke ŝ estas sorĉistin.”

Li diris nenjon sed transiris ka prenis miajn florojn ka metis in en konservopotojn virmaniere iom mallerte ka polekse tiel ke m preske ploris pro am. Mi povis vidi el obskur de maltaŭ' d oficej.

“Ŝi havas tre ĉarman gracian formon” li diris. Mi tuj konsci's ke l scias ke m aŭdas ka l volas mildigi vundon. Ho plej bonkora mestro medol de Tiu Kiu tiel amis mondon⁵⁵.

“Ĉu v iros al taŭroludo Sinjor Woodseaves?” demandis Srin Grimble.

“Al ti mi diras ke jes ka ke ne.”

“Ki?”

“Vi vidos ĝustatempe Srin Grimble.”

⁵⁴ Edric estis saksa estro dum la 11a jarcento, kiam invadis Anglion la normandoj. Laŭ legendoj li plu vivas kaj mortos nur kiam Anglio reestos kiel antaŭ la invado. Ĉiam, kiam okazas milito, Edric kaj liaj batalistoj rajdas en la montaro.

⁵⁵ Dio, laŭ frazo en la Biblio.

Post ti li plu laŭiris sian vojon. Ka kion mi faris? M agis kiel mi spozis ke m nenjam agos por vir tiom malmodesta m estiĝis. Mi venis el senluma ĉambro rekte en sunlumon ka paŝon post paŝ sekvis lin laŭlonge vojon kvaz m eĉ havis nenjometan retirigemon kia decas al ĉiu knabin. Mi marŝis longe maltaŭ li timante ke l turnos sin ka vidos min sed mi nenjam lasis lin nevidebliĝi. Estis kvaz mi n povis. Mi sentis ĉiam kreskantan altiron. Kiam lia verda jako malaperis ĉirke vojangulon mi freneze rapidis por denove vidi ĝin.

Taŭroludej stis multe preter urb en verda paŝteĵ kie fluis rivereto. Ka kvankam s on tie marŝis dum iu alia tago de jar por pluki liliojn aŭ neforgesuminojn aŭ por promeni apud akvo loĝantoj opinius ke stas strange tamen hodie stis tutĝuste ka dece ĉar on mortigos beston tie.

Homoj sur voj ne rimarkis min vestitan nigre ka vizaĝo kaŝita en mia kufo. De fore mi povis vidi arenon ka buntajn kolorojn de roboj ka paltoj kunmiksitaĵ ka multan mornkoloron de vestaĵoj de laboristoj kies enspezoj ne permesis aĉeti alian palton krom porfunebnan. Mi povis vidi taŭron blankan ka nanan ligitan al kramp en mur d aren konstruita el duoncirklo de malglataĵ grizaj ŝtonoj. Sunlum pribrilis ĉiujn kvaz i stis abeloj en mez de mielĉelar ka bluaer brunakvo verda paŝteĵ stis tiel belaj ke m ne povis kredi k'on elverŝos sangon dum tia tago. Foje mi demandas min ĉu stis bela klara veter ĉe Golgota kiam Maria sorrigardis al kruco⁵⁶ ka ĉu birdeto kantis k abeloj laboradis en trifolioj. Jes mi kredas ke stis vitroklara veter ka sunbril. Ĉar nenju amar mankis en tipokal ka certe un el plej amaraj vidaĵoj stas kruelec de homoj dum bela maten plena de beno.

⁵⁶ Golgota estas la loko kie Jesuo Kristo estis krucumita. Pri Maria kaj la kruco, vidu la noton 43 sur paĝo 83.

Ĉapitro 2: Taŭroludo

Dum m alproksimiĝis mi vidis ke laŭkutime tie stis ne nur virinoj de Lullingford sed anke ĉiuj infanoj. M opini's ke stas hontinde alkonduki tipovrulojn kiuj sfiĉe frue konos mavecon de mondo por vidi hundojn disŝirataj ka povran bruton mortigita. Poste mi diris tion al Gideon sed li n kunsentis.

“Laŭ via vol i stus molaj kiel lan” li diris. “I dev's sti kuraĝaj k aŭdacaj.”

Mi diris ke m ne povas trovi molecon en vol ne vidi kruelan agon ka k'al mi ŝajnas ke necesas pli da kuraĝo ne voli vidi alies doloron.

“Nu nu ni n povas fari mondon ĉar ĝ estas jam farita” diras Gideon.

Do nun jen amas' kriado ka vetado bojetado ka mordominacado de hundoj homoj perkubute puŝantaj vendistoj krikonigantaj rostitajn terpojn ka kaŝtanojn pomojn spicitan elon zingibrokukojn infanoj portantaj blankajn taŭtukojn timoplene rigardis taŭron ĉar ĝi grumbladis al si. Povra besto pensanta pri sia granda rubuspaŝteĵ trans Valetto Callard sendube. Ĝi malamis nek homojn nek hundojn ka n koleris kontr iu sed nur volis r'esti tie vagadante tra roskovrita kampar. Jen homamas' ka jen Kester. Mia vidpovo maltrafis lin en amas' do m rapidigis miajn paŝojn demandante al mia kor kion li faras en tia loko. Ĉar mi kredis lin malsmila al ĉiĉiuj. Tamen tiom mi fidis lin ke m certis ke l stas ĉitie boncele. K i'plupelis min serĉi lin en homamas' ka resti proksima kvaz li'anĝel dum titago. Malestimind'anĝel sed mi kredas k'al Di ne multe gravas kiaj stas Liaj anĝeloj kondiĉe k'i taŭge plenumas Lian volon. Ŝafhundo kiu hajmon kuras por averti al estrin ke ŝi'edzo falis de rokego ja stas li'anĝel eĉ se ĝ estas mikstrasul plej mavtipa kun oreloj pendantaj kiel de spaniel.

Blinde ka neracie kiel hundo de ŝafisto mi restis apud Kester Woodseaves sed sfiĉe fore por ke l ne vidu min. Tiel mi povis aŭdi ĉion diratan de l al viroj kiuj staris ĉirk aren' kun siaj hundoj iom

aparte de homamas'. Ka kvankam i stis viroj el mia propra region' ka kelkajn mi konis tamen mi devas diri ke troviĝis inter i dutri tre malicaj vizaĝoj. Hundoj stis ferocaj ka hidaj multaj kun aĉaj vangejoj minace voĉante ka salivumante ka montrante ruĝon d okuloj. Tamen se m devus elekt'inter viroj ka hundoj mi preferus hundojn. Plejparte i stis terhundoj sed inter i troviĝis nemalmultaj buldogoj k el ĉituij novul de Grimble stis supermezure plej minaca kun ridaĉo kiu frostigis min. Undu enhavis abundan dogecon ka multaliaj stis miksrasuloj.

Ĉiuj viroj turnis sin al Kester kiam l alvenis ka ludestro Bienisto Huglet kri's—

“Kie stas via hondo⁵⁷?”

SinJOR Huglet estis granda krudaspekta vir kiu ŝajne konstruiĝis akcidentmaniere el korpopartoj de dutri aliuloj. Li stis giganto preske ka l movis sin mallerte liaj brakoj stis tr'ege longaj ka lia tali' tiel dika ke tajloroj kiuj kunportas propran ŝtofon ĉiam postulis kroman sumon por liaj vestaĵoj. Lia buŝo smilis tiun de ran ka naz estis ronda ka ruĝa okuloj stis tiel nanaj k'i perdiĝis inter montoj da karn el kiu konsistis lia vizaĝo. Kiam ajn li n povis kompren'ion li ridis ka lia rido sfiĉis por timigi. Ka ti ja oftokazis. Grimble stis intimamiko lia ka dum Huglet levis sian ruĝan platinazon Grimble mallevis sian longan palan tiel ke kune i n multon maltrafis. I havis po du hundojn.

“Jen Teksisto” diras Grimble. “Ĉu vi n konas teksiston Huglet?”

“Nu niaj vojoj n interkruciĝis ĝis nun. Mia b'frato teksas por mi sciu. Do teksisto kie stas via hondo?”

“Mi n havas.”

“Sen hondo? Do paŝu flanken!”

Sed li fikse staris tie. Hazarde li stis preske ĉe mezpunkto de duonlun el grizaj ŝtonoj el kiuj konsistis aren ka viroj kun hundoj iom fortiris sin ambaŭflanken tiel ke l stis sola. Starante tie svelta ka rekta vestita per verda jako dum brizeto blovis liajn harojn tiel ke buklo falis sur lian brovon ĉar li portis ĉapelon sub brako li ŝajnis havi nenjon komunan kun iu tie sed esti nur parto de paŝtej verda kiel lia jako. Li havis nek barbon nek vangharojn tiel k'on

⁵⁷ Hundo.

povis vidi formon ka koloron ka sulkojn de lia tuta vizaĝo kiu ŝajnis al mi esti vizaĝo pri kiu nenju povus laciĝi rigardante ĝin. Foje mi demandas min ĉu Ĉiel stos tia longa rigardad al vizaĝo pri kiu on nenjam laciĝas ka kiun on ĉiam volas denove rigardi. Li havis ian sagaspekton tiel ke kvankam Huglet estis multe pl'alta tamen Kester ŝajnis superalti lin. Li ĉirkerigardis ka diris—

“Kamradoj mi volas peti vin ĉesigi ludon.”

Sekvis longa konfuzoplena silento. Poste Huglet ridis ka frapis sian femuron ka denove muĝis. Grimble rigardis siajn botojn ka subridaĉis.

“Nu jen bela ŝerc!” kri's Huglet. “Ĉesigi taŭroludon ĉu junul?”

“Ja's. Mi volas ĉesigi ĝin.”

“Ka pro ki vi volas ĉesigi ĝin karul?” demandis Grimble laŭ softa kantanta maniero.

“Ĉesigi ĝin?” muĝis Huglet “Li n povas ĉesigi ĝin.”

“Mi volas ĉesigi ĝin en tuta Angli.”

“Vi volas multon junul. Mi diras al vi ke taŭrolud ekzistas en Angli ekd' Angli mem ekzistiĝis. S on forprenus bonan malnovan sporton ne plu stus Angli.”

Li diris ĉiĉion per sama laŭta muĝa voĉo.

“Mi demandas kial vi volas ĉesigi ĝin?” ripetis Grimble softe k obstine.

“Ĉar ĝ estas kruela mizera afer.”

“Ĝi n estas kruela. Hondoĵ amas ĝin. I ĝuas ĝin. Anke taŭron ĝi multe plaĉas.”

Sinĵor Grimble rigardis distretitan herbaĵon tutkvaze legante vortojn.

“Kiel gravas ĉu i ĝuas ĝin aŭ n? *Mi ĝuas ĝin*” diras Huglet. “Ti sfiĉas ĉu n?”

Aliaj viroj ĉirke kolektiĝis. Ĉar kvankam Sinĵor Huglet ofte kriegis preske ĝis kreviĝ on malofte aŭdis lin kriadi dum tiom longa period al un person. Laŭdire kiam Huglet kriegis kiel nun kontraŭkriato ĉiam cedis ka kviete foriris.

“Ki okazas?” demandis Sinĵor Callard kiu posedis taŭron. Sinĵor Huglet turnis sin ka elŝprucis—

“Ĉitidomnito volas ĉesigi taŭroludon. Taŭroludon komprenu por kiu ni ĉiuj laciĝe veturas tiom da mejloj.”

“Ellitiĝis ja longe taŭ tagiĝo” interrompas Sinjor Grimble.

“Ve! K edzin ka m tiom ĝenis nin por venigi bruton akurate frue. De ki s’fer’s vir?”

Li rigardis Kesteron kiel apotekisto rigardas viron delonge malsanan.

“Ja’s” diras estro de *Kruço da Cidro*. “Mi j’aŭdis pri homoj volantaj ĉesigi longtempan genuadon. M eĉ aŭdis pri dutri volantaj ĉesigi militojn ka famojn de militoj. Tamen taŭroludojn? Nenjam en vivo! Kiu krom pokaĉo da kritikamaj parsonoj iam volis ĉesigi ludon?”

“Klare ke povrul fariĝas senmensa” diras Grimble. “Ĉu v sanas teksisto?”

Muelisto venis por rigardi skuis kapon ka foriris ki stis aktivego kiam temis pri Muelisto.

“Sed pro *ki* vi volas ĉesigi ĝin do?” diras Sinjor Callard tre konfuzita.

“Mi jam diris. Ti ne gravas. Aŭskultu Sinjor Callard ĉu v vend’s al mi taŭron?”

“Vend’s?”

“Ja’s mi n marĉandos marĉende pri prezo.”

“Sed ti n valorus por mi penon. Mi ricevos pl’ege pli se m lasos lin batali. Per venko mi fariĝos riĉa. Se malvenko do m ricevos plej altan buĉprezon d’arenposedantoj. Ĉu v komprenas?”

“Kiom vi gajn’s se l venkos?”

“Dudekpundon.”

“Mi donos al vi dudekpundon ka poste vi povos forkonduki beston.”

“Di min benu!” diras Sinjor Callard. “Ho Di min benu ja!”

Li gapis je Kester kvaz vidante fantomon.

“Konsentas?” diras Kester.

Srin Callard kiu nenjam parolis tal edzo k eĉ tiam diris samon ka nenjam malobeis venis plena d eksitiĝo kondukante taŭron.

“Akceptu proponon de sinjor Patro! Akceptu ĝin karul!” ŝi diris tutsenspire. “Akceptu dudekpundojn ka n’ajmenigos karegaĵon.”

Callard tiom miris pro ke ŝ aŭdacis paroli ke l nur povis ripetadi—

“Di min benu!”

“Di benu vin ĉu?” diras Huglet denove ekmuĝkriante. “Vi b’zonos pl’ol benon se v faros tian stultaĵon Callard. Domne! Detruos nian amuzon por dudekpundo! M instruos vin! K anke vin junul!”

“Ho sed certe li stas pl’ol senmensa idioto li delire frenezas se l proponas dudekpundojn por besteto ka poste redonos aĉetaĵon” diras Grimble. “Ho mi povus plori! Tamen povrul estis sana taŭ dusemajna lundo teksis ĉe ni tutĝuste. Sed poste li klarsendube frenezigis. Ho ve!”

Li viŝis sian vizaĝon k aspektis tre konfuzita.

Kester eltiris sian monujon ka proponis al Callard monsumon. Tutcerte sian tutan heredaĵon d onklo mi n dubis.

Jam Srin Callard alvokis ĉiujn siajn infanojn ĉar i havis kvin infanojn k anke bebon ka ŝ flustris in ka subite i kune kri’s “Prenu ĝin Pejtro! Bonvolu nin aŭskulti!”

Surprizite de ti Sinjor Callard aspektis tutkonfuzoplena ka l etendis manon al Kester por mon. Sed Sinjor Huglet ĝin sobfrapis.

“Nenju rabos al mi amuzon!” li diris. “N aŭdacu preni ĝin Callard. Ni volas nian amuzon m insistas!”

Ĉiuj viroj kun hundoj nigratone vizaĝis ka murmuraĉis—

“Jes ja jen juste! Jen evangeli! Ni volas nian amuzon!”

“Kamradoj! diras Kester petegante “estas domaĉe dum tiom bela tag inciti un povran kreiton kontr alian. Jen ago de Diablo. Se v deziras batalon kial vi n loktos vir kontre vir aŭ boksos duope? Rigardu! Por distri vin mi loktos kontre ses el vi un post alia. Kiu venkos min plej klare tiu prenos mian jakon ka dua prenos mian ĉapelon ka veŝton. Ĉu?”

Nenju parolis i nur iomete movis piedojn ka dise rigardis. Ŝajne ĉiu sci’s ke Kester stis tre kapabla loktisto ka ŝajne nenju volis preni por si tiproponon. Sinjor Grimble rigardis Kesteron kvaz malamante lin. K estis klare per sekvo ke l tutja malamis lin. Decidiĝinte ke l ne plu akceptos decidojn de Huglet l ekdiras—

“Junul bone parolas. Nu mi konsentos pri ĉikion li diras ka m akceptos ĉesigi taŭroludon hodie laŭ un kondiĉo.”

“Eldiru ĝin” diras Kester.

“Ke vin mem ataku hondoĵ.”

Sinjor Grimble malice ka gake ridaĉis ka Huglet remuĝegis.

“Jen ja ni nun venkis vin knaĉjo!” li kri’s. Ka Grimble diris—
“Eble v amas brutojn per via monujo sed vi n montros vian amon
per via propra sango!”

“Daŭrigu taŭroludon!” ordonas Sinjor Huglet.

“Religu beston” diras Callard al sia Srin kiu staris apude
fervora transdoni ĝin al Kester por ke l redonu ĝin kiel li promesis.

“Kies hondo lotiĝis unua?”

Sinjor Huglet ne plu atentis Kesteron ka daŭrigis aranĝadon.

“La hondo de Sinjor Towler lotiĝis unua ka *Kruĉo da Cidro* dua”
diris un posedanto de taŭraren’.

“Taŭen venu Towler!”

Kester staris tutsenmove ka rigardadis Grimblen ĝis li stis tre
maltrankvila. Ŝajne li n volis renkonti okulon de Kester.

“Ti stus plej bona amuziĝo de via tuta vivo ĉu Sinjor Grimble?”
finfine diras Kester. “Vidi viron turmentata kiel taŭro.”

“Nenju stus tia stultul!”

Kester ĉirkerigardis.

“Kamradoj!” li diras “s eble mi konsentos al plan de Sinjor
Grimble k akceptos sur min hundojn un post alia ne por mortig’in
sed por ĉeni ĉiun per nuraj nudaj manoj ne grave kiel ferocan se m
faros tion laŭ mia propra risko ĉu v donos al mi skribitan promeson
k’alia taŭroludo n okazos en Lullingford dum dek jaroj? Ka se m
malsukcesos ĉeni eĉ nur un hundon mi tial tutmalsukcesos ka
ludoj daŭros.”

Ĉies lango liberiĝis pro ti.

“Di min benu!”

“Jadi!”

“Domne!?”

“Ti superas ĉion!”

“Je hundoj!”

Okazis konfuza bru de voĉoj.

Unu aŭ du kri’s k’i ne konsentas. Sed plejparte i scivolemis pri
ki okazos ka ĉar on sci’s ke parson malaprobos taŭroludojn ka jam
petis skviron ĉesig’in ĉiu kredis k’i eble devos ĉesi malgre ĉi’ ka pro
ti i ĝuu nunan distraĵon ĉar ĉitiu stis neatendita amuzaĵo kian on
en tiregion’ ancor nenjam spektis.

Kiam Sinjor Huglet sukcesis ne plu ridi li klarigis al ĉe'stantoj ki okazas.

“Manojn se v aprobas” li kri's.

Ĉiuj krom eble dekdu levis manojn.

“Decidite!” diras Sinjor Huglet. “K anke decidita *via* fato bravul!”

Mi kaptis Tim-on de Muelisto ka diris al li ke l'iru al Kester ka flustru ke hundo de Grimble stas nova ka tr'ege mavhumora. Sed verdire mi sentis ke nek ti nek ali stos eĉ utilita ka m ne povis elpensi kion fari. Sed pr'io mi decidiĝis mi restos proksima al li ka kiam li falos m enkuregos ka fortrenos in ka se Grimble intermiksos sin li s'feros. Nenju stas tiel feroca kiel amanta virin ka ĉiam kunpleksis min ke Patrin de Jesu povis deteni siajn manojn de centestro⁵⁸ ka sendube tiel stis pro taŭa ordon de ŝia Fil. Sed verdire se m estus tiPatrin m opinias ke m malobeus ordonon.

Tim revenis kurante ka m vidis tiklarajn bluajn okulojn sekvi ka resti momente sur mi. Poste mi kaŝis min maltaŭ Srin Callard.

“Li sci's” diras Tim. “Sed li malgraŭe dank's vin.”

M iris al restoracibudo ka ŝtelis viandotranĉilon. Sed preske tal mi kaŝis ĝin sub falbal de mia jupo mi vidis ke ĝ n estos b'zonata almen dum iom da temp. Okazos i'pli mirakleca ol m iam taŭe vidis. Jen.

“Iru al centro de mur” diras Huglet “ka ligu hondojn al taŭroĉen. Ka se v ligos iun el miaj mi donos al vi kvin ŝilingojn mia knaĉjo. Ho mi preske krevas pro rido vidante tian stultulon!”

“Hondo de Towler” diras arenestro. “Preta!”

I liberigis terhundon de Towler plej ferocan besteton tie.

“Kaptu lin! Mordu lin!” krias Towler ka m preske svenis. Ka tiam okazis.

Kester paŝis taŭen.

“Nu Bingo!” li diras. “Bona hundo!”

Bingo haltis rigardis Towlern kvaz por diri ke l eraris ka kuris al Kester feliĉege svingante voston k amemante.

⁵⁸ Laŭ la Biblio, Jesuo estis ekzekutita sub la aŭspicio de la romia armeo, kiun komandis centestro.

“Ni stas amikoj ĉu n?” diras Kester.

Towler sakris ka Huglet aspektis nigra kiel nokto. Sed nenju povis plendi ke n estis tuthoneste k iuj el pli bonkora tipo ridis ka diris “Brave knaĉjo!”

Simile agis hundo de *Kruĉo da Cidro* ka sekvanto. Kiam posedantoj venis por forkonduki ĉenigitajn hundojn ĉiu aspektis embarasiĝinta ka konsternita.

Kester ridis.

“M amas hundojn” li diras. “Bestoj stas miaj plej amataj. Vi n povis sc’i tion sed tiel stas ka m vidas ĉitie nur un hundon kiu n estas mi’amiko ĉar ĝi nur nove venis al ĉitiregion’.”

“Ja’s” diras Grimble “vi n povos fari viajn maj-ludojn kun Toby. Jadi se v konservos vian vivon v estos bonsorta!”

Subite mi pensis pri pli bona helpil ol viandotranĉil kvankam mi plu tenis ĝin por gardi kontr eventual. Mi kuros al urbo ka venigos apotekiston ĉar n estis kuracisto tie por ke l estu proksima se damaĝ okazos. Restis ancor multaj hundoj ĉar on n indulgus Kesteron rilate iujn. Eble stas sfîca tempo se m rapidos. Do ancor portante viandotranĉilon sub mia robo mi flankeniris el homamas’ atingis vojon ka kuris impete. Sed tal foriri mi rigardis denove timian amaton ĉar se m n estos sfîce rapida m eble ne revidos lin vivanta.

Li stis ridanta dum Huglet forkondukis un el siaj hundoj. Kvankam Kester ne teksis por Huglet l amikiĝis kun liaj hundoj dum bazartagoj ekster *Kruĉo da Cidro* ŝajne. Li tiel amikis bestojn ke dutri minutoj sfîcis por k’i stu por ĉiam li’amikoj.

Ka dum mi maltaŭen rigardis ŝajnis al mi kvankam mi diris al mi ke m nur imagas ĝin ke tiokuloj tiel vieglaj ka helaj restis sur mi ka ridetis al mi amikemis min ka paroladis min kiel okuloj de vir kiu longe rigardas sian karan konaton kiu fordonis sian pacon por li sian animon al lia zorgo ka sian korpon por lia ĝu.

Sed dum mi kuris mi diris al mi—

“Ne Pru Sarn vi stas nur li’anĝel ka ja malind’anĝel.”

Ka ĉiuj bluaĵ vinkoj en heĝdigoj kuniĝis en nebulon de larmoj dum mi kuris ka n plu aspektis floroj sed blutajdo da malfeliĉo por dronigi min.

Ĉapitro 3: Plej bona alta skribo kun ornamoj

Mi povas diri ke m laŭiris vojon al urbo pli rapide ol ĝi jam delonge laŭirigis. Mi kaŝis tranĉilon en heĝo por ke m ne stumblu pro ĝi. Butiko d apotekist estis aperta kiel m anticipis ĉar li stis presbiter ka n povis malobei parsonon. Nenjam taŭe grandaj verdaj ka ruĝaj boteloj aspektis tiel belaj kvaz plenaj d akv el Paradiza River. En butik estis agrable senlume ĉar eta fenestro estis tutplena de linimentoj ka medikamentoj jen plonĝaĵoj por ĉevaloj jen kuracaj herboj por bovinoj jen plastroj fluidoĵoj ka faskoj d aromherboj tiel k'on tutne povis vidi. Odoris agrable pro mento herboj ka sapo k apotekist afable rigardis min super siaj okulvitroj ka demandis ki okazis.

“Nu Sinjor murdo preske” mi diras. “Mi petegas vin fermi butikon ka venu ĉar alie tia vir kian ĉitiurbo nenjam taŭe vidis nek vidos mortiĝos.”

Je ti bravul surtiris siajn botojn.

“Kiajn medikamentojn mi kunportu?” li demandas. “Vi povos klarigi ceteron dum ni kuros.”

Do m diris al li k'ion por hundomordoj k ion por revivigi viron kiu proksimiĝas al morto. Post minuto li firme surmetis ĉapelon ka n'foriris.

“Trinketu da brando” li diras. “Vi presk elĉerpiĝis”.

Sed mi diris al li ke n sed ke se m ne povos egalrapide kuri li nepre hastu sola al taŭraren.

M eklantis ĝuste tal n'atingis tranĉilon ka ĝisatingis lin ĉe kampenirej. Enirante mi vidis teruran lokton ĉar ni nur lastamamente alvenis. Restis ĉenota nur hundo de Grimble.

Dum ni proksimiĝis okazis kriegoj. Li sukcesis ĉeni hundon. Poste aŭdiĝis dua kriegado ka m vidis (ho mi'kara amato!) ke hundo kaptis lin ĉe gorĝo.

Mi kaptis ŝultron de Grimble.

“Forsendu v'an hundon!” mi diris.

Grimble tutne moviĝis.

Post un sekundo da titenego mia multamat estos morta ka frida.

Mi taŭen kuris mi kiu taŭe nenjam nocis vivantan estaĵon ka dum granda besto baŭmis kun dentoj en gorgo de mia mestro mi trapikis ĝian koron.

Sango ŝprucis ka peza korpo falis ka kun ĝ anke Kester.

Mi fortrenis lin k apartigis makzelojn de hundo. Ŝajne restis nenjom da viv en Kester.

“Akvon!” mi diras al Huglet kiu hazarde stis plej proksima. “Alportu akvon murdisto! Brandon Sinjor Camlet bonvolu.”

Li klinis sin super Kester.

“Mi dev’s bruligi mordon” li diris. “Plej bone tal ni revivigos lin. Sed kiel hejti feron?”

Mi stariĝis. Mi spitis ĉiujn. I n estus pli timoplenaj se m estus sovaĝa reĝin.

“Ses viroj arigu branĉetojn” mi diras. “Ka rapidu! Ka v Grimble trovu silikon ka tindron.”

“Mi n havas” li voĉetis.

“Trovu.” Mi kriegis kiel sovaĝa besto levante tranĉilon. “Trovu aŭ—”

Fajr bruliĝis pli rapide ol mi povas skribi. Ni verŝis iom da brand en gorgon de Kester por restigi vivfajreton ka poste Sinjor Camlet bruligis mordon ka Kester vekigis agoniante ĉar estinte tutsenkonscia li n pretis sperti doloregon.

“Kara kara karul” mi diras. Ĉar kriego trapikis mian koron. “Kara kara. Jam stas farite. Nenju denove tuŝos vin.”

Sinjor Camlet bandaĝis lin ka m lavis al li vizaĝon per fridakvo ka donis al li pli da brando.

“Ne profunda vundo” diras Sinjor Camlet. “Tamen ni preske tro tardis.”

“Ni n povis n alveni ĝustatempe” mi diras. “Mi stas li’anĝel hodie.”

Ka tuj verda kampo sore naĝis taŭ mi ka m plentutsvenis. Kiam mi rekonsci’ĝis mi vidis Gideonon ka Jancison sidantajn apud mi sur herbaĵo k aliaj homoj jam foriris.

“Kie li stas?” mi diras.

“Kiu? Teksisto?” diras Jancis. “On bone prizorgas lin. Oni rekondukis lin al Lullingford ka Srin Callard restos ĉe li.”

“Ŝi bone ĝojas pro nana taŭro” diris Gideon.

“Vi savis vivon de tivre Pru tutsendube. Mi nenjam taŭe vidis ion tian. Ni ĝuste tiam eniris kampon ka m transrigardis ka vidis vin. ‘Jadi!’ mi diris. Ka nur tion mi diris. Mi kuris ka Jancis kuris sed vi jam mortigis hundaĉon tal n’atingis vin. Vi meritas medalon Pru!”

“Vi n povas rajdi hajmon Pru. Ĉu m kuru ka petu al Muelisto kunpreni ŝin Sarn? Ka ĉu m ne revenu kun vi por helpi ŝin undu tagojn?”

“Jes ja petu al Muelisto. Ti stas bona pens. Sed rilate revenon—vi bone scias ke v nun stas melkistin de Grible por tri jaroj.”

“Mi n volis. Vi ka Pejtro devigis min.”

“Nu sed vi vidis domon ĉu n? Vi laboros por ti ka ĉasbal k arĝentaĵoj.”

“Ja’s. Mi vidis domon ka m opinias ĝin senluma amara malnova loĝej malgraŭe ke ĝ estas nova ka m preferus maltrafi ĉasbalon ol vivi kiel kontraŭvola sklavo.”

Ŝi ploris sed Gideon plenmalatentis ŝiajn larmojn.

“Vi devas iri al Grimbleoj ka v devas ĝustatempe iri al ĉasbal do kial tiom klangadi⁵⁹?”

“Sed kial mi devas Sarn?”

“Ĉar mi fikse decidis.”

Estis preske kvaz li dirus “Ĉar m estas en piedpiloril.” Kvaze li’amin vokus lin majtagfestadi sed piede ka mane li stis fikse ligita.

Post ŝia forir on donis al mi manĝeton en *Kruĉo da Cidro* ĉar m ancor tremadis ka poste Muelisto helpis min en kaleŝon k olda ĉeval kiu iam konis gajan sonon de bruanta korn ka subitajn lumon ka konfuzon ĉe paghaltejoj por forrapidegi libere apen trotis. Ĉar vere li ŝajnis samopini’ kun Srin Muelisto kvaz estis tutegale ĉu aŭ n l’iam revidos hajmon. Srin Muelisto diris nenjon ka Muelisto kiel kutime anke nenjon ka Polly dormis. Nelge Srin Miller ka Tim anke dormiĝis. Ni pluveturis senĝoje en frida nokto.

⁵⁹ Bruaĉi kvazaŭ rompita sonorilo.

Krepuskiĝis poste senlumiĝis. Gideon stis longdistance taŭ ni ĉar Bendigo forte trotis kvankam olda. Muelpone ligita al maltaŭ' de kaleŝo trotsonis morne.

Plaĉis min kvieto ka malankoli' ĉar anke mi stis morna ka kvieta. Mi'amat estis vundita ka m ne povis ĝisiri lin. Li kuŝadis malforta kiel bebo ka ĉe'stis nur Srin Callard por flegi lin. Mi forgesis ke ŝ havis ses infanojn ka tutbone sci's flegi senhelpulojn ĉar amantoj ĉiam kutimas kredi ke nenju alia povas konsoli ka helpi sian amaton krom i mem. K estas iom da ver en tikredo eble pl'ol nur iom. N'iradis senĉese tra kampar nek monta nek ebena dum nokto nek nigra nek lumeta sentante nin nek gajaj nek b'daŭremaj. Mi meditis ke ni similas homojn kiuj celas lokon preter mondo kiu stas nek Infer nek Ĉiel. Niaj ses kapoj inkluzive tiun de ĉeval ĉiuj bul-balanciĝis ka m kredas ke ni ĉiuj dormadis eĉ olda diliĝenc-ĉeval kiam Muelisto parolis dum sia dormado m ja kredas.

“M abomenas in” li diris per kapmov indikante siajn edzinon k infanojn. “Prefere i stu katidetoj dronigeblaj en muelejlageto. Prefere tuta mond estu katideto.”

Nenjon pli li diris. Estis smile al kiam on deklamas Kredkonfeson solene ka senritme. Nur tion muelisto diris al mi ka m ja kredas ke l diris ĝin dum dormado. Taŭen n'iris ĝis n'atingis senluman muelejon kie silenta akvo kuŝis kiel mola nigra krep. Aliaj eliris ka malligis poneon ka Muelisto reveturigis min al Sarn. Nokt estis plena d odor d akvo ka musko kun fojfoja primolodor. Mi pensis pri dom de teksisto dom kiu ŝajnis konstruita laŭ sorĉado ka pri li kuŝanta en kuirej apud teksil kiu pro skirplampo ĵetis barilsmilan ombron sur lian vizaĝon lia harar taŭzita ka malseka pro dolorŝvito.

“Se Srin Callard parolus malmilde al li mi povus frapi ŝian bebeton” mi pensis. Sed mi sci'is ke ŝ ne farus tion. Ŝ estis bonulin eĉ kvankam laŭ mi'opini ŝ havis menson smilan al konko kava por nur e'i alies vortojn.

Kiam n'alvenis hajmon jen Patrin tre konsternita sur sojlo. Ŝi diris kion diris nenju alia ka pri ki mi mem ne pripensis.

“V eble mortigiĝus Pru.”

Ŝi sidiĝis ka komencis plori ka m devis ridi je ŝ ka postuli manĝajeton por montri ke m ja vere plu vivas. Sekve ŝ preparis

tian manĝon kian m ankor nenjam tiom ĝuis kvankam ŝi normale dormus jam de multaj horoj. Ŝajne Gideon jam raportis ion al ŝi sed ŝi postulis sc'i pli. Ŝi n estis kontentigebla ka konstante volis pli. Ŝi surmetis okulvitrojn ka tre atente rigardis min sidante en granda kverka seĝo. Mi vere konsterniĝis pro ŝia rigardado simila al tide kovanta birdin kiam on venas por kaŝe vidi ŝin ka ŝ tutne palpebrumas nek kuntiriĝas sed nur rigardas per vieglaj brunaj okuloj kvaz dirante “Mi gardos mian posedajon.” Ŝajnis ke Patrin preterrigardis min ka vidis iaĵon minacantan min. Eble mian Sorton kiel ŝ imagis ĝin. Mi certis ke temis pr'iaĵo minacanta min ĉar nelge Patrin aspektis tre defia ka sidiĝis rektege ka diris —

“Ni ja venigos teksiston.”

Tute kvaz iu malpermesis ke ŝ venigu lin.

Ŝi nuldiris pri mia rakonto tutnenjun akuzon ke m stulte ka malmodeste agis kiam mi savis vivon de nekonata junul sen ies ajn permes. Ŝi nur daŭrigis etajn kapjesojn fojfojajn ka ripetadis —

“Ja's. En somer ni venigos Teksiston.”

Poste ŝ diris ke nun ŝ enlitiĝos ka m iris skribi en mia kajer.

Neniu ŝanĝ okazis en niaj vivoj kvankam estis men viegle sen dimanĉaj vizitoj de Jancis. Ŝtendom ŝajnis tre soleca pro ŝia manko ka Srin Beguildy stis nur duone tia kia taŭe. Ŝi ŝajnis kroĉi sin al mi ka konstante paroladis pri kutimetoj ka diroj de Jancis kvaz ŝi jam mortis. Ti multe kolerigis Beguildyn ĉar verdire li b'daŭris ke Jancis forestas ne nur pro juna skvir sed pro ke malgre sia mallerta manier ŝi faris vere multan laboron. Li diradis “Ĉit virin. Bubin revenos tutbalde kun dudek pundoj enmane mi ja kredas. Do n estu parolanta pri ŝ kvaz ŝi mortis vi stultulin! Tia ludema viegla junulin! Ŝi multajn orajn pundojn metos en niajn poŝojn kiam ŝi lernis sian devon ka ĉesos sopiregi je vir naskita sub tripenca planedo ka kiu finfine dronos. Mi n celas ofendi vin Pru ka m esperas ke v n ofendiĝas. Vi plugis uleksejon ja netbele Pru ka hodie ni pritraktos kvar-sinabajn⁶⁰ vortojn se v deziras.”

Nu ja stas sendube ke Beguildy stis tre stranga oldul. Mi kutimis pensi ke se l stus bonedukita l eble povus esti un el tifamuloj kiujn ni tiom alte taksas. Grava klerul l eble stus aŭ

⁶⁰ Silabajn.

muzikul aŭ rimist aŭ predikisto. K eble se l plenĝuste uzus sian menson li n okazigus sian ruiniĝon ki ja okazis. A°! Ka ne nur sian. Sed ni n povas sc'i. Verdire ni stas pupoj de Li kiu konstruis nin. Li prenas nin el skatol kelkfoje ka diras "Nun dancu!" aŭ eble ĝi devas riverenci aŭ svingi manon aŭ svenfali. Poste Li remetas ĝin en skatolon ĉar rol finiĝis. Eble temas pri Festag aŭ Kristnaska dram aŭ Paska teatraĵ aŭ tragedi. Stas laŭ Lia bontrovo. Li verkas teatraĵon. Sekve mavaj marionetoj plenumas Lian volon tutsame kiel bonaj ĉar ĉiu aktoras destinitan rolon. Ki okazus se dram atingus momenton kiam fiul devas agi mave sed jen! li surgenuas preĝante. Tiam dram vere ruiniĝus. Iam ekzistis pupo nomata Judas ka se l pro tim rifuzus plenumi sian difinitan rolon nenju el ni stus savita⁶¹. Ĉiĉio stas tre stranga mister ka tia ni devas lasi ĝin. Sed ĉar estas tiel mi kredas ke n'agas malĝuste se tre severe ni kulpigas mavfarantojn. Terura sort atendas tihomon kiu devas agi fripone ka malbenite ĉar certe nenju laŭvole agus tiel. "Estas necese ke venu faliloj". Kiel Gabriel elmontrus sian lertecon per duklinga glavo se Lucifer rifuzus batali? "Sed ve al tihom per kiu falil venas." A°! Do se dram enhavas murdon aŭ se bona junulin estas hontigata pup estas trovenda por fari malican laboron kvankam verŝajne se ĝ rajtus malakcepti ĉiu elektito dirus "Ne mi Mestro!" Sed i tutne scias. Laŭ mi'opini ni n multe diferencas de sovaĝaj bestoj kiuj planas mortigajn malutilojn en siaj senlumaj mensoj sciante nenjon disverŝas sangon embuske sursaltas sian predon kun son de krioj en nokto tamen egale senkulpe kiel bebo. Ka m kredas ke ni n multe diferencas de tempestoj kiuj freneziĝas en arbaroj k avara fajr kiu ellekas vivojn dum un momento ka lipoj d akvo kiu ensuĉas niajn parencojn. Ĉi' stas parto de dram. Sed se por ni stas destinita gajagrabra rol ni nepre stu dankemaj glorante ka helpante al men bonsortaj k eĉ estante dankemaj al

⁶¹ Laŭ la Biblio, Judas perfidis Jesuon al la Romia registaro de Palestino, sciigante kie Jesuo troviĝas, por ke la Romia armeo povu kapti kaj krucumi lin. Laŭ unu kristana teologia vidpunkto, Judas plenumis la volon de Dio, ĉar nur pro tiu perfido Jesuo estis ekzekutebla. Se Jesuo ne estus ekzekutita, li ne povus supernature nuligi la pekojn de la homoj kiuj kredas je li. Sekve, Judas estis speciale elektita de Dio por plenumi Lian volon, eĉ kvankam pro sia ago Judas kondamniĝis al Infero.

tikompatinda pupo kiu iras ti'n ka re'n tage ka nokte por detrui nin. Ĉar roloj povus est'inversaj.

Tial malgre ĉi' mi ĉiam kompatis Beguildyn kvankam verdire li stis fikanajl en nia rakonto.

Ni havis nur neabundan rikolton tisomere ka de herbaĵoj ka de grenoj. Niaj vivoj daŭris laŭ sia kutima melodi sen ŝanĝo krom ke Patrino ja plenumis sian promeson ka venigis Kesteron.

Mi rimarkis ke ŝi estis tr'okupata tijunion ŝpinante tr'energie ĝis eĉ Gideon laŭdis ŝin. K un tagon ŝi diris—

“Tioma mult estas ŝpinita ke m devos venigi Teksiston.”

Sed mi decidiĝis ne renkonti lin do tagon de li'alven ĉirke fin de pajlrikolto mi prenis hokegon ka tondadis heĝojn en foraj kampoj kie nenju trovos min.

“Mi heĝondados Patrino” mi diras. “Mi kunportos iom da pan ka fromaĝo. Bonvolu zorgi pri junaj meleagroj ka diru al Gideon ke l devos melki ĉar mi n revenos taŭ mallum.

Do kion ŝi faris? Ŝi komencis tordi manojn ka diradi apen aŭdeble—

“Ho vee vee havi tian malbenon.”

Tamen m iris. Ka kiam mi hajmon revenis jen en mia mansardo eroj de lan ka faden kiujn li lasis ka tr'agrabla odor de 'bako. Ĉar li ĝuis iom fumadi dum labor. Ka tuj apud angul de teksil kion mi trovis? Bluan-blankan naztukon kiun mi tre malhoneste metis en mian ŝrankon ka enŝlosis ĝin kun granda kontento. Mi diris al mi iom figaje k'iam mi lavos ĝin ka rulpakos kun iom da lavendo ka resendos ĝin. Sed ancor ne.

Patrino estis plena de rakontoj pri teksisto. Ho li stas bonkora ka forta ka komplezema! Mi pensis mi mem povus sci'gi tion al ŝi. Kvaz fil ŝi diris. Mi nur vidu lin sidanta sur kanapo ka trinkanta teon. “Sendube” mi pensis “ka m perdus mian koron eĉ pl'ol taŭ!”

“Volis sc'i ĉu m havas pliajn infanojn krom Sarnon” ŝi diris. “Do m diris al li.”

“Ho Patrino kion vi diris al li?” Mi diris.

“Mi diris ke m havas plej bonan knabinon en mondo komplezeman filinon ka tre delikatan ka sveltan kun longa ĝisgenua harplekto ka malhelaj molkorigaj okuloj ka tr'agrablaj manieroj gaja petolema ka kompatema. Ja's! Mi sci'gis lin!

Tutveron jes ja! Ka m diris ke v scipovas altan ka malaltan manskribojn ka ke Beguildy lernigas vin legi ka ke v povas legi eĉ kvarsinabajn vortojn nun.”

“Kara Patrin” mi diris “kian rakonton v elpensis!”

“Nenjan elpensajon karulin ĉar jen ver.”

“Ĉu vi diris ion pri leteroj de Gideon? Ĉu v diris ke mi skribas in?”

“Nu ne karulin. Eble Sarn ne volus nek Jancis nek vi.”

“Ne. Patrin v estas tre saĝa.”

“Oni ĉiam diris en mia famili ke stas tiel karulin.”

“Do Teksisto kredas nin tre klera famili mi n dubas ka l sen dubo kredos ke Gideon skribas leterojn.”

Poste dum mi helpis ŝin enlitiĝi mi kuraĝis diri—

“Ĉu vi diris al Teksisto ke m estas leporfrapita?”

“Ne ne mia kara! Pro ki mi tiel agus?”

“Nu l eble iom pripensas min pro ke v diris tiaĵojn sed s iam li renkontos min—”

“Nu karulin se l renkontos vin ka l stas kia mi taksas lin vi certe multe plaĉos al li.”

Post kiam m ordigis kovrilojn ŝi kaptis mian manon.

“Pru ĉu gravus al vi se l havus nur un kruron aŭ un brakon aŭ stus variolmakulita?”

“Ĉu gravus al mi Patrin?” mi tuj elkri’s senpripense “kompreneble ne gravus. M amus lin eĉ pli pro ti.”

“Mi sci’s tion karulin” diris Patrin tre kontente. “Mi sci’s ke v amas tiviron. Ka m ja vere ĝojas pro ti. Nu ja ne kaŝu vin de l Pru. Stu kuraĝoplana ka risku ĉion kiel bona ludanto de Multekostaj Koloroj.”

“Ne ne! Nenjam! Ho Patrin vi estis kruela tiel ruzeme kaptante min!”

“Mi nur deziris sci’i Pru. Mi fariĝas antikva k olda ka proksimiĝas tempo kiam viv estos peza ŝarĝo. Mi volonte scius ke bon atendas plej karan filinon iam naskitan.”

Ŝi rigardis foren tra nanan lumplenan fenestron kies vitron nelumaj rondaj makulaĵoj kiuj stis rozoj alpremis k arĝenta ĉiel’ estis senbrila ka sen steloj sed amemaspekta ka ŝajne ŝ aŭskultis iajon. Ŝi diris—

“Mi ja kredas ke ĉi’ bonos por vi Pru. Venis en mian koron senaverte kiel ros ka dolĉe kiel ruĝa roz ke v ricevos amon ka n nur donos ĝin. Post miaj tagoj tamen post miaj tagoj. Sed ne gravas se m scias ke ĝ vere okazos.”

Mi sentis iom da strangeĉ en nokto.

“Ki stas al vi karulin?” mi demandis ŝin. “Ĉu vi taŭvidas estonton?”

“Ne. Mi vidas nenjon. Sed mi sentas ĝin en mi.”

“Ĉu v sanas Patrin?” Mi diris ĉar mi timis k’eble ŝ forglitas de mi ĉar ĉiam faras tion mortantoj.

Sed ŝi diris ke jes ŝi ĝuas sian ĉiutagan farton ka sanas ka n mortos ĝis post multe da tempo sed ŝin trafis pens kiam ŝi memoris Teksiston kiu diris —

“Nu fraŭlo m estas ka fraŭlo mi restos laŭ mia kredo. Sed s iam mi pensos pri edziĝpeto temos pri ti’ulino.”

Je fin de grenrikolto Gideon petis ke m skribu lian duan leteron al Jancis.

Ni vespermanĝis sur benk apud fenestro de laktej. Poste m alportis inkon ka diris kion mi skribu? Li diris ke m skribu ke l stas sana k esperas k’anke ŝ ka ke ŝ stu bonkondata ka forte laboru ka n petu taŭtempan monon por vestoj aŭ botoj sed pripensu stontecon ka n’havas negrandan rikolton ka ŝia patro plu samopinias pri juna skvir kiu revenos de Nederlando venontan jaron kun poŝoj plenaj de mon ka granda longakorna bovin naskis sed senatente samkiel on anticipus ka ŝ diru al Sinjor Grimble ke l volonte ricevos kelkajn ŝafidojn kiam li venigos in de montoj taŭ vintro sed se vidiĝos simptomoj de piedputro i hajmon iros jam tuj ka do nenjon pli de G. Sarn.

Poste li diris “Enmetu ke m vidos ŝin ĉe Kristnaska bazar se Grimbleoj kunportos ŝin.”

Mi diris ke m faros mian plejeblon ka ĉu gravas se m enmetos iom pli? Ka m devis ridi ĉar ĝi ja ŝajnis stranga leter de vir al li’amatin. Ka Gideon sorrigardis abrupte ka demandis kial mi volas skrib’ion pli? Do m diris ke plum kelkfoje volas mem skribadi ka l diris ke l spozas ke n estas facile se’i ĝuste kion on faras kiam on komencas skribi ka ke Di lin protektu de tia stultaĵo ka se nur m enmetos ĉion diritan de l mi rajtos aldon’iom se m volos.

Do m skribis ĝin.

SARN

26 septembro

MIA KARA AMATIN

Ja vere ŝajnas longa temp ekde via leter kiu stis tre ĉarma ka m kisis ĝin multajn fojojn. Vi bone scias verki amleteron. Mi povas vidi vin ambaj dum skribado viajn orajn harojn brilantajn ka Tekstiston iomete ridetantan ka videble tre amuzatan ka kun okuloj kiuj povas log'iun ajn knabinon de ŝia propra vir k atentu ke v n enamiĝu en iun krom min s eble. Eble ke m vidos vin ĉe Kristnaska Bazar. Diru al Teksisto ke ĉiuj rakontoj de Patrin pri nia Pru stas fabeloj ĉar ŝi stas ĉiumaniere or'nara. Diru al Sr Grimble ke m volonte havus kelkajn ŝafidojn. Diru al Teksisto ke kiam li preterpasos domon de Huglet plejbone stus ke l portu pafilon ĉar Huglet nun havas teruran hundon ka m esperas ke ĉi' stas en ord inter Teksisto ka Grimble. S iam Teksisto volos iom da kudrado ĉar li stas sola ka senvirina vir mi havas du virinojn en hajm Patrinon ka fratinton kiuj ambaj bonvenigas taskon justaprezan ka peklitan brasikon ruĝan ka prunkonfitaĵon i ja faras k i bone profitas vendante je duon de kutima prez k estas bonfareme tiel utilig'in. Rikolt estas negranda longakorna bovin naskis n'anticipas ke juna Camperdine revenos hajmon venontjare ka s i havos simptomojn de piedputro i hajmon iros jam tuj ka do ĝis reskribo ka nepre zorgu pri vi mem. Komence de fridum englutu fajrvarmegajn citronon ka premitan mielĉelaron ka v estas mia plej plej karamata al kiu mi volonte dediĉos vivon kiam ajn ka mortus por vi pro hundomord aŭ iu alia kaŭz ka nun bonan nokton de vi'amanto

GIDEON SARN

Ti stas bela teksto "La Mestro ĉe'stas."

Ofte mi demandis min dum daŭro d aŭtun ka fridaj noktoj kion i opini's pri mia leter. Ni sci's k'i ja ricevis ĝin ĉar un bazartagon Gideon revenis kun ŝafidoj kiujn Grimble metis en enfermejon por li ĉe *Kruĉo da Cidro* k i stis bonstataj sen piedputro. Sed alproksimiĝis Kristnasko kiam venis leter de Jancis ka m

memoras ke stis sovaĝa nokto ka pluvo frapegis fenestron dum mi legis ĝin al Gideon. Sed intern'estis varme. Ĝi donis al mi gajan Kristnaskon malgre laborado ka kvankam Patrino forte malsanis ka tial ni devis venigi el fora Silverton helpiston de kuracisto ĉar Gideon rifuzis venigi kuraciston mem dirante ke'lspez por eĉ helpkuracist estas grandega. Li grumbladis ka diris ke ŝ estas ŝarĝo ka Patrino ofte demandis al mi "Ĉu Sarno opinias min ŝarĝo?" Tial m estis en malfacila situaci. Sed tileter stis kontentiga kiel pelvo da bona varma supo ka pro tim ke Gideon metus ĝin inter siajn proprajn posedaĵojn mi faris kopion ka jen ĝi.

ALTA BIENO, OUTRACK

1 decembro

MIA PLEJKARA KONATO—

Mi pensas pri Sarno dum mi skribas ka pri plej bona el amantoj. Sinjoro Woodseaves multe bonvenigos kudradon ka peklaĵon prunkonservaĵon kiujn Sarno tiel bonkore menci's. Ebl' iun tagon parolos al via fratino pr'i. Sinjoro Woodseaves diras ke ti nepre stas plej efika kuracilo por tusado ka l uzis ĝin un nebuloplenan nokton post kiam li revenis al Lullingford de tie-ĉi sed l opinias ke nur virino povus ĝuste prepari ĝin. Domaĝe pri rikolto ka bovido sed ne ĝenu vin pri hundo de Huglet ĉar li timas nenjun hundon nek Hugleton mem. Sed ti verdir'estis preske trafo ĉe Bovludo ka tre kuraĝa virino kiu tiel enkuregis por savi povrulon. Ĉar Sinjoro Woodseaves aŭdis ke virino faris tion alta svelta virino kun belaj malhelaj okuloj laŭdire. Mi ne diskutus tion kiel vi scias Sarno. Sed aliaj certe rakontas. Teksisto diras ke se l'iam havus kunulinon li preferus tiaspecan virinon. Ka nun bonan nokton ka gajan Kristnaskon de

JANCIS BEGUILDY

Mi jam amas vin ka s on tiel agas dum sekas ligno kiel on agos kiam ĝi verdos?

Ĉapitro 4: Jancis forkuras

Denove stis taŭkristnaska tag un jaron k ok monatojn post kiam Kester ĉesigis taŭroludon. Ne venis leteroj de Jancis jam de longa tempo sed Gideon nenjam ĝenis sin pri tiaj aferoj. Li diris ke stas nur pro veter ĉar vojoj stas tiel kotplenaj en region de Grimblea bien ke nenju povus atingi ĝin en mava veter. On iris al bazar malofte dum vintro sed taŭe provizis sin per b'zonaĵoj ka Sinjor Grimble sendis dek ĉarojn da gren al muelil por mueliĝo ka post ti on trankvilis bien ka du dometoj de laboristoj kun ĉevaloj en staloj bovar en apuda paŝteĵ ka ŝafoj en furaĝbetaj kampoj proksimaj tutkomfortaj por tuta vintro. On kutimis teni multajn kuracherbojn ka sanigaĵojn ĉe tiaj bienoj ĉar nenju apotekist aŭ kuracisto povus atingi lokon ĉar vojoj stis nedireble aĉaj ĉiam tiel estis.

“Woodseaves ne povas iri ti'n ka Jancis ne povas sendi leteron al Lullingford sed kiam venos iom da bona veter ni ricevos leteron” diris Gideon.

M ofte pensis pri Jancis enfermita kun Srin Grimble virin kiun m abomenis kiel anke Jancis. Mi pensis pri altaj montoj ka grajlŝtormoj smilantaj al glacia mur inter ŝi ka n'ka neĝo dika ka mola flustrade flustradanta.

“Ĝi ĉirkas ka ĉirkas domon ka lasas blankan ganton sur fenestro.”

Tion on diris pri neĝo ĉe Sarn.

Stis du filoj kompreneble por viegligi vivon sed un el i edziĝos kun filin de laboristo k alia stis tre religiema ka n aprobis iaspecajn majludojn nek plezuriĝon nek eĉ multajn ridadon ka paroladon. Do restis por ŝi nur Srin Grimble kiu stis postulema ka kritikema ka Sinjor Grimble kiu stis tre nekompleza dum frida veter pro reŭmamismo. Mi tr'ofte pensis pri ŝi. Ĉar kiam on pensis pr'iu ĉe Sarn on pensis pri tiu ofte pro silenta kvieto precipe dum vintro ka manko de marŝado de tempo tiel ŝajnis.

Ka kiam ajn mi pensis pri Jancis m enmensigis ion viditan iam en juni kiam ni havis strangan nekutiman veteron ka multe da tempesto ka grajl kiu un tagon dum proksimume hor fariĝis neĝo. Ka m vidis sovaĝajn rozojn tre delikatajn ka sentemajn kiuj nenjam spertis fridon pli grandan ol tide ros kun palruĝetaj petaloj plenaj de neĝo ka ŝajne plene frostiĝintaj eĉ en oraj koroj. Mi ĉiam pensis ŝin tia ĉar m amis ŝin k al mi ŝ ŝajnis infan kvankam ŝ estis pl'aĝa ol mi. Eĉ kvankam ŝi memorigis min ke ŝ estis bela ka mi malbela m amis ŝin des pli kiam ŝi s'feris ĉar nenjam m amas homojn tiom kiam sorto ridetas al i. Do m volonte sendus al ŝ iaĵon je Kristnask eĉ se nur orlitan tukon el simpla linaĵo. Mi petis al Gideon ke l demandu pri ŝ ĉe Kester kiam l'iris al bazar sed Kester estis for ka dom fermita. Ti stis malagrabla informo ĉar plaĉis al mi pens ke l stas ĉe sia propra fajrej en dometo kiun mi vidis. Ŝajnis ke l pli proksimas kiam tiel stas. Sed li kutimis foriri por resti dum tuta monato en iu vilaĝo por plenspinadi tie ka tiel ne b'zoni plurfoje veturi tien.

Ĉiam estis tre kviete en nia kuirej. Patrin estis enlite ĉar ŝi nun ĉiam estis enlite dum malmilda veter ka Gideon estis en arbar por havigi julŝtipon. Ĉar negrave ki ajn alia mankis al ni ĉition ni ĉiam havis ĉar por havigi ĝin kost estis nur labor ka Gideon nenjam domaĉis tion kompatinda junul. M iris al pordo por aŭdi ĉu l finis haki ka m povis aŭdi firmsonadon de lia hakil ka ĝian e' on el translage. Arboj stis kvaz en montetoj da neĝo ka lago frostigita ĝis preske sia centro. Arboj blankaj kiel suker staris ĉirkaŭ akvo tiel senmove kvaz ensorĉitaj kiel homoj en tradicia ferakonto starante en faskegoj ka garbegoj el neĝo. K aer estis tutsenmova. On ne povis enmemorigi someron. On ne povis imagi liliojn sur lag k ondetojn. Mi detenis spiradon por ĝui silenton ĝis ruĝtringo vokis de fora ekstrem de lag apud kirko tre morne kun son "Mut! Mut!". Iu anas' transflugis senlumiĝantan ĉielon ka m aŭdis Patrinon tuseti do m sci's ke ŝ balde volos sian vespermanĝon. Son de hakil jam ĉesis do Gideon balde venos ka m komencis prepari manĝon.

Mi bakadis ka tion mi multe ĝuis. Plejparte mi faris laboron de viroj ka kontraste bakadon mi sentis malpeza k agrabla. Mi plezuris vidante paston leviĝadi taŭ granda ruĝa fajr ka pretigante fornon per brulanta ligno poste elrastante cindrojn ka

metante bulojn laŭ vicoj. Stis agrabl'esti en varma ardet-luma kuirej plena de plaĉodor de pan ka rigardi eksteren al griz-blankaj kampoj k arboj fridaj ka solecaj ka poste tiri kurtenon ka bruligi junkklampon pretigante manĝilojn sur tablo ka metante terpopasteĉon sur ardantajn cindrojn por varmigi ĝin ka sciante ke nelge ĉiuj miaj amatoj stos komforte pretaj por nokto. Kortobirdoj stis enfermitaj je krepuskiĝo bovinoj ka ŝafoj stis en gregej Bendig en stal Katinj apudkamene Patrin kun iom da fajr en sia ĉambro ka varmigil en lito ka nun Gideon hajmen venas por vespermanĝo. Ĉar forn estis ancor varmega m enmetis aron da tortetoj el spicitaj frukteroj ĉar al Gideon plaĉis iom da frandaĵo samkiel al ĉiu alia kvankam li fojfoje grumblis ka parolis pri ruiniĝo ka kie stos nia dom k arĝentaĵoj kotope. Sed kvankam m obeis lin tutjare kun nur paneto ka fromaĝo ka terpo por manĝi en Kristnaska sezon mi sekvis mian propran vojon ka n'ĝue gajis preske kiel aliaj homoj. Ka nun poste post ĉi'okazinta mi ĝojas pro timalobeet al Gideon pl'ol pr'io alia en nia tiama vivo. Ĉar mi povas diri "Malgraŭ ĉi' tion i havis ne gravas ki alia mankis."

Mi softe kantadis al mi ka paroladis al Katinjo kiu stis preske tro komforta por ronroni sed kiam mi parolis ŝi duonlevis sin k arkigis dorson tre ĝentile ka apertis buŝon por miaŭi ka poste montris sin tro ĝisoste malema elspezi energion por eligi eĉ sonon. Sed ŝi rigardis min kvaz volante diri "Mi scias ke v pretigis ĉitium agrablan fajron por varmigi min Srin ka m scias ke v havas iaĵon por mi en ŝranko k elkoran dankon."

Subite okazis nelaŭta frapeto sur pordon. Apen aŭdebla ka tiom timema ĝi povus esti de povra rubekol frapetanta per beko. Un tia birdo dum mavega veter kutimis alveni ka se m tro lantis manĝigi ĝin ĝi surfrapis fenestron. Jen stis tutmallume. M iris al pordo ka ĉar jam stis senlume ka nenjam on vizitis nin mi konfesas ke m pensis pri fantomoj ka feoj ka koboldoj ka ĉiaj strangaĵoj d antikva epoko.

M apertis ĝin.

Jen taŭ fon de blanka senĝojiga ebenaĵo de frostita lago tutveaspekta ka pala en fajrolum staris Jancis.

Tuj kiam m entiris ŝin ŝi falfalis sur plankon. Povra knabin! Nenjam mi vidis tian mizerulon. Ŝiaj vestaĵoj stis tuttraŝiritaj

botoj rompitaĵoj manoj ka vizaĝo gratvunditaĵoj kvaz ŝi trapasis dornheĝojn—mi sci'ĝis poste k'efektive ŝ ja faris tion—ka ĉi' malsekege gutanta kvaz on tiris ŝin el lago. Ŝi tutsvenis ka m streĉe klopodis revivigi ŝin. Kiam ŝi konsci'ĝis ŝi diris ke ŝ ne manĝis jam dum preske du tagoj ka ke ŝ piediris tutan distancon de Grimblej en ĉitia veter.

Pensu pri ti! Kurte dirite stas ke ŝ forkuris ka ŝ havis nek monon nek fortikajn botojn ka ŝ devis kaŝe foriri kiam eble ki hazarde okazis kiam ŝi n havis sian ŝalon.

Ŝi longe ploradis.

“Ho mi n povis elteni Pru! Ho kara Pru ne riproĉu min! Stis plenmaltolereble. Ka kiam proksimiĝis Kristnasko ka n venis informoj k i ĉiuj stis dekoble pli malagrablaj pro fiaĉa veter ho! mi *tutne* povis ĝin toleri. Ka knabin ĉe dometo diris k'anke taŭaj du melkistinoj forkuris. Ŝi diris kial anke mi n forkuras? Iome ŝ diris tion ĉar ŝi kompatis min k iome ĉar Alf Grimble ŝia fianĉe interesiĝas pri mi. Do ŝ informis min pri plej bona tempo por forkuri ka deturnis ĉies atenton dum mia forir ka ŝ donis al m'iom da pan ka viando ka botelon da lakto ka promesis pretekst'ion por deteni sekvadon.”

Ŝi paŭzetis por spiri k aŭdiĝis el ekstere son de ĉarradoj de Gideon kiuj knaradis en neĝo.

“Kiel vi diros al Gideon?” mi demandis ŝin.

“Ho ne permesu lin koleri min Pru. Ne permesu. Mi n povas toleri pli. Mi rakontos al vi ĉiujn miajn spertojn ka v komprenos ke mi n povas.”

Gideon venis al pordo trenante gigantan ŝtipon julŝtipon per ĉen.

“Ne forigu min Pru. Kion ajn li diros ka kiom ajn li koleros ĉar mi perdis laboron pri kiu l decidis tamen lasu min tranokti ĉitie!”

Do m diris ĉu ŝ opinias k'iu hom povus devigi min iam elpordigi ŝin ka precipe en tia veter? Mi kuŝigis ŝin sur kanapon ka diris ke ŝ ripozu nun ka poste ŝ iomete manĝos k enlitiĝos ka ĉiuj ŝiaj s'feroj jam forpasis. Ŝi ridetis ka flustris—

“M amas cin Pru! Por mi v estas kiel Savinto ĉinokte” ka tiel ŝ endormiĝis.

Ofte kiam mi pripensas postajn eventojn mi ja vere ĝojas pro tirideto ka tiflusto.

Ho kiom Gideon furiozis!

“Ja ŝz perdos tutan monsumon” li diris jam dum unua minuto “ka ŝ perdos ne nur laborpagon por venontaj jar ka kvar monatoj sed ŝi perdos pagon por jar k ok monatoj kiujn ŝi pasigis tie. S on rompas kontrakton on ricevas nenjon. Vi scias tion tiel bone kiel mi.”

Mi demandis kiel li povas pripensi monon kiam ŝi ĵus venis tia al nia pordo mizerega ka duonmorta.

“Vi de ĉiam stas stultul Pru” li diras “ka m spozas ke v ĉiam estos.”

Sed mia pacienc tutelĉerpiĝis ka m sentime parolis al Gideon.

“Mi dankos ke v bremsu vian langon ĉivesperon Gideon! Jen Kristnasko ka Jancis ven’s al vi el brakoj de morto preske. Ĉar ŝi nur malfacile ne mortis. Se ŝ redevojiĝus tiel tarde ŝ certe perdus vivon. Ka ĉar m ŝirmas ŝin ka ŝ uzos mian liton ka m dorlotis ŝin por vi ĉar ŝ estas via kara konatin vi humilu al mi ka dankemu al mi k al tiuj Supre pro saviĝo de povra knabin.”

“Jadi! Kia meger eken un minuto!” diras li. L’iomete ridis konsternite ĉar mi n kutimis paroli tiel. Poste li stamfiris en kuirejon.

“Nu!” li diras tre laŭte ĉar li n kutimis je malsanuloj ka l ĉiam ŝajne kredis in surdaj. Kiam Patrin malsanis li laŭte kri’s je ŝ kvankam Patrin tenis tre bone sian aŭdpovon.

“Bonan vesperon Sarn!” diras Jancis tre nana ka malforta.

“Do v revenis!”

“Ja’s.”

“Ka tiel rompis vian kontrakton.”

Ŝi komencis plori.

“Kion do? N faru tion!” li diris konfuzite. “Pru denove kontrelangos min se v ploros. Mi dev’s ne diri eĉ vorton ne ĉinokte. Iajo stos direnda morgo sed mi dev’s malĝeni vin ĉinokte. Nu kia via farto?”

Li staris en mezo de kuirej ka laŭtkri’s tion al ŝi tiel ke m ne povis ne ridi.

“Bona dankon Sarn” ŝi diras.

“Via stato n indikas ke v bone paŝtis ĉe Grimble. Ĉu v iam vidis junan Camperdinen?”

“Ne.”

“Ĉu vi havas konaton tie?”

“Ne Sarn. Vi estas mia konato por ĉiam eterne.”

“Ne Alf Grimble?”

“Ne. Sed l amoremis pri m iom ka ĝenadis min. Pro ti mi forkuris.”

Mi taŭe ne taksis Jancison tiel lerta. Sed laŭ mia kredo ĉiu virin stas lerta kiam ŝ amas. Ŝ aspektis ege pala kontre nigra kanapo.

“Mi forkuris ĉar vi stas unsola konato kiun mi deziras Sarn.”

“Do jen kial! Mi rompos al Alf kapon venontan bestar-bazon.”

“Ne! Ne faru ne faru!”

“Do v forkuris tiom da mejloj plus mejloj ĉar vi n deziris Alfon ka ĉar mi stas via kara konato?”

“Ja’s.”

“Kisu do knabin!”

Mi forkuris en laktejon tiam ka kun mi Katinjo ĉar ŝi ĉiam iom timtimis kiam Gideon ĉe’stis. Mi senkremigadis lakton preske senĉese ka jes m iom ploris sed pro ti kiu s’feris? Ĉar mi deziregis esti sur kanapo ka ke junul laŭte kriui al mi el mez de kuirej ka poste diru “Kisu do knabin!” Ka se v demandus kian junulon m elektus mi dirus ke lia jako kolorus kiel maja paŝtej ka ke l rigardus min per okuloj plenaj de potenco ka sc’i ĝis mi’anim tutrenversiĝus.

“Mi n povas havi mian deziraĵon Katinjo” mi diras. “Sed vi povas ĉar viaj deziraĵoj facile haviĝas.”

Ka m donis al ŝi grandan pladon da krem. Jes ja! Kion dirus Gideon se l sciis? Tamen li havis sian kremon en kuirej.

“Mi donas ĉition al vi Katinjo” mi diras “ĉar mi n povas havigi al mi propran kremon. Sed plitrankviligas min vid’iun kontenta.”

Ŝi timrigardis min kredante ke post minut on frapos ŝin ĉar donac estis tro bona por esti reala. Poste ŝ plenlekis ĝin.

Tiam m aŭdis Patrion alvoki.

“Nu v ja ĝuis almen tion Katinjo” mi diras. “Ka nun Patrin ĉu v volas iom da krem kun te?”

“Nu jes karulin. Mi ja multe ĝuas guton da krem en mia te. Sed kion diros Sarn?”

“Li mem lekadas propran kremon Patrin.”

“Kion?”

Patrin kredis ke m ŝercvolas.

“Nu kvaze. Jancis venis.”

“Jancis?”

“Ja’s. Forkuris.”

“Jadi!”

“Piediris tutan distancon.”

“Sed kial ŝi n iris hajmon?”

Ankor mi n pripensis tion. Ŝajnis laŭnature ke ŝ venis al ni kiel malsatega rubekol.

“Ŝi timas Beguildyn sendube Patrin.”

“A°. Vi devos iri sci’gi al Srin Beguildy.”

“Tagon post Kristnasko. Jancis ĝuu Kristnaskon.”

“Ĉu i kiel on diras iom kolombumas?”

“Ja’s. Li surpriziĝis ka l kisis ŝin tal pripensi.”

N’iom ridis.

“Ka nun via te Patrin! Fariĝas vere kristnaskasente. Ĉiuj havas kremon! Ka post vespermanĝo m ornamos domon per ileks.”

“Atentu k’anke vi havu iom da krem karulin.”

Dum mi sobis ŝtuparon en kuirejon kie par sidis tre malnovmode sur kanapo mi demandis min pri ki stus krem por mi ka dum m infuzis teon m eksci’s.

“Jancis” mi diris “vi devas skribi al Sinjor Woodseaves por diri ke v forkuris ĉar l eble strebos iri tien pli frue ol kutime por skribi por vi leteron.”

“Bone Pru ti stas vi’afer ĉar vi skribas ne mi. Sed li n reiros tien.”

“N iros? Pro kial?”

“Mi rakontos al vi ĉion morgatage. Mi tro lacas nun.”

“Bone” mi diris kvankam mi ja deziregis sci’gi pri li.

“Mi rakontos ĉinokte pri mia forkur” ŝi diris. Sed mi diris “Unue manĝo.”

“Altabliĝu nun ka manĝu ka trinku. Poste v povos ĉion rakonti al ni ka post ti mi skribos.”

Mi sci's ke rakontad estos bonefika por ŝ. Ĉar post malagrabra sperto raportad eligas dornon. Do ŝ rakontis ke ŝ planis atingi Lullingfordon en bazartago ka peti Gideonon hajmonveturigi ŝin. Sed ŝi perdis vojon inter montetoj kiuj aspektis tutsamaj pro neĝo ka misvagis tre foren ka nokto kaptis ŝin ka ŝ dormis en budo kiun on konstruas ek uleks dum ŝafnaska sezon ka dum nokto ŝ aŭdis spiradon el sub pordo ka kredis ke jen muĝanta taŭro de Bagbury sed ŝi trifoje alvokis Triunuon plejeble laŭte ka ĝ forkuris. Poste ŝ penege marŝis al Lullingford tra irante kampojn ĉar ŝi n povis trovi vojon. Ĉeval postkuris ŝin ki stis pli timiga ol muĝanta taŭro de Bagbury ka tiam ŝi rampis tra heĝon. Kiam ŝ atingis Lullingfordon Gideon jam foriris ĉar li ĉiam reiris plejeble frue. Ŝ iris al dom de Kester sed ĉar li forestis helpo tie n estis ricevebla. Ŝi timis peti al aliaj ĉar i eble resendus ŝin al Grimble do ŝ re'kmarŝis. Tamen nelge ŝ estis tiom svenema ke ŝ devis rampi en grenejon k atendi ĝis maten. Ka poste kiam ŝ atingis arbaron ŝi decidis uzi men longan irejon ka denove devojiĝis. Ti ja stis ne mirinda ĉar en arbaroj ĉirke Sarn rekta voj stis apen trovebla eĉ dum somer.

“Pro Di” diras Gideon “ŝajnas ke v b'zonas viron por protekti vin. Tian rakonton pri stultec ĝis nun mi nenjam aŭdis.”

“Ka kion diros Pejtro mi n povas imagi” ŝi daŭrigis. “Ne eblos deteni nek fortenti lin. Li stas tr'obstina nun ka s on opononas⁶² liajn planojn li furiozas. Se Patrino sciis ŝ eble trovus solvon.”

“Mi vizitos ŝin postmorge” mi diris. “Ne stas kredeble ke ni n sukcesos elpens'iaĵon por superi tian stultetan oldulon espereble ne ĉagrenas vin mi'esprimo.”

“Ĉagreni! Vi kiel eble plej aĉe parolu pri mia patro ka v tutsen dub ne povus troigi. Vere li ja stas stulta malgre sia lernad el libroj.”

“Trankviliĝu nun. N'elpensos iaĵon por doni al vi tempon por vin savi. Eble v povos trovi alian postenon. Aŭ eble Gideon—”

“Se v volas diri k'eble Gideon deziras nupton mi diras ke je ĝusta tempo ka n taŭe. Mi jam diris al Jancis ke se n'havos bonan rikolton ka n'profitos mi pretas edzinigi ŝin dum Rikolta Festo. K anke ŝ tion volas.”

⁶² Eĉ iomete oponas.

“Mi multeĝojas. Amo nenjam tro fruas. Ka s on amas knabinon on nepre volas ŝin endome ka ĉekamene ka ĉetable endome k ekstere.”

Mi pensadis pri eta dom apen dudek mejlojn for kiu plejeble diferencis de nia ka pri tiea tr’obstina fraŭlo kiu n volis virinon en sia dom certe ne povran Pru Sarnon. M opini’s ke venis ĝusta tempo por skribi leteron.

“Kion mi diru en via leter Jancis?”

Ŝi diris ke m skribu laŭ mia plaĉo. Do m alportis paperon k inkon ka mian plumon ka skribis ĝin.

SARN

Vesperon taŭ Kristnasko.

KARA SINJOR WOODSEAVES—

Mi skribas por informi vin ke m foriris de Srin Grimble kiu stas avara pri manĝaĵo ka tre postulema pri labor ka pro reŭmamismo mestro fariĝas netolerebla dum trapike frida veter ka filoj anke netolereblaj pro un aŭ alia kial’. Survoje mi haltas ĉe Sarn. Mi povas diri ke Gideon ka m planas nupti dum Rikolta Festo. Mi povas diri ke m estas tre ĝoja ĉar kiam on amas iun on volas esti kun li ka nokte ne povas ripozi ĉar on volas sc’i kie li stas ka ĉu ĉi’ bonas ka ĉu l surmetas sekajn ŝtrumpojn post malsekiĝo ka ĉu l iam sentas sin soleca.

Mi pli volas mian amaton ol ion ajn alian en kroma mondo.

Li stas bonkora ka kuraĝa ka kiam l alvenas mi povas diri nur “La Mestro ĉe’stas”.

Mi ne povas envortigi mian amon ka m tiom amos lin ĝis fin ka nun bonan nokton Sinjor Woodseaves ka ĝojigan Kristnaskon de JANCIS BEGUILDY.

“Vi skribas vere belan leteron Jancis,” mi diras. “Ĉu m legu ĝin al vi?”

“Tutne! Kial fari tion? Vi scias vortojn direndajn.”

“Ja’s. Mi ja tre bone scias vortojn. Sed mi dev’s ne dir’in. Jen ki ĉagrenas.”

Mi faldis leteron ka metis ĝin sur kamenbreton pretan por ke Gideon portu ĝin sekvan bazartagon.

Jancis forkuras

I' stranga ĉe' stis en dom dum tituta Kristnaska festo. Ĝ estis plej bona Kristnaska festo kiun n' iam spertis kun pli da kantado ka ridad ol jam de multaj jaroj. Tamen i' sence ĝ estis morna. Ŝajnis al mi ke kantado venis el tre fora loko subakva. Ka kiam Jancis sidis apud fenestro ka lum tra verdeta botelvitro falis sur ŝiajn palorajn harojn ka ŝian palan vizaĝon ŝ aspektis kvaz akvo superfluis ŝin.

Verda gruzo verda gruzo verdas jam herbar!

Plej bela belulin reĝin de ĉijar

Mi lavos vin per lakto ka vestos per silk

Ka skribos vian nomon per ora plum ka ink.

A°! Eĉ nun mi povas aŭdi Jancison kanti tion per sia dolĉa alta voĉ el tre for ve! tre for!

Patrin konsentis ellitiĝi kristnaskan matenon ka ŝ venis en kuirejon kie ŝ sidis komforte en kamenangul rigardante geamantojn kun plezurplena komprenema ĝoja rigardo kian m ofte vidas sur vizaĝoj d oldulaj virinoj kiuj mem vivis k iom konis amon. Rigardante junajn geamantojn i kvaz diras—

“Ĉu v ĝojas knaĉjo? Eĉ pli v ĝojos... Tutkonfuzita knanjo? Nu m povas diri ke v estos eĉ pli konfuzita multege pli.”

Mi bone povis vidi dum ni kantis “Kiam Jozef piediris” ka “Ĝoju bonaj kristanoj!” ke Patrin ank aŭdis aliajn voĉojn voĉojn d etuloj kiaj Callard-infanoj kune kantantaj alte ka dolĉe. Ŝi vidis aliajn vizaĝojn zorge lavitajn ka rozkolorajn kiuj leviĝis al ŝi dum ŝi sidis en krepusko sur kanapo pretajn rideti post solenaj kristnaskaj kantoj ka kri “Anjo!¹”

Ŝi multfoje frapetis ŝultron de Jancis ka diris “Belulin! Bela!” k unfoje m aŭdis ŝin averti Jancison pri leporoj.

“Kiam venos via tempo karulin n ofte vagu en arbar nek en kampar. Restu proksime al dom ka v ne renkontos ĝin. Ti stus malfeliĉiga missorto ja vere.”

“Ho Srin Sarn!” diras Jancis ridante ka ruĝiĝante pl'ol iomete “vi vere tro rapidas. N'ankor eĉ n amindumis.”

“K anke tempo rapidas karulin. Ne lasu kreski muskon sur voj d am. Ne diru tro da neaj vortoj. Li stas bona knabo s on ne ĉagrenas lin.”

“Sed Sarn mem pl'ol mi volas prokrasti” diris Jancis.

“Stulta stulta knabo! Ĉu gravas argentaĵo? Ĉu gravas geservistoj? Certe mi kontentus sen i se m ne plu devus zorgi pri porkoj ka povus meti piedojn proksime al fajr ka trinki tason da tejo⁶³.”

“Gideon volas kunvenigi min al Ĉasbal” diris Jancis. “Ka m eĉ eniros taŭ Frin Dorabella.”

“Ti stas malinda pens. Ĉar kial gravas kiu unueniras se ĉiuj eniras? Ka kial un bal valoras pl’ol alia?”

“Tamen multplaĉus al mi eniri taŭ Frin Dorabella.”

“Ka tiel stos!” vokis Gideon de pordo kie li frapadis neĝon ka koton de siaj botoj.

“Ka tiel stos knabin mia ka vestita tiel senhonte kiel denaska sinjorin.”

Li venis trans kuirejon portante peceton de visko por kiu li grimpis pomarbon ka laŭte ŝmackisis ŝin sub ĝi.

Patrin kunfrapis manojn aplaŭde kiel infan kiam katido vekiĝas por ludi. Sed eĉ kiam ŝ aplaŭdis pro ĝoj ŝiaj manoj ankore smilis al preĝantaj manetoj de talp en kaptil.

“Ne men frue ol Rikolto Sarn?” ŝi pledis. “Vi n plu prokrastos? Mi certe plu vivos ĝis tiam. Sed poste—venos vintro ka kiu scias? Mi volas vidi vin edziĝi taŭ vintro.”

“Ho ni n prokrastos Patrin. Ne timu! Kial necesus? M estos riĉul vendinte tritikon ka rikoltado kostos nenjon ĉar ni havos por-am-helpon ka m repagos per kromlabor por najbaroj dumvintre. Ka post dutri jaroj ni povos translokiĝi ĉar oldul ĉe Lullingford ne longe vivos ka m havos sfiĉan monon kiam domego vendiĝos.”

Do i ĉiuj gajis ka kiam mi diris “Manĝo pretas” Gideon frapetis tr’ameme mian ŝultron ka diris ke m estas bona knabin.

“Vere bona knabin superanta ĉiun alian. Nun kuniĝu! Ĉiuj ĉetablen! M ege malsatas.”

Tamen mi n povis gaji kiel i. Mi sentis min ekster ĉi’. Sed mi ja konsolis min de temp al tempo dum mi tranĉis panon ka fritis lardon ka verŝis teon rigardante al mia leter sur kamenbreto kun adres skribita per tr’alta manskribo—

⁶³ Teo.

Sinjur Woodseaves
Domo de Teksisto
Lullingford.

Poste Jancis rakontis pri Kester ka pri malicaj agoj de Grimble kiujn ŝi n povis priskribi en leteroj. Ĉar montriĝis ke Grimble ka Huglet n amis Kesteron dekiom li ĉesigis taŭroludojn ka balde neam' fariĝis profunda malam'. I klopodis instigi ĉiujn aliajn bienistojn kontre lin dirante ion aŭ alion. I kritikis liajn teksaĵojn kiuj efektive stis plej bonaj en tutregion'. K i diris ke l stas lanta ka multekosta. Ankor ne kontentaj i enketis pri liaj religio ka pensmanier rilate al tritikleĝoj ka parlamentanoj. I kamradis kun Skvir pri ti k instigis lin eĉ pli kontraŭi Kesteron. Ĉar i diris nenjon pri taŭroludo ka priparolis nur tritikon. I ĉiel komplotis kontre Kesteron ka sendube tre ĉagrenis in ke l nek drinkis nek postkuris virinojn nek faris ion raportindan al Regiona Polican'. Tamen i kiel eble plej strebis malplezurigi lian vivon ĉar tiom ĉagrenis in dekjara forigo de taŭroludoj. Do un tagon kiam li teksis ĉe Grimble ka vesperiĝis Sinjur Grimble ekzamenis tre atente ŝtofon faritan de Kester dum titago ka n povis trov'ion priplendeban nek pri kvalito nek pri kvanto. Ĉar li ja bone laboris ka Jancis diris ke ĝ estis glata kiel silko tutsen buloj aŭ nodoj. Li nenjon diris al Kester ka post vespermanĝo Jancis alportis paperon k i komencis skribi leteron al Gideon. Ka ŝajnis ke Sinjur Grimble ne povis toleri tion ĉar li n scipovis legi aŭ skribi ka laŭ li Kester estis trofierema. Do kiam li jam ne povis plu deteni sin sed dev's aŭ paroli aŭ krevi li diras—

“Se juna Sarn ja'mas difektitajn varojn li ricevos sian deziraĵon ka sendube li devos danki al vi Teksisto. Tre komfortaj k agrablaj vi kunestas kompreneble vi ka knabin de Sarn. Plibone ke v teksu bebo-tolaĵon juna Woodseaves!”

Je ti Kester furioz'ekprenis sian ĉapelon ka ĉiujn posedaĵojn sed diris nenjon. Ka kiam l atingis pordon li turnis sin ka diris—

“Venigu bofraton de Huglet por teksu por v estonte Grimble. Vi n plu ricevos teksadon de mi. Vi stas fibuŝa buf ka hont al via komunum ki'situas en Infer.”

Li ĵetis sin eksteren ka nenjam revizitis domon.

Mi devis soriri al mansardo por iom pripensi tion. Mi j'amis Kesteron pro lia furiozo. Mi pensis ke m volonte vidus lin furioza kvankam ne kontre min ĉar se l furiozus kontre min mi mortus.

Postkristnaskan tagon m iris al Ŝtona Dom ka voj ja stis malrekta ĉar neĝ estis tre profunde amasiĝis sur voj tra'rbar. Sed ĉiel' estis blua ka viskoturdoj kantadis dum kukolobidoj brilis sur maj-arboj. Kontre mi'anticipo forestis Beguildy. Srin Beguildy ka m longe interparolis.

“Nu nu povra ŝafido” ŝi diris “ne povanta veni al sia propra Patrin ĉar mestro stas tia porkokapa stultul! Damne! Nun kion ni faros? Ĉar reir al Grimble nenjam eblos. Sed mestro furiozegas pro mono perdita. Iom pli restigu ŝin ĉe v ĝis forpasos furiozega karulin.”

“Ho ŝ tre bonvene povos resti laŭ sia plaĉo.”

“Suprauloj vin rekompencu!” ŝi diras. Ĉar ŝ estis tre religiema virin laŭ instruoj de kirko. Ka kvankam mi n volas dir'ion malican pri ŝ tamen m emas opini' ke ŝ estis religiema almen parte por spiti Beguildyn. Sed eble jen nur fipens mia.

“Gideon diris al ni ke servistin de Callard forkuris taŭ vintro” mi diris. “Ŝ estas tre soleca tie tutan tagon kun kvin etuloj ka beb. Eble se n'ĝuste provos kredigante ke n'komplezas in i pagus sammulte kiel Grimble. I n trovos alian taŭ printempo ĉar ĉiuj stas dungitaj ĝis maj ka krome Valetto Callard n estas lok amata de knabinoj. Iru ka parolu kun Srin Callard ka m pretekste petos lecionon por okupi vian mestron.”

“Sed jam delonge vi n plu lernas mi'kara ĉar vi nun scias tikiom Beguildy.”

“Ja's nu ion novan mi volas lerni sed mi n scias ĉu ĝ estas en libroj.”

“Ki povas esti ti?

“Ĝ estas malnova antikva sorĉo Srin Beguildy k on nomas ĝin kontento.”

“Ho ti! Ĝ estas en nenju libro lia.”

“Nek en i'alia libro” mi diris. Sed mi pensis jes ja un person scikonas ĝin. Se Di volos tiu lernigu min. Sed tion li nenjam faros.

“Sed nenjel utilis mi'ir Pru” ŝi diras. “I'ncitus hundojn kontre min plejverŝajne. Callard estas tre religia komprenu. Ka l ne povas

toleri nian mestron. Ka ĉiun *lian* penson pensas lia Srin kion ajn *li* diras *ŝi* diras tuj kiel e° el Sarn. Tialrilate i verŝajn'eĉ ne volos dungi Jancison pro ŝia paĉjo. Sed eble s iros *vi* ka konfidos al i ke Jancis fianĉiĝis kun Sarn i eble konsideros ŝin ĉar on jam komencas admiri vian fraton kiel viron kiu nepre fariĝos riĉa.”

Do m diris ke m iros. Mi malvolegis iri ĉar on'iom fiopini's anke pri mi ka parolis malagrable pri m tr'ofte. Sed kiam mi vidis Gideonon ka Jancison tiom amantaj ka gajaj dum vesper ludantaj “Bankrotigu mian najbaron” en fajrlum mi sci's ke m devas iri.

“Nu Gideon” mi diris “klare ke v plu fervoras. Kvankam vi n povas ludi konkrojn per kaŝtannuksoj ka ŝeloj d helikoj nun vi plu volas bankrotigi.”

“Konkroj!” diras Patrin el si'angul. “Kia ludo! Li ĉiam amegis ĝin sciu. L amis ludi per grandaj ruĝetaj-ka-blankaj konkoj on nom's in Romiaj helikoj ĉu n Pru? Por trovi tiajn vi foriris nokton kiam povra Sarn forpreniĝis en siaj botoj! Povr'anim!”

Ŝ iom larmis k ekaspektis tre nana kiel ĉikiam ŝ estis morna.

“Trankvilu Patrin li nun stas en pac.”

“Povr'anim! Ka Sarn transprenis pekon. Mia fil Sarn. Plen'englutis ĝin. Ka m taŭvidas ke denove stas knaboj ludantaj Konkrojn en nia kuirej per grandaj ruĝetaj-ka-blankaj.”

Ŝi transrigardis al kanapo. Gideon ĵus bankrotigis Jancison k estis en tre bona humor.

“Ja's knaboj ka knabinoj” diras Patrin. “Ĉar mi vidas ke l elĉerpos ŝin per pl'ol kartoj.”

Ŝi komencis ridi pensante pri siaj genepoj ka pro sia ŝerco ka ŝ tiom ridis ke ŝ malfacile spiris ka m devis enlitigi ŝin.

Sekvatage m ekiris al Valetto Callard. Nenju volonte irus tivojn kie neĝ amasis profunde sur ter ĉar ĝ estis trans neŝirmitaj altaj paŝtejoj kun nordaj deklivoj amare fridega ka neĝoplana. Sed ĉar mi havis bonan celon mi komencis kanti sur nudaj paŝtejoj kie nenju aŭdis.

“Malfermu pordegojn ĉielvaste...”

Ka jen apud bien en nana fermita kampo kion mi vidis sin paŝtanta ĉe malhela pinarbar? Blankan taŭron kiun Kester savis ĉe taŭroludo. Mi haltis k iom rigardis ĝin. Jen ĝi nek morta nek

kripla kun blanka pelt en bonordo aspektante tutkontenta kvaz ĝi ĵus alvenis Ĉielon ka ĉiĉi' pro Kester.

Li plenumis sian promeson ka pagis monon ka poste redonis taŭron al Callard por liaj infanoj.

“S iam vi decidis ke taŭrolud estas kruela bonvolu diri tion al i” li diris. “Sed ne kontre via konscienco.”

Callard estis tre honesta vir ka l sentis neceson prikonsideri ĉu jes ĉu ne do l tre serioze pripensis. Jancis diris poste ke stis tr'amuze vidi lin ĉiuvespere kunigi infanojn ka sidig'in sur nanajn taburetojn ka patrin prenis bebon sur sian genuon. Ka Callard diris tre laŭte—

“Taŭrolud estas fia!”

Ka lia Srin per sia malankolia voĉo ripetis—

“Fia!” kiel e°o ĉe Sarn.

Tiam ĉiuj infanoj kri's kiel nesto d birdoj—

“Taŭrolud estas fia!”

Foje bebo balbutetis ka foje li silentis kvaz pripensante. Nur un voĉ malkonsentis tid Aaĉjo Callard voĉo tr'alta ka trema. Li kri's—

“Ne ne! Ĝi n estas fia. Ĝ estas vere bona gajiga malnova sporto!”

Sed nenju atentis lin ĉar li fariĝis tre senkomprena. Li apertis pordon kiam mi frapis ĝin ka vokis al sia bofilin—

“Stas tialta maldika junulin Maria. Sorĉistin.”

“Do enkonduku ŝin bopejtro.”

“Venu enen” li diras. “Ŝi sobos kiam bebo ĉesis kriadi. M envias liajn pulmojn. Mi'nbone fartas. Ne bone ja. Ĉu v kuracas?”

Mi diris ke n.

“Ho! Mi kredis ke Beguildy lernigis tion al vi. Tre pekema vir l estas. Kovrita de pekoj kiel ŝafo de ruĝaĵo. N utilos al li kriadi ĉe pordoj de Paradiz dirante ‘Lavu min ka m f'riĝos pli blenka ol neĝo’. Ĉar m diras al vi k'eĉ Juĝisto de ĉi' ne povus purigi lin eĉ se L havus sfiĉan tempon. A°! Fioldul Sorĉisto stas. Mi ja kredas ke l vivas per suĉado de homaj vivoj en noktomez. A°! L elsuĉas sangon. On diras ke l iras al tombej k elfosas kadavrojn por ŝteli ostojn ka muel'in por fari sorĉaĵojn. On diras ke l hajmonportas infanetojn en sia sako ka manĝas in. Ho li stas plej mava vir post Punti Pilato⁶⁴ m certigas vin!”

Jam pl'aĝaj infanoj ploregis pro tim ka Srin Callard vokis de supre—

“Bopejtro kion diras nun? Silentu!”

SinJOR Callard envenis tiam k invitis min manĝi kun i ĉar stis hor de vespermanĝo. Post manĝo m rakontis al i pri Jancis.

“Do ŝ forkuris!” diras SinJOR Callard. “En ĉitiveter? Ja mirinde!”

“Mirinde” diras lia Srin.

“Rompis sian kontrakton!” diras Callard.

“Kontrakton” diras Srin Callard morne.

“Nenju romp isian kontrakton dum *mia* junec” diris oldul. “I ne kuraĝis. On metus in en pilorion.”

“Ĉu vi stas certa ke n estas pro Teksisto?”

“Teksisto” e°is mastrin malĝoje.

“Teksisto! Teksisto!” kri°s infanoj kvaz laŭdante lian nomon.

“Mi tiom certas pri ti kiom ke m spiras” mi diris.

“Ka ŝ fianĉinas kun via frato?”

“Ja’s. I nuptos dum Rikolta Festo.”

“Do” diras SinJOR Callard. “Srin provdungos knabinon.”

“Provdungos!” e°as Srin Callard per senespera ton kvaz kredante ke ŝia task estos provi toleri Jancison.

I akceptis dungi Jancison por ses monatoj ka pagi al ŝi tri pundojn ki stis por i granda sum. Do m hajmoniris tre kontenta. Sekvatage Gideon diris ke n°rajtas uzi Bendigon do m veturigis Jancison al Callard haltante survoje ĉe Beguildy por informi oldulon.

Ho! Kia furiozo! Ka plej malplaĉe li plenkulpigis Gideonon kiu tutne rilatis al afero.

“Mi rekompencos pro ti vian fraton” li diras. “Ja’s! Tre malamiga vir. Lia paĉj estis sama. Kiam mi planis ion ajn aŭ komencis ion ajn li venis ka fiaskigis ĝin ek! Ka samas juna Sarn. Rigardu kiel li malhelpas k obstaklas min rilate al juna Skvir!”

Sed Srin Beguildy ĝojis.

⁶⁴ Puntio Pilato estis la Romia prokuratoro (t.e. registo) de la loko kie Jesuo estis ekzekutita, kaj ordonis la krucumiĝon de Jesuo.

“Ka v hajmonvenos je fin de pajlrikolto Jancis” ŝi diris “por kudri viajn edziniĝvestojn. Ka ceremoni okazos je Mikelfesto⁶⁵. Glorrozoj tiam floros duan fojon ka v havos in en via bukedo.”

“Mi diras al vi” diras Beguildy “ke Sarn ne prenos ŝin. Transdonu al li timesaĝon Pru Sarn. Li n obstrukcos min. Mi damnis tiviron per fajro k akvo ka damnita li nepre restos. Diru al li ke nek kun ringo nek sen ĝi li prenos mian knabinon.”

“Nu bonan tagon al vi Sinjor Beguildy” mi diris ĉar mi kredis ke forveturi stus saĝe.

“Pru” diris Jancis dum ni vojaĝis tra marĉpaŝtejoj inter Plash ka Valeto Callard. “Por ki vi pertranĉilis hundon de Grimble ka tiom riskagis por Teksisto?”

Ŝi rigardis min per siaj grandaj bluaj okuloj ka m kruele batis Bendigon por kaŝi mian konfuzon. Povra ĉeval ĵetis duonrigardon je mi ka mia konscienco pikis min sed kion mi povis fari?

“Oni diradas ke jen tre nekutim’ago de knabin por nekonat. Ja’s! eĉ vilaĝanoj apud Grimble scias ke tion faris vi kvankam nek Grimble nek Srin Grimble diras tion al i ĉar i n volas paroli pri tiafer ĉar i stis kondamnitaj pro ĝi. Sed ĉiuj en tuta region jam de taŭ nun scias.”

Ŝi daŭre rigardis min ka ruĝskarlatato flamegis en miaj vangoj. Mi senĉese batadis Bendigon ka n’rapidegis trans truojn ka ŝtonojn ka marĉajn lokojn kiel nenjam taŭe.

Jancis iomete ridis ruze k agace.

“Povrolda Bendigo ne kulpas” ŝi diras.

“Mi volas bald atingi bienon” mi respondis iom stulte.

“Ho nepre v atingos ĝin” ŝi diris. Post ti ŝ silentis dum kelka tempo kvankam ŝi plu rigardadis min.

“Mi demandas min” ŝi diras “kion Teksisto pensus se l scius.”

“Li n povas sc’i” mi diris. “L estis senkonscia.”

“Ebl’on diris al li! Ka m demandas min kion li pensus se l aŭdus ke Pru Sarn batalis kiel tigro por li?”

“Li pensus nenjon. Ĉiu ja scias ke m kompatas senpovulojn.”

“Sed li n apartenas al senpovuloj tiSinjor Woodseaves. Li stas plej lerta loktist en region ka tre memstara vir.”

⁶⁵ Religia festo, je la 29a de septembro.

“Li stis senpova kiam tiToby de Grimble kaptis lin je gorĝo ĉu n?”

“Ja’s. Sed kial devis tiPru Sarn savi lin? Kial ŝi metis lian kapon sur sian sinon tiel tenere? Komprenoble lia bruna hararo estas alloga ka silka. M ofte rimarkis tion dum li skribis leterojn por mi. Ka tiFelena samopinias. Ŝi ja turmentas lin bazartagojn.”

“Kia senhont’aĉulin! Kion ŝi faras?” Plaĉis al mi deturni Jancison al alia tem.

“Ho ŝi iras al dom ka lasas tie grandan korbon d agarikoj aŭ da beroj aŭ eble pecon da viando se Ŝafisto buĉis ŝafon. Ka kiam ŝi renkontas lin survoje ŝi rigardas lin per tiverdaj okuloj ka ŝia rideto estas dolĉa kiel oktobra nukso. K un nokton kiam Ŝafist estis ebria k estis tarde kiam i ekiris hajmen kion ŝi faris? Ŝ iris dum krepusko ka kantis sovaĝan kanton ekster lia fenestro.”

“Kion ŝi kantis?”

“Nu ŝ kantis—

Virgin’ serĉis amon dum malhelo de lun’.

Amulon! Amulon!

Donu vi bonvole donu al mi nun.

Amulon! Amulon!

Junu’l tra fenestro rigardas al virgin’

Per lum’ tra fenestro li klare vidas ŝin.

Nu kiel por am’ vi pagos do al mi?

Per korpo per korpo jen pagos mi al vi.

Ka m nomas tion vere senhonta kanto ĉu n Pru?”

“Kion li pensis pri ĝi?”

“Mi n volus senhonorigi min per tia demando. Sed ŝi stas tre sovaĝa virin tiFelena. Ŝi logos ka tentos lin ĝis fal se nenju detenos ŝin. Sed mi volas sc’i kion mi diru al Teksisto se l demandas kial vi tiom strebis savi lin.”

“Diru nenjon.”

“Ti n estas respondo.”

“Nenjun alian respondon li ricevos.”

“Vi staris super vir kiel anĝel ĉe pordego d Eden kun tigra tranĉil.”

“Ti n estas vi’afero.”

“Ja’s. Ja stas.”

“Pro kial?”

“Ĉar m amas vin Pru.”

“Dank al Di ni jam atingis domon de Callard” mi diris ĉar ni nun eniris gregejon ka domopord apertiĝis k eliris kvin infanoj Aaĉjo Callard Srin Callard ka bebo kiel abeloj el sia korbo.

Lasta dir de Jancis tal mi forveturis estis—

“Mi devos balde venigi Teksiston.”

“Sed por ki?”

“Por skribi mian leteron al Sarn.”

“Sed nun vi stas nur dutri mejlojn de Gideon. Kial do v volus skribi leteron?”

“Ti n estas vi’afero” diras ŝi tre modeste ka ridante en si “samkiel vi diris al mi Pru Sarn!”

Ĉapitro 5: Libeloj

Post forir de Jancis al Valetto Callard tra printempo ka somer nenj estis skribita en mia libro aparte de miaj propraj aferoj ekzemple mia progres rilate legadon de malfacilaj libroj ka pensoj kiuj trafis min enmansarde. Ĉar i n rilatas vivojn d aliuloj en titempo i n interesus vin ka m ne lasos in okupi vian tempon. Gideon iris al Valetto Callard ĉiudimanĉe k aliajn tagojn li laboris trioble. Mi plugis sulkojn egalkvante kun li ka fosis egalkvante. Nia bien estis riĉa je tritiko. Nek taŭe nek poste mi vidis kampojn kun tiel bona stat en nia parto d lando ĉar tiu stis jar de dolĉa kreskiga veter kun sfiĉa pluvo por ŝveligi grenon sed ne sfiĉe por putriĝi ĝin. Dimanĉon post dimanĉo m vidis Gideonon survojan al Callard halti k apogi sin per pordego ĉe supro de dekliva paŝteĵ kie on povis rigardi tutbienon kvaz avarul rigardanta sian oron. Ka diversfoje m akompanis lin ka m ĝojus vidi tian ardan kontenton sur vizaĝo d iu ajn des pli sur tiu d Gideon kies vizaĝon on malofte nom's gaja. Poste li pluiris grandapaŝe fajfante presk aŭdeble ka m sidis kelkan tempon tal reiri al Patrin. Mi deziris k'iun tagon li fajfos plenaŭte. Mi diris al mi ke kiam li finfinedziĝos kun Jancis dum tritiko ka Fortun frapados sur pordon tiam finfine l fajfos aŭdeble. Mi volegis aŭdi tion ĉar m opini's ke stas nesane kiam on konstante fajfas aŭ kantas aŭ parolas al siaj pupoj.

“Kiam venos rikolto!” mi pensis. Ka m komencis revi pri kiam m estos bela kiel fein.

Ege ĝojigis min aparte de pensado pri ĉiĉi' rigardi starantan tritikon ka vidi ĝin kvaz grandan lagon sub vento. Kelkfoje ĝ estis kvieta kun senkrispa surfaco alifoje ĝi distremis ondete k on povus preske kredi ke grandaj amasoj da sovaĝaj asfodeloj sub foraj heĝoj stas nimfeoj ondumantaj gracie sur tajdo ka kelkfoje okazis granda tempest en kavoj kiel tempesto sur Lago Galile kiun trankviligis Reĝo d Amo⁶⁶. Tiel mi rigardis grenon semajnon post semajn dekiam ĝ estis nur verda ĝis ĝi komencis koloriĝi rufa aŭ bruneta aŭ pala laŭ sia spec. Ka nokte ĝ brilis kvaz lum kaŝis sin

maltaŭe ka ĝ trankvile glimis kiel lampiroj aŭ marĉa fosforesko. Mi nenjam sci's k ankore ne scias kial tritiko tiel lumas dum noktoj de juli k aŭgusto havante propran lunlumon eĉ kiam lun forestas. Sed estas mirinda vidaĵo kiam granda silento de plena somer ka profunda nokto kuŝas sur ter ĝis eĉ tremol tiklaĉem'arbo ne kuraĝas paroli sed detenas spiron kvaz ŝ atendas alvenon de Sinjor. Sendube s iu legos ĉitium libron estos al li strange ke simpla bienistin tiel rigardis ĉirkajn objektojn ka vere n multaj tiel agas. Sed kiam on loĝas en malagrabra dom on rigardadas tra fenestron multpl'ofte ol hom kiu kontentas pri sia loĝej. Tiel mi al kiu plaĉis nek mi mem nek propra vivo serĉis plezuron kie ajn mi povis trovi ĝin. Kelkajn vidaĵojn m atendis kiel knabin atendanta sian amaton ĉe sia bordo d arbar. Ondumado ka glimado de tritik estis un tia k alia kiu venis ĉirke tempo kiam akvo de lago distremis estis miriga vidaĵo de libeloj eliĝantaj el siaj korpoj. Ni havis multegajn libelojn ĉe Sarn de multaj specioj ka koloroj nanajn ka grandajn. Sed ĉiu je difinita tempo devis sorgrimpi el sia akva tombej ka veni el sia korpo per granda labor kun dolorego turmentado kiel akuŝdolor per krevo kiel tide tombo. Dum nenju jar dekiam m unue vidis ĝin mi maltrafis timontron de potenc de Di.

M iris al lago por pluki vergojn de lonicer por fari balailojn. Ka ĉar mia mens estis malĝoja pro memor pri kion Frin Dorabella diris ĉar balailoj ĉiam pensigis min pri ti ka vidante ke tremado d akvo jam komenciĝis kun lanta milda ondetado de tuta supro de lago m decidis iri al loko kie laŭ mia se'i troviĝis ĉiam multe da libeloj ka tie trovi konsolon rigardante i'an eliĝon el siaj korpoj. "Libeloj" mi nomas in ĉar mi dubas ĉu iuj konas signifon de nia nomo por i. Ni nomis libelojn "viperavertil" ĉe Sarn ĉar on kredis ke kie viper kuŝas kaŝinte sin en herbaĵo supre ŝvebas viperavertil. Un specion tutbluan ni nomis "alcion" k alian kun tre maldika korpo "flikil". Patrin kutimis diri al Gideon ke se l forvagadus aŭ

⁶⁶ Laŭ rakonto en la Biblio, dum Jesuo kaj liaj kamaradoj estis en boato sur la lago de Galileo, ŝtormo minacis detruir la boaton. Jesuo admonis la ŝtormon, kaj la vetero kaj la akvo kvietiĝis. Jesuon nia rakonto nomas la "Reĝo de Amo", ĉar laŭ ŝia opinio amo estis la ĉefcelo de Jesuo.

alie petolus Diablo kudrus lin k uzus libelojn por kunkudri liajn orelojn tiel ke l ne povus aŭdi konsolajn vortojn de Di ka stus damnita. Sed mi nenjam povis kredi ke diablo povus regi tian belan estaĵon—libelon.

Ti stis plej bela parto de jar ĉe nia lago kiam dum kvietaj varmaj tagmezoj akv aspektis tr'amikema trankvila ka palblua ka ŝajnis nekredeble ke ĝ povus dronigi homon. Ĉirkestaris altaj arboj kun densa foliar riĉe somerverda senmovaj kaptitaj per sorĉo sendante siajn buntajn ombrojn sur lagon tiel k'arbosuproj preske kunrenkontiĝis en mez. Ambeflanke notoj de nanaj birdoj kiuj ankore ĉesis kanti sonoritis trans akvon ka stis tiom silente ke kvankam stis nur maldikaj kantoj kiaj de regoloj ka rubekoloj on povis aŭd'in el fora flanko de lag. Eĉ dum tibruliga tago kiam m eltiradis veprojn de lonicer mi sentis dolĉan freŝan aeron el akvo tr'ebri'gan ka vivoplenan. Ĉar kvankam Sarn stis morna loĝloko dum vintro tre morna loko tamen dum ĉiti'unsola parto de jar ĝi ĉesis revii pri malfeliĉo ka smilis al aliaj belaj arbaroj ka lagoj. Ĉie ĉirke lago staris altaj junkoj kun dikaj kapoj el bruna pluŝo simila al palto de Frin Dorabella. Interne de ringo de junkoj troviĝis ring el nimfeoj dum tiparto de jar i stis plej bela vidaĵo ĉe Sarn ka plej bela vidaĵo kiun m iam vidis. Grandaj brilantaj folioj kuŝis trankvile sur akvo k eĉ pli trankvile sur folioj kuŝis nimfeoj blankaj ka flavaj. Kiam i stis burĝonoj i smilis al dormantaj blankaj k oraj birdoj kun kapo sub flugilo aŭ al i'ĉizita el glimanta ŝton aŭ kiel mi taŭe diris al gutoj de pala vakso. Sed kiam i plenapertiĝis i smilis al nenjo krom al si mem ka tiom belegaj k'on ne povis deteni larmojn vidante in. Flavaj havis pli da petaloj po kvin aŭ ses sed blankaj pli larĝe apertis siajn kvar ka ĉiu petal stis pli granda. Ĉitipetaloj stis brilblankaj interne kiel vestoj de tiviroj kiuj staris kun Kristo sur montosupro⁶⁷ k ekstere i havis delikatan verdan tinkturon kvaz i prenis koloron el verdaj ombroj en akvo. Anke kelkaj libeloj aspektis tiel ĉar puntajn flugilojn sen alia kolor tuŝis tremanta verdo.

⁶⁷ Laŭ la Biblio, disĉiploj de Jeŝuo vidis lin stari sur montosupro, kaj apud li estis Moseo kaj Elija, du famaj profetoj el frua biblia epoko. Iliaj vestoj estis brile blankaj.

Do ĉirkis lagon tri ringoj kvaz ĝ estis trioble sorĉita. Unua stis ringo de kverkoj ka larikoj salikoj ka fagoj solenaj ka fortaj por malpermesi eniron de mondo. Sekvis ringo de junkoj milde susurantaj facile rompeblaj ka maldensaj sed sfiĉaj por restigi interne sorĉadon.

Ka sekvis ringo de nimfeoj kiel mi diris kuŝantaj kvaz Jesu piedirante sur akvo metis in sur surfacon per Siaj fridetaj manoj tal turni sin al popolamas' dirante "Jen lilioj!" Ka kvaz i n sfiĉis por skui animon jen sub ĉiu nimfe' blanka ka verd'aŭ palora troviĝis ŝia brilanta ombro kvaz ŝi anĝel. Ka dum tuta longa trankvila tago nimfeoj ka ties anĝeloj rigardis un alian ka stis kontentaj.

Libeloj abundis ka grandaj ka nanaj. Jen grandaj bluaj kiuj stis tiom fortaj k'i flugis trans supron de plej alt'arbo s'on timagis⁶⁸ in ka jen etaj maldikuloj preske tro nanaj por nomiĝi libeloj. Jen lukse bluaj alcionaj libeloj k aliaj kiujn ni nomis "injoj" buntaj ka poluritaj kiel glazurita fajenco. Jen preske multaj havis flugilojn senkolorajn aŭ leĝere verdetajn ka dutri aspektis pudritaj kiel folioj de lavendo. Kelkaj stis flavbrunaj kiel putorkato kelkaj stis rustkoloraj kiel kupra fruktokaldron'. I pensigis pri juveloj multevaloraj gemoj kiaj listiĝis en Bibli. Ka son d i'aj flugiloj stis laŭta en aer akra ka zumanta kiam i rekonsci'ĝis post sia s'ferego. Kelkfoje sur n okupata muska terpec inter arboj i sidis samkiel katoj ĉirke kamen tutkontentaj tiel k'on preske kredus vid'in purigi vizaĝojn ka ronroni.

Sur alta junko proksima al bordo m trovis libelon nur nun komencanta iri el sia korpo ka m klinis min preske detenante spiron por vidi timiraklon. Jam haŭto super ĝiaj brilaj ardantaj okuloj stis maldika kiel vitro tiel k'i vidiĝis brilantaj kiel koloraj lampoj. Nelge malnova haŭto splitiĝis ka ĝ liberigis kapon. Ka jen komenciĝis loktado k akuŝstrebado por liberiĝi unue kruroj ka poste ŝultroj ka molaj krispaj flugiloj. Ĝ agis kiel demonhavanto kelkfoje konvulsianta k alifoje fariĝante rigida kiel kadavro. Tuje taŭ fin ĝi restis senmova longan tempon kvaz demandante al si ĉu ĝ sfiĉe kuraĝas plene liberiĝi sin en mondon tutnovan. Poste ĝ forte puŝis ka faris krevigan tordiĝon ka ĝ tuteliĝis. Ĝi sorgrimpis iom

⁶⁸ Timigis.

pli sur junko tre dormeme ka lace kiel infan post longa tago ĉe foir k ekdormis dum flugiloj komencis kreski. “Nu” mi diras iomete ridante ka samtempe apen retenante larmojn “jes vi sukcesis! Kostis al vi multon sed vi liberigis vin. M esperas ke via viv estos feliĉa. Mi spozas ke jen via Paradizo ĉu n?”

Sed kompreneble ĝi n povis respondi nur plu kreskigi flugilojn kiel eble plej rapide. Do jen mi staranta kun brakplen da veproĵ ka jen ĝi forte tenanta brunan junkon en ora lum kiu kovris Sarnon kiel gracoplena kuracanto. Mi malŝparis tempon ka ti stis mortiga peko ĉe ni do m turnis min por foriri. Sed ĝuste dum mi turnis min aŭdiĝis susureto ka jen! taŭ mi staris Kester Woodseaves.

M ekpretis forkuri ka verdire m preferus salti en lagon ol ke l vidu min. Sed li metis sian manon sur mian ŝultron ka kvankam ĝ estis milda ĝ estis man de loktist al kiu on ne povis diri neon.

“Kion? Ĉu volas forkuri? Kial do Pru Sarn?” li diris.

Mi klinis mian kapon ka volegis esti libel. Mi diris nenjon.

Mi klopodis fortiri min sed tutmalsukcese. Li nur ridis.

“Mi ja opinias” li diris per voĉo kiu faras sian propran someron “ke v tre strange kondutas al vir kiu venis elkore danki vin kiu savis lian vivon Pru Sarn tiel klopodante forkuri k eĉ salti en lagon!”

Lia man tiom batigas mian pulson ke m apen povas stari.

“Kion vi rigardadis kiam mi venis?” li demandis min.

“L inĵo-libelon venantan el sia mortotuko.”

“Finfineliĝintaj” li diras “i stas eterne liberaj. Liberiĝo kostas multe. Sed liberiĝinte i nenjam faldas flugilojn.”

“Vere” mi diris “ka kelkaj iras ti’alten ke m opinias k’i kelkfoj’eble flugas eĉ en Ĉielon.”

“Ĉiu el ni volonte farus tion mi certas se ni povus elekti nian Ĉielon. Mi n multe deziras ore pavimitajn stratojn. Ka m preferas atingi mian Ĉielon tal mi mortos.”

“Ka ki stas ti?” mi demandis lin. Min tiom interesis ke ja vere mi tutforĝesis mian malbenon.

“Ankor mi n estas tutcerta” li diris. “Sed post jar eble mi scios.”

“Longa tempo” mi diris mokante lin “por ŝin-ŝanceliĝi pri via peceto de Paradizo.”

“Ĉu v povus pli frue decidi pri via Pru Sarn?” diras li.

Mi rigardis lian verdan mantelon kiu tre belaspektigis lin ka m elektis lokon sur maldekstra flanko tuj inter maniko ka brusto kie mi volonte kuŝigus mian kapon ka m diris—

“Ja’s. Mi decidis pri mia.”

“Ho! Nu ki ĝ estas?”

“Mi diris ke m decidis pri ĝ Sinjor Woodseaves. Sed miaj pensoj apartenas al mi.”

Li ridis. Poste li diras—

“Vi skribas domne bonajn leterojn Pru.”

“I stis leteroj de Gideon.”

“Estis tre bonkore ke Sarn memorigis min ŝanĝi ŝtrumpojn kiam i malsekiĝas. N ofte on renkontas viron kiu pensas pri tiaj aferoj ka tutn estus Sarn mi taŭe spozis.”

Li briligis al mi plenan lumon de siaj okuloj ka klinante kapon mi n povis respondi.

“Ka kudra labor ka prunkonfitaĵo ka peklaĵo je duon de bazarprez nu m devas diri ke ti preske senmensigis min ĉar m aŭdis ondiron ke Sarn stas profitema vir tre rigida je negocoj postulante nenjon ka donante nenjon. Ka jen li proponas al mi tiajn frandaĵojn! Klaras ke m kruele misjuĝis tiviron.”

Nun mi memoris ke ŝtrumpoj stis en leter kiun mi skribis por Jancis post ŝia forkur. Do m diris al li ke Jancis menci’s ŝtrumpojn.

“A° jes tiel estis!” li diras. “Tileter plaĉis al mi. Ŝ estas tre bonkora knabin. Ĉar negrave kiu skribis tileteron kompreneble ŝ diktis ĝin ĉu n?”

Li refoje rigardis min ka m trovis nenjon direblan.

“Mi pli volas mian amaton ol ion ajn alian en kroma mondo’. Jen virin vere valora por vir” li daŭrigis. “Ka m tiom amos lin ĝis fin’ ka speciale ti pri ‘mi volonte dediĉos vivon kiam ajn ka mortus por vi pro hundomord aŭ i’alia kaŭzo’. Min plaĉis ti. Sed jen mi forgesis ja Sarn diris tion al Jancis Beguildy. Ki’amant estas tivir! Vi nepre multamas lin Pru Sarn.”

“Ho jes!” mi diris ruĝiĝante. “Jes ja.”

“Vere jes ka nepre tiel dev’s esti. Bonan amon al tekstoj li havas anke ka same Jancis. Ĉar titeksto ‘La mestro ĉe’stas’ estis en leter kiun Jancis skribis al mi samanke en tikiun Sarn skribis al Jancis.”

“Ne surprize” mi diris.

“Mi venos al amportado de Sarn ka m certe dankos al li pro bonkoraj pensoj rilate al kudrado ka prunkonservaĵo ka peklaĵo” li diris.

“Ho ne!” mi kri’s ĉar mi sci’s ke Gideon koleregus.

“Jen sendankema knabin” li diris “kiu nevolas k’on danku al ŝia frato.”

Lia vizaĝ aspektis kontenta kvaz l eltrovis kion li volis se’i.

“Nu n utilas plu seadi ka kajadi” li diras “vi skribis leterojn ka vi verkis in. Ka m nur povas diri ke vir pri kiu vi pensis kiam vi diris kion vi diris dev’s esti feliĉa negrave kiu ajn li stas.”

“Mi n havas konaton.”

“Ĉu vere? Ja stas domaĉe laŭ mi’opinio. Tamen vi havas amikon. Skribu en via libro kiam vi hajmoniris ke Kester Woodseaves estas via amiko ĝis ĉesos Tempo.”

Mi dankis lin elkore pro ti ka poste li diris ĉu n’iru serĉi pli da libeloj elirantaj el siaj mortotukoj? Do ni faris tion ka multparolis iel ka tiel pr’io ka tio. Ni rigardadis libelojn forflugi de junkopintoj ka n’vidis akvon kiu tremis pro sia dismoviĝo ka nimfeojn kiuj rigardis siajn anĝelojn.

Sed nur post longa tempo m memoris diri pro kiel li scias pri libro en kiun mi skribas? Ĉar evidentiĝis ke m ne povis bone memor’ion ajn kiam li ĉe’stis.

“Nu” li diris “eble bird informis min. Aŭ olda maljunega virin kiu smilas al birdeto.”

“Sed kiel v informiĝis pri cetera sci kiun vi klare posedas pri’m?”

“Nu” li diris “dutri homoj konas vin Pru. Ka n multaj konas vin sen ami vin. Kredeble m iom rikoltas el ties koroj ka n multo pri v restas kiun mi n scias Pru.”

En tivortoj mi trovis ripozon. Ka ho jen somer en lia voĉo tiam ka ĉiam! Mi forgesis horon ka ĉion. M eĉ forgesis ke m dev’s melki! Sed kiam mi vidis ombrojn de vesper etendiĝi trans lagon k aŭdis krepuskobrizojn levi foliojn en arbar mi turnis min por foriri. Tiam li diris—

“Pr’iaĵo mi devas demandi al vi.”

Li staris rigardante rekte en miajn okulojn ĉar ni stis preske samaltaj kvankam li stis iomete pl'alta.

“Pro kial vi faris tiom por mi titagon ĉe taŭroludo?” li diris. “Pro kial vi staris super mi kun tranĉil ka kuris al Lullingford kotope por savi min?”

Okazis profunda silento k aŭdeblis nur leviĝo de someraj branĉoj ka frapetado de kvieta akvo. Kiel mi povus respondi? Tamen li postulis respondon ti stis evidenta.

M ekmemoris vidante nimfeojn rigardi siajn anĝelojn ke m nomis min anĝel de Kester ĉe taŭroludo.

“Nu mi nur estis vi'anĝel titage” finfine mi diris. “Kvankam anĝel tre malrigardinda.”

“Se v iam volos postenon d anĝel vi povos peti de mi skribitan rekomendon” li diris ka kvankam liaj vortoj stis gajaj liaj okuloj stis plejeble seriozaj. Ka poste kiam ni diris “Bonan nokton” ka m turnis min hajmen li kri's mien—“Ne vere malrigardinda tamen!”

Ka m povis aŭdi lin ridi en arbar.

LIBRO KVAR

Ĉapitro 1: Rikolto hajmestas

Nenjam dum mia tuta vivo mi vidis tritikan rikolton kia tiu. Ni komencis grenadi ti signifas falĉadi je komenc d aŭgusto-monato ka n'lasis garbojn stari en kampoj ĝis tempo d amportado ĉar veter estis tiom bela k'i ne difektiĝis. Kutime stis ke kiam bienisto n havis multajn laborantojn l anoncis daton kiam najbaroj venu ka helpu entreni grenon. Sed ĝis tidato pro bela veter ni laboris solaj. Ni leviĝis ja frumatene tutcerte! Kiaj matenoj i stis! ĉvebis forta ebriga dolĉec en aer veninta el maturiĝinta tritiko ka sun leviĝis gracie kiel cign en vastecan ĉielon kie mankis ĉia nubo. Patrin estis tre viegla k aktiva pro varma veter kiu plibonigis reŭmamismon ka pro pens pri plifaciliĝo de labor ki okazos kiam rikolt estos jam enigita. ĉellitiĝis je kvina hor por prepari nian matenmanĝon ka poste ni foriris surhavante nur sfiĉajn vestojn por esti decaj ka kun lignaj rikoltoboteloj plenaj de malforta bier. Ni ĉiam faris bieron por riko ti signifas "rikolto". Ĉijare ni brogis multpli ĉar ni dev's provizi manĝaĵojn ka bieron al najbaroj dum amportado. Retropensante m ĉiam sentas k'ekzistis daŭra ĉarmo pleniganta titagojn. Gideon stis pli kontenta ol mi ĝis tiam vidis lin ĉar du aferoj kontentigis lin nome labori ĝis elĉerpiĝo ka plenumi celon. Vidi tutan bienon kovrita de tirikolto garbaroj solidaj ka maturaj sen i'ajn signo de kurkuli' aŭ meldu' aŭ smut estis viviga al li. Li febregis sekurigi ĝin en stakejon sed ni devis atendi ĝis anoncita tago. Jancis venos titage por helpi kolekti lasitajn tigojn. M opini's ke ŝ sidu sur supro de fina ŝarĝo kun floroj ĉirke si smila al statu kian on kutimadis starigi en tipozici ĉar ŝ aspektis parto de rikolto pro tiom da ruĝeto k or.

Mi mem fariĝis sensobtuza ka muta pro mirego. Jen vere "La Mestro ĉe'stas!" L eĉ rigardis min ka tutne malamis min! Tiom da tempo ni pasigis inter farbecaj libeloj apud lago—ĉiĉi' stis reala reala kiel ĉiutaga pan! Kiam m enmensigis kion li diris k eĉ pli kiel li rigardis mi sentis svenemon. Jadi! kiom mi kantis dum tifruaj

tagiĝoj kiam ros kuŝis peze post subita frosto ka tritiko susuradis ka tremis en matena vento!

Kiam n'eliris folioj de tardaj blankaj trifolioj stis ancor firme falditaj ka floroj de sablorhorloĝo de ŝafistoj plu restis fermitaj. Dum ripozminutoj m observis in apertiĝi dolĉe ka lante kiel timemaj koroj. Poste Patrin alportis nian tagmezmanĝon rampante tra kampojn nigre vestita kiel eta morne kolorita birdo ka kelkfoje kantante "*Horde-Ponto*" per si'olda voĉeto kiu tamen restis dolĉa. Ka post tagmeza paŭz tra longa flagranta vesper (ĉar ĉe n'on nomis vesper ĉiujn horojn post tagmez) m observis sablorhorloĝojn de ŝafistoj refermi sin ka blankajn trifoliojn faldi sin kiam venis ros. Ni hajmoniris laŭvice por melki ka poste ni vespermanĝis sur kampo ka rekomencis labori. Dume mi senĉese pensadis pri Kester kiu balde lernlaborados pri diverskolora teksad en granda urbo. Sed kiam mia kor diris ke l laboros por mi ka n nur por si mi silentigis ĝin ĉar li n diris tion ja nur mia dezir naskis penson. Sed mi ja revis pri kvindek pundoj kiujn mi ricevos riĉega sum laŭ mi'opini. Ka m ja planis kuraciĝi plejeble rapide tiel ke kiam Kester revenos post sia foresto mi staros taŭ li kun vizaĝo tiel bela kiel tide Felena sed espereble ne tiel amoremaspekta.

Finfine venis tago d amportado ka ĝ estis belega blua tago kun ĉiel' kia renversita pelvo kolor de fajenc de Worcester. Al ni promesis veni ne men ol kvindek homoj inter i inoj. M ellitiĝis taŭ tagiĝo por pretigi ĉion ordigi fajencon nian ka pruntitan sur stabloj en fruktoĝarden helpi Gideonon meti barelojn da bier en korton pretajn por ke viroj plenigu siajn rikoltobotelojn ka ĉerpi akvon el puto por te. Fruktoĝarden estis vidinda belaĵo kiam stabloj stis pretigitaj (ĉar mi povis elmeti ĉion preta sen timi pluvon dum tia tago) kun trinkpotoj ka pladoj multkoloraj ka brunaj kvaronaj panoj ka grandaj buterbuloj kun cignoforma stampo grandaj mielĉelaroj zingibropan' fromaĝo konfitaĵo ka jele' krom ŝinko ĉe un fin de ĉiu stablo ka bul da bovaĵo ĉ'alia. Eĉ Gideon ne domaĉis manĝaĵojn dum ĉititago. Laŭ nerompebla leĝo ĉe amportado ĉiu devis satmanĝi.

Jam tre frue ĉaregoj komencis ruliĝi en gregejon kun solena gajiga son ĉiu kun propra par de ĉevaloj aŭ bovoj. Ĉiu bienisto venigis siajn proprajn virojn ka propran ĉaregon ka kelkfoje du

ĉaregojn. Tirbestoj stis ornamitaj per rubandoj ka floroj ka kelkaj portis anke moton kian “Bonsorton por nia tag” aŭ “Di benu Tritikon”. Stis impone vidi grandajn ĉevalojn kun densaj hartugoj sur superhufaĵoj strigitajn ĝis i brilis kiel saten’ paŝantajn fiere kiel Lucifer ĉar i bone sci’s kiom longan tempon ĉaregisto pasigis plektante rubandojn. Anke bovoj stis belaj ĉar kornoj stis ornamitaj ka ĉirke koloj stis dikaj ĉenoj el Dolĉa Vilhelmo ka Ĝoj de Veturantoj ka tritiko. Muelisto povrul venis inter unuaj kun sia kaleŝ k olda ĉeval de diliĝenc. I tamen vere beligis ĝin ĉar stas surprize kiom on povas ornami kaleŝon s on supre alfiksas paron da flugiloj.

Venis tempo kiam mi bonvenigu helpontojn do m petis al Tim de Muelisto ke l gardu stablojn ka lasis lin kun granda viandopasteĉo ka l sidis ĉefine d un el tabloj kun duon de pasteĉ en un vango preta fortimigi birdojn ka katojn ka hundojn k eĉ koboldojn el felando kiuj eble avidus pasteĉon. Bovpelis el Plash bele ornamis siajn brutojn per tifaĵoj balanciĝantaj sur kornoj ka jen Sukey ka Moll rajdis ĉiu sur bov. I’a patrin venos nur tarde k i sovaĝadis kiel montaj fringoj. Sekvis Felena rajdanta sur taŭza pone de ŝafisto kun pankorboj en kiujn enmeti spikojn. Kiam mi vidis tiverdajn okulojn brilantajn kiel juveloj en ŝia bruna vizaĝo ruĝeta pro somer ka longajn sveltajn ŝultrojn ka tiruĝan buŝon mi presk esperis ke Kester efektive forgesos veni. Srin Beguildy ka Jancis alvenis sed ne Beguildy. Kuz el Lullingford kun dentodolorego venis k anke lia Srin. Ka jen Callardoj alveturis premitaj en grandan rikoltoĉaregon kun reto super kvin infanoj tiel k’i aspektis tutkiel nanaj bovidoj survoje al vendej. Aaĉjo Callard sidis apud sia fil vestite per sia plej bona tabakokolora palto ka sia kastora ĉapel malgre varmego. Buked estis en lia ĉapel kiun li svingis knabece dum i knare eniris tra pordegon de gregej laŭte kriante—

“Rilkto! Rilkto! Nenjam estis tiveter de Ĉiopova Di!”

Li ĉiam diris “Rilkto” malnova form de vorto “rikolto”. Poste venis Sakristian’ alta ka nigre vestita iom amara sed laŭ si’aĝo plej lerta vir rilate forkegon en tuta region’. Srin Sakristian’ portis grandegan taŭtukon el blua katunaĵo kun poŝoj por spikoj ka ti aspektigis ŝin eĉ pli granda ol kutime. Ja ŝajnis blasfeme paroli pri

ŝia spikokolektado—kvaz Salomon en sia tuta glori surmetis taŭtukon ka kolektadis spikojn.

Tivvy stis tr'elegante vestita kiel ofte faris knabinoj ĉe ĉitiaj "eventoj" ĉar "evento" malofte okazis ka en ki'alia loko krom en kirko kie ĉi' escepte kufon stis kaŝita de sidbenk eblis montri sian robon kun falbaloj aŭ tre dekolititan robon?

Tivvy portis pajlan kufon kun suba plumform el muslin florbahan robon tre dekolititan kun rozo sur brusto blankajn ŝtrumpojn ka novajn nigrajn sandalŝuojn. Jancis estis bela preterdire en blua poplin ka sunkufo ka Sukey ka Moll portis striktajn robojn el blanka katun kun diverslokaj ruĝaj rozoj.

Callard-infanoj diskuris kiel kovaĵo da kokidetoj ŝutitaj el korbo sed Tim de Muelist estis kvietita kiel mutul ĉar li sentis sin honorata pro ke l rajtis gardi tutan festmanĝon. Srin Muelisto ka Polly m atentigu stis unuaj venintoj kun laboranto de Muelisto ka Sammy de Sakristian' stranga knabo longa kiel angil kun duoble pli da dentoj ol li volis ka multegaj tekstoj en kapo kiuj elflugis kontre vin pro i'ajn kaŭzo ka frapis vin kiel burdo dum somera vesper. Stis kvaz ĉiuj tekstoj iam legitaj de lia paĉjo jam loĝis en lia granda kapo ka tial ĉiam un stis tutpreta.

"Petu do la Sinjoron de la rikolto ke Li sendu laborantojn en Sian rikolton" li diras. Sed estro de *Kruĉo da Cidro* kies edzin prizorgis drinkejon por ke l povu veni ĉar Gideon verŝajn estos bona klient en estonto rapidege avertis lin.

"Ne komencu preĝojn tal mi drinkis kvaron knaĉjo" li diras "ĉar eble i plenumiĝos pro ke v estas fil de Sakristian' ka m multegege soifas."

Viroj kuniĝis apud bierbareloj ka ĉiu novalvenint iris preni sian bieron. Towler venis ka Ŝafisto mastro de Felena alta bruna vir tutosteca ka paŝeganta kun sia longa kibo ki stis stango ĉirke ses futojn longa ka tenata ĉe mez por helpi lin marŝi.

"Nu ŝafisto!" eksonis Aaĉjo Callard "ĉu vi n jam vidis sunon danci dum Paska maten sur cia monto?"

Paŝtisto malatentis lin ĉar kunestante tiom kun mutaj ŝafoj li stis preske tiom silentema kiel muelisto kvankam ne tutĉar nenju povus. Sed patro de Moll ka Sukey diris—

“Ne sed ja lia Srin vidas lunon danci en somermez kiel ni bone scias.”

“Kiam ŝi dancas kun diablo!” kriaĉis Sukey.

“Ka ne nur kun diablo” diras Srin Sakristian’.

Ŝajne al Felena stis indifere. Ŝ estis starant’apud mi ka ŝ flustris ke ŝ preferus danci kun iu ajn ka resti svelta ka supla ol esti rigida kiel tomoŝton’ kiel Srin Sakristian’.

“Ŝi surkondukis lin sur la altaĵojn de Baal Nombroj dudek du” diris Sammy. Ka post ti ŝajne nenjo stis dirinda.

Gideon venis por decidi laboron de ĉiu vir. L aspektis tre bela en sia pura kitel bone brodita ka manikoj sobvolvitaĵ kiuj montris liajn fortajn brakojn ka l portis forkegon sur ŝultro.

“Nu estro!” voĉis olda Callard “Ki’taskon v donos min?”

“V iros sur supron de ĉarego kiun mi ŝarĝos” diras Sakristian’ “se ci promesas kapti tirapide kiel mi ĵetos.”

On ridis ĉar al nenju plaĉis tasko kuŝigi garbojn ĵetitajn de Sakristian’. Li stis plej rapida ĵetant en tutregion ka nenjam laciĝis.

“Ho!” diras Kruĉo da Cidro. “Ni metos vin sur unuan ĉevalon de plejtaŭa ĉarego por esti talisman’ de bonsorto ĉu n knaboj? Vi povos kri’ *ĵig!*⁶⁹ ka *ĉes!* ka v multe pl’utilos ol ni ĉiuj.”

Oldul akceptis tion kiel grandan komplimenton ka senprokraste postulis ke lia fil tuj helpu lin sorgrimpi.

“Nu knaboj” diras Gideon “ni jam nun komencu s ni’ntencas hajmonporti hodie rikolton.”

“Rilkto! Rilkto!” krias olda Callard. “*ig!*”

Obe’me taŭa ĉeval ekiris ka ĉiuj ĉaregoj ka portiloj lante moviĝis preter domon. Patrin staris sur sojl kapjesante ka ridetante ka dirante—

“Dankon al vi ni donas tutcerte! Mia fil Sarn ŝuld’s vin.”

Do n’eliris sub blua ĉiel’ por hajmontreni tritikon grandaj ĉaregoj kun solidaj radoj ruliĝis super stoplo dum Aaĉjo Callard ebria pro ĝoj kriadis “*ig!*” kiam li celis diri “*Ĉes!*” ka kaŭzis multan konfuzon ĉar ĉevaloj ne sci’s kion fari. Ni aliaj sekvis laŭvice trans kampojn bunte vestitaj dum infanoj ka hundoj dise kuradis ti’n-

⁶⁹ “Antaŭen!”

ka-re'n k en rilktej stakfaristoj metis ŝtipojn tutpretaj por ebligi konstrui stakojn por unua ĉareg alte ŝarĝita per gren ka ĉirkestaris apogante sin per forkegoj diskutante laboron de tago ĉiu vir planante ĉion kvaz rikolt apartenus al li ka ĉiu vir ĝojante pro gren kvaz li mem vendos ĝin. Ĉar tia stis amportad en pasintec.

Dum tagmeza paŭz m iris al alta paŝteĵ por gvati alvenon de Kester. L estis marŝanta trans forajn kampojn laŭ pado ka m restis tiom longe por rigardi lin kiu konsistigis mian tutan mondon k'on jam rekomencis labori tal mi reiris. Jen bela vidaĵ en tia loko dum tia tago. Bien nun stis tutkovrita de tritiko k aspektis kiel ora ŝildo ĉirkata de senlumaj arbaroj ka de kampoj. Ka brilantaj koloroj de roboj de virinoj kremkoloraj ĉemizoj de viroj ka dutri koloraj brilaj ĉevaloj ka malhelaj bovoj flavaj garbaroj kun siaj bluaj ombroj turoj da flavaj ŝarĝoj sur portveturiloj prezentis bildon kian on n ofte vidas dum sia viv almen ne nuntempe.

Anke son estis gajiga. Voĉoj sonoris dolĉe tra maldensa senventaer. Mi povis aŭdi oldan Callardon kri' “, ig!!” ka “Ĉes!” k aliajn virojn kri' ka Jancison laŭte ka dolĉe ridi pr'iaĵo dirita de Gideon k infanojn ĉirpi “Patrin mi jam plenigis du miajn taŭtukojn!” “Panjo m trovis ses spikojn kunaj!” El rikej venis foraj voĉoj de stakistoj ka kelkfoje kolombo rukulis en dikarbar kie vitrece kuŝis lago ka kelkfoje garol skoldis aŭ pego ridis. Nenja nub estis sur ĉiel' nek indiko de trem en etaj brizoj kiuj moviĝis en foliplenaj heĝoj. Ka jen fore du kampojn un kampon ka finfine en sama kamp estis vir pri kiu mi nenjam povis pensi sen vortoj “La Mestro ĉe'stas.”

De fore li vidis min ka svingis ĉapelon tiel ke bone formita kapo kiun m amis estis nuda kun brunaj haroj timaniere kuŝantaj sur ĝi ke n eblis ne sopiri kares'in.

Mi sobis d alta paŝteĵ ka staris apud ĉarego de Gideon sciante ke Kester venos por ricevi ordonojn de titaga mestro.

On iom ŝercis ĉar Kester tiom tardis.

“Teksisto forgesis tagon k anstate venis morgon!”

“N estu tiom frua Teksisto venu venontan lundon!”

“Li tardas sed li stas plen’de potenco ka forto ka juna sango” diras olda Callard ĉar nenju en tifamili iam akceptis aŭskulti vorton kontre Kester.

“Tiel lestaj stos unuaj kaj unuaj stos lestaj. Mateo dudek” diras Sammy.

“Bonsorton por tag Estro!” Kester krias al Gideon.

“Elkore dankon pro alveno” respondas Gideon.

“Ki’n mi faru??”

“Ĉu v iam rikoltis?”

“Ja’s.”

“Ĉu ci povas ĵeti?”

“Ja’s.”

“Do v prenu mian lokon dum mi ĉirkiros ĉu n? Sakristian’ stas aliflanke ka l ĵetas ege rapide. Sed vi n povos tro rapidi por juna Callard ka Towler.”

“Sed atentu n tr’alte sorpuŝi forkegon kiam ŝarĝ stas basa” krias olda Callard “ĉar m enmensas viron ki’iam tion faris ka l puŝis ĝin en viron sur supro. A! kiel toasto sur forko li stis povrul ka kriegis tiom ke ĉevaloj ekkuris ka forkego restis en li.”

Sed Kester laboris bone ka faris toaston el nenju. Liaj okuloj ridis al mi fojfoje k un fojon kiam malplena ĉarego tardis li venis al kie mi spikumis ka diris—

“V ancor iom fortenas vin Pru Sarn. Vi dev’s alteni ne fortenti”.

M ordigis spikojn iel ka tiel sed nenju vorto sukcesis elveni.

Poste li diris lante kun nuanco de rido en voĉo sed anke kun komfortiga son—

“Kara kara karul nenju denove tuŝos vin.”

Tuta forta vivo de vir kolektiĝis en liaj okuloj k arde rigardis min. Do li ja’ŭdis! Kelkfoje on aŭdas kvankam preske morta. Li ja’ŭdis ka memoris vortojn dum lia kapo kuŝis sur mia brusto ka mia kor disŝiriĝis pro am. Kion mi povus diri? Nenjon. Kie mi povus kaŝi brulantan vizaĝon sur kiun li restigis siajn okulojn? Tutnenje.

“He Teksist!” on vokis. “Venis ĉarego ka n’atendas cin!”

“Nenjam mi spertis amon de patrin nek de fratin nek d amatin.” Li diris tion tre softa sed fervorege tiel ke vortoj

brulstampis mian koron. “Sed se m ja konus tian sperton mi forgesus ĝin kiam vi diris al mi tivortojn Pru Sarn!”

Post ti li turnis sin abrupte ka reiris al ĉarego.

Kia tago ĝ estis! Ora? Certe jes ĝi ja stis ora! Mi spikumis senĉese k estis kvaz ĉiu brakplen stis ia valora Ĉiela trezoro. Preske ĉiuj kampoj stis malplenaj ka nudaj kiam ni trinkis teon en ombro sub heĝo ĉar veter ne fridiĝis dum ombroj plilongiĝis ĉar stis tia septembreza tago kiam tuta varmec de somer ŝajn estis disverŝata pro am al ora gren.

Sun stis basa en ĉiel’ ka rikoltobier stis basa en barel kiam Patrin frapegis pleton por ke m venu helpi pri tekruĉegoj por vespermanĝ. On ŝarĝis lastan ĉaregon ka m diris al Tim kiu stis bona fidinda gardisto ke l nun iru al kampo por hajmenveturi triumfe sur supro kun aliaj infanoj. Poste n’elportis tekruĉegojn ka barelon da hajmfarita bier tre forta ka bona ka komencis tranĉi viandon ka panon.

N’aŭdis in laŭte kri’ de kampoj k iom poste jen venis plej granda ĉarego kiun trenis blankaj bovoj de Jancis ka bovoj el Plash. Aaĉjo Callard ŝoforis k infanoj sidis sur supro kune kun Jancis svingante verdajn branĉojn ka bukedojn de papavoj ka Gideon aspektante pl’alta ol kutime en sia kitel marŝadis kontente ka majeste apud ĉarego.

Jadi kiel ŝprucis larmoj! Larmoj kiaj fluis el okuloj de Patrin ka mi pro nia ĝoj k aliaj larmoj pro postaj eventoj. Ĉar s en mezo de tigranda ora tag alvenus blovego de vento ka muĝo ka nigraj nuboj kovrantaj ĉielon ka mallum ka tondro ka forkfulmo n estus pli tragike nek men anticipite ol ŝtorm kiu bald ektrafos nin.

Ĉareg eniris ka ĉiuj ĝin sekvis kantante ka kriante ĝis i atingis barpordon de stakej.

Tie staris Parson’ kun Patrin ka m apude por beni tritikon.

“Homoj!” li diris “Ni danku pro ĉiutaga pano.”

Ka ĉiuj diris—

“Ni dankas al la Sinjoro.”

“Dio benu la tritikon kaj la mastron de Sarn” diras Parson “kaj liaj bonaj faroj revenu al li kiel kolomboj al siaj montoj.”

“Amen!” diris ĉiuj.

“Sinjorino Sarn volas ke mi anoncu ke la festmanĝo estas preta en la fruktoĝardeno kaj ĉiuj estos bonvenaj” diris Parson.

Gideon taŭenpaŝis.

“Rikolto hajmestas amikoj ka m elkore dankas” li diris. “Ke ĉiu helpinta vir postulu de mi tasklaboron denun ĝis mi plenpagis mian ŝuldon.”

Ni sidiĝis ĉe stabloj en longedaŭra lum de sunsubir. Nu sidiĝis gastoj sed ni ĉe tekruĉegoj stis plenokupataj ka n havis multan tempon por sidiĝi.

“Nu Teksisto” diris Kruĉo da Cidro “M aŭdis k’on atakas vin ĉar vi ĉesigis taŭroludon. Sed mi certne malbenvolas.”

“Nek mi. Plaĉas al mi vir ki’amas hundojn” diras Towler.

“Nek mi” diras Sinjor Callard ĉe apuda tablo.

“Sed kelkaj nek reteneblas nek forteneblas” diris Kruĉo da Cidro. “Ho mi diras nenjon! M aŭdas in ĉe drinktablo nokte. Drinkejestro stas muta hundo kun starigitaj oreloj. A°! Jen drinkejestro! Sed i celas malutilon al ci Teksisto. Stos malfacile sed i forprenos cian laboron s eble. Ka s eblos malutili vin aŭ viajn kunulojn tiel stos. I’nfluis anke Skviron.”

“Mi scias sed tamen elkoran dankon” diris Kester. “Pro Skvir mi tardis hodie. Li volas aĉeti mian dometon. Nenjo sfiĉos krom aĉeti ĝin. Li bone scias ke s l aĉetus ĝin li balde forigus min ĉar ĉiuj aliaj apartenas al l aŭ al liaj ’mikoj. Ja proponis al mi multe da mono proponis Skvir.”

“Ĉu v favore pripensos tion?”

“Jadi ne! Mi restos.”

Estis i’agrabla al mi en tivortoj. Stis kvaz li konstruis rifuĝoturon taŭ miaj okuloj. L eble foriros kurtan tempon eĉ jaron sed vivdaŭre li restos. Ka foros nur dekkvin mejlojn eĉ men laŭ flugo de korvo.

“K anke *vi* gardu vin Pru Sarn” diras Kruĉo da Cidro. “Vi multofendis Griblen tratanĉante lian hundon. Tamen vi faris tion bone mi devas diri. Certe bienisto kiu mortigas sian propran viandon volonte dungus cin aŭ vi povus fariĝi helpanto de kuracisto ka tre bone sukcesi.”

“Mia diris ke ŝ ne povis kredi okulojn kiam Pru Sarn enŝavis⁷⁰ tranĉilon” pludiris Drinkejestro. “Opini’s ke ŝ vidas fantoman

vizion. Diris ke plum faligus ŝin ŝi diris. Ka ti pruvas ke stis eksterordinare ĉar n estas facile faligi Srinon ŝi smilas kaŭĉukan pilkon.”

“Domaĉege ke m n estis tie” diris Sukey. “Mi tuj mortigus por vi hundon Sinjor Woodseaves. Kion mi donis al vi ĉe Beguildy-amŝpinado Sinjor Woodseaves?”

“Poste ludu ‘Kisi en rondo’ kun ni Sinjor Woodseaves!” diras Moll. “Ke v kisas ja bone mi scias!”

Felena taŭenklinis sin trans tablon.

“Ĉu v ludos?” ŝi diris. “Ĉu v ludos Teksisto?”

Sed ĝuste tiam on vokis d apuda tablo.

“Ĉit ĉit! Sakristian’ diros kelkajn vortojn.”

Kiam Sakristian’ parolis kvar muroj de kirko ŝajnis ĉirkelkreski k eblis flari ĝian malseketan mucidan odoron k aŭdi muŝojn zumadi ĉe fenestroj. Ĉar ĉu l legis “li prenis al si edzinon kaj ŝi naskis al li Aminadabon” aŭ “La ora kaliko frakasiĝis” aŭ ĉu l parolis dum rikoltovespermanĝo li ĉiam sonis same.

“Amikoj” diras Sakristian’ “ni spertis bonan tagon. Mi certas k’inter ni n troviĝas vir kiu ne ŝvitegis eĉ Aaĉjo Callard tutcerte.”

“Ho a°! Mi ja vere ŝvitis” krias oldul tre kontenta.

“Ka nun ni ĝuadas bonajn manĝon ka trinkon ka poste undu ludojn—”

“La popolo sidiĝis por manĝi kaj trinki kaj ili leviĝis por ludi. Eliro tridek du.”

Jen Sammy.

Sakristian’ kolere rigardis sian Srinon kvaz volante diri—

“Ĉit Sammy!” ka ŝ diras—

“Ĉit Sammy! Pejtro parolas. Ne forgesu ke vi nur enmensigas alies vortojn sed Pejtro novelpensas ĉion dum li parolas.”

Ŝi retranskiviĝis por rigardi Sakristianon tutkiel kato rigardanta turniĝantan radon.

“Mi diras ke ni spertis bonan tagon ka Sarn havas bonan rikolton ka m demandas al vi pro kial? Pro ke l stas laborema homo ka lia fratin stas laborema ka lia patrin stas laborema. Vi n trovus en dek paro°oj pli laboreman familion. Malsmile al iuj kiujn mi

⁷⁰ Envis.

povus menci' kiuj nenjam laboras iel ajn sed tutan tagon serĉas en malnovaj antikvaj malpiaj libroj. A°. Mi povus menci' iun kies vizaĝon mi hodie ne vidas ĉitie al kiu iom da laboro stus utiliga. Nu najbaroj ni ĉiuj scias ke Di helpas tiun kiu sin helpas ka kiam ni rigardas tigrandajn stakojn da greno estas certa ke n'scias ke jen ver. Ka mi volas por vi bonsorton Sarn. Ka mi esperas k'anke junulin stos laborema. Ĉar mi aŭdis ke sekva festeno por kiu ni venos al Sarn stos nupto. Ke ĝi alportu pli da prispurado ka mi nen kvankam kompreneble ni povas havi proprajn opiniojn ĉar ni scias el kie ŝi venas ka ki generiĝis en ostoj aperos en karno—"

Sed feliĉige okazis bru ĝuste kiam li diris tion k' alvoko venis da aliaj tabloj—

"Jen du rajdantoj ĉe barilo."

Ka jen juna skvirino kun Frino Dorabella. I rajdis trans fruktoĝardenon ka junulo kri's "Bonan vesperon al vi homoj kaj bonan sorton por la tritiko!"

Ĉar li ĉiam stis "saluton-amiko-bonvena"-eca al ĉiuj mi devas agnoski tion ka tial li multe plaĉis al oni.

Frino Dorabella ŝajne tutforĝesis ke ŝi kverelis kun Gideon. Ŝi haltis ĉe lia tablo ka ridetis ka ŝiaj nigraj okuloj brilis.

"Nu Sarn" ŝi diris "vi mastris la bienon mi vidas. Vi havas treege bonan rikolton. Ĉu vi proponos al ni glason da rikoltobiero por trinki je via sano?"

Mi povis vidi ke ŝi admiris lin ĉar li stis fortulo. Mi nenjam renkontis viron pli fortan escepte unun. Mi povis anke vidi ke Skvir ordonis ke ŝi reamikiĝu kun Gideon ka verŝajne li sendis junan Sinjoron Camperdine por certigi ke ŝi faros tion ĉar ĉiuj sci's ke ŝi impertinentis al Gideon ĉe *Kruĉo da Cidro* ka Skvir ne volis perdi viron kiu verŝajne fariĝos riĉa. Gideon alrigardis ŝin rekte ka malafable sed ŝi ridetadis kvankam iom venkeme k' iom pledeme. On donis al ŝi plej bonan stanalojan poton da el' ka ŝi diras—

"Sanon kaj prispuron Sarn!"

Ŝi tuj glutegis ĝin ĉar ŝi povis trinki elon egalrapide kiel iu virino ka taŭnelge en tiepoko el' stis sola trinkaĵo dum matenmanĝo de virinoj. Poste ŝi redonis poton ka klinis sin etendante manon fortirante longan ganton ka ŝi diris—

"Vian manon Sarn!"

Tio venkis lin ĉar li n povis rifuzi manon de denaska dam. Do li prenis ĝin en sian grandan pugnon ka juna Sinjor Camperdine kapjesis kvaz volante diri ke ŝ sfîce faris ka ŝ resurmetis ganton. Tutdume mi vidis Jancison rigardi ŝin kvaz timante ŝin ka samtempe abomenante ŝin. Sed rigardante Frinon Dorabella ka ŝian ŝtonecan beletecon ka poste Jancison molan ka roze dolĉecan mi n opini's ke Jancis multe b'zonis timi. Oni donis iom d el' al Sinjor Camperdine kiu salutinte ka trinkinte diris—

“Mi pensis ke eble Beguildy ĉeestas sed mi ne trovas lin.”

Srin Beguildy stariĝis ka riverencis.

“Ne Sinjor li n ĉe'stas malgre sia dev. Ka n serĉu lin ĉehajme Sinjor ĉar mi dubas ĉu v trovus lin. Sed se v venos semajnon post hodie—”

M opini's Srinon Beguildyn tre ruza. Ŝi volis doni tempon al Gideon ka Jancis ka forteni junan sinjoron laŭeble plej longe dum ŝi pripensos kiel manovri Beguildyn.

“Bone” alvokis junul dum i forrajdis. “Post unu semajno kaj certigu ke Venera ĉeestos!”

Jancis subridis je ti. Ĉiam ŝi tiel agis kiam iu menci's tistultan aferon. Ka ŝajnis al ŝi amuzege ke l tiom volemis virinon al kiu lia kuzin impertinentis ka ŝ ja stis ĉetable dum tuta konversaci'. Sed mi sobklinis min sur benkon por aspekti malalta ka por ke l ne vidu mian formon tiel ke Jancis ree spasme ekridis ka diris ke m smilegas al kovanta kokin. Ni kunridis pri juna skvir. Srin Beguildy venis al ni tre senespera ĉar ŝi n sci's kion fari pri Beguildy ĝis nuptotago. Subite ŝ elpensis iaĵon ka ridis ka frapis sin ĝis mi timis ke ŝ malsaniĝis.

“Jadi m elpensis solvon” ŝi diras. “Mi petos mian kuzinon el Lullingford kiu stas ĉitie pro grac de Di ke ŝ sendu mesaĝon al mia mestro jam ĉinokte por diri ke ŝia ĵus ege malsaniĝis (mi dev's elpensi malsanon. Iaĵon kruele s'ferigan) ka ke nenju kuracil ekzistas krom malnova fama kuracil manĝi sep panojn bakitajn de sepa infan de sepa infan je ununura bakado ka ke ŝ bone pagos (vi povos repagi post edziniĝo Jancis ĉar vi ricevos butermonon aŭ iaĵon) ka l foriros senprokriste por elserĉi sepan de sepa k estos malfacile sed ni havos pacon ĝis Mikelfesto.”

“Ho Patrin” diras Jancis kisanke ŝin “domaĉe ke v n estis fama general rajdanta ĉeflanke de Lordo Wellington k embuskante francojn!”

Ĉi’ stis aranĝita tal komenciĝis ludoj ka dancado ka m kompatis Beguildyn ĝis mi memoris kia malicoldul li stis volante vendi sian infanon kontre ŝia vol.

Nun preske mallumiĝis ka leviĝis lun granda ka ruĝokra. On akiris grupon de viroj plejparte mezaĝaj aŭ oldaj por fajfi al ni muzikon. On dancis en stakej inter stakoj d ora tritiko forbalainte pajlon. Olda Callard estis selektita kiel fajfanto ka tre fiero li stis ĉar estante plejolda l elektis melodiojn ka decidis pri ritmo ka tial li sentis ke tuta gaja aktivec dependas de l ki multplaĉas al olduloj.

“*Horde-Briĝo!*” li diras.

Bela melodi elsonoris klare en kvietaer.

Mi staris apud un el stakoj rigardante. Stis gaja vidaĵo. Gideon dancadis ĉirkebrakumante Jancison proksime ka forte. Srin Sakristian’ ŝvebis ti’n ka re’n k anke Felena gracie kiel fein. Eĉ Patrin dancis kelkajn paŝojn.

Dekdu’ fajfadis kiel nesto da turdoj sidante en un el malplenaj ĉaregoj—

Malfermu pordojn ĉielvasten...

kiam Kester trovis min.

“Do jen v estas” li diris. “Ne dancas?”

“Ne.”

“Pro kial?”

“Mi n estas ki’aliaj knabinoj.”

Li pripensis tion. Poste li diris—

“Nu mi dev’s foriri. M iras metilernadi dum dek monatoj por lerni kolorteksadon en Londonurbo. Poste mi povos popece labori en hajm ka malatenti Grimblen ka lian bandaĉon. Kolorteksaĵoj multenspezas ka m forsendos ĝin per diliĝenco ĉiujn kelkmonatojn.”

“Kiam vi do revenos?” mi diris kvaz dronante.

“Mi revenos por venontaŭgusta foir ka tiam mi venos por iom paroli kun vi Pru Sarn.”

“Eble vi forgesos.”

“M opinias ke n.”

“Nu Di benu cin” mi diras.

“Anke vin.”

Li turnis sin por foriri sed poste returnis sin.

“Sed v estas stulta ne volante danci” li diras “knabin belforma kiel pomflora fein!”

Li ridet’s k eliris.

Do li sci’s pri Venera! Ho mi hontis ka mute staris. Mi koleris anke kontre Jancison çar ŝi certe informis lin kvankam ŝi nenjam konfesis sed subridaçis ka diris ke sendube li rimarkis mian agrablan formon tra mia vesto tiel ke m eç pli hontis ka sentis çagrenon.

Patrin laciçis ka volis ke m helpu ŝin enlitiçi. Poste m rigardis el ŝia fenestro al stakej kiu taüe stis malplena krom un granda stako ka nun stis plena d obskuraj formoj. Dum mi staris tie Gideon ka Jancis subite venis çirke domangulon ka dum i’ris lante ka vidante nenjon krom un alian mi klare aüdis Gideonon diri “Ne Jancis mi certigos pri ki stas mia. Morgenokte post forir de via patro sobvenu ka lasu min eniri.”

Mi n aüdis ŝian respondon çar i stis jam preter fenestro ka cetere mi retiris min çar m abomenas subaüskultanton. Do tion l enmensigas! Li n povis fidi sian karan amatinon eç s’majnon. Mi pensis ke’ble ne gravas çar i tre balde nuptos. Ka vere çu aü n kontre eklezion mi devis çoji çar Gideon montris homan senton. Kelkfoje li ŝajnis frostita. Kiam çiu j jam foriris ka n’enportis çion el ros proksimis tagiço. Do m iris al mansardo ka skribis en mian libron. Sed unue mi prenis folion de paper ka skribis tre zorge.

“Belforma kiel pomflora fein.”

“Li parolis pri mi” mi diris ka rediris multfoje “povra Pru Sarn!”

Ka varm ekbrulis en mia kor varma k agrabla kiel arda fajro. Çar ki stas sur ter aü eç en Çiel kiu smilas scion k’admiras vin okuloj de via kara konato ka Mestro? Mi çesis demandi al mi kion li pensas pri mia leporlipo çar verdire li ŝajne tutne pensis pri çi. M enmensigis kion li diris pri pekado dum ni rigardis libelojn. Li diris ke s on çuste pripensas çi tutsimple n ekzistas. Çi malaperis kiel mortotukoj de libeloj kiam i barakte liberiçis. Pro kial vi serçus mortotukon kiam vi povas rigardi brilantan libelon? Eble li

timaniere pensis pri mi. Mia povra hida lip estis kvaz mia peko kvankam ia senkulpa peko. Ja mia peko ka mia ceter stis mia justec ka mia glor ka per i mi ĝojigis lin. Longatempe mi ploris nur pro ĝoj ka tiom da feliĉo trakuris min ke m sentis ĝin renovigi tutan sangon en miaj vejnoj ka m sentis ĝin tiom pura ka forta ke ĝ eĉ povus kuraci mian misaĵon. Efektive ti enhavis iom da ver ĉar mia lipo jam n aspektis tiom hida post titago.

Maten venis freŝa ka dolĉa ka korvoj amase flugis kun dormeme serenaj grakoj sub venta ĉiel' al nia stoplo kiu disfalis ie ka tie. Survoje al melkado m haltis ĉe stakej por danki pro gren. Kial en timomento mi pensis pri vortoj "la malbeno kara"? Kial mi pensis pri kion on kolektis per rikolto k opini's trezor kvankam ĝ estis nur kia fajril en stako? Kial fride minaca horor movis sin en mia kor kie ĉi' stis gaja ka varma kiel subita frosto frapas ĝardenon dum aŭtuna vesper kiam dalioj stas plej fieraj—vinkoloraj ka puroraj kun ĉiu petal en ordo florantaj alte super mur kun abeloj ĉirkezumantaj—tiel ke matene ĉi' stas vintre morna?

Ĉapitro 2: Beguildy serĉas sepan infanon

Jancis rakontis al mi sekvatage ke tivespere mem Srin Beguildy diris ŝajnigitan mesaĝon ka tagon post amportado Beguildy ekiris tre pretendeme kun sia fraksena stango por trovi sepan infanon ka reporti panon. Mi diris ke ja ŝajnas hontinde timaniere trompi povrulon sed Jancis diris “Tutne! Feliĉigas lin ka n’donos al li monon se l trovos sepan infanon do ki alia stas farinda?”

Ŝ aspektis dolĉa kiel dianto tiJancis. Ŝ iomete restis ĉe ni por helpi lavi telerojn ka poste ŝ sidis en kuirej dum mi laboris kudrante edziniĝvestojn. Post vespermanĝo kiam ŝi foriris Gideon diris—

“Atentu ke v ne forgesu!”

Ŝi ruĝetiĝis kiel epilobi’ ka kuris laŭlonge d arbarpado. Post vespermanĝo Gideon diris kvaze senatente “se m tardos Pru ka v volos enlitiĝi metu ŝlosilon super pordon de stal.”

Senkomente mi konsentis fari tion. Sed mi vidis lin razi sin tre zorge ka surmeti sian dimanĉokitelon do m sci’s ke n grave kiun ajn daton decidis Parson por nupto nupt okazas nun ka m alportis rozon por lia palto. L aspektis tre hontetema pri ti sed mi diris ke kiam knabo vizitas sian knabinon tuj taŭ nupto li ĉiam devas surporti floron. Ti ŝajne trankviligis lin ka l pensis ke m suspektas nenjon ka l foriris fajfante laŭte ka klare laŭ arbarpado kie folioj fariĝis rustkoloraj ka suspiroj sonis ie ka tie k aer elspiris aŭtunon ka bruete falis brunaj nuksoj per kiuj knaboj laŭplaĉe ludis konkrojn. Morna tre morna m opini’s arbarpadon post kiam alta form de Gideon ne plu stis videbla ka m aŭdis ondetojn de lago ka frapetadon de boato kontre ŝtupojn ka huhuon de strigo. Kial morna? mi demandis min ĉar nupto tibalde venos ka glorrozoj floris tritik estis sekura en stakej k en mia kor Mestro ĉe’stis? Tamen stis iaĵo en tivesper kian on sentas kiam iu ĵus mortis. Mi ĉirkiis por certigi ke ĉi’ bone statis. Patrin dormis bruna ka nana ka serena en granda lito. Bendigo stis enstale tre komforta ĉar li

stis olda ka febla ka n'enstaligis lin taŭ oktobro. Ĉi' bone statis ka m demandis al mi kian danĝeron mi sentas en aer. Nelge mi sci'ĝis sed dum kelka tempo ĉi'okazis laŭkutime. Ĉiunokte mi metis ŝlosilon en stalon sed diris nenjon. Ĉiumatene lito de Gideon stis malordigita sed mi bone sci's ke l ne dormis en ĝi. Li fajfadis gaje kiel i'alia vir ka n plu subvoĉe. Mi ĝojis pro l ka ĝojis prepari por Jancis. I uzos gastoĉambron kiu pro multjara neuzado multbezonis riparon. Do m aĉetis kelkajn rulojn da malkara tapetpaper per mia butermon ka m tapetis ĝin kvankam Gideon ne sci's. Patrin partoprenis sekreton ka ŝ ofte envenis ka kunpremis manojn dirante "Ki'bela tapeto! V ja bone laboras mia kara. Rozoj sur ĝ! Laŭ mi'opinio rozoj bonsortigas. Vi'onklin Dorcas havis rozojn en sia nuptoĉambro k eĉ n un el ŝiaj infanoj mortis nek malsanis nek ploris. M enmensigas ke ŝ ŝercis pri ti. 'Nek morti nek plori' ŝi diris. M esperas ke tide Sarn ne multe ploros ĉar mi n povas elteni sonon d infan ploranta. Sarn ade kriegis k estis terure aŭdi lin. Li surfrapadis liteton obstinege ja. Ĉiam postulegis tujan obeon ka s on tardis li n forgesis li ploradis tutan tagon ĝis li sukcesis."

Mi jam finis tegadon ka m komencis meti iom da glazurita kalikoto ĉirke tualetotablon kiam Srin Beguilty venis kurante al nia dom kvaz sovaĝulin. Ja stis tr'agrabra veter k etaj birdoj stis sur novaj stakoj k unuaj pomoj falis. Ŝi venis frumatene. Mi faradis buteron. Mi n vidis Gideonon ĉar li prenis panpecon en kampon kie li plugadis. M estis en melkej kiam Srin Beguilty enkuris.

"Ho mia kara!" ŝi krias. "Ho mia kara! Plejmavaĝ okazis."

"Jadi ki?"

Mi timegis rigardante ŝian vizaĝon.

"Li reven's!"

"Kiu? Mestro Beguilty?"

"Ja's! Ja li! Ka taŭe tiom bone progresis! Li frestos almen du smajnojn mi kredis. K i du tiom dolĉas kune. Mi ne kredis ke Sarn povus paroli tiel ĝentile kiel li nun al mi ka Jancis kia Reĝin de Maj. 'Patrin' ŝi diras 'm estas pli ĝoja ol mi kredis ebla'. Ja's k anke via frato. Trankviligis lin trovi ke liaj duboj ka timoj pri juna Camperdine malpravas. Se mi n lasus lin veni l opinius ke junul stas tie. Nenj alia eblis. Ju pl'on volas des pl'on kredas k'aliaj ĝin

volas. Sed trovinte ke ĉi' ĝustas anke li ĝustagas. 'Patrin' li diras ĉar verdire nelge mi stos taŭ Li supre ka ĉiuj beataj anĝeloj 'Patrin lasu min tranokti de nun ĝis ni nuptos. Frue stos li diras 'alie mi n petus vin. Ka ŝ akceptas'. Do m donis al i nian ĉambron ka m dormas sur kestolito de Jancis en kuirej. Mi metis plej bonan katunan peplomon sur liton ka plej bonajn litotukojn kiuj n havas flikaĵojn ka tapiŝaĵon sur plankon ka m mortigis kokon ka faris iom da bona pansaŭco ka lasas in vespermanĝi agrable ka kune taŭ fajr ka restas ekstere ĝis i finas kvankam i ja ĝentilege proponis ke m manĝu kun i. Sed novaj g'edzoj ĉu per ring aŭ ne stas novaj g'edzoj. Ka kiam i jam enlitigis m ordigadas kuirejon ka lavas telerojn. Ka m ĵus finis tion ka sidas taŭ fajr pensante pri tempo kiam m edzigis Beguildyn k admirinda junul li stis kvankam vi nun ne povas tion kredi ka l ne meritas miajn pensojn tiavida malicoldulo. Mi sidas tie tre trankvile ka pensas ke balde mi dev's rigli pordon k elrasti cindrojn kiam eta son aŭdiĝas elekstere k eniras Beguildy. Mi preske falas sur plankon.

'Nu Srin li diras 'Kie stas Jancis?'

'Ŝi dormas' mi diras.

'Ka kiam vi donis al knabin nian ĉambron ka dormas en kestolito? Post ti l enkuras ka jen i. Ka fariĝis Infer mem kredu min. Li ĵetis sur Sarnon malbenon kian mi nenjam aŭdis nek aŭdos.

'Ka malgre via ŝtelenir vi n edziĝos kun knabin li diras.

'Vi n povas malebligi' diras Sarn 'nenjo en mondo povas malebligi nun'.

'Mi ja malebligos' diras mestro. 'Ĉu n mi malbenis cin per fajr k akvo? Ĉu n mi diris ke ci naskiĝis sub tripenca planedo ka n povas gardi monon? Ĉu n mi diris ke v estos malriĉa dum vivo ka mortos en akvo? He?'

'Nu stas domaĉe por vi ke v eraras ĉar v estas saĝul sagaca' diras Sarn 'Sed rikoltiĝis ka m estas riĉul.'

'V estas nek dekone nek centone riĉa kiel juna Skvir. Liajn poŝojn plenigas francmono' krias Beguildy. 'Vi n havos mian knabinon Sarn'.

‘Mi havas ŝin ŝajnas’ diras Sarn tuttrankvile ka ti plene frenezigas Beguildyn. Li pren’s blunderbuzon kiun li havas ĉefenestre preta por vulpo ka l atakas vian fraton per kolbo.”

“Jadi!”

“Vi prave diras Pru Sarn. Mi kriaĉas ka Jancis kriaĉas ka m enkuras el kuirej ĉar m restis ekstere pensante k’eble Sarn prefer’s tion ĉar li stas en sia noktoĉemiz ka tiel bela kiel virin povus deziri sed mi n volis kaŭzi pli d embaras ol jam okazis. Sed tal mi povas eniri Sarn sternigis mian sur plankon kie li kuŝas kiel ŝtupo kion nenju pli meritus. Ĉar tre damninda vir stas Beguilty k obstina ka l konservas sian malamon jaron post jaro. Mi ja kredas ke radiko de tutafer stis ke via paĉjo postulis tikronon post kiam Beguilty decidis ke ĝ estis donac. A°! Kvankam li stas mia mi n povas ne diri ke l terure gardas domaĉon. Nu Sarn senkonsci’gis lin ka l diris ‘Prenu liajn piedojn bonvolu Patrin ka n’metos lin en kuirejon. Ĉar ĉu l mortis aŭ ancor vivas mi n plu s’feros ĉinokte’. Ja’s. Li diris tion. Ka l diris ‘Eble on pendigos min sed mi n s’feros ĉinokte’. Frida ka kvietia kiel frostita lago sed terura vir kiam on ekscitas lin stas via frato. Do m verŝas akvon sur mian ka don’s al li’om d alkohol ka nelge li vekiĝas sed mi zorgis jam ligi lin al lito. Li baraktas energie sed ŝnur stas forta ka m donadas al l alkoholon k iom poste li kvietiĝas ka dormas. Do en maten via frato foriras ka m malligas mestron ka kiam li vekiĝas mi diras al li pro kial li reven’s? Do li diras ke mava inform vojaĝas rapide ka spozeble li havas orelojn k irante monten li nur ĵus atingis Kastelturon de Mallard k iu informis lin ke Sarn nun dormas en nia dom. Malicaj on estas! Do m pretigas por li’om da matenmanĝo ka l eliras. Silentega li stas do m venas por averti cin ĉar kiam li silente koleris li stas mortiga.”

Mi diris kidamaĝon tioldul povus fari? ka n’ja scias ke liaj sorĉoj ka kiajnaĵoj stas nur sensencaj ludoj. Sed ti n trankviligis ŝin ka ŝ nur diradis konstante ke mavaĵ alvenos ka Di sendu nuptotagon rapide ka ŝ foriris hajmen sovaĝa kiel kiam ŝi venis premtordante manojn dum ŝiajn hartufojn blovis ŝtormvento. Ĉar blovis vera tempesto kiu jam komenciĝis taŭ dutri tagoj ka ĝ flugigis pajlon ka grajnoŝelojn en stakej ĝis aer stis sufok plena de polvo. En kampo mi devis stari tutapud Gideon ka kri’ tal li povis

aŭdi min. En arbosuproj aŭdiĝis muĝego kia d akvobaraĵo kiam degelis neĝo k ululado en kamenoj tiom ke v feliĉas ke v havas kvar murojn ka tegmenton. Mi diris al Gideon je vespermanĝo ĉu vento forblovos staksuprojn? sed li diris ke n ĉar i stas firme fiksitaj. Post nur du tagoj makleristo venos por taksi prezon de gren ka post tri tagoj pl'okazos nupto. Sciante tion k estante trankvila pri Beguildy ĉar li n s'feris pro bato m aŭskultadis venton tre kontente ka faris iom da toasto ka pensis pri Kester. Ĉar m ja kredas ke nenjo pli kontentigas ol muĝanta vent en kamentubo kiam ĉi' iras bone. Mi diris ĉu n'enlitiĝu frue ka Gideon diris ke jes ĉar ni laboris forte ka finis rikolton. Do n'enlitiĝis j'oka hor ka m ekdormis post minuto kun son de laŭta seka tempest en miaj oreloj.

Kiam mi vekigis abrupte mi pensis "Stas Juĝ!" Estis lumego ka teruranta muĝego bategoj ka krioj el nokto. Mi kuŝadis konfuzita ka ripetanta *Patro Nia*⁷¹ plejeble rapide ka b'daŭris ke m n adoradis pli regule enkirke. Ka m aŭdis voĉon de Gideon kiu kri's el f'nestro k aliajn voĉojn elsube k un stis voĉo de Sammy de Sakristian'. Ĉiti' konsolis min dum mia stulta tim ĉar m spozis ke Sammy povos memori tekston k ank elbuŝigi ĝin eĉ en Nokto de Juĝo. Ĉar plu stis nokto k anke frue ĉar poste ni sci'ĝis ke n'enlitiĝis taŭ n multpl'ol du horoj. Gideon kuris preter mian pordon vokante min do m ellitiĝis ka vestis min ĉar m spozis ke ĉu 'kazas Juĝ aŭ ne mi portu vestojn kvankam en bildoj savitoj portas noktoĉemizojn. Sed mi ja opini's ke m devos atingi Ĉielon tal mi povos stari komforte taŭ Sammy de Sakristian' en mia noktoĉemiz.

Mi sobkuris ŝtuparon k eksteren ka tiam mi vidis. Mi pensis k'eĉ fin de mond estus pl'elportebila ol ti ĉar tikaze ni stus prizorgataj sen pliaj rikoltoj farendaj ka sen mon gajnenda per dolor ka laboro. Stus same por ĉiuj en tihor sed ĉiti' stis nur por ni ka frakasis nin kiel ĉarrado frakasas spikon de tritiko.

Laŭta muĝado venis el nia brulanta gren. Flamis rikolto tuto tutrezulto de ĉiuj jaroj da labor ŝtofo mem d anim de Gideon ka nia stontec. N estis granda kometo nek flamanta stel furiozanta trans ĉielon por anonci finon de ĉi' nenju trumpeto de ĉefanĝel sonoranta

⁷¹ *Patro Nia* estas familiara preĝo kristana, preskribita de Jesuo en la Biblio kiel modelo de kia devas esti preĝo.

ka soneganta en nigra nokto inter tremantaj mondoj. Nur tritiko. Nur nia tuta havaĵo! Nur ki povus fari el nia Gideon bonkoran ameman viron ĉar posedante ĝin li ĉesigus sklavecان laboradon dum tago ka dum nokto ĉesus sklavlaborigi nin ka laborus kiel ĉiu alia. Nur tritiko kiu donus iom da komfort al Patrino iom d esper al mi. Nur tritiko kiu donus al Jancis amatajn infanojn rangon d edzin ĉe kamen' k eble ank iom d am. Ho mi'anim! Brulis tritiko! Mi kroĉis min al pordego de stakej ka feroce varmega vento levis miajn harojn. Nigraj figuroj kuris tra ruĝa lum kvaz en bildo d Infer sed i signifis nenjon eĉ men ol nenjon. Vaste muĝanta vento plu iris ka kunportis fajron. Mi povis vidi ke ĉi' sendube komenciĝis en horde ĉe okcidenta flanko de stakej de kie flugiris vento. Jam ne restis horde. Kie ĝ staris stis du grandaj rondaj domoj kun larĝo ka formo de stakoj sed el blanka fajr teruroplena vidaĵo havantaj dimension ka formon de stakoj sed faritaj el fandanta flam. Nenjo stis en i k estis mirige k'i staris. Fojfoje pec de ĉitifandaĵo enfalis sensone ka videblis kavernoj el grizaj cindroj ka ruĝa minaca ardetanta fajro. Tiel sendube stas kiam mondo brulos kun fervora varmego je fin de ĉi'. Ĝ eble plu turniĝados samkiel de ĉiam sed ĝi n plu stas amikaĵo ĉirkata de nebuloj agrable kolorita pilko kun bildoj de bluaj maroj ka verdaj montoj sur sia rondaĵo. Ĝ estos putrinta pro fajr kiel pom putras kiam eniĝas vespoj leĝera ka malplena ka sensignifa. Tia stis nia horde enfalanta sen son kvaz iu interne ti'n ka re'n movis sin. Ĝ estis pli doloriga vidaĵ ol se ĝ tutkolapsus ĉar kvankam ancor stako ĝi ŝajnis ŝerco d iu demon' diranta— "Do kion fari? Jen viaj hordestakoj! Faru hordeopanon ka manĝu!" Mi rigardis tidu demondomojn kun rondec k alto de niaj bonaj hordestakoj ka m memoris hordeon ho dolĉan hordeon susurantan en tagiĝa vento! M enmensigis plugadon por ĝi kun tiom d esperplen ka semadon inter semado de vintra tritiko ka semado de somera tritiko Gideon ka m paŝis ti'n ka re'n sur kampoj kun sakoj da semoj sur ŝultroj aŭ kun profunda ronda kovril povanta enteni sfiĉajn semojn por un ti'n-kaj-re'n-transir de kampo ka n'larĝe svingis brakojn laŭ granda donema movo kvaz ni nutras tutan mondon ka tion mi multamis rigardi. Ĉar rikoltado kvankam agrabla por rigardi kiel stas ĉiuj agoj dum jar ĉe bien stas avara maloferem'ago kompare

kun semado. On devas klini sin super ĝin k arigi ĝin al si ka premi ĝin al sia sin' ĵaluze ka firme teni ka preni ĝin. Ĉiam troviĝas avarec en rikoltado per falĉileto laŭ mi'opini. N en rikoltado per falĉil ki'stas grandskala detrua movado kun nek am nek koler kiel juĝado farata de Di. Nek en draŝado ki'stas plena de koler sed tutsen dezir aŭ vol havi aŭ konservi. Sed rikoltad estas nur avarado samkiel semad estas nur donado. Ĉar jen on iras ti'n ka re'n sur vastaj kampoj portante kion on tiom zorgoplene konservis draŝinte ĝin el grajnoŝeloj ka konservinte ĝin ĝis ĉitimomento. Kvankam ĝ estas onia tuthavaĵo ti n gravas on prenas ĝin po grandajn manplenojn ka disĵetas ĝin tutne volante reten'iom. On iras tutrekte taŭen ka ju pli granda stas man des pli granda stas kontento k on disĵetas ĝin ambeflanken tiel ke person' ne konanta kamparkutimojn eble dirus jen frenezul. Ĉar aspektas kvaz on manĝigas ĉiujn birdojn de region' ĉar ĉiam postsekvias en sulkoj korvoj ka sternoĵ ka multaj birdetoĵ kiuj stus tutne profitdonaj s on volus vend'in por manĝi.

Stas bele vidi orajn semojn ĵetataj enaeren dum sun brilas sur in ka leĝera printempa vento disblovas in tien ka ien aŭ s estas vintra tritiko do verŝajn estas kvieta bruna tago milda kiel matura bier rilate kolorojn k odoron d aer. Mi ĉiam pretis por semado kvankam ĝi n multe plaĉis al Gideon k efektive li ŝajnis domaĉi disĵeti grajnojn ka l semadis tro maldense ka tiel malŝparis teron ka laboron. Mi pensis pri ĉiĉi' ka pri belaj vesperoj kiam Patrino ka m promenis al kampoj por rigardi junan hordeon sorpuŝi sin verda ka maldensa ka pli densiĝanta ĝis bruna ter tutverdiĝis ka horde kreskadis pl'alta rigida ka pinta ka poste ĝ moliĝas ka longiĝas eĉ pli ka vento trakuras ĝin kiel boato sulkas akvon ka finfine trovas voĉon ka kanton ka levas verdajn plektitajn spikojn por ŝvele maturiĝi ĝis i staras perfekte kvaz Sinjoro ĵus formetis d i Siano manon k i stas el puror. Oraj folioj oraj tigoj oraj tuberoj kiel kapoj ka tuberoj krome havas orajn barbojn. Tamen honesta or ka n tior kiun on nomas malben. Ho kiom m amis dum tikvietaj dimanĉmatenoj kiam m iris al puto ka por nelonge demetis sitelejn k eliris en grenkampojn kuŝantajn sub vasta palblua ĉielpaco kvaz bestoj sataj ka ripozantaj! Etaj birdoj mallaŭte pepis kontente aŭ softe kantis. Krispiga brizo blovis ka korvoj alte flugis en ĉiel' ka

dua florado de palaj oraj floroj sur lonicer kontrastis kun blu. Stis varmec kiu ĉirkis onin ka reĝineca donaco d odor de gren. Al ki'aliodor ĝi smilas? Ĝ enhavas tiom multe pl'ol aliaj dolĉaĵoj. Enestas somer ka frost. Enestas akvo ka kor de siliko kiun gren sorbas en siajn kavajn tigojn. Stas pan en ĝi ka vivo por homoj ka bestoj.

Ĉi-ĉiaj pensoj kunfuzaj ka konfuzaj plenigis min dum mi firmtenis min al palisar tro paralizite por movi min ka sekiga vento blovdadis sur mian vizaĝon. Kelkaj malfeliĉoj instigas eksalti k impeti por savi sin sed aliaj stas tro fortaj por ti ĉar i devigas nenjon fari. Tiam paralizo falas sur animon kiel paralizigo de kuniklo kiam ermen' arde rigardas ĝin ka ĝ scias ke nenjo pli stas farebla.

Fajr jam atingis du plej grandajn stakojn de tritiko. Ĝ atingis in k i n plu stis. Bald i smilos hordeon. I stis bonaj stakoj ja solide kvadratecaj ka plejble altaj sen risiko de faliĝo ĉar ni tiom rikoltis ke ni havis sfiĉe da spaco nur per tialtec. Ka ja stis bona tritiko kun longaj tigoj ka tutsen meldu'. Ĝi necesigis plejmultan tempon ka por semi ka por rikolti kaj dum portado plej grandaj ĉaroj uziĝis por ĝi tuttage. Ka nun ĝi n plu ekzistis! Ĝ estis granda fajramas' en kiu stis du nigraj formoj de stakoj ka balde fajr forkuros ka n plu stos son restos nur du grizblankaj domoj por demonoj kun tristaj ruĝaj glimoj en internaj kunfaliĝantaj koridoroj. Staris pliaj stakoj de tritiko apudheĝe sed plej apud brulantaj stakoj stis aven. Aven delikate bela kiel filikoj por tablo de dam! Dolĉega tiaven bele delikata kia somermeza herbo oriĝinta. Mi ĉiam plej amis avenon. Ka subite m estis vera patrin d aven. Fajr konsumu tritikon ka hordon sed ĝi malhavu mian avenon. Mi transgrimpis palisaron ka kuris al loko ki'etaj figuroj sin movis. Mi kaptis Gideonon je maniko.

“Vi dev's savi avenon!” mi krias. “Ho savu avenon delikate belan!”

Sed li diris nenjon. Li laboris kvaz frenezul ka m vidis ke l strebas savi avenon—avenon ka stakojn apud heĝoj. Li ka Sammy fosadis akvofluejojn inter brulantaj stakoj ka n brulantaj.

“Kie stas Tivvy?” mi demandis ĉar nun malfreneziĝinte mi serĉis helpon d iu ajn.

“Ŝ iris alvoki Pejtron,” diris Sammy ŝvitanta ka ĝemanta super sia ŝpato ĉar fajr alproksimiĝis.

“Ĉu m rajdu Bendigon por venigi helpantojn?” mi diras. “Aŭ ĉu m kolektu sitelojn por komenci alporti akvon?”

“A° tion?” diras Sammy. “Faru tion ĉar helpantoj multtro malfru’s.”

Nenjun vorton diris Gideon. Mutiga frenezo trafis lin ka l laboris kiel dekopo da viroj. Pro terurigo ka fortostreĉo k intensa fajrvarmego ŝvito fluis kvaz river sur lia vizaĝo ka liaj vestoj stis kvaz li ĵus venis el akvo. Ka ĉar l estis tiom malseka kaj proksima al fajr li malaperis en nubo de vapor ki aspektis tre stranga kvaz li sorĉiĝis aŭ jam stas en Infer.

Mi malligis Bendigon ka brutojn kaj bovinojn kiuj kuŝis en gregej k i brue galopis en arbaron duonfrenezaj pro tim. Mi vekis Patrion ka diris ke ŝ dev’s vesti sin ka veni al lago por ĉerpi dum ni pasigos sitelojn de man al man laŭlonge de homa ĉen. M arigis ĉiujn sitelojn k ujojn ka pensis ke stas b’daŭrinde ke malgre granda lago plena d akvo ni povas estingi incendion nur per timalmultakvo kiun ni povas meti en etajn sitelojn. Ka poste m pensis ke kiam on plendas pr’io kaj tio ka tristas ne kulpas kosmo ĉar ĝ smilas grandan lagon plenan de bon sed kulpas nanec de siteloj.

Patrin tre konfuzita ka kvieta iris kvaz infan kun mi.

“Ĉu m nun ĉerpu Pru?” ŝi diras.

“Vi povas komence pretigi sitelojn” mi respondas. “Sed vi plejble rapide ĉerpu post dutri minutoj kiam ni venos.”

“Nun Sarn” diras Sammy “vi dev’s ĉesi fosadi k anstate porti akvon.”

Ĉar kvankam eble ŝajnas nekredeble dum tituta terura nokto kvankam Gideon plej multe laboris Sammy ka m ordonis. Gideon okupis sin freneze pri postulitaj taskoj ka daŭrigis kiam ne plu’tilis laborante kvaz bov en draŝej. Li forĵetis fosilon pro dir de Sammy ka venis kun n’al lago. Patrin streĉe ĉerpadas. Ŝ aspektiĝis konstante pli nana dum problemoj amasiĝis ĉirke ŝ kvaz manĝinte magiaĵon ki’nevidebligis ŝin. Ŝi smilis brunan birdeton kiu pormomente surterigis sin apud akvo dum migrado ka poste forflugis al nekonata loko.

“Nun jen venas Pejtro dank’ al Sinjor” diras Sammy. Li stis bravul tinokton kaj dum daŭris fajr li diris sol’un tekston ka ti stis n evitebla “Brulado kaj fajraĵo” kvankam tutcerte li memoris multpli.

Ja vere venis Sakristian’ kurante tr’arbar ka Tivvy proksimsekvis ka vento alportis koleran voĉon de Srin Sakristian’ longe maltaŭa kiu plendis ĉar ŝ estis sola.

“Nun” diras Sammy “Pejtro iru al stakej ka ĵetu akvon por ’stingi fajron Tivvy prenu malplenajn sitelojn tuj kiam li malplenigis in ka kuru kun i al Srin Sarn ka vi ka mi ka Pru kuros portante plenajn. Mi taŭe pensis pri homa ĉen ka pasigi de man al man sed ni stas tro malmultaj Sarn.”

Gideon parolis unuan fojon.

“Nenjam” li diris ka lia vizaĝo stis sovaĝa ka pala “nenjam mi havis multajn helpantojn nur min mem ka tidu.”

Ka dirante tion li metis brakon trans sian vizaĝon kiel li kutimis kiam li stis knabo k okazis tragedi ka l ploris.

A° mi diras al vi ke ne multaj volus vidi tion fortan mastreman viron ki’ploris kiel knabeto.

“Kion do Sarn!” diras Sakristian’ skuita kiel ni ĉiuĵ “Ne faru tion! La Eternulo donis, kaj la Eternulo prenis.”

Je ti Gideon venkis sian emocion.

“Eternulo?” li diras. “Ne. Eternul ne faris. Faris Beguilty. Kiam n’estingis stakojn mi kaptos ka rostos lin.”

Mi n havas vortojn por esprimi teruran tonon de lia voĉo. Mi volis demandi per ki l scias — se vere l scias — sed mankis tempo por paroli. Ni kuris ti’n kaj re’n ĉiu kun du plenaj siteloj kaj post hor aŭ iomete pli ti sfiĉis por lacigi fortan viron des pli virinon. Porti akvon stas facile se n urĝas k on uzas vekton. Sed kure stumbladi tra rostanta varmego kiel stis plejparte ka sc’i ke se ni lantos aven forbrulos k eble sen lanto sfiĉas por elĉerpi ĉies kuraĝon. Aven ja forbrulis. Fajr saltis trans digon ka leviĝis nova granda flamego. Mi senspiritiĝis tiam ka kvankam mi plu kuradis mi n plu ’speris.

“Ho m tiom lacas” diras povra Patrin. Sed mi n povis lasi ŝin ripozi.

“Se ni n povos savi ĝin” mi diras “vi nenjam liberiĝos de porkoj Patrin.”

Do ŝi reklinis sian povran oldan dorson dum ŝi staris ĝistalie en akvo malgre reŭmamismo. Oni kri's ke ni savu grenejon ĉar se ni perdos grenejon ni perdos anke domon. Aŭdinte tion Patrin ĉesis ĉerpadi do m devis doni titaskon al Tivvy ka n'devis reporti niajn proprajn malplenajn sitelojn. M unfoje sorrigardis ka vidis Patrinon elportadi aĵojn el dom. Poste mi rigardis in ka trovis ŝian kudraĵaron ka kupran fruktokaserolon ka brodaĵon kiun ŝi faris kiam ŝi estis eta ka siluetan bildon de Patro kion bofrato de Parson ki'stis parte fremdlanda tondis el nigra paper. On opini's ke sendube li stis simplul ĉar li ludis kvaz infan per paper ka tondil kvankam on dev's agnoski ke l bone faris ĝin k on diris ke ĉar li stas parte fremdlanda li scipovas nur tiaĵojn fari. Kvankam Patrin timegis Patron vivan ŝi tre strange alte taksis ĉitibildon. Do jen ĝi kun aliaĵoj ka ses potoj da prunkonservaĵo ka Katinj en korbo.

Nur kiam tagiĝis ka vento ĉesis ka nebula kvieta pluv ekfalas finfine n'estingis fajron. Nu eble ĝi estingis sin mem ka n'sukcesis savi grenejon ka domon. Ruĝa lum foriris el ĉiel' ka spegulata brulad el lago. Tutnokton on povus kredi k akv en lago fariĝis alkohol k anke brulas. Ĉi' speguliĝis konfuz-ka-renversite ruĝflavaj flamoj fum pelata de vento blankarde brulantaj stakoj kavaj ka kliniĝintaj biendom ka grenej ka n'mem aspektis kvaz pupoj en tumulto.

Nelonge post fin venis Srin Sakristian' kiun teruris Bendigo ki'galopis snufegante kaj distretante tr'arbar tiel ke ŝi opini's k estas Nigra Ĉasisto. Stis multaj kavaj arboj en Sarnarbar ĉar stis malnova arbarteren' do ŝi rampis en kavan arbon ka restis tie ĝis lumiĝo. Sed estante interne ŝi n povis eliĝi ĉar ŝi estis eksterordinare dika ka portis multegajn vestojn ka kvankam dum timkrizo ŝi sukcesis enpuŝi sin n estis facile liberigi sin kiam forpasis timkriz. Sed kiam ŝi sukcesis ŝi rapide preparis por ni matenmanĝon ka ja n'bezonis ĝin ne nur pro pasintaĵoj sed por fronti tagon.

“Nu jen Tivvy ka Pru palaj kiel fatomnoj⁷²” ŝi diras. “Ka vi Srin Sarn dev's esti en lito k enliten vi ja 'ros post manĝo ka maĉ. Ka vi

⁷² Fantomoj.

Sarn! Ho vir vir vi timigas min pl'ol Bendigo ja vere! Nu do kie stas nia manĝo? Kuniĝu kuniĝu manĝu ka maĉ homoj!”

Ŝi diris tion samkiel taŭe ŝi diris “Kuniĝu por ludi Multekostajn Kolorojn”.

“Sed mi volas sci'i” diras Patrin “kiel Sakristian' ka Sammy eksci's ke niaj stakoj brulas?”

“Mi sci's” respondis Sammy “ĉar Tivvy ka mi revenis dumnokte de muelej ka n'vidis Beguildyn ŝteliradi tre silente ĉdirekten. Do mi diris al Tivvy ke ni sekvu ĉar mi jam gvatis Beguildyn delonge ĉar li stas fioldul ka Potenca Di fortenas sin de li. Per fruktoj vi konos ilin. K estis stranga hor por veni al Sarn ĉar l enlitigas ĉiam frue. Do ni lante sekvis lin tenante nin tre maltaŭaj. Ka tuj kiam n'atingis randon d arbar grandeg'ekflamis en malproksimangul de stakej ka post minuto Beguilty kuregis laŭ arbara vojeto ka n'preske ne povis kaŝi nin. Tuj kiam li preterpasis ni kuris al stakej ka stis eta stako en angul ka tujapude stis ĉiti'.”

Sammy montris kovrilon de tindrujo de Beguilty ka n'ĉiuj rekonis ĝin ĉar li skribis sian nomon sur internaĵo per ruĝa farbo pro fier pri sia skribokapablo.

“Vere ja stultul faligis ĝin” diras Srin Sakristian.

“Ne Patrin” diras Sakristian' “Beguilty n estas stultul. Man d Eternul forprenis de li kovrilon ka ĵetis ĝin ti'n por ke Sammy vidu ĝin. Ja's stis tiel.”

“La pokalo estas en la mano de la Eternulo Psalmo sepdek kvin ok” diris Sammy.

“Tamen n estis pokal” ridis Tivvy kiu ĉiam parolis stulte kiam ŝi ekscitiĝis. “Estis duon de malnova fera tindrujo.”

“Jen malbenaĵo!” ĝemis Patrin. “Li malbenis mian filon per fajr k akvo ka ĉiti' stas unua. Nur Kara Di scias ki stos dua. Stas peko kiun vi manĝis Gideon. Jen ĝi damaĝas bienon ekde tiam. Ja's depost kiam mia povra mestro mortis kun botoj sur piedoj stas s'feriga loĝej ja s'feriga pro porkoj ka reŭmamismo k eterna plugado ka nun ĉi' malestas kvaz nenjam ĝ ekzistis.”

“Ja's fajr stas avara manĝanto” diris Srin Sakristian.

“Mi ekstermos ilin en momento Nombroj dek ses. Nin ja formanĝos ĉi tiu granda fajro. Readmono kvin. Fajro ekstermos la palacojn de Ben-Hadad. Jeremia kvardek naŭ” diris Sammy.

“Jen tri tekstoj kunnaskiĝis! Bravul bravul!” krias Sakristian.

“Tamen ja Beguild’indas ekstermiĝon” komentis Srin Sakristian.

“Ka horror de tia malvirto” diras Tivvy “stas ke ĝ estas ensanga. Ĝi transiras de patro al infan. Nenjam on scias kiam ĝi montros sin. Vi mirigas min Sinjor Sarn ja vere ĉar v planas edzinigi infanon de viper. Nenjam plaĉis al mi Beguildyjoj ka speciale ne Jancis.”

“Ja vere knabin pravas” elkri’s ŝia patrin ka Sakristian aldonis—

“Ki stis generita en ostoj eliĝas en karno.”

Gideon ĉirkerigardis kun vizaĝo griza kiel d oldul. Li nenjam estis kiel taŭe post tinokto. On ne povas bati kapon de bovo per male’ ka spozi ke ĝ restos neŝanĝita. Li penis paroli sed vortoj tre lantis. Ĝuste tiam estis hufbatoj ka brua irad ekstere ka Bendigo trotis preter fenestron.

“Ha!” diras Gideon k iris al pordo.

Mi sci’s kion li celas ka rapidis post li. Bonfortune venis bovinoj el arbar softe elĝemante plendojn ĉar jam delonge pasis melkhor. Do anstate pledi por Beguildy m diris—“Rigardu bovinoj venas! I elsekiĝos se ni n melkos in.”

“Ja’s vi dev’s zorgi k’i n elsekiĝu” Srin Sakristian avertis elĉambre. “Kuzo de bofrato posedis plej bonan bovinaron kian on povus vidi. El Chesire li stis. Bonegaj bovinoj stis ka nenjam malsanis ka ĉi’ abundis en tidom bona lakto ka buter ka fromaĝo ka multe multaj siteloj da senkrema lakto por porkoj ka bonaj dikaj porkoj stis ka brava dika vir estis bofrata kuz ka brava dika virin stis li’edzin k estis dek du bravaj dikaj infanoj.”

Mi devas diri ke Srin Sakristian kiu mem estis tre dika ĉiam taksis homojn laŭ dikec ka ŝ opini’s ke s on maldikas pli bon’estus ne naskiĝi.

“Ja’s” ŝi daŭrigis “i ĉiuj stis grasoplenaj kiel buter ka ĉe kirk i plenigis benkon ĝis kreviĝo ĝis tago kiam li permesis lakton elsekiĝi. A°! Ti stis mava tago por i. Postrestis nenju prisperado. Bovinoj maldikiĝis ka porkoj maldikiĝis ka post iom da tempo maldikiĝis anke famili ka nelge el tigranda grasa famili nenjo restis krom dek kvar mizeraj birdotimigiloj.”

Tivvy s'feris je spasma de ridaço ĉar rakontoj de ŝia patrin preske ĉiam ridigis ŝin kvankam multajn batojn ŝi ricevis pro ti.

“Unue melku knaĉjo” mi diras al Gideon “ka poste iru al Ŝtona Dom.”

Di pardonu min ĉar mi tiel trompe parolis sed mi volis savi lin de peka murdo. Tuj kiam l eniris melkejon m alkondukis Bendigon al pordo ka kri's al Sakristian ke l rajdu kun Sammy ĉar Bendigo povos porti ambon ĝis Plash ka kaptu Beguildyn ka tuj irigu lin al paro'a polican' en Lullingford por savi lin de Gideon. Ĉar s on malliberigos lin Gideon ne povos atingi lin ka l s'feros nur kion ordonas leĝo.

“Mi komprenas” diras Sammy. “Mi falu en la manon de la Eternulo nur mi ne falu en manon homan. Du Samuel dudek kvar. A° do n'nepre iru Pejtro.”

“Ĉu anke Jancis ka Srin Beguilty malliberiĝos?” demandis Tivvy.

“Tutne! I faris nenjon. Fakte Jancis estas ja bela knabin ka se ŝ posedus ĝustan spiriton ka humiligus sian animon kaj kondutus malvante m opinias k'eĉ mi mem edzinigus ŝin” diris Sammy.

I foriris ĝustatempe ĉar Gideon kuris el melkej ka kri's k'i haltu.

“I kondukos Beguildyn al prizono” mi diras. “Vi n metu murdon sur vian animon knaĉjo jama mav sfiĉas sen ti.”

“Senpezigus min” li respondis strangamiene. “Ĉi' amasiĝis en mi. Sfoke sufokas min. Senpezigus min mortigi tifriponon. Nun mi nenjam resaniĝos.”

“Tamen vi n rajtas mortigi patron de via stonta edzin” mi diras.

“Edzin? Ki'edzin?”

“Nu Jancis. V edziĝos kun Jancis post nur semajn.”

“Kion?” li diras kun sovaĝa feroca mien. “Ĉu ci opinias ke m edziĝos kun filin de Diablo? Mi diras al ci k'eĉ por savi al mi vivon mi n edzinigus ŝin. Ne ja nenjam m akceptos revidi tiknabinon ne propravole ne krom se ŝ perforte sintrudos al mi.”

“Gideon! Gideon! Ne diru tion! Ho Gideon troviĝas en vivo plivaloraĵoj ol mon ka tiaĵo. Lasu ĝin knaĉjo. Nia sorto n estas riĉiĝi. Vivu kontente k edziĝu kun povrinfan' kiu tiom multamas vin ka s mon alvenos despli bone. Ka se n do n gravas. Sed rifuzi

edziniĝon al povra knabin post ki okazis vi n rajtas. Via kor ne povas esti tiel dura.”

“Ĝ estas. Monto granita kvarca pirita n estas tiom dura. Se v lasos tiknabinon alproksimiĝi m mortigtretos ŝin kiel tineon. Tiel m avertas vin. Putraj! Tiaj i stas. Kia patro tia ’nfan. False ridetanta vizaĝo sed iun minuton iun ajn minuton ŝ eble forbruligus domon. Ne surprizus min se hieranokte ŝ portis al li silikon ka tindron. Camperdine prenu ŝin kun bonven. Mi donacas ŝin al li.”

“Tamen Gideon vi stis preske g’edzoj pasintsemajne. Se naskiĝos bebo ki okazos?”

“Bebo? Ki? Infan de mi ka ŝi? Mi diras al ci ke s i’tia okazos mi strangolos ĝin. Aŭskultu! Nigra stas sango.—Aĉa vulpa fia. Tiaj i stas. I n meritas vivi. Dank al Di on pendumiĝas pro brulatenc. Mi certigos ke l pendumiĝu. Ka diru al knabin ke ŝ restu for de mi. Ti stos plejbona por ŝi.”

Mi n kuraĝis persisti. Kion mi povus diri kiam homa bonkorec en mia povra frato jam forbrulis en fajr ka n plu ekzistas? Nur malsaĝul ĉerpas ka ĉerpas el seka putro. L aspektis eĉ pl’alta starante kun dors al senluma ventskuata arbar kiun nun skurĝis pluvego kiu pasintanokte povus savi ĉion kie aŭtuna ŝtorm ĝemis ka sekaj folioj kirliĝis ka moviĝis en aer kiel kreskaĉoj dum akvotrem en lago. Liaj vestoj ancor gluiĝis al li flamlekitaj kaj fulgaj de fajro. Lia vizaĝ estis malpura tiel ke faltoj taŭe ne viditaj tre klare videblis k estis pli da faltoj ol hieranokte mi certis. Liaj okuloj kutime fridaj kiel akvo flamis de malam kiam li pensis pri Beguildy aŭ pr’iu en tifamili sed alifoje lia vizaĝ estis malplena ka senesprima kia vizaĝo d elĉerpita ka detruiginta senesperul perdita vizaĝo. Mi diris ĉu n’fosu terpojn ĉar m opini’s ke lin iomete konsolos konstati k’io restas al li. Li venis senvorte ka laboris forte ka bone sed iam kaj tiam li haltis ka silente strange rigardis fridan silentan lagon nubkovritan ĉielon ka ŝtormoplenan arbaron. Ŝajnis al mi ke spirito de vir stis kia birdo kun rompita flugil. Ka tagmeze kiam m iris por prepari nian manĝon li mankis kiam mi batis pleton ka m trovis lin en stakej kie ancor subbrulis amasoj da cindroj li kuŝis sur vizaĝo rigide ka surde kiel mortinto k efektive mi ja kredas ke lia kor ek de tiam jam estis morta.

Ĉapitro 3: Malbena mortiga

Stas malfacile ja tre malfacile priskribi tivintran sezonon kiun ni travivis post tinokto de tristo k amara kordolor. Ĉar kiam plum jam skribis vortojn de bela signifo ĉagrenas ĝin skribi vortojn de dolor ka mav. Sed trista ka mava stis titempo ka n utilas nei tion. Dum multaj tagoj post fajr bienlabor ĉesis kiel ofte okazas post morto. Gideon nure volis ataki Beguildyn aŭ se n tion do devigi lin s'feri plej grandan leĝpunon. Srin Beguildy devis forlasi Ŝtondomon ĉar posedanto ne volis tie viron kiu bruligis stakojn nek lian familion do por elig'in li pretekstis ke lupago tardas. Ĉi' stis vendita ka Srin Beguildy ka Jancis iris al Silverton kie Beguildy stis en prizon atendante asizon k i havis nur vestojn en kiuj timomente i staris. Tamen povra Jancis ne staris ĉar kiam ŝ aŭdis teruran raporton pri kion diris Gideon ĉar mi petis ŝian Patrion laŭeble plej milde informi ŝin ŝi falis sur plankon ka movetis nek manon nek piedon ka diris eĉ nenjan vorton. On portis ŝin al ĉar' el Plash Bien en kiu forveturos ŝi ka ŝia Patrin k on diris ke ŝ kuŝis en ĝi kvaz rompita flor. Eble ti stis bona ĉar se ŝ ne perdus forton ŝi klopodus vidi Gideonon ka m opinias ke l batfaligus ŝin pro si'amara brulanta furiozo. Ŝajne trankviligis lin rakonto pri mizer ka tagon de forir li'ris al lok en arbar el kiu li povis vidi ĉaron preterpasi ka l staris tie sobrigardante ĝin veturigata de moroza farmlaborist al kiu malplaĉis intermiksiĝo kun famili' kondamnita de homoj ka povra Srin Beguildy sidis tutolda ka senorda en ĉar' ka Jancis kuŝis sur pajl en fundo kiel blanka figur el vaks. Mi scias ĉar Timmy de Muelist estis tiam en arbar ka l venis kurante al mi timigite preske ĝis morto por rakonti al mi ĉion.

“Ho Pru Sarn! M estis en arbar por dutri nuksoj” li diras “ka m vidis Sinjoron Sarn marŝantan sola ka trista ka terureca ka m timis do m kaŝis min en arbo. Ka Sinjor Sarn iris sub branĉojn de granda betul kie preterpasas voj en arbar. Ka nelge m aŭdis rulbruadon ka m vidis ĉaron el Plash ka Srinon Beguildyn

plorantan ka kriantan senbride sed mi n povis vidi Jancison. Do m grompis arbon por vidi ĉu ŝ estas en fundo de ĉar' ka tie ŝ estis. Ŝ aspektis kiel bild en kirko pri infanin kiu kuŝas kvaz morta en dom k on alvenigas Sinjoron ka l diras 'Leviĝu' tion Li diras. Tamen Li n diris tion al Jancis. Ka m timis ka m deiris silente d arbo ka m vidis Sinjoron Sarn kiu sobrigardis ĉaron ĉar vi scias ke stas nana deklivo tie. Ka lia vizaĝo teruris min ka m pensis pri forkur sed l ekmovetis sin do m ne moviĝis pro tim ke l venos mien. Li longe ka minace rigardis ĉaron ĝis knarado preske n aŭdeblis ka n stis pli laŭta ol pasinta bardburdo ka poste stis nenja son krom de turdo kiu rompas konkron kontre ŝtonon. Ka Sinjor Sarn levis ambajn pugnojn⁷³ ka skuis in je ĉar' ka ho Pru! lia vizaĝo smilis tiun de Sinjor Jehov en libro de Pejtro kiam Li n flanketurnas Sian koleron. Ka poste li lante foriris rigardante al ter ka turdo ancor batadis konkron kontre ŝtonon ka m kuris al vi."

Ka tiel plej decema vir en nia region rigardis foriri sian karan knabinon knabinon smilan al nimfea burĝon' ka kiu fidele amis lin.

Mi diris al mi "Jen malben. Ho titerura malben."

Sed post ti Gideon ŝajnis pli trankvila. Ka m kredas ke taŭe li malfidis propran koron timante ke se Jancis venus al li li kapitulacus. Lia 'ntenco stis ne kapitulaci sed denove rekomenci ka taŭeniri rekt'al sia fiksita ka fina cel.

Sekvan matenon post forir l elportis plugilojn ka venis al kuireja pordo ka vokis al mi dum mi preparis kaĉon por Patrin kiu denove stis en lito ka ja restis en ĝi ekde post fajr ka manĝis nenjon krom kaĉon ka griaĵon ka l diris—

"Venu plugi grandan kampon ĉu n Pru?"

M opini's ke stas plejbone tutne rifuzi al li do m diris Ja's mi venos. Mi portis kaĉon al Patrin ka diris ĉu m petu Tivvyn veni ka sidi kun ŝi de temp al tempo pro ke ni komencas plugi ka ŝ diras—

"Ho tiamara plugaĉado! K eble tuta gren forbrulos kiel taŭe. Nenja ge'dziĝo nek dom nek porcelano nek nenjo nur porkoj denove en printempo! Sed eble mi n vidos printempon. Mi stas tre n'sana Pru. Vi dev's venigi por mi helpanton de kuracisto mi n dubas."

⁷³ Pugnojn.

Ka vere ŝiaj povraj manoj stis tre maldikaj ka ŝrumpintaj ka ŝia nana vizaĝo pli bruna ka magra ka ŝ eĉ pli multe smilis perdiĝintan birdon aŭ kaptitan beston ol taŭe ka pli timanta Gideonon.

“Ne lasu lin eniri taŭ mi resaniĝos” ŝi diradis. “Ne lasu mian filon Sarn veni ka sentigi ke m estas ŝarĝo. Li n amas min. Li deziras ke m estu morta ka sub ter.”

Ka ŝ levis manojn petege.

Do m venigis Tivvyn por prizorgi ŝin ka dum tituta vintro da malhela veter malhela interne k ank ekstere ni plugadis enterigante stoplon de tibona perdita rikolto nia. Ni stis eĉ pli malriĉaj ol taŭe ka nenjo prosperis kiel taŭe ĉar mankis al ni kor. Anke ni devis provizi manĝojn al Tivvy ĉar kvankam ŝi venis senpage pro ke ŝ amis Gideonon ni devis doni al ŝi manĝaĵon ka ŝ multe manĝis. Anke helpanto de kuracisto kostis tre kare ka ju pli mava veter des pli l postulis. Ĉirke Novjar okazis tre’ge frida periodo kiam frostis voj tiel ke lia ĉeval falis ka rompis al si kruron ka n’devis pag’iom pro ti. Ĉi’ plitristiĝis ĉar Gideon devigis min tiom plugadi ke m devis lasi laboron en laktej ka kortobirdojn ka porkojn al Tivvy ka ŝ ĉiam stis kaprica ka senatenta tiel k’on komencis plendi pri buter ka kokinoj malofte demetis ovojn ka porkoj komencis aspekti malgrasaj ka neglektitaj ka Tivvy pensis pri nenjo krom beligi sin por tenti Gideonon. En januar veter pli maviĝis ka falis multa neĝo k un nokton Patrino tiom malsaniĝis ke m devis denove alvenigi helpanton de kuracisto. Tamen mesaĝon mi n sendis ĉar nenju akceptis iri pro profunda neĝ. Estis nenjo por bazar ĉar bovinoj stis sekaj escepte d un k ovoj malabundis. Do Gideon n iris al Lullingford ka m decidis iri dimanĉe kiam eĉ Gideon ne plugis ka ĉe Lullingford mi sendos mesaĝon al kuracisto per Silvertona diliĝenc. Tion mi faris ka pasigis lacigan tagon ka tristan mi preterpasis senhoman domon de Kester Woodseaves ka pensis ke’ble i’afflikto trafos lin en granda urb aŭ l eble renkontos amulinon tie ka n revenos al Lullingford. Sed poste mi ĝojis pro tilaciga tago ĉar kelkfoje nura konsol trovebla de hom stas memor pri s’fer eltenita por iu kara.

Kiam helpanto de kuracisto venis post nemalmultaj tagoj li devis longe resti ĉe ni dum pluraj tagoj pro neireblec de vojoj. Ti

ĉagrenis Gideonon pro elspez por manĝaĵo por li k anke por lia ĉevalaĉ. Eĉ pli ĉagrenis lin ke helpanto de kuracisto faris kontentigan raporton pri Patrin ĉar ŝajne Gideon opini's ke m devas venigi tiviron el malproksime nur se ŝ estas ĉe pordo de morto. M enmensigas ke ni sidis taŭ kamen malfrue dum tempesta nokto dum hajl tamburis kontre fenestron ka bona klara gajiga fajr brulis. Helpanto de kuracist estis agrabla vir ronda basa kun hela ruĝec survanga kvaz pro dika glazur. Li ĉiam kunfrotis manojn kvaz ĵusa paciento tre ĝojigis lin sed on nenjam povis konkludi el ti kiel prosperas tipaciento ĉar li frotis manojn tiel gaje pri kadavr kiel pri vivanto ka vere mi kelkfoje pensis ke kun eĉ pli da ĝoj. Li kunfrotis in dum ni parolis pri Patrin kvankam ne tiel forte kiel pri Srin Beguildy kiu malsaniĝis pli kaj pl'ekde sia'lveno en Silverton ka nun laŭdire komencis mortiĝi. Li n estis senkompata vir ka n deziris mavon sed kompreneble li'nteresiĝis pli s on preske mortas ol s on nur iomete malsanas.

“Srin Sarn resaniĝos nun. Bele” li diris.

“Ho” diras Gideon. “Ŝi res'niĝos ĉu do?”

“Ja's ka pluvivos multajn jarojn mi n dubas. Tre forta malgraŭ ke maldika ka delikataspekta.”

“Kiom da jaroj?” diras Gideon.

“Ho! Malfacilas diri. Kuracisto eble povus sed kompreneble mi stas nur kvazlernanto. Sed facile povus esti dek jaroj. Ja's. Mi dirus ke dek. Kun zorgo.”

“Dek jarojn!” Gideon diris tion tre strangamaniere.

“Ja's sed vi devos dorloti ŝin.”

“Dek jarojn ka ĉiam kiel nun?”

“Ho ja's! Ŝi devos resti enlite dum vintroj k eble poste tutjare.”

“Ka n plu stos utila?”

“Utila? Kiel ŝi povas esti utila?”

“Ka v venos dutri fojojn ĉiuvintre mi spozas?”

“Ho ja's se v alvokos min” diras helpanto de kuracisto trinkante iom d el' ka prenante plian pecon da pan kun fromaĝo ki malridigis Gideonon.

“Kiam v intencas forpreni telerojn Pru?” li diras. “Mia ventro pleniĝis taŭ longe.”

“Ho sed vi manĝas tro malmulte” krias Tivvy. “Stas mirinde ke v ne jam mortis pro malsato. Vi b’zonas edzinon kiu kuiras por ci ka preparos tentajn manĝojn. Tripkolbasojn en pasto ekzemple. I diferencas d ordinaraj kolbasoj kiel Ĉiel d Infer. Mi kuiris in pasintadimanĉe ka nek Pejtro nek Sammy poste diris vorton dum tuta tago ĉar i tiom kontentiĝis enventre.”

“Ho jadi! Mi b’daŭregas esti edzo” diras helpanto. “Ja’s tuttriste mi b’daŭregas!”

“Eĉ se v n estus mi n interesiĝus” respondis Tivvy impertinente. “Mi preferas grandan viron.”

Gideon n atentis ŝin samkiel tripkolbasojn.

“Tre granda vir” daŭrigis malmodesta knabinaĉo “ka bruna. Grandaj ŝultroj grandaj manoj brakoj kun grandaj buloj de muskol ka tenden grandaj piedoj fortaj kruroj—”

“Nu mastrin vi faras liston kia ti’en Kanto de Salomon” diras kuracisthelpanto.

“Ka forta” daŭrigis Tivvy kiu n atentis lin sed rigardis fikse al Gideon “forta ka nenjam laca volupta ka postulema ka malfacile detenata sed tre kapabl’amoranto ja’s k arda ka n akceptanta rifuzon de knabin pri kiu l decidis. Jen vir por mi! Ja’s jen vir al kiu Tivvyriah filin de Sakristian stus bonedzin kiu pensus pri nenjo krom ŝpari k avari ka klopodi plenumi lian volon ka riĉigi lin.”

“Nu v devus esti advokato Mastrin ja v devus” diras vizitanto “ka se v n atingos vian celon on enboteligu min kun alkohol kiel ranidon!”

Sed Gideon tutne levis siajn okulojn al Tivvy li nur sidadis ka grimacis ĝis kiam ŝ enlitiĝis. Poste l diris denove—

“Ka ŝ pluvivos jarojn ĉiam malsana sed ĉiam viva?”

“Ja’s jadi ja! Vi komprenas pri knarantaj pordoj. Sed atentu ke ŝia puls restu forta. Jen danĝer. Se ĝ fariĝus neforta ŝ verŝajn’ekmortus kviete ka subite taŭ vi povus diri ‘smilaks’. Tenu pulson forta ka ŝ restos gaja kiel rubekol.”

Ni konversaci’s iom pli ka Gideon diris ke l kontrolos bestaron tal enlitiĝi.

“Makuleta longakornin nebone fartas” li diris. “Ŝajnas konstante s’feri de febro. Foje kor preske krevas. Eble dozo da vulpoganto⁷⁴ ĝustigos ŝin ĉu n?”

“Ja’s. Vulpoganto lantigos pulson tre tuj. Sed vi dev’s atenti. Ĉu ŝ estas juna bovin?”

“Preske kvarjara.”

“D ne donu al ŝi tro. Kiam iaĵ oldiĝis ka triviĝis ĝi n povas multtoleri ĝin.”

Kiam vizitanto jam enlitiĝis ka Gideon revenis de bovinej li sidiĝis senespereme ka diris—

“Ŝi planas morti.”

“Ĉu Makuleto?” mi diras.

“Ja’s. Ŝajne ti’olda diablo vere malbenis min.”

“Kulpas nur veter ka Tivvy ja stas iom ventkapa ka min tro’kupas plugado.”

“K anke Patrin” li diris “kutimis helpi sed nun ŝ estas senutila eĉ men ol senutila. Peza ŝarĝo! Pro ti ni nenjam profitos.”

“Ŝi n sciu ke v pensas tion” mi diris.

Sed sekvan tagon mem kiam m alportis al ŝi vespermanĝon jen Gideon staranta ĉambromeze ka parolanta tre laŭte ka Patrin aspektis timigita mus.

“Nu” li diras “vi tre misfartas Patrin!”

“Ja’s mi malsanas Sarn” ŝi diras kun sia rideto.

“Sendube vi b’daŭras ne povi fari iom da labor.”

“Ja’s ja vere Sarn. Sed kiam varmiĝos m esperas prizorgi kovkokinojn ka ceterajn kortbirdojn. Ja’s! K anasojn k orfajn ŝafidojn.”

“Sed ne porkojn?”

“Nu stus plaĉe se Tim povus prizorgi in iom pli longe. Tre reŭmamismigas min apud tiakvo.”

“Multekostas manĝigi tigrandan knabon ĉiutage.”

“Mi scias ka m resaniĝos plejeble rapide Sarn.”

“Mi s’pozas ke viv ne plu donas plezuron ĉar vi tiom malsanas.”

“Ofte stas laciĝe sed ank ofte m estas komforta.”

“Pro reŭmamismo ka tus ka kapturniĝ eble v deziras iri al Plibona Lando”.

⁷⁴ Digitalo.

“Kiam plaĉos al Sinjor konduki min al Plibona Lando m devos iri senplende sed mi preferas vivi ĉar vivon mi konas k eĉ plej mavan sed tiPlibonan Landon mi n konas.”

“Vi scias ke ne stas tie tusoj nek reŭmamismo nek kapturniĝo.”

“Nek kamenanguloj nek tasoj da te” ŝi diras “ka m timas ke ĝ estos tro luksa por mi Sarn.”

Sed Gideon starante en ĉambromezo ka parolante tre laŭte diris—

“V estus samkontenta mort’au viva!”

L eliris sed ĉiuvespere l denove eniris ka parolis sammaniere ki b’daŭrigis min ĉar kvankam l eble celis gajigi ŝin k on ŝajne kredas ke tutne gravas kion on diras al malsanuloj tamen m opini’s tion malankolia parolmanier por povra olda malsana virin. Sed finfine iun vesperon en fin de marto dum malseka humida veter kiam reŭmamismo stis tre forta ŝ diris kiam l atingis sian kutiman parolfinon— “M opinias ke v estus samkontenta mort’au viva”—

“Nu Sarn eble m estus.”

Ka ti ŝajne kontentigis lin. Li ĉesis veni ĉiuvespere ka ti trankviligis Patriron ĉar li timigis ŝin nun eĉ pl’ol taŭe k eĉ Tivvy rimarkis tion. Kiam venis april m opini’s ke niaj aferoj pli bone progresas Patrin stis pli feliĉa kvankam ancor tre malforta. Mi pli bone laboris mi n plu maltrankvilis ka Patrin ĝuis kunestadon de Tivvy. Ni laboris pli forte ol taŭe ka miaj vestoj komencis aspekti tro larĝaj sed ti n ĝenis min. Mi prisemis grandan kampon per tritiko dum Gideon daŭre plugis. Stis belege tie dum freŝa maten kiam purpuraj ombroj kovris malsekan teron ka sun leviĝis preter arbar ka Lago Sarn aspektis kiel palblua sulketoplana vitro kun lumo maltaŭ si. Ofte bluis anke ĉiel’ en kiu pendis alaŭdoj. Ofte grandaj blankaj nuboj kiel novlavita ka kardita lan staris sur suproj d ekflorantaj arboj. Brilaj koloroj pensigis min pri multekolora teksado kiun Kester verŝajne jam preske mastris. Kvankam venis nenju vorto post Kristnasko pri liaj faroj aŭ bonfarto mi sentis en mia kor ke ĉi’ iras bone ĉe li. Je Kristnasko veturigisto de Silvertona diliĝenc lasis pakaĵeton por mi ĉe *Poto da Cidro* ka kiam mi reiris al mansardo m trovis en ĝi peceton da ŝtofo teksitan dukolore ka leteron.

LONDONURBO.

Kristnasko

KARA PRU SARN—

Ĉiti' portas al vi miajn bondezirojn. Mi povas teksu du kolorojn nun kiel vi vidas per ekzemplaĵo. Virinoj ĉitie stas neinduloj palaj ka nanaj plejparte blondaj ka n troviĝas eĉ un vere alloga brunokul inter i. Loka registaran' kiu stas teksist invitis min al sia dom por bankedo. Juna virin sidanta apud mi uzis malmultan ŝtofon por sia korsaĵo sed tutne ŝparis ruĝiĝojn. M enmensigis senluman ŝtonan ĉambrom ka vizaĝon de juna Camperdine inter ombroj ka virinon kiu agis pro amemec k amara spirito tamen malgraŭe aspektis kvaz pomflora fein k en un vir ekbruligis fajron kiu malfacile estingiĝos. Ka do feliĉan Kristnaskon ka bonan Novjaron de

KESTER WOODSEAVES.

Kredu ke jam taŭ sekv'april tileter eksmilis ĉifonon maĉitan de musoj.

Anke mi sendis al li Kristnaskan leteron ka jen ĝi.

SARN.

Kristnasko

KARA TEKSISTO

Mi sendas ĉikune hajmfaritan ĉemizon. On diras ke se v surportos ĝin vi n s'feros pro variol aŭ aliaj malsanoj. Mi teksis ĝin el kanabo ka faris multajn malnovajn piajn sorĉparolojn super ĝi sed ne malpiajn. M ofte memoras tagon kiam n'observis libelojn en tempo d akvotremado kiam floris nimfeoj. Nun adiaŭo ka Di sendu al vi feliĉon.

Via ob'eme

PRU SARN.

Sepa d april stis bela klarkolora maten ka m enmensigis teksaĵon do dum m iris ti'n ka re'n trans kampon ĵetante brilajn semojn mi kantis *Horde-Ponton*.

Piedojn levu kuru lerte

Taŭ kandeloj hajmen certe.

Malbeno mortiga

*Malfermu pordojn ĉielvaste
Trarajdi reĝon lasu gaste.*

Ĉu Kester iam rajdos al Sarn el Londonurbo? mi demandis al mi. Li venos por foir li diris en tempo d akvotremado kiam laŭlonge de lago nimfeoj floris rigardante siajn anĝelojn ka kiam blu- aj alcionlibeloj ka helaj glazuritaj injoj eliĝis el siaj mortotukoj.

Tiel mi pensis sed kiam mi sorrigardis mi vidis Tivvyn alkuranta tre rapide ka maltrankvile.

“Venu tuj Pru!” ŝi diris. “Ŝi tre’ge malsan’s. Te misigis ŝin. Li diris infuzu ĝin forte li diris ĉar tiel ĝ estos pli bonefika. Do m obeis. Ka ŝ diris ke ĝ estas amara. Sed ŝi trinkis ĝin. Ka nelge ŝ tutkvietiĝis ka m ne povis aŭdi ŝin spiri. Poste ŝ singultis ka flustris—

“Venigu Prun”.

M alvenis apen ĝustatempe por kisi Patrinon kiu stis tutŝrumpinta sur kusenoj. Ŝi flustris—

“Amara” ka ridetis ka spasme enspiris kaj mortis.

Post nelge mi diras al Tivvy—

“Kie stas tite?”

Sed ŝi jam forverŝis ĝin.

“Gideon” mi diris “ĉu stis venen en tite’ kiun Tivvy donis al Patrin laŭ via ordon?”

“Nu kion mi scias pri kion donis Tivvy al Patrin?” li diras.

“Ho Sarn! Vi ja sci’s!” krias Tivvy. “Vi diris ‘Infuzu ĝin forte’ vi diris.”

“Fermu buŝon eta mensoganto” krias Gideon “se n do diru al Pru kion vi ka mi faris en grenej pasintan dimanĉon.”

Je ti Tivvy ruĝiĝis kiel fajr ka silentis.

Mi tutne povis kompren’in. Mi venigis Kuraciston por trovi pro kial Patrin mortis. Ka l diris ĉu n’kutime donas al ŝi *digitalon* stranga vorto kiun mi n konis sed li literumis por mi ka m skribis ĝin. Do m diris ke n mi nenjam aŭdis pri ĝ. Do li diras “Vulpoganto! Vulpoganto!”

“Vulpoganto?” mi diras. “Ne. Pro kial mi donus tion al ŝi?”

“Ja vere kial?” li diras rigardante min tre akre.

“Enigmas al mi Sinjor” mi diras “pro kial Patrin mortis. Ŝi jam komencis bele resaniĝi.”

“Ankaŭ mi volas sc’i tion” li diras.

“Eble n’petu Polic-Mort’keton” mi diras.

“Do vi akceptus mortenketon pri la kadavro?”

“Nu ja jes se ti stas ĝusta ka farinda.”

“Nu se vi akceptas ĝin ĝi ne estas necesa.”

Li stis tre stranga vir. Mi tutne povis kompreni lin.

“Mi iom dubis” li diras. “Sed se vi volonte akceptas...Mi supozas ke la kaŭzo estis simpla oldiĝo. Kelkfoje ili forpasas tiel en la printempo. Kaj mortenketo kaŭzas multan ĝenon kaj estas multekosta...nur pro dubeto...kaj ĝi ja ne povus helpi la kompatindan virinon...do se vi permesos ni ne ĝenos nin per enketo.”

Por mi ti stis vere mistera diraĵo. Sed memorante ke Kuracist estas klera hom mi n plu strebis kompreni lin. Hom kiu stis en lernejoj k eĉ studis en universitato stas tiel mistera kiel Triunu’. Do pro ke m okupis min pri funebra ceremoni’ ka multaliaĵoj mi n plu pensis pri li sed mi profunde funebris Patrinon ĉar dum ŝi kuŝis en ĉerko ŝ aspektis kiel frostita birdo mortigita de vintro.

Ĉapitro 4: Dum maja maten

Stis eĉ pli silente ĉe Sarn sen kvieta ĉe'sto de Patrin. Ŝia malesto dolorigis min pl'ol se m dependus de ŝ ĉar ni plej sentas mankon de homoj kiuj dependas de ni por ti ka por ĉi. Sekve patrin dum labor sentas malfacilon ka malkapablon kiam forestas etuloj sin kroĉintaj al ŝia jup ol kiam i ĉe'stas ĉar ŝia kor n estas en ŝia labor. Do dum plilongiĝantaj tagoj d april m ofte sidis plorante dum m enmensigis ŝiajn povrajn levitajn manetojn ka ŝian elkoran bonvenon kiam vespere m envenis laca. Nur Gideon ka mi restis tie ka Tivvy de temp al tempo. Labor daŭris samkiel taŭe kvankam tristec ĉirkis ĝin. Gideon nenjam eniris stakejon sen malbeni Beguildyn kiu plu stis en prizon sen juĝa decido. Delonge n'aŭdis nenjon pri Jancis ka ŝia patrin ka n venis alia leter de Kester. Bazar rekomenciĝis. Pli bone diri ni rekomencis partopreni ĝin ĉar ni havis multon por plenigi standon. Un el ni iris k alia prizorgis bienon ka m aŭdis ke ĉiufoje kiam Gideon stis ĉe budo Frino Dorabella venis por aĉet'ion. Efektive on jam diris ke ŝ amas Gideonon ka m esperis nur ke Skvir n aŭdos tion. Mi n miris ke ŝ amoremis pri Gideon ĉar vere li stis brava fortul kun multa karakter ka forto ka belaspekta ka stis nemultaj junaj viroj ĉe Lullingford titempe ĉar kelkaj iris loĝi en London k aliaj ne revenis de militoj. Gideon pridiris nenjon al mi sed mi povis rimarki ke ŝia favor flatis lin ka m kredis un tagon kiam ŝi venis al nia pordo por peti trinkon da lakto ke lia man tremetis kiam li donis al ŝi tason. Sed se l pensis pri ŝ mi certas ke stis nur pro amorem ka junec ka dezir prosperi ka n am kian l'iam sentis al Jancis. Mi kredis ke l nenjam amos denove post veneniĝo de tifru'am—ĉar vere malben ŝajne 'niris tion samkiel ĉion. Sed n estis dubo ke li'nterensiĝis pri ŝ ka kiam intertempe mankis Frino Dorabella ĉe'stis Tivvy. Li plene malestimis Tivvyn sed li stis preta preni kion ajn ŝi donos samkiel ĉiu alia junul precipe post renversiĝo de vivo ka perdiĝo de kara konatin. Li ŝajnis voli foresti kun Tivvy kiam li n laboris kvaz li stis maltrankvila ka l ne toleris paroli pri Patrin ki mirigis min ĉar

li nenjam multe zorgis pri ŝ dum ŝia vivo. M enmensigas kiam estis Majtago ka n'ekiris al bazar ĉar ni devis vendi produktojn negrave ĉu on funebras aŭ n mi diris ke m enmensigas pri angul kie Patrin staris lestafoje por adiaŭi nin. Ka Gideon eksaltetis ka rigardis nerveze lokon kiun m indikis preskakvaze kredante ke ŝ revenis. Ka kelkfoje mi rimarkis ke l rigardas ŝian seĝon nerveze ka mediteme. Ti afliktis min ĉar li n kutimis sin teni tiel. Ĉiualimaniere l agis kiel taŭe ka bien stis sama ka lago ka printempo. Maj alvenis varma ka grandioza ka burĝonoj ka ŝosoj apertiĝantaj petaloj k apertaj petaloj blovetoj da dolĉaer ka ŝtormoj da varma pluvo transiris kamparon kiel dum ĉiu alia jar. Merloj ĉarmadis tuttage ka kukoloj ekkantis je kvara aŭ kvina hor matene. Fulikoj kun siaj idoj naĝis sur lago cinkloj tegmentis bone siajn nestojn svingvostuloj ludis apud akvo k arde' staris rigardante sian longan ombbron sur vitreca lago kvaz demandante al si kiam ĝ atingos longecon de kirkotur. Folioj de nimfeoj flosis verdaj ka brilaj kiel malplenaj boatetoj ĉar ancor n estis flortempo por nimfeoj. Junaj folioj en arbar fariĝis pli longaj ka largâ herbaĵo kreskis ka komencis ondeti tritiko leviĝis viva ka hela. Karesmolilioj en paŝtej velkis ka kampanuloj venis kiel fum sorrampanta deklivojn d arbar. Ĉi' renoviĝis ka ju pli brilaj stis koloroj des pli mi pensis pri Kester ka lia teksado ka des pli m hontis ke m ĝuas printempon dum povra Patrin kuŝas en sia freŝe fosita tombo. Venis tago en mez de tibela majveter kiam kratagarboj laŭlonge de lago tiel dense portis florojn k'i sternis solidan blankan muron en akvon ĉe siaj piedoj. Kvankam stis tagmezo birdokantoj stis preske samlaŭtaj kiel je tagiĝo ĉar en maj i ŝajne nenjam laciĝas. Ni stis en kuirej por tagmanĝi tal eliri por fini elfosadon de terpoj. Tivvy helpis kiel ofte nun kvankam Gideon ne multe dankis al ŝi lia mien stis ĉiam meditema ka l kuntiris brovojn ka kelkfoje eksaltis kvaz aŭdante voĉon.

Kuirej stis agrabla loko post varmeg ekstera ĉar stis frua jar. Sunlumo makulis trankvile plankardezojn ka siring elekstere sendis forte dolĉan parfumon tr'apertan fenestron pro ke florado preske jam finiĝis.

Io preterpasis fenestron k aŭdiĝis softa frapeto sur pordon. Ĝi memorigis min pri titempo kiam Jancis forkuris ka venis al nia

pord en neĝo. M iris aperti ka jen ŝi staris Jancis blanka kiel fantom apogante sin per pordostango kun ŝal volvita ĉirke ŝin k en ŝal m apen povis vidi bebon ne pli grandan ol pupo.

“Ĉu Jancis?” mi diras. “Jadi kiel vi venis?”

Sed ŝi tiel sovaĝa ka blanka kiel marvirin serĉanta sian homan amaton nur preterrigardis min.

Ŝi nek rigardis nek diris vorton al mi. Ŝ eĉ ne rigardis Tivvyn. Ni n ekzistis por Jancis en tihor. Ŝi nur englisis kiel nebulring el vintra mont aŭ drivajo de floroj el somerarboj aŭ blankulin el sub lago. Ŝ estis vestita per robo kiun ŝi kutimis surmeti por festenoj ŝirita kaj ĉifita sed ankore blanka ka kvankam ĝi n beligis ŝin kiel blua tamen kun blanka ŝal ĝi faris el ŝi glisantan fantomon en aer dum ŝi transiris kuirejon. Senorde ŝ kolapsis ĉe piedoj de Gideon ka ŝ metis bebon sur plankon taŭ lin dum li sidis ĉetable en granda brakseĝo. Ka ĉar manĝajo stis aranĝita sur tablo ka l okupis ĉefseĝon ka Jancis kaŭris sur planko mi n povis ne pensi pri rakont en Bibli kiam Jesu stis ĉe festen k iu malriĉulin venis por pet'ion k on riproĉis ŝin ka ŝ kuraĝis diri k'eĉ al hundoj ne mankas paneroj. Ŝajnis ke tuta bonaĵo de vivo sterniĝis tie sur nia kverka tablo ĝis ĝi knaris pro pez. Troviĝis fruktoj d am hajmeca pan de ĉiutaga komplezo pokal kiu sensoifigas ĉiun ka sal kiu gustumigas vivon ka ĉiuj men gravaj plezuroj kiuj donas bonecon ka dolĉon al vivo. Ka Gideon rajtis disdoni ĉion. Sarn de Lago Sarn stis mestro de tifesten ka l rajtis diri se l volis “Jen mi ŝarĝos cian teleron ka pleniĝos cian poton.” Ka l rajtis domaĉi ĉion.

Jancis genuis en makul de brilanta sunlum ka ŝ aspektis kiel neĝflokio kiam tago komencas degeli. Post tiktako de nur un momento ŝ eble plene likviĝus. M enmensigis titagon en laktej kiam ŝi venis esperante ke Gideon tuj edziĝpetos al ŝi. Ka m enmensigis nokton kiam m esperis bonon por ŝi dum Beguildy serĉis sepan infanon ka tempon kiam mi vidis ŝin venadi mien inter siaj du blankaj bovoj kvaz pratempa dam kiu mortis taŭ longe. Mi memoris ŝin kanti *Verda Gruzo* tiKristnaskon kiam ŝi forkuris ka lumon el fenestro kiu verdigis ŝian vizaĝon ka ke ŝ kutimis diri—

“O! Mi volas ludi *Verda Gruzo*”.

Ĉiuj ŝiaj pasintaj vortoj k agoj ŝajnis ĉirki ŝin dum ŝi tie genuis kun orharar pendanta sur ŝiaj ŝultroj. Tiel pala tutblanka k ora ŝ kontrastis kun Gideon bruna ka malhele vestita k eĉ pli ti donis impreson ke ŝ alvenis el i'alia mondo k anke bebo ĉar anke ĝi stis blanka ka ĝia kapeto kie ŝal flankenfalis estis kovrita de palflava lanugo. Nenju aspekto de Gideon troviĝis en ĝi. Ĝi n aspektis homa bebo sed anstatingan' kiu estiĝis en mezo de somernokto sur petal de liliflor. Ho jen pli stranga beb ol ankore mi vidis! M apogis min kontre pordostango ka larmoj sobruliĝis sur mia vizaĝo ka por deteni laŭtajn singultojn mi promesis al mi ke Jancis havos plej bonan manĝon de sia tutvivo tuj kiam ĉiti' finiĝos ka ŝ manĝos ovon d ardeze griza ĉaskokin kies ovoj valoris multe da mon por kovado ĉar ŝ estis premi'ta birdo. Sed mi n scias kial mi tiom volis ke ŝ manĝu tion anstate ordinaran ovon egale bongustan k anke pli grandan. Ka m anke promesis al mi ke bebo ricevos plej bonan baniĝon kiu iam okazis ĉar ĝi ja 'spektis kvaz ruliĝinta en cindroj. Ka jadi! mi plenigos ĝin per lakto ka m belordigos malnovan junkan lulilon ka faros nanan lankovrilon ka metos plensatan bebeksteren por dormi en sunlum! Nelge ĝi perdos tistrangan timigan aspekton antikvan kiu kredigis ke ĝ jam sci's ĉion scieblan ka malplezuris pro ĝ. Mi volis vidi ĝin kun granda florbulo d oraj primoloj. Ka tutdume Tivvy sidis apud Gideon kun buŝo aperta pro surprizo k aspektis timanta kvaz vidante fantomon.

Gideon smilis ŝtonan viron. Nenju sento videblis en lia vizaĝo nek kompatato nek koler. Ĉi' tia ŝajne stis forpasinta. Stis kiel malnova rakonto kiun li jam forgesis ka Jancis estis ĉefa rolulin en tirakonto sed kial ŝ estis ka kiu ŝ estis ka kion ŝi faris ne plu troviĝis en lia mens ĉar li jam plene forgesis tirakonton. Iam pli fru'ekzemple se ŝ venus je Kristnasko li verŝajne batfaligus ŝin pro koler. Sed poste l eble kisis ŝin. Nun li nek batis nek kisis.

Ĉiu sento lia pri ŝ mortis en fajr tinokton en septembro ka tipovra knabin devis porti pekon de patro. Ĉar kiam okul de Gideon vidis ŝin li vidis siajn brulantajn stakojn k en ŝia blua rigardo troviĝis ruĝaj reflektoj de fajr kiel en klara maten on povas vidi lestajn sovaĝajn subbrulaĵojn de tondroŝtormo. Ŝi nun signifis nur tion al li. Ka kvankam lia malam al Beguildy restis sovaĝa kiel taŭe li nenjon plu sentis pri ŝ nek malamon nek deziron eĉ nek

amordeziron k eĉ mene amon. Frino Dorabella jam kaptis lian menson ka Tivvy kontentigis korpon. Ne plu troviĝis loko por Jancis. Jen li sidanta en nia malnova kuirej tiom kvieta ka plena de memoroj pri ĉiuj Sarnoj kiuj ĉitie jam loĝis ekde Tim kun fulm en sango ĝis Patro kiu forpasis el vivo dum malluma ronkado post kolerego. Mi pensis pri Patrin kies ŝpinrado tie zumadis tagon post tago kiel eta tobostrigo. Mi pensis pri ĉiuj aliaj Sarninoj ka pri mi kiu strebis ka sklavis por malben. Ka ŝajnis ke timalben smilis planton eble muŝkaptanton kiu logas vivantojn en sian festenhalon sternante grandan manĝon ka jen! kiam i eniras ŝi kaptas in ka prenas in ka ligas in ka katenas piedojn tiel k'i n povas eskapi. Peza dolĉec de taglilioj en ĝarden devigis min pensi pri entombigejoj. Mi volis ke Jancis diru iaĵon ka tiel finu aferon ĉu por bon ĉu por mav tiel ke m povu jam prizorgi bebon. Sed ne ka silento daŭrdaŭris. Ekstere Lago Sarn staris taŭ mi kvaz spegul enkadrita per ia multevalora verda juvelaĵ. Aŭdiĝis nenjo krom tristeta ĉarmo de birdoj proksimaj ka foraj ka vaganta zumado d abel kiu eniris nian kuirejon ka malŝatante ĝin reflugis kolere eksteren.

Jancis eklevis sian kapon ka rigardis Gideonon. “Sarn!” ŝi diris. Ka denove “Sarn!”

Dum ŝi diris tion m imagis multajn aŭskultantojn kiuj kliniĝis el aer dense kunamasiĝinte kiel petaloj de blanka peoni' atendante aŭdi kio rezultos pro ĉitirenkontiĝo.

Ŝi kunpremis siajn manojn ka fikse rigardis Gideonon per siaj bluaj okuloj kvaz dummomente lasante bebon kiu poste mem parolu por si.

“Ĉu v enmensigas Sarn” ŝi diris “ke ni ludadis *Konkrojn* per grandaj ruĝetaj ka blankaj helikodomoj apud akvo ka vi preske ĉiam venkis ka mi malvenkis? Ĉu v enmensadas ke m volis ludi *Verda Gruzo*?”

Ŝia febla voĉo ĉesis dum momento k okazis i' stranga ĉar dum mi rigardis ŝin ŝajnis al mi ke multaj voĉoj el tre for sonigis vortojn de tiolda kanto ka kantis ĝin en harmonioj laŭ kutim de kantantoj en nia region. Ĉar s iu ja kantas li aŭ ŝi scias kanti en harmonioj ĉar on ĉiuj amas muzikon ka ĝ enradikiĝis en animoj. Tiel m aŭdis ĝin kun ornamaj notoj de sopranoj ka persistantaj sonoj de basoj

ka kontraltoj ka tenoroj kaptis vortojn ka ludis per i ka ĉiuj emfaze kantis kvaz parolante por Jancis. Tre base kaj elfore sonis tamen riĉe pro multaj voĉoj.

Printempo nun alvenas verdiĝas herbar

Elektu belulinon reĝino de jar

Harar kiel silko kronita de lum

Ni skribos ŝian nomon per bela ora plum.

M ankore ne scias kion m aŭdis. Parson diris ke mia viegla imago nur ludis pri pasintec. Mi n povas diri. Tamen ĉu image ĉu reale mi tutvere j'aŭdis ĝin harmonie kantatan ka ĉiu ton stis klara ka ĉiu harmoni' ĝuste interligita sed el tre for.

"Ĉu v enmensas vesperon kiam vi vidis min sub ruĝa lum Sarn revenante el Lullingford kun ŝafoj? Ka titagon kiam ni trovis paruneston kun dekkvar idetoj ka v kisis min unfoje por ĉiu birdeto?"

Ankor Gideon nek faris sonon nek moviĝis.

"Ka kiam mi forkuris ka Pru ŝirmis min vi diris al mi en mez de ĉitikuirej mem 'Kisu min knabinjo!' K iam en laktej vi diris ke m aspektas kvaz farita el kratago ka lakto? Ka ĉe dom de Callard tivesperon kiam mi tenis bebon dum Sinjor Callard devigis in ĉiujn diri 'Taŭrolud' estas fia...' ĉu v enmensigas k Aaĉjo Callard subite diris 'Mi vidas du bebojn en ŝiaj brakoj nian ka ŝian estontan?' Ka rikoltodancon kiam on belege fajfis ka n'dancis?"

Tremeto transiris vizaĝon de Gideon kiam ŝi menci's tirikolton ka min mirigis ke Jancis parolis pri ĝ ĝis m ekkomprenis ke ŝ jam forgesis originon de kverel de Gideon kontre ŝi. Ŝi nun sci's nur ke l n amas ŝin ka kialo tutne gravis.

"Ka kiam Pejtro iris serĉi sepan infanon ka v alvenis ka n'kuniĝis tiel dolĉe? A°! Eĉ timatenon kiam Pejtro revenis ni stis tiaj ka v diris 'Post kvin tagoj mi'eta karulin!' Ka m diris 'Ke Di vin feliĉigu!' Ka post tihor Sarn mi n vidis vin taŭ nuna hor."

Ankor Gideon ne respondis do ŝ metis manon sur lian brakon.

"Ĉu v memoras?" ŝi diras.

"Jes" li respondis indiferente. "Mi memoras sed estis taŭ longe. Ne plu pensinde."

"Sed ne bebo. Jen bebo Sarn! Via ka mia."

Ŝi suprenlevis infanon kvaz por meti ĝin sur liajn genuojn sed li svingis manon por rifuzi ĝin.

“Knabo!” diras Jancis. “Ne knabin tiel ke vin ĉirkos virinoj. Knabo kiu tutbalde gardos ciajn porkojn kaj post kelkaj jaroj li gvidos plugilon. Ja’s. Mi scias ke l stos bona fil al vi ka bone laboros ka rikoltos duoble pl’ol li’avo detruis.”

Povra bebo movetis sin kvaz ĝi sentis pezan ŝarĝon.

Gideon rigardis ĝin kvaz ĝi nur videbliĝis kiam ĝi tuŝis lian vivocelon k alitempe stis ne videbla. Poste l kurte ka kruele ridis.

“Ti?” li diras. “Vi proponas al mi tion por helpi min? Mi dankas cin! Eĉ se ĝ vivos ka pri ti m dubas ĝi nenjam utilos ĝi nur dorlotiĝos en dom ka manĝos kaĉon.”

Ka kvaz sciante ke ĝ ne sukcesis en ekzamen povretul komencis kri’. Gideon forpuŝis tablon ka stariĝis. L’iris al maltaŭa kuireja pordo kiu stis plej oportuna elirej al legomĝarden. Ĉe pordo li haltis dum minuto.

“Plej bone stas ke v reiru al el kie vi ven’s” li diris. “Vi n estas bonvena ĉitie nek vi nek tialia.”

Ka l fermis pordon ka foriris.

Jancis restis senmova ka ŝajnis muta ka kunfuzita. Pala plum pelita d aer lilipetal vaganta sur akvo ne povus esti tiom perdita kiel ŝi en timomento. Mi kuris al ŝi ka levis ŝin ka bebon sur kanapon ĉar ŝ estis tiom malpeza ke tuŝis mian koron.

“Nun atentu” mi diris “nenjun vorton vi diros taŭ vi manĝos ka trinkos! Boligu akvon Tivvy mia brava knabin dum mi varmigis lakton por bebo.”

Jancis diris nenjon sed nelge larmoj komencis sobflui lante sur ŝiaj vangoj. Ŝi manĝetis ka poste mi demandis kiel ŝ atingis nin.

“Mi marŝis” ŝi diris “ka povra beb estis tre peza. Vi n povas imagi rigardante lin kiom peza li stas.” Mi sci’s ke l apen pezis pl’ol kokin ka tial m anke sci’s kiom laca stis povra Jancis por kiu tiel nana ŝarĝo stis tre peza.

“Jadi kiel via patrin permesis ke v marŝu?”

“Patrin mortis.”

“Ve! Mi b’daŭras tion” mi diris. “Ŝ estis tre bonkora virin.”

“Dankon!” diras Jancis sed tutsenfervore.

Ŝi smilis virinon kiu en ludo *Multekostaj Koloroj* jam riskis ĉion ŝi demetis karton nomatan *Multekosta* ka perdis ĝin. Ŝi nun estis ekster ludo ka n plu gajnos nek perdos. Mi n volis menci' ŝian patron ka ŝ diris nenjon pri li.

“Nu via hajm stas ĉitie” mi diris. “Vi scias tion Jancis kara.”

“Mia hajm ne povas esti ĉitie se Sarn n amas min Pru.”

“A° sed ĝi ja stas” m elkri's. “Kvankam mi ja ĵuris per Bibli ke m obeos Gideonon kvaz metilernant edzin ka hundo tamen ĉitage mi kontros lin. Vi kuŝos ĉinokte en mia lit infan. Vi k uleto dormos hajme ekde nun.”

Ŝi ridetis triste kvaz dirante “ĉu do ja vere?” kaj kuŝis tenante bebon. Sed nun Tivvy jam komencis aspekti pli ka pli ribelema k eksplode elkri's —

“Ka ĉu ŝ ja dormos ĉitie Pru Sarn? M opinias ke ne! Eble vi n scias ke m mem stos edzin de Sarn. Ja's. Li dev's edzinigi min por mia bon k anke por sia.”

Jancis apertis okulojn ka rigardadis ŝin samkiel faris Saĝulin kiun m iam konis kiu povis eldiri alies pensojn.

“Mi scias ke stus bone por vi Tivvy se l ja edzinigus vin” mi mokeme k ironie diris al ŝi ĉar mi nenjam povis toleri Tivvyn jen ver direnda “ka kredeble li devos ne multe prokrasti pro ke v estas filin de Sakristian. Sed mi demandas ĉu efektive li faros tion? Ka m estas preske certa ke l nenjam faros tion. Mi kompatas vin Tivvy ka m tutne menci'us ĉition taŭ Jancis sed vi komencis diskuton.”

Vizaĝo de Tivvy flamiĝis sed ŝi n ŝanceliĝis.

“Mi diris ke stus bone por li ka n nur por mi” ŝi respondis.

“Mi n povas kompreni” mi diris ka Di pardonu min pro mi'abruptec “kiel edziĝo kun vi *povus* esti bona por Gideon.”

“O! Nu balde mi pruvos al vi” ŝi diras.

“Iam Tivvy l amis Jancison” mi diris al ŝi. “Ka ŝ estis lia kara konatin ka li'edzin escepte de ringo.”

Ŝ ignoris tion.

“Mi diros al vi kial estos bone por Gideon ke l edziĝo kun mi” ŝi diris. “Te el vulpogantoj! Jen kial!”

“Te el vulpogantoj! Ĉu v frenezas Tivvy?”

“Ĉiu scias ke m scias nenjon pri erboj⁷⁵. Ĉiu scias ke Sarn donis foliojn de vulpogantoj al bovin. Vi ka mi scias ke Kuracisto diris ke ŝajne via patrin trinkis vulpoganton.”

Ŝi parolis ĉiam pli lante ka klinis sin taŭen kun manoj sur tablo.

“Ĉiu scias Pru Sarn ke via frato opini’s ke Srin Sarn estis ŝarĝo. Ĉiu scias ke l ja volas riĉiĝi. Ka m scias ke se l ne fru’edzinigos min anke ĉiu alia scios kio stis en tite’ kiun li preparis por sia patrin ka postulis ke m donu ĝin forta al ŝi.”

“Ki stis ti?” mi diris sentante min malsana en kor.

“Vulpoganto!”

Ŝi morde elbuŝigis tivorton. Mi sci’s ke ŝ diris veron.

“Mi povas pruvi tion” ŝi diris “ĉar hazarde mia patrin ĵus alvenis por doni al Srin Sarn noktorobon kiun ŝi kudris por ŝi. Kiam mi sobvenis post doni teon al Srin Sarn m elverŝis tason por mia patrin el restaĵo ka Patrin diris post minuto ‘Jen vulpoganta te’. Ja’s Patrin bone scias per ki mortis via patrin sed ŝi n diros ĝin eĉ al mus se Sarn edziĝos kun mi.”

“Mi nenjam kredos tion” m ekkri’s. Sed Tivvy diras—

“Vi kredos! Eĉ nun vi kredas.”

Ka stis vere. Anke Jancis kredis. Ŝi softe ĝemis ka flustris—

“Stis taŭdirite Pru! Stas fatal. Mi jam ne havas hajmon Pru nenjan hajmon sur tuta Ter. Nek bebo nek mi havas kien iri. Kion fari bebo?”

Bebo alparolite ka kontenta pro manĝo kiun ĝi ĵus englutis lakte ridetis. Jancis fermis okulojn ka ŝajnis ke ne plu gravas al ŝi kion diras iu ajn.

Sed Tivvy venas al kanapo ka diras—

“Se v tranoktos ĉitie ni dissci’gos ĉion Jancis Beguildy!”

Mi b’daŭras konfesi ke mia kolerem leviĝis ka m alkuris ŝin kaj forte batis al ŝi orelojn.

“Iru!” mi diras. “Iru kruela knabinaĉo tal mi disŝiros vin. Mi nenjam malamis taŭ nun. Sed vin m abomenas. Kiel vi povas tiel fiagi al tipovra infan? Vi decidu kun Gideon pri kion v ambaj faros.

⁷⁵ Herboj.

Sed kiam vi transpasos sojlon ĉitien eksteren iros mi. Ka dum ĉititago for de tie ĉi!”

Mi povas diri ke ŝ foriris tre rapide surprizita pro vidi mildan Prun Sarnon tiom kolera.

“Nu kuŝu vi trankvile ka ripozu kara” mi diris “dum m iros al Gideon.”

“Ne! Ne ĝenu Sarnon Pru” ŝi diras. “Sed mi ripozos. Ja’s. Bebo ka mi ambaj b’zonas ripozon. Ni bone ka longe ripozos Pru. K elkoran dankon pro ĉi’.”

Eksteren m iris. Jen Gideon laboranta kiel sep. Mi ja kredas ke tikruelaj vortoj kiujn li diris al Jancis estis nur lia rimedo por fortigi sian propran koron. Mi ja kredas k’eĉ tiam estis sem d am ka sen Tivvy ĝ eble elkreskus ka florus. Mi nenjam hahezitis do m alpaŝis Gideonon ka diris—

“Tivvy diras ke v donis venenon al Patrin. Ĉu ver?”

“Pro Di tiknabinaĉo b’zonas batadon” diras Gideon. “Ka se ŝ devigos min edziĝi kun ŝi ti stos ŝi’edziniĝdonaco!”

“Do vi *ja* preparis vulpogantan teon por ke ŝ donu ĝin al Patrin?”

“Patrin diris al mi ke ŝ preferas morti ol vivi ka ŝ estis peza ŝarĝo.”

Li nenjam klopodis moligi nek nei tion ĉar ti n estis lia kutim.

“Nu v estas murdinto ka nia rilato jam finiĝis” mi diris.

“Vi ĵuris fari kion m ordonos.”

“Murdo nuligas ĉiun ĵuron” mi respondis.

“Mi n volas Tivvyn ĉitie. Ŝi tutne utilas.”

“Ŝajnas ke v ne povas elekti” mi diris. “Aŭ Tivvyn aŭ pendumiĝi laŭ mia kompren. Mi savus vin se m povus ĉar v estas mia frato malgre ĉi’ ka m anke multamas vin. Laborinte kun iu sulkon kontre sulko fosilon kontre fosil tiom longe kiom mi kun vi on n’eviteble amas aŭ malamas lin. Ka vin mi n povas malami kvankam mi strebis dum ĵus pasintaj minutoj. Gideon! Pro ki vi faris tifian agon? Ja vere v devos penti en polvo ka cindroj ka pensi pri nenjo alia aŭ Diablo nepre metos sian markon sur vin ka v n atingos bonon en nuna vivo ka v iros al plej profunda infer en posta. Vian propran patrinon Gideon!”

Sed li diris nur—

“Ŝi diris ke ŝ preferas morti ol vivi ka ŝ estis peza ŝarĝo.”

“Nu mi foriros do m avertas vin” mi diris pasie.

“M esperas ke v restos por rikolti fojnon ka tritikon” li respondas tuttrankvile kvaz farinte nenjon mavan ka vere m kredas ke l opini’s ke l plene pravis.

“Ne” mi diris. “Faru aranĝon kun Tivvy.”

“Ŝ estas senutila dum rikoltado. Ŝ estas ĝisoste pigra.”

“Mi restos ĝis ŝi venos sed ne poste” mi diris. “Ka m ne promesus tion se m ne sciis ke ŝ urĝe b’zonas bald edziniĝi. Vi ja seniluziĝis min Gideon pri ĉi’.”

“Senprave. Kion mi faris? Dormigis oldulinon kiu volis dormi. Ka Tivvyn nu ŝ preske petis min.”

Trankvila? Ho li stis trankvila kiel lago profunde frostiĝinta.

“Ka Jancis?” m ekkri’s. “Ka tipovra pupo kiun v enmondigis? I stas nek oldaj nek malmolestaj.”

Responde li fingromontris al nigrigita planko de stakej ka diris—

“Vi scias kies filin ŝ estas.”

Poste subvoĉe li diris kvaz forgesinte min—

“Sed mi ja amis ŝin iam.”

Do m lasis lin kun liaj pensoj ka rekuris al dom alvokante dum mi apertis maltaŭnan pordon—

“Rigardu Jancis kara m alportis ovon d ardezkolora kokin por kirli en lakto por vi!”

Sed nenju respondis k kiam m eniris kuirejon kanapo malplenis.

Mi kuris trans gregejon ka tra’lirejon apud sterkamas’ ka sur tivojon bonan kiun faris Romianoj taŭ multaj jaroj. Tamen por lago tilonga temp estis nur momento ĉar kvankam akvo tremiĝis dumilfoje post tiam laŭ Parson tamen ĝi tremis multmilfoje taŭe ka retremos ĝis tutmondo ŝrumpos kiel forlasita korpo de libel. Mi kuris laŭlonge de voj en forta varm ka sabla ter brilis en lum k ombroj stis kurtaj ka tre nigraj. Mi ĉirkiis unuan angulon troveblan ka sekvan k eĉ plisekvan ĉar eble ŝ marŝis pli rapide ol mi spozis. Sed nenju stis sur voj nenju blanka k ora patrin kun blanka k ora pupo. Nur kamomil en amasoj sur deklivoj havis tikolorojn oran ka blankan ka dum mi kuris ĝia forta parfum

kaptis mian koron. Mi pensis k'eble ŝ soriris al mia litĉambro por lavi bebon. Mi rekuris vokante ka serĉante ĉie. Sed nenju stis en dom krom Katinjo kiu rigardis min triste ka kuris en ĉiun ĉambron iomete taŭ mi. Mi serĉis en grenej ka subtegmento ka bovinej. Kial mi spozis ke ŝ estis tie mi n povas diri sed jam mi senesperis trovi ŝin. Mi trakuris arbaran vojeton ĉar eble ŝ ekdeziris marŝi tie kien Gideon ofte akompanis ŝin por adiaŭi ŝin hajmen. Mi kuradis vokante ĝis arbarkolomboj sorflugis klakante sed respondis nenju. Nur arbar staris ĉirke mi. Nur lakitaj ranunkoloj flavis bordojn de lago ĉiu florar duobligita en klarakvo ka muroj de kragago leviĝis blankaj ka verdaj. Sento de perdo ka malhavo plenigis min. M iris al Gideon ĉe maltaŭ' de dom.

“Mi n povas trovi Jancison” mi diris.

“Mi diris ke ŝ reiru al el kie ŝ venis” li respondis sammaniere kiel li taŭe parolis ka senhonte.

“Ŝi n povas” mi diris “ĉar ŝi n havas monon ka ŝia patrin mortis ka ki okazis al ŝia patro ŝajne scias nur asiztribunal ĉar ŝi ne. Ŝi marŝis tutvoje el Silverton Gideon. Ŝi n havis monon por pagi diliĝencon. Ĉiujn tilacigajn mejlojn ŝi marŝis por atingi vin. Ka kiamaniere vi bonvenigis ŝin?”

Li diris nenjon je ti sed daŭrigis sian laboron.

“Vi dev's veni serĉi povran knabinon” mi diris. “Tuj dum nuna minuto vi dev's veni. Vi dev's elpensi alian lokon serĉendan. Ho elpensu tuj alian lokon Gideon! Ĉar mi n povas. Ka se ni n povos trovi alian lokon restas nur...”

Kun forta tremado mi fingromontris al lago.

“Ki?” li diris tre kolere. “Vi volas timigi min ĉu?”

Li batis fosilon en teron kvaz malamiko kaŝis sin tie ka venis kun mi tra domon ka kromdomojn. Poste l ekiris laŭlonge de voj dirante k'eble iu donis al ŝi lokon en ŝarĝvagon' ti timigis min koncerne lian menson ĉar nenju laŭiradis tivojon krom ni mem ka fantomaj ĉaroj kiuj laŭdire aŭdiĝas nokte ruliĝante knare laŭlonge d antikva ŝose. Sed post kurte li revenis ne trovinte spuron de Jancis.

“Ni devos dragi lagon” mi diris. “Ni ne b'zonos iri malproksimen mi n dubas. Balde ŝ estus subakva ĉar ŝ estis tre

nana k eta. Ka ŝ n havis sfiĉan tempon por longe marŝi. Sendube ŝ eniris laŭ digvoj' ĉitie.”

Ĉar kiel mi taŭe diris ti larĝa ŝtona digvoj' kiun konstruis Romianoj etendiĝis d antaŭo de nia dom sob al vilaĝo ĉe fundo de lag kie on diris aŭdiĝis vespere sonoriloj.

Montriĝis ke m pravis ĉar ĝuste kie digvoj' eniris akvon estis boteto de bebo. Mi taŭe rimarkis ke ĝia rubando stis nefiksita ka boteto preske forfalis k efektive ĝi pli frue ja stus perdita se ĉitibebo smilus aliajn bebojn kiuj ridas ka piedbatas por senti sian forton. Sed ĝ estis nur povra simplul el vaks ka tial sendube boteto restis sur piedo ĝis ĝi sentis malvarman akvon ka baraktis mortante kiel ĝi taŭe ne faris vivante.

I kuŝis tie sur lito de lilifolioj ka n'senvorte levis ka portis in en domon. Mi lavis in ka metis sur in blankajn vestojn ka n'kuŝigis in sur lito de Patrino ka m amasigis ĉirke ĝin blankajn siringojn ka kratagojn k orajn tagliliojn k orajn primolojn per kiuj infan estonte farus florbulojn.

Tutdume Gideon diris nenjon nek multe rigardis in li daŭrigis sian laboron en bien.

Sed najbaroj venis dum ĉiu el tri tagoj taŭ enterigo el proksime k el for. Ĉar reven de Jancis k infan ka droniĝo provizis rakonton kia taŭe n aŭdiĝis en nia parto de land kie vivo pasis senevente eĉ laŭ memor d Aaĉjo Callard.

I venis ka rigardis in ka virinoj ploris kvankam i kondutis malmole kiel siliko pri Jancis dum ŝia vivo. Pli junaj viroj staris nelonge dirante nenjon sobrigardante ŝin kvaz i sopiras al ŝi.

“La pekoj de patroj” diris Sakristiano oratorante super tidu “ka ne nur la pekoj de patroj ĉar ne konvenas paroli delikate homoj ka kvankam tristigas diri tion povra knabin ne kondutis dece k infan naskiĝis bastarde. Homoj ĝi n estis eĉ hordeinfan' ĉar tutne rolis ringo. Ni n scias kiu stis patro” li daŭrigis rigardante Gideonon tiel ke stis klare ke l ja bone sci's k intencis sci'gi al ĉiuj se Gideon n edziĝos kun Tivvy “ni n scias tion sed ni ja scias *el kie ŝ venis*. Ni scias kiu stis ŝia pejtro najbaroj. Ni scias ke patris ŝin kunlaboranto de Diabolo. Ni scias ke bruligo de stakoj stis nenjo jes men ol nenjo kompare kun kion li faris sekrete ka kaŝe. Ki okazis

estis taŭcipebla ĉar ki generiĝas en ost eliros en karn karaj animoj.

“Per iliaj fruktoj vi konos ilin Mateo sep” aldonis Sammy.

Poste longe sobrigardinte tidu orajn kapojn kiel on rigardas raran birdon kiun on nenjam denove vidus li diris al si tiel flustre ke m aŭdis lin nur ĉar mi staris plej apude—

“I stis amindaj ka ĉarmaj dum vivo k en mort i n disiĝis.”

Ka l vespiris forgesante menci' ĉapitron ka verson.

Infanoj de Callard venis duope por rigardi korpojn. Poste dum i staris ĉe litfin rigardante bebon sur fleksita brak de ĝia patrin subite i ekkri's kune samkiel pri taŭroludado—

“Ho dolĉa! Eta pupo!”

Ka Muelisto kapjesis trifoje kvaz dirante jen du katidetoj kie i devas esti.

Poste Aaĉjo Callard taŭenpaŝis ka diris—

“Du entombigoj en un monato! Ti min memorigas pri tagoj kiam granda malsan afliktis landon ka n'vivantoj laciĝis pro entombigado de mortintoj. K estas strange ĉiuj amikoj ke ĉitidu mortis kvankam kune i n nombris tridek jarojn dum mi jam nombris un ka naŭdek jarojn ka tamen ancor min ne kaptis pesto kiu furiozas tra ĉitiamara olda mondo tiantikva pesto nomata Morto.”

Ankor Gideon diris nenjon. Tamen nokton tal ni portis in al tombej m aŭdis lin moviĝi ka ĉar mi timis ke pro subita horor en spirito l eble difektos sin ĉar kvankam kutime li movis sin lante ka kviete de temp al tempo l agis haste m iris vidi ki okazas.

Li staris apud lito. Kiam m eniris li ĵus etendis manon ka prenis per grandaj brunaj fingroj plektitajn orajn harojn densajn ka delikatajn pri kiuj ĉiam fieris povra Jancis. Kiam li turnis sin je mi'enir li smilis knabon kaptitan en plena kulpo klinante kapon ka balbutante vortojn per kiuj li volis klarigi sian agon k efektive i tion faris—

“Mi ja amis ŝin iam.”

Ĉapitro 5: Lasta konkroludo

Se Parson ne dirus ke m dev's zorge skribi ĉion k ellasi nenjon ĉar sc'i ĉion afabligas sed sc'i nur parton malafabligas eĉ pl'ol s on scias nenjon se l ne dirus tion mi tutne volus skribi pri titri monatoj ĉe Sarn inter morto de Jancis ka tempo d akvotrem. Ĉar kelkaferoj stis tiel malfacile priskribeblaj k'eĉ granda klerul hezitus ka mi kvankam mi scipovas altan ka basan skribadon tutne stas klera ka pene trovas vortojn por kelkaferoj. M opinias kelkfoje k'en nia homa lingvo ne troviĝas vortoj por plej gravaj aferoj. Do kiam tiaferoj trafas n'ekmutiĝas ka povas nur senti ka sentadi ĝis koroj stas kiel krevanta digo. Eble en posta vivo kiun mi jam komencas ekvidi sur rando de ĉimondo ni trovos ĝustajn vortojn. Sed ankore ne. Do se m malsukcesos dum mi'entrepren on devos pardoni pro kion mi n povas fari ka plenigi spacojn en mia rakonto per trajboj el propra imago.

Plej strang'aspekto de titemp estis ĝia silento. Gideon ĉiam estis silenta hom sed nun li fariĝis senvorta kiel Muelisto. Li venadis k iradis sed nenju vort eliĝis el lia buŝo. Ka kelkfoje l ekhaltis dum labor kvaz i'frapis lin. Liaj pensoj verŝajne. Poste li rektigis ŝultrojn tigrandajn ŝultrojn ka denove daŭrigis laboron. Mi spozis ke ti ĉesos post iom da tempo ka ĉar ankore nenjo stis aranĝita de li ka Tivvy mi decidis ne lasi povran knabon tutsola sed resti tie dum iom da tempo. Tivvy ne sci's kion fari ĉar ŝ obstine volis edzigi Gideonon sed ŝi timegis hantadon kiu laŭ ondir nepre okazas en loko kie patrin ka bebo kune mortis ka ŝi tutne kuraĝis paŝi sur nian flankon de lago. Do ni restis en profunda kazeiginta silento kiu pli ka pli fariĝis solida kiel glaciiganta akv aŭ acidiĝanta lakto. Krom birdoj kiuj zorgis pri propraj aferoj ka n pensis pri ni nenju voĉo sonis ĉe Sarn. Vespere kiam i silentis mi povis aŭdi boaton de Gideon ligitan tuj preter fin de digvoj' ka kiu frapis frapis per softaj memorigaj batetoj. Kelkfoje en kuirej dum nokto kiam Gideon nokte stis ekstere prilaborante tritikon aŭ

fojnfaradon mi sobtenis pladon d alloga manĝaĵo taŭ Katinjo nur por ke ŝ miaŭu. Ka poste mi diris “Do nun ci miaŭis! Bona Katinjo!”

Kiam li stis en dom Gideon stis muta kiel dronint escepte un fojon en nokto de brila lunlum dum ni vespermanĝis tarde post fojnfarado li subite klinis sin taŭen ka diris—

“Ĉu v vidis tion?”

“Kion?” mi diras.

“Iu preterpasis pordon en blanka robo.”

Sed ne taŭ Juli kiam veter stis tondrema varma ka senventa ka tristiga strangece vere trafis lin. Mi sidis ĉe sojlo por kapti iomete da freŝaer ĉar blovetis el trans lago vespere. Mi kardis lanon ka ĝia blankece amasiĝinta sur mian nigron aspektigis min kiel pigon m opini’s. Siringaj folioj stis sensukaj pro varm ka lago smilis al varmega plumbo kun ĉirke ĝ altaj densaj arboj ĉizitaj el fer. Ĉirke bordo de lag estis nimfeoj kuŝantaj sur pez’akvo kun nanaj blankaj brilantaj burĝonoj. Nenju birdo parolis ĉar ĉiuj stis en siaj kaŝejoj pro varmego. Eĉ akvobirdoj restis inter junkoj ka boato ĉesis frapetadi kontre ŝtupojn kvaz on jam decidis pri tago kiam venos pasaĝer ka nenjo stas farenda taŭ tiam. Subite Gideon ĉirkiris angulon ŝvitante pro hasto kun ĝenista-hokego en un man ka heĝgantoj ancor sur manoj ĉar li stis okupata pri heĝoj inter fojnado ka tritikrikolto. Li haltis kiam li vidis min ka metis manon sur sian kapon k elkri’s pasie—

“Pro kial ci sidas timaniere ludante ke v estas Patrin?”

“Mi tutne ludas esti Patrin” mi diris. “Ki stas al vi?”

“Patrin kutimis sidi tie ka kardi lanon. Mi kredis ke v estas Patrin.”

“Nu mi n kaŭzis tion” mi diris. “Sed kial vi ĉirkiris tiangulon tiel kurege?”

“M interplektadis tigrandan kratagan heĝon ka ŝ venis sur ĝi tutblanke vestite.”

“Kiu venis sur ĝi?” mi demandas senpacience.

“Jancis” li diras tuttrankvile ne kvaz dirante strangaĵon sed samkiel li parolus vidinte Tivvyn aŭ Pollynn Muelistan. Li diris nenjon pli sed reiris al sia labor tamen li n reiris al heĝo. Li ĉiam rifuzis diskuti kion li vidis li nur diris ke l vidis ka jen fin. Alian fojon li sarkadis grandan tritikan kampon. L eniris domon tre

haste ancor portante sarkilon ka diris ke l vidis Jancison kiu plugis per siaj du blankaj bovoj en hordekampo k infan sidis sur plej proksima bovo.

“Nu komprenu Gideon” mi diris “vi dev’s ne plu pensadi pri Jancis alie vi sorbiĝos. Ka hom sorbita stas survoje al freneziĝo. Vi devas pensi nur pri prosper k enspezado ka ŝparado kiel taŭe ka n pensu pri Jancis aŭ Patrino taŭ via mens estos pli trankvila.”

“Mi n pensas pri Jancis. Ŝi propravole venas.”

“Nu direktu pensojn al aliaj aferoj ka ŝ ne venos.”

“Al kiaferoj?”

“Nu riĉiĝi k akiri domon.”

“Pro kial?”

“Pro kial vi taŭe volis. Pro ke v volas tion.”

“Mi ne volas tion nun.”

“Sed kial? Vi tiom volis ke v venenis Patrino. Vi tiom volis ke v rifuzis Jancison. Ka kiom vi volis jam taŭe—vi ja soifegis kiam vi faris tion.”

“Nu nun mi ne volas.”

“Sed pro kial?”

“Mi perdis volon kiam mi vidis in en akvo.”

“Sed pensu do pri Tivvy. Mi scias ke ŝ volas partopreni en ĉasbal.”

“Mi n volas Tivvyn. Mi pli volas pendumiĝi.”

“Do Frinon Dorabella. Ŝi volas vin. Prenu ŝin ka ŝ elspezos sian monon por savi vin de Tivvy.”

“Dorabella stas brunhara. Mi volas blondan. Nanan. Kun bluaj okuloj. Virinon kia kratago ka lakto.”

“Do pensu pri mi. Estu mia kompan’ de temp al temp.”

“Sed v intencas foriri.”

“Ne taŭ via mens estos pli trankvila knaĉjo. Mi restos kelkatempe se v tenos vin bonhumora ka ĉesos memori pasintajn tristajojn.”

Sed n utilis. Post malpli ol semajn l envenis senspire ka diris—

“Denove ŝ faras ĝin.”

“Kion? Plugadon?”

“Ja’s. Ka hordekamp estas kalva kiel fuliko.”

“Pro nebonaj semoj” mi diras “jen kial’ Gideon. Ĉar vi devis aĉet’in anstat enmeti proprajn.”

Sed mia kor stis peza ka m ne povis vidi ki stus fin de ĉi’ ĉi. M eĉ esperis ke Tivvy venos.

Fariĝis kutim ke l diris—

“Ŝi venis denove hodie en arbar.” Aŭ li diris—

“Rigardu! Jen ŝi proksimiĝas al digvoj’. Jen! Nun tutmalseka ŝ marŝas sur digvoj’. Jen! Nun ŝi malaperis.”

Unfojon li diris ke ŝ gestis al l en boato. Sed li vidis ŝin nur subĉiele tiel ke dom estis ia rifuĝej por li ka kiam li sentis tistrangan timon l eniris ka fariĝis pli normala. Ĝojigis min ke l ne vidis fantomon en dom. Anke ĝojigis min ke l nenjam aŭdis ion. Ŝajnis ke post kiam frapis lian koron vidi ŝin en akvo li perdis kapablon elekti kion *vidi* sed ankore li povis elekti kion *aŭdi*. Sed je komenco d aŭgusto kiam tritiko preske maturiĝis l eniris ka diris ke ŝ kantis *Verda Gruzo* trans akvon.

“Son eniras ĉitien” li diris maltrankvile. Do m fermis fenestron.

“Pli bone ke v metu iom da lan en orelojn” mi diris. Verdire stis kortuŝe vidi viron kian Gideon tremi pro glim de blank en heĝ aŭ e° el trans akvo. Do l metis lanon en orelojn ka n’bone sukcesis pasigi unuan parton d aŭgusto. Venis vesper taŭ foir ĉe lago Sarn ka multaj standoj jam stariĝis. Ni sidiĝis frue por nia vespermanĝo ĉar alvenis leter de Frin Dorabella kun informo pri Beguildy. Do m apertis leteron ka legis ĝin al Gideon ka l elprenis lanon el oreloj por aŭdi ka leter diris k’on malmulte punis Beguildyn ĉar lia krim stis nur reago pro filin.

“Domne!” diras Gideon. Flamanta malam denove ekardis en li kiam l aŭdis pri tinana pun ka m preske kredis ke ti liberigos lin de vizioj. Sed nelge li denove malankoli’ĝis ka diris ke l vidis Patrionon en arbar kie stas porkoj.

“Nu javere” mi diris “ti stis nur Polly de Muelisto. Ŝi grandiĝas pl’ol kutime ka Patrin stis nur nana.”

“Ne” li diris. “Ti stis Patrin. I ĝenas min Pru.”

“Trankviliĝu!” mi diris frapetante lian ŝultron kvaz li stus infan. Ĉar vere kiam li parolis pri hantado li ŝajnis febla ka timema kiel infan en mallum.

“Vidu ke ĉi’ ĝustiĝos” mi diris. “Kuraĝu ka n faru al vi zorgojn. V iam amis *Konkroj*. Nun vi dev’s ludi Konkrojn per propraj pensoj.”

Sed li nur rigardis min kvaz ne komprenante ka diris—

“Malplaĉis al ŝi ke m malafable parolis pri bebo. Tr’ofendiĝemaj stas patrinoj pri siaj beboj.”

Ni sidis silentaj dum kelkaj minutoj ka subite li diris—

“Tent! Ŝi kantas *Verda Gruzon*.”

Longatempe l aŭskultis kvankam mi aŭdis nenjon.

Li klinis sin taŭen ka diris ke ŝ venas de digvoj’ domen. Lia vizaĝ ekŝvitis kvaz li timis pri sia vivo. Sed verdire veter stis humida ka varma tiom k’on ŝvitus sen ti ĉar stis samtempe tiom senvente ka mucide plej mava veter ĉe Sarn kie nenjam stis mult’aer pro valetu ka kie ĉiam stis malseke pro akvo. Dum ĉitia vesper akvo sobfluis sur muroj lasante sur kalkolakto spurojn kvaz de multaj helikoj. Super lago nebulo leviĝis kun form de vojetoj ka bukletoj blanka kiel lan densiĝante koagule en mezo de lago. Kelkfoje buklo de nebul etendiĝis kiel koltuko k alifoje ĝi stariĝis en form de virin ŝvebante en aer. Ŝajnis al mi ke Gideon eble vidis un el tinebulaj fantomoj. Ĉar i daŭre leviĝis ka sinkis ĉirke digvoj’ kiam leĝeraj ventetoj sur akv in tiris. Ĉe Sarn en aŭgusto ĉiam stis densaj nebuloj nokte ka matene ka ĉiti stis nekutime prema pro tondra pluvo de taŭa nokto ka minaca tago da humido sekvis ĝin. Mi diras ke prema ĉar mi ĉiam abomenis nebulon ka n’spertis ĝin tiom ke ĝ plene kaŝis bienon k arbaron ka kirkon kvaz lago leviĝis ka dronigis ĉion.

“Tent!” diras Gideon. “Ĉu v aŭdas *Verda Gruzo*?”

Tiel forta stis lia mens ka tiom ĝi mastris mian ke m preske kredis mem aŭdi mornan kantadon. Ka jen post momento sidante en granda brakseĝo kun rigida sopirema vizaĝo kiel ti de sorĉito kia kredeble li stis tutsenaverte Gideon mem ekkantis melodion. Li levis dekstran manon solene kiel parson’ diranta benon ka rigardis tra pordon lagen ka digvojen ka dense blankkazeiĝnebulen. Li kantis kvaz sub iu forta potenco kiu devigis lin. On povis vidi ke l ne povis ne kanti. Li havis tondretan voĉon belsone basa ĝ estis ka kvankam li komencis tre softe ĝi pli fortiĝadis dum li kantis ĝis muziko ŝajne mastris tutan domon. Ka kiel li donis

tiom da signif al t'infaneca kanto! — tutan amon kiun li taŭe sentis al Jancis ka lian deziron ke ĉi' stu por ŝi grandioza ka ke ŝ iru al Bal kiel dam plenan timon ka kompaton je ŝia morto. Ŝajnis ke lia mens pli trankviliĝis post tikvaza cedo ka repaciĝo. Ankor rigardante pordon li diras—

“Jen Jancis. Trempita d akvo ŝ estas el lago.”

Do m diris ke m vidas nenjon.

“Sed rigardu ja jen akvo gutas de ŝia robo” li diris. “Ti'n ka re'n ŝ iras! Tutmalseka ŝ tutver'estas!”

Li fingromontris al planko k efektive akvo ja kuŝis en ĉiuj kavetoj d ardezoj kvaz lago trovis rimedon soreti tra plankon. Do m diris ke jes mi vidas akvon en kavetoj d ardezoj.

“Atentu kiel ŝmaĉas koto en ŝiaj botoj! Kota stas lago. Vidu kiel lante ŝ venas—lante kiel taŭe dum ŝi ŝpinadis per granda rado. Ŝi marŝas lante ĉar ŝiaj vestoj stas tre pezaj. Stas deklive ka ŝia kor pene batas ĉar ŝi devas tutsola porti bebon.”

Ka l diris maltrankvile—

“Ke mi n estu mokinta bebon!”

Venis longa silento. Sonoj en ĉambro stis malpli ol dum vesper kiam Patro mortis. Stis kvaz Sarn ĉiuj vivantoj en ĝi ni ka niaj brutoj arboj plenaj de birdoj arbaraj vojetoj kun sovaĝaj bestoj jam sinkis al fundo de lago kie troviĝis vilaĝo. Mi komencis kredi kion diris Gideon ĉar vere ti ne multe diferencis de multaj rakontoj pri hantado kiujn ni jam aŭdis.

“Rigardu jam nun!” li murmuris. “Ŝ iras laktejen. Jen nun ŝi malaperis! En laktej mi rifuzis edziĝi kun ŝi titagon taŭ ŝ iris al dom de Grimble. Jen nun ŝi revenas. Ŝia flava kapo tre brilas ka memorigas min pri vaganta lum en Nova Dom en Lullingford.”

Li klinis sin taŭen fikse rigardante laŭ malklara irej kiu kondukas al laktej.

“Jen rigardu malsekan plankon!” li diris. “Stas kvaz ŝ enportas lagon kun si. Mi n antaŭvidis ke ŝ venos en domon. On facile gardas kastelon kiam nenju atakas. Sed nun—”

Li longatempe rigardis ardezojn.

“Sed nun ŝi foriris!” l ekdiris. “Kiel or'abel kiu ŝvebas en aer ka kantas dum ir. Ja vere bela !”

Li meditis longatempe. Poste li stariĝis ka diris ke l'iros prizorgi brutaron ĉar vesper komencas fariĝi nokto. Li diris tion kiel kutime ka m spozis ke tim nun forlasis lian menson. Sed dum l eliris li turnis sin ka rigardis min samkiel en nokto kiam Beguildy iris serĉi sepan infanon ka diris—

“Se mi tardos metu ŝlosilon super pordon de stalo.”

Mi pensis ke ne ke se l restos ekstere eĉ duonhoron mi serĉos lin. Efektive mi preske komencis tuj sekvi lin. I'avertis ke m iru. Sed strange ŝajnis sekvi lin kiam li nur iras prizorgi bestaron. Do m restis en dom ka komencis serĉi en libro de Beguildy kiun m aĉetis kiam on vendis lian libraron k en Bibli' por trovi kuracparolon kontre tia sorĉiĝo. Mi legis ne pl'ol dum duonhor eble ne tiom longe ka m spozis ke stas ĉirke naŭa hor kvankam pro s'foka nebul ka silento ŝajnis pli tarde ka subite m aŭdis tamburadon sur pordon ka kureg'eniris Tim de Muelisto k anke Polly.

“Ho Pru Pru! ni tarde hajmonpeladis porkojn ĉar nigra porko rifuzis elveni el inter junkoj ka n'kondukis in en porkejon sensone ĉar ni timis ke Sinjor Sarn koleros je ni ĉar ni tardas ka n'serĉadis lampirojn sub heĝo de fruktarbar k el dom venis Sinjor Sarn. Do ni kaŝis nin. Ka ni rigardis el sub heĝo ka vidis ke l staras apud akvo kun kap iomete klinita kiel ĉeval kiu stumblas. Ka m rakontis al Polly kion diris Aaĉjo Callard. ‘Sarn?’ li diras. ‘Ho Sarn jam konas hantadon de bela fein en lago ka jam ne povas mastri sin.’ Ka dum mi flustris tion al Polly Sinjor Sarn levis kapon ka rigardis ĉiudirekten kvankam on povis vidi nur nebulon. Ka l direktis sin laŭ digvoj' irante kiel dormanto k iris al digvoj' k al boato ka malligis boaton k eniĝis ka prenis remilojn ka remis per grandaj batoj for de bien al kien kondukas digvoj' al mez de lago. Do n ĉirkekuris por vidi kien l'iras sed nebul kaŝis lin. Bru de remiloj daŭris iomete ka m volegis esti en boato. Sed nelge mi ĝojis ke m restas sur seka ter. Ĉesis son de remado.”

“Ja's. Tutmorte ĉesis” diris Polly.

“Ni detenis spiradon por ĉu n'povos aŭd'ion sed ne! Stis kiel en teksto kiun Parson lernigis al ni pasintan dimanĉon ‘Fariĝis silento sur la tuta lando ĝis la naŭa hor’. Ho stis solene.”

“Via devo stis veni al mi tiam” mi diris. “Sed rapide! Kion pli?”

“Nu nenjon pli” diras Tim “krom grandan plaŭdon. Mi taŭe nenjam aŭdis tian plaŭdon eĉ ne kiam makulita bovido falis en akvon.”

“Ja’s. Jadi stis plaŭdego” diras Polly.

“Poste tutsilentigis ka n’detenis spiron k aŭskultis sed nenj aŭdigis. Ka m alvokis Sinjoron Sarn laŭ lia nom sed nenju respondis. Ka m timigis k anke Polly ka n’kuris al vi.”

Boaton! Mi dev’s atingi boaton! Mi kuris al digvoj’ ka forŝiris mian jupon sed ne necesis naĝi ĉar boato jam revenis ĉar aer blovis el alia lagekstrem ka pelis akvofluon al ni ka dum tempo d akvotrem akvoflu stis pli forta. Stis terure vidi timalplenan boaton ŝtelveni lantlante. Mi kaptis ĝin k enigis ka prenis remilojn kiujn Gideon elprenis el teniloj ĉar eĉ en tihor li n povis agi mallerte aŭ senatente. Mi forremis kriante al infanoj k’i kuru venigi Sakristianon ĉar li loĝas plej proksime. I balde forestis ka tutne b’daŭris tion. Ka m remis ĝis mez de lago sondante en akvo per remiloj rigardante ti’n ka ti’n ka kriante lian nomon kvankam mi tutsci’s k estis jam tro tarde. Ankor mi remis ka vokis kiam m aŭdis Sakristianon kr’i de bordo.

“Mi ka Sam serĉos dum vi ripozos iomete” li diris. “Sed nenjam ni trovos Sarnon. N utilas grapli en ti parto de lago. Ĝ estas tro profunda. Nenju stas trovebla kiu eniris tilokon.”

I forremis ka dum i proksimiĝis al mez de lago m aŭdis in kanti kiel taŭe ni kantis super Patro—

Pekoj ka bonoj taŭ Di

Prezentos siajn pledojn

Sed i eksterlasis versojn pri herbo kiu kovras kapon ka piedojn ĉar lia tomb estis akvo. Ja’s! Tutebenaĵo de tiakvo ne stis tro granda por esti tombo de vir forta kiel li. Nebulo longa ja mejlo stis mortotuko ne tro granda. Ĉar kvankam li pekis ka faris mavon k alportis malutilon al homoj per sia fortec tamen nenjam l agis nananime nek laboris senatente nek mensogis. “Monto el granito kvarco piritio” l’iam diris al mi parolante pri sia harditeco. Ka l ja smilis in. Li n povis cedi pl’ol granito povas diseriĝi kiel grejso. Ka nun li finludis Konkrojn sed ne per granda ruĝeta ka blanka sed per sia propra vivo.

Lasta konkroludo

Ka ĉar lia rival estis tiu kiun nenju povas venki ĝi frakasiĝis en pecetojn dum momento ka tiel Gideon Sarn malgajnis en sia lesta ludo.

Ĉapitro 6: Lago tremas

Tistis nokto de plor ka tim pri kiu nenjo en viv iam forgesigis min. Sakristian ka Sammy post vana serĉado hajmoniris. Mi stis sola sub nebula kovril en tiloko plena de fantomaj paŝoj. Mi diris preĝon por mortantoj. Poste mi sidis horon post hor ĉe fajr en timalhela spirita deprim kiun alportas mizer aŭ konfuzego. Tiu stis plej stranga mortonokto kiun ancor mi pasigis ka plej trista nokto en mia tuta vivo. Mi pripensis ke Gideon malpermesis al mi sobiri en akvon por sanigi mian aflikton kiel on kutimadis taŭ longe. Ka nun vidu! li mem eniris lagon por resaniĝi kontre sia propra malbeniĝo. Ka m pensis pr'ora Jancis ka bebeto ka Srin Beguildy ka Patro ka povra Patrin ĉiuj mortintaj. Morto ja multokupis sin rikoltante inter ni. A°! Tiu stis korŝira maldormo ĉar ĉiam mi volis ke miaj amatoj stu en bona stato. Taŭ un jar Jancis elektigis por ludo nomita ,eti Seĝon por kiu on ĉiam elektis plej belan knabinon. Mi bone memoris ŝin vestitan per blua robo kun somerflora kron sur kapo ka bukedo en man ka du dikmuskolaj junuloj alten levis ŝin en seĝo ka ceteraj preterpaŝis unope por ke ŝ elektu un el i. Ĉiuj junuloj stis en ludo sed nur un knabin ka kompreneble okazis multe da scivolem pr'elektota junul.

On donis al ŝi bukedon k un knabo tenis pelvon d akvo ka kiam ŝ elektis sian deziraton ŝi trempis bukedon en akvon ka frapis al li vizaĝon ki multamuzis ĉeestantojn.

Ka kompreneble Jancis elektis Gideonon ka l atendis ĝis fin ĉar plaĉis al li vidi ĉiujn ceterajn rifuzitaj ka sc'i ke l n estos tia. Ka ŝ forte frapis al li vizaĝon per bukedo k elsonis ŝia dolĉa tinta rido ka l mallevis ŝin per siaj grandaj brakoj ki stis parto de ludo ka kisis ŝin ki n estis ludo. Ka m pensis ke stis tristafer ke ŝ verŝis akvon sur lian vizaĝon kvaz por indiki ke ŝ bapto lin en lago logante lin al morto ka ke datreven de foir stis netolerebla por li. Do m suspiris pensante—“ni ĉiuj stas Liaj pupoj ka Li reĝisoras dramon.”

Mank enmensigis ke Gideon gajnis gineon⁷⁶ pro plej bona ka klara fajfado. Li scipovis tre bone fajfi k anke li povis regi sian vizaĝon spite de klaŭn kiu penis ridig'in. Ĉar kiam Gideon decidis pri mongajn' li stis tiel serioza ke nenjo en mondo povis eĉ ridetigi lin. Anke Beguildy bone fajfis sed li pl'ofte venkis en osceda konkurs kvankam proksime rivalis kun li Aaĉjo Callard. Beguildy persiste partoprenis foiron kvankam ti kolerigis Sakristianon kiu diris ke ti stas Eklezia festo ka n por sorĉistoj ka kiu okupis sin pri ĉi' kvaz li stus ĉeful.

Pensoj pri ĉi' ĉi pikis mian koron ĉar ki stas pli doloriga ol memori gajajn festojn pasintajn? Tiam on diras "Ja's ĉituu aŭ tiu stis ĉitie tiam." K on memoras kiom forta stis ĝoj k on eĉ povas ĝui ŝerciojn pri grandaj solenaĵoj. On memoras k'iu diris "Anser nun marŝas sur mia tombo" ka ridis. K on memoras ke tiparolinto jam delonge stas sub ter. Do memor pri lestjara foir plorigis min kvankam ne plorigis min droniĝo de Gideon. Efektive lia morto stis eksterordinare stranga ka n kia kutima sorto ĉar li mortis nek en sia lito nek pro perforto sed propravole kaj propracele eniris nebulon ka malaperis. Ka ke ni nenjam trovis lin ŝajnis al mi vere taŭga fin de vivo kiu intence apartigis sin de ĉiuj agrablaj kvankam iom stultaj agoj ka kutimoj de homoj. L apartenis al nenju ŝajne ĉar li n ĝenis sin pri siaj plej proksimaj parencoj. Li plej apartenis al ter k akv el kiuj li konstruis al si vivon laŭ sia vol. Rokoj ka maltrankvil'akvo peza hum arboj ĝemantaj sed ne cedantaj al ŝtormo parencis kun li kvankam li n amis in. L ekprenis ka tirane posedis in. Ka farante tion l iasence stis viktimo de ŝtelistoj ĉar i kaptis ka sklavigis lin. Ŝajnis al mi ke l ne povis morti kiel aliaj homoj k enteriĝi sub ses futoj da hum ka havi nomŝtonon. Ne. Li b'zonis larĝan ĉambron kie l povis libere vagadi laŭplaĉe inter maltrankvilaj fluoj de lag en mezo de propraj bien k arbaro. Ĉu m povas lamenti pri tiaĵo? Ĉu on povas lamenti fulmofrapon aŭ nubrompiĝon? Ne. Nur kiam mi memoris timalmultajn fojojn kiam li cedis al sia sort mi povis plori pro l ekzemple kiam mi memoris ke l metis brakon taŭ vizaĝon dum incendi' ka plorsingultis.

⁷⁶ Nun arkaika monunuo brita kun valoro de unu pundo plus unu ŝilingo.

Dum tuta nokto mi pensis pri l ka mallum pleniĝis de malvarma tim ka horor ĉirkiĝis ka bien fariĝis tiel soleca ke ĝ ne plu apartenis al mondo. Mi sci's ke m ne povos pasigi tie plian nokton ka m komencis demandi min kion mi povos fari pri brutar ĉar nenju eĉ metus piedon ĉitien post tiaj okazoj. Ne ne se tiel ĉiam estus! Sakristian tutrifuzis ka se l ne volis do aliaj certne venos. Nenju volos aĉeti ĉitibienon ka kvankam mi povus forlasi kampojn kiujn ni prilaboris por ke denove arbar k erikej kaptu in brutoj devos esti prizorgataj dum i restos ĉitie. Tamen mi firme decidis ne plu loĝi tie sed forfuĝi kiel el urboj d ebenaĵ en Bibli' ne pro kulpo de bien mem sed pro kion faris el ĝi Gideon. Mi foriros morgue. Sed mi n povis decidi kion fari pri brutoj ĉar se m petus al iu eĉ doni al i akvon tiu dirus "Ne ne mastrin on vidas fantomojn tie."

Finfine venis benita tagiĝo ka nebul kuŝis kiel vasta brilanta nuboj sur bien sed dum sun sorŝvebis plena de potenc ka varmigo ka n kontrebila nebul liberiĝis unpece ka lante levis sin ĝis estiĝis spac inter ĝia malsupraĵo ka lago kie naĝis fulikoj kvaz abeloj ĉirkekurantaj inter du tabuloj. Poste duon' d arbotrunkoj liberiĝis tiel k'arbar ŝajnis ĉirkita de neĝo. Ĝi plu levadis sin ka finfin' eniris ĉielon ka malaperis inter tagiĝaj nuboj. Poste nuboj nuliĝis ka restis nur nuda ĉiel' blua kiel birdokul. Tuj post malaper de nebul mi vidis ke lago rompiĝis dum nokto k akvo stis dika ka tremema kvaz bolanta tiel ke nimfeoj fiksitaj per ĝisfundaj tigoj movetiĝis. Kiam benita sunlum venis anke solvo venis en mian menson. Nun stas foirtago. Multaj homoj stas ĉitie. Kial ne konduki bestojn al foir ka fari enfermejon ka peti iun vend'in? I vendiĝos malkare. Ha. Jen solvo! Do post kiam mi manĝigis brutojn ka melkis mi kunigis ĉiujn en gregejon por k'i stu pretaj k ordigis domon kuntiris kurtenojn k ekiris al dom de Sakristian por demandi ĉu m rajtos konstrui enfermejon ka venigi brutojn ka peti potvendiston aŭkc'in dum li vendos siajn varojn. Ti n multe plaĉis al Sakristian sed li sci's ke l ne rajtis rifuzi ka foir stis en ni'arbar do li n povis ne konsenti. Tivvy rigardis min tre malice ĉar ŝi volegis esti mastrin de Sarn ka krome ŝ amis Gideonon ka ŝajne ŝ kulpigis min pri misiĝo de ĉi'. Sed mi devis rapidi ĉar jam unuaj ĉaroj venis al foirej. Ankore tiam stis kutim ornami ĉaron por ĉiu vilaĝo per floroj ka branĉoj por alporti popolon. Aŭ kelkfoje junuloj marŝis viroj ka

virinoj en apartaj grupoj kantante survoje. Sed i reiris duope knabo ka knabin. Kiam mi preterpasis on jam pretigis varojn en budoj spicitan elon ka gingibropanajn bebojn kiujn amis Molly mentajn kukojn ka broĉojn el ŝtoneroj ka kombilojn kiuj staras alte en harar. Virin ardigis fajron ka preparis grandan pelvon da pudingo por konkurs por trovi kiu povas manĝi varmegan pudingon plej rapide. Ĉaroj veturis laŭ arbaraj vojetoj kun sama son kiel ĉe nia rikoltofesto. On babilis kiel ar da garoloj ĝis i atingis foirejon k aŭdis pri Gideon. Mi povis sc'i kiam ĉiu grupo sci'ĝis ĉar silento tuj estiĝis. Sed verŝajne i poste pensis ke nu i stas proksimaj al kirko kiu staras sur sankta ter ka malbenita lok estas je malproksima ekstrem de lago do i kuraĝiĝis ka denove ekbabiladis. Mi vidis Sinjoron Huglet ka Sinjoron Grimble amikegajn k i sulkgis brovojn je mi kiam mi preterpasis in.

Laŭlonge d arbarvojeto troviĝis granda moviĝo de libeloj ka glazuritaj injoj aspektis belegaj ŝvebante super sovaĝaj geranioj kiujn ni nomas drakosango. Mi pensis “Vento leviĝas inter branĉoj libeloj venas el siaj mortotukoj sed Kester Woodseaves forgesis min.” Ĉar l'intencis hajmonveni taŭ nun. Ka kial li memorus malbenitan virinon leporfrapitan kiu riskas akuziĝi pri sorĉado? Ne li n r'ensemigos min. L amindumos tijunulinon pri kiu li parolis kiu n avare ruĝiĝas.

Reveninte al hajmo m arigis ŝafojn porkojn bovojn ka pelis in rajdante sur Bendigo al foir. Feliĉe i ĉiuj konis min k iris kien m ordonis. Poste mi reiris ka metis kortobirdojn k anasojn anserojn ka meleagrojn en kestojn ka korbojn ka veturigis in per ĉarum. On gapis vidante min rajdi tr'arbar pelante gregojn da bestoj taŭ mi ĉar bestoj tre laŭtis blekante gruntante ka muĝante ĉar i malamis arbaron. Ka dum ni marŝadis tie ni ĉiuj troviĝis en tremanta akvo malklare ombrumataj ka m pensis pri kiel ni speguliĝis tie kiam n'enterigis Patron. Poste kiam kampoj ka grenejoj gregej ka bovinej ne plu enhavis vivantojn mi metis Katinjon en korbon ka ŝlasis pordon. Ka m pensis ke nun fantomoj posedu bienon jes ĉiuj eĉ Tim kiu havis fulmon en sango. Ĵur kiun mi faris al Gideon nun stis nuligita. Nenjo ĉitie stis farenda. Kial resti se nenju b'zonis mian servon? Mi iros mian vojon. Mi ne sci's kiun vojon sed mi sci's ke ĝ estos soleca. Mi jam pakis kelkaĵojn kiujn mi lasos ĉe Muelisto

kiu transportos in al Lullingford ka m konservis nur vestojn en kiuj mi staris ka malnovan Bibliion ka mian taglibron. Do m eliris el bien kie loĝadis Sarnoj eĉ de pratempo. Stis dolorige forlasi kampojn kiujn mi tiom longe prilaboris sed restadi stus pli dolorige. Mi tremis pensante pri kiel kirkspajr fingromontos trans akvon al hantata dom tinokton super tipej profunda plej senluma loko kie stas Gideon.

On jam vendadis mi'ajojn kiam mi denove alvenis ĉe foir kun stanaloja poto en kiun m enmetos monon. Ĉar mi n volis partopreni gajadon mi sidiĝis sur muron de tombej por atendi ĝis ĉi' stos finita ka m povos foriri. Aĉetproponoj stis vieglaj ĉar spozeble bestoj ne transprenis malbenon eĉ kvankam i venis el trista bien. Sakristian aĉetis Bendigon ka patro de Molly aĉetis bovojn por sia mestro. Callard prenis kelkajn bovinojn ka post iom da tempo ĉi' vendiĝis ka m donis Katinjon al Felena ĉar m opini's ŝin bonkora kvankam ne tre respektinda—aŭ eble eĉ pro ti.

Ŝi diris—

“Ĉu v ricevis informon pri Teksisto Pru?”

“Ne” mi respondis. “Ni jam delonge aŭdas nenjon.”

“Li stas unika” ŝi diris. “A°! Ja ŝajnas al mi ke l fariĝis el aliaĵo ol ni. Kvaz li venis elfor. Ĉu v memoras ke ni ludis *Multekostajn* por li'anim vi ka mi? Sed sendube iu eleganta dam en urbo kaptis lian animon jam taŭ nun.”

Tutdum ni parolis ka dum mi sidis sola sur mur de tombej mi konsci's pri minacaj rigardoj flankenrigardoj paŭtoj ŝultrulevoj k iuj fortiris sin kiam mi preterpasis. Mi miris pri ti ĉar kvankam mi sci's ke malnovaj rakontoj delonge kreskadis ĉe solecaj bienoj k kvankam tristo sfiĉas kelkfoje por malamigi homojn kvaz i opinias ke man de Di distribuas propekan punon tamen laŭ mi'opini ti ne sfiĉis por klarigi rigardojn kiuj trafis min ka tranĉis al mi koron ĉar en i mi vidis malamon. Ĉiam m amis homaron ka m jam diris ke m smilis virinon starantan ĉe vojfin kun bukedo donacota al mondo preterrajdanta. Sed anstate ĝi superrajdis min. Ja's! Je ĉititag en mezo d aŭgusto dum akvo tremis ĝi superrajdis min.

Mi demandis min kion fari ĉar m atendis kelkajn personojn kiuj veturos al Bramton ka donos al mi lokon en ĉar' ka tiel m estos survoje al Silverton. Se m forirus nun mi n havus vojaĝhelpon ka

krome mi n povos kalkuli monon ĝis ĉi' stos pagita por ke potisto prenu sian procentolukron. Pro ambaj kialoj mi devis atendi.

Srin Muelist alvenis kviete ka diris ke ŝ estas tie de komenco ka ke ŝ aŭdis multon diratan pri mi ka Grimble ka Huglet komencis flustradon ie ka tie dirante ion ka tion kun kapjes aŭ palpebrum aŭ skuado de kapo ka “Domaĉe! Kvankam bonaspekta junulin!” Aŭ “Iu devas agi. Parson' nepre prizorgu tion.” Do diskutado fikse pritemis min laŭ ŝia raporto ka tuj kiam i laciĝis pro parolado pri morto de Gideon i komencis paroli pri mi. Junaj diskutantoj ja kutimiĝis al rakontoj ke m travagadis kamparon nokte en korpo de lepor ka ke m konstruis leporejon sub ĉimur mem de tombej. Vortoj de Frino Dorabella ĉe *Poto da Cidro* restis en mensoj k incendi' pruvis malbenon ĉar kvankam Beguildy bruligis on diris ke Di ne permesus lin fari tion al bien de justuloj. Droniĝo de Jancis dekoble nigrigis aferon ka morto de Gideon stis fina bato. Stis i'nekomprenebla. Nura videbla kial' devis esti malben de Di. On opini's ke certe nia ŝip enhavis ian Jonan⁷⁷. Ka ĉar ĉiam on amis Patriron k aprobis Gideonon ĉar li fariĝos riĉa ŝajnis ke sendube *mi* kaŭzis malbenon. On konkludis lante laŭ kutim de kamparanoj sed farinte konkludon nur malvolonte on ŝanĝos sian opinion. Pro ti on rigardis min kun malam flanken turnis sin ka flustris. M estis Sorĉistin de Sarn. M estis virin malbenita de Di ka leporfrapita. M amikiĝis kun Beguildy timalica oldul helpanto de Diablo ka sendube ni stis samspeculoj. Ka nun preske plej kulpinde m estis sola. Mi povas diri k'en nia region' negrave ki okazis aliloke on suspektemis pri soluloj. Eble ĉar en tiperditaj ka forgesitaj bienoj en montar k inunditaj kampoj ĉirke lago kie dum longaj vintroj ventoj hurlis ĉirk angulojn de dom kiel lupoj k on parolis pri pasintaj teruraĵoj—pri viroj murditaj proksime al hajmo tristaj fantomoj kiuj mornas ekster botelvitraj fenestroj kiujn taŭe i posedis ka tra kiujn i nun rigardas nur elekstere terura muziko de mortlupar kriaĉado de sorĉistinoj kia laŭdire stis mi rajdantaj kun blovitaj folioj sur ventego minaco de

⁷⁷ Popol'esprimo signifanta personon kiu kaŭzas misfortunon. (Origine, Jona estis nomo de profeto en la Biblio. Jona admonis pekulojn, dirante ke se ili ne pentos, ilin trafos katastrofoj senditaj de Dio.)

vojrabistoj jam delonge enterigitaj ĉe vojkruciĝo—nenju volus esti sola ka nenju senkaŭze kondamnus homon al soleco. Sekve s on estas sola on nepre stas kondamnita.

Mi n povas diri kiom ti ŝiris mian koron. Por virin kiu povas senti ĉirkefluantajn amon ka malamon d aliaj eĉ sen dirita vorto ka kiu bone fartas nur en varmec d anim eĉ nana malam sficās por mortigi florojn.

“Nu” diras Srin Muelisto “m iomete komprenas ĉar on diras ke mia stas malbenita ka l ja meritas tion sed tutne vi ka m diras ‘Gardu vin kontre Grimble!’ Li stas insida tiGrimble. Huglet laŭte fanfaronas sed on scias kion li celas. Sed pri Grimble nenju scias. Li faligas vorton ien ka tien kvaz kardolanugon k on nek vidas nek suspektas sed jadi kia granda kardorikolto! Ka m opinias ke kardoj jam plenkreskis ka komencas flori.”

Dum ŝi parolis Tivvy tutnigre vestita kuris al mi ĉar ŝi disdiradis ke ŝ estis fianĉin de Gideon ka ŝ diras—

“Vi frapis al mi orelojn Pru Sarn! Nun rigardu!”

Ŝi sorgrimpis muron ka kri’s—

“Homoj mi parolos unfoje ka n pli. Mistraktita virin m estas. Taŭ kvin monatoj Sarn promesis edzinigi min ka jam de kvin monatoj mi rajtas esti Srin Sarn. Ĉar Sarn mult’amis min. Sed ŝi malebligis. Pru Sarn malebligis. Ŝi tiom timigis min ke m ne povis proksimiĝi al bien. Ŝi bategis min. Ka pro ke ŝ estas sorĉistin mi timis ŝin. Ŝi volis tie sti mastrin komprenu. Ne povis toleri k’alia person’ rajtu fari decidojn. Ka rigardu ki okazis! Ŝi ja stas mastrin tie nun ka tagon mem post morto de mi’povra Sarn ŝi vendas ĉion. Ho ŝ estas senkora virin! Ĉian fiaĵon ŝi volonte faras. Sen ŝi mi estus Srin Sarn jam de kvin monatoj. Ŝ estas forta ĉar ŝ estas sorĉistin!”

Mirigis min ŝia furioza ton ĝis mi memoris ke ŝ gravedas je aminfan’ ka ti stis dekoble pli hontiga ĉar ŝ estis filin de Sakristian k estis terure pensi kion Sakristian faros kiam li sci’ĝos do Tivvy sentis neceson kulpigi. Tuj kiam ŝi ĉesis paroli Grimble leviĝis. Li staris kun sia longa nazo direktita sob kvaz li pripensas kion li diros el ĉi’ direbla.

“Homoj” li komencis “ĉiti’ stas solena tago. En ĉitiakvo kuŝas brava bienisto. A°. Vir kiu povus meti sian markon sur Sarnon.

Pripensu lian plugadon! Nepre li riĉiĝus. Anke li stis fianĉo de bela junulin respektinda ĉar ni scias ke ŝia frato povas citi tekstojn pli flue ol ĉiu alia vir vivanta aŭ eĉ laŭ memor d Aaĉjo Callard.”

“Ja’s. Justulo!” kri’s tioldul el ĉar’ kie li sidis. “Sed olda Camperdine bone rivalus lin tivir kiun Beguildy tenis en botel. Ja’s. Li stis lerta pri tekstoj kiam li drinkegis. M aŭdis lin citi tekstojn tiom longajn k’on b’zonus stangon por mezur’in. Sed kiam sobra li rifuzis diri eĉ un tekston. Tiam li parolis tre obscene. Sed post drinkego jadi stis mirakle!”

“Mi diras” Sinjor Grimble trankvile rezonadis “ke ŝia frato povas elbuŝigi tekston ŝia patro stas Sakristian ŝia patrin stas laŭleĝa edzin de Sakristian ka logike sekvas ke ŝ estas fidinda junulin. Ka v aŭdis kion ŝi diris. Mi ja konfirmas ke ŝ diris veron k eĉ pl’ol simplan veron. Aŭskultu. Ekde sia naskiĝo Prudence Sarn estas virin frapita d Eternul. Kion ŝi faras ŝi n povas tuteviti ĉar ŝin regas potenc de Satan’. Ni scias ke pro ti ŝ travagadas kampojn. Pro ti ŝ estis amiko de Beguildy ka lernis lian fiecon ĉar i stis samspecaj. Pro ti ŝ sorĉrigardas tiun aŭ alian ĉu infanon ĉu beston ĉu grenkampon tutne gravas. Ĝi ŝrumpas ki ajn ĝ estas ĝi ŝrumpas ka forvelkas. Ka ŝ volonte mortigas senhezite. Kion ŝi faris al mia hundo kiu valoris multon por mi? A°. K eĉ pli nigraj agoj! Pli ka pli nigraj! Pro ki mortis ŝia patrin? Homoj ŝi mortis per vulpoganto. Veneno. Sakristianedzin stas mi’atestanto. Kiu flegas malsanan patrinon? Ŝia filin. Nu homoj kion vi diras pri ti?”

Aŭdiĝis murmurad inter ĉeestantoj kiuj moviĝis ka puŝis por rigardi min sidanta muta pro mirego. Sed ancor nenju parolis. Kamparanoj ne haste kondamnas. I stis brulema tindr sed siliko ancor n estis almetita.

“K eĉ pli nigra” diras Grimble. “Sed unue permesu ke Srin Sakristian kaj Tivvyriah Sakristian stariĝu ka diru per un vorto ĉu ti stas ver. Nun diru. Ĉu ja ĉu ne?”

“Ja!” i duope diris.

“Nu pro ki mortis en akvo tisensaĝa junulin Jancis Beguildy ka ŝia povra infan? Kiu stis sola kun i en dom kiam ĝ okazis? Prudence Sarn! Kial Jancis ĉagrenis sorĉistinon? Ĉar ŝi sci’s ion. Ŝi sci’s pri diablaj artifikoj faritaj de ŝia patro ka sorĉistin. Ka ĉar ŝi n havis monon ŝi venis minacante kaŭzi skandalon se ŝ ne ricevos

multan monon ka tion Prudence Sarn rifuzis doni. Do kiam nenju ĉe'stis escepte de tifebla delikata etulin' devanta prizorgi sian bebbon ka Pru Sarn kiu stas forta kiel vir Jancis Beguildy mortis en lago."

Denove aŭdiĝis murmurado sed necesis pl'ol morto de filin de jam suspektinda sorĉisto por aktivig'in.

"Sed poste stis pli mav'ago" diris Grimble. "Kiam Sarn amindumis je Tivvyriah ti ne plaĉis al lia fratino. Ŝi volis resti mastrino. Ŝi n volis alian virinon en dom. Ŝi jam forigis sian patrino pro ti. Ja's. Ŝi preferis havi nenjun fraton ol havi edzigitan fraton."

Suspir trairis amason kiu certe nombriĝis tricent animojn ĉar foir stis granda. "Kion ŝi faris?" Grimble daŭrigis ka malam en liaj okuloj kiam li rigardis min stis terura. "Nu kiam krepusko venis ka nebulo leviĝis dum Sarn ĉerpadis akvon por brutoj ŝ enpuŝis lin ka post ti ŝ forremis en boato por trompi Sakristiano ka ŝ teruris infanojn de Muelisto tiel k'i ne kuraĝis diri veron."

L atendis dum minuto por ke ĉiuj komprenu. Poste li diris—

"Leporfrapita! Sorĉistino! Trifoje murdistino!"

Tuj Hutlet ekmuĝis—

"Ne permesu al sorĉistino vivi!"

Siliko stis metita al tindro. Sonis ulul. On kri's—

"Surtretu ŝin!"

"Ŝtonumu ŝin!"

"Ŝi dronu!"

Troviĝis nenju por defendi min krom kelkaj kiuj ne povis aŭdiĝi. Sakristiano jam hajmoniris. Li stis justa vir ka m opinias ke l apogus min. Plejmulto de ĉe'stanoj stis el aliaj regionoj. Kelkaj stis nek por nek kontre mi.

Felena puŝis taŭen sian edzon postulante ke l subtenu min sed on kri's—

"Anke ci mem riskas kondamnon paŝtisto!" "Kiel ci pagas terluon?"

I taŭensvarmis je mi kiel leviĝo de vintrinundo. I'rigis kelkajn al kirko por elporti trempilon. K ancor muĝadis voĉo de Huglet.

"Ne permesu al sorĉistino vivi!"

Lago tremas

Mi ja kredas ke m svenis pro terur ĉar mi konsci's nenjom pli ĝis mi sentis fridan akvon ka senspire malsubis sentante ŝnurojn kiuj ligis min al trempil k aŭdante muĝadon de Huglet kies voĉo smilis al bruego d iu granda demon'.

Ĉapitro 7:

Malfermu pordojn ĉielvaste Lasu reĝon alrajdi gaste.

Mi rekonsci'ĝis k apertis miajn okulojn demandante min ki stas tilaŭta tretado ka pensante ke Bendigo liberiĝis. Sed mi memoris ke Sakristian forkondukis Bendigon do m penis vidi ki povas esti ĉar ĉarĉevaloj jam stis kondukitaj al Plashbien por titago. Mi sorrigardis ka m tuj kredis ke certe mi mortis ka nun stas en Paradiz.

Sobrigardante al mi de sia ĉeval kun okuloj tiel vivardaj ke m kredus ke l amas min se m n estus alie konvinkita stis nenju alia ol Kester Woodseaves. L aspektis iomete pl'olda ka konturoj de lia vizaĝo stis eĉ pli klaraj ol taŭe kvaz li'aniam pliĉizis ĝin. Koncerne liajn okulojn tuta lum de Ĉiel stis en i kun agrabla subsugesto d antikv'Adam⁷⁸. I rigardis min de kapo ĝis piedo ka m sereniĝis. Ja's! ligite al trempil en tiom mizera situaci' en kia nenju sin respektanta virin volus esti vidata d iu vir ka nepre ne de si'amato mi tamen trovis trankvilon. Nenjo ĝenis min. Nenjo ĉagrenis min. Kester ĉ'estis. Kester stis mestro. Ki povus aflikti min? Tia stis mia fido ke kvankam plimalpli tricent homoj kontris min ka nur Kester defendis min tamen mi sci's ke m estis ekster danĝer. Mi povus turni min sur mian flankon k endormiĝi sur titrempil kvaz ĝ estus lanuga lito tiel trankvila stis mia menso.

“Nu!” finfine li diras “nu Pru mi'kara v estas en mava stat!”

Ka l'iom ridetis kvaz dirante “Sed ne restos tiel.”

“Ja m estas” mi respondis ka mia voĉo tremegis pro ĝoj “en tre mava stat Kester Woodseaves.”

Li ĉirkerigardis ka pergeste alvokis Felenan. Ŝ alkuris kvaz sklavin.

“Bonvolu malligi” li diris indikante ŝnurojn.

⁷⁸ Laŭ popoltradicio, Adam, laŭ la Biblio la unua homo, estis unue perfekta, plejbela persono.

Farante tion ŝi flustris —

“Ne gravas kion i faros kontre min. M obeos lin. Vir por kiu on volonte mortus.”

“Ĉu stas iu sfiĉ’amika ke l tenos miĉevalon?” li demandas.

Callard kri’s—

“Mi faros tion kun bonvol.”

Tal elseliĝi Kester ĉirkerigardis ka diris—

“Nu klare ke v belamuzis vin! Taŭe per blanka boveto. Nun virin pli blanka ol lili’. Mi bone scias kiu instigis vin!”

Kelkaj kapklinis sed plejmulto koleris ĉar li ĉesigis amuzon.

Kester liris al Grimble.

“Mi ka vi jamtaŭe konflikis⁷⁹ Grimble” li diras. V estas tro malinda k elturniĝema por esti vir. Se ĝenas vin mia traktado vi rajtas lokti kun mi laŭ via plaĉo. Sed v estas nur ridindaĵo. Via nazo stas tro longa Grimble. Ĝ entrudiĝas en ĉies aferojn.”

Ka je ti li pugnobatis nazon al Grimble ka Grimble muĝegis poltrone ĉar li stis tutmalkuraĝa ka ĉeestantoj ne povis ne ridi.

Poste Kester iris al Huglet ka diris—

“Vi certe ne kaŝas viajn celojn. Vi faras nenjon sekrete. Mi povis aŭdi vin kriaĉi eĉ ĝis Splash. Ĉu v loktos?”

Nu kvankam li stis tre granda Huglet ne volis lokti. Li ŝinŝanceliĝis ĉar li sci’s ke Kester stas tre lerta loktisto. Sed multaj rigardantoj sci’s nenjon pri Kester ka n gravus al i s i scius ĉar i nur volis agrablan tagon d amuzo. Tion Kester taŭspozis.

“Loktado!” i kri’s denove bonhumore. Sed kion i celis nenju povus sc’i.

“Horahura!” krias olda Callard frenezeta pro ekscitiĝo k infanoj vidante Kestern ka memorante siajn lecionojn modeste metis interplektitajn manojn sur stomakojn ka ĉantis—

“Taŭroludo stas fia” ki ridigus min se m ne tiom maltrankviliĝus pri Kester.

“Arenon! Faru arenon!”

“A° amikoj jen agrabla glata pec de herbaĵ” diras Kester indikante lokon apud akvo. Do tie i faris arenon. Kester demetis siajn jakon ka veston ka nevolante same agis Huglet. Haste on

⁷⁹ = Konfliktis.

faris vetojn. I komencis lokti. Mi kredis ke Huglet frakosas ĉiujn ostojn en korpo de Kester sed ne! Kester stis hardita ka sperta loktisto ka kiam ajn Huglet firme tenis lin li sukcesis liberiĝi preta rekomenci. Dutrifoje Huglet maltaŭen puŝis lin ĝis lia ŝultro preske tuŝis teron sed ĉiun fojon li liberigis sin abrupte ka subite tiel ke l ne perdis poenton. Tutdume mi timegis ke Huglet per sia granda forto rompos dorson de Kester ka m povis vidi ke ti multege plaĉus al li ĉar li forgesis ĉion krom malamon al vir kiu dufoje forprenis de l amuzon. Mi demandis min kial Kester ne penis faligi lin per ia ruzo sed Felena flustris—

“Li celas ion tiTeksisto. L’ial atendas.”

Tutdume Kester movetis sin pli ka pli proksimen al akvo ka m miris pri ti ĉar koto tie stis tre glitiga.

Ka subite en nur moment ĉi’okazis. Sed kiel ĝi fariĝis m ancor ne scias. Kester diras ke l uzis novan ĵeton kiun li lernis en urbo. Nu dum palpebrum Huglet estis ĵetita ne nur sur teron sed tut’en akvon. L eniris kaptaŭen ka kiam li malfacile baraktis el ŝlim en kiun l’iris tutkorpe ka kot estis tre glueca ĉiu tiel laŭte ridegis ke l paliĝis. Efektive stis komike. Muelisto kiu staris apude ridetis unuan fojon laŭ memor de ĉiuj kvaz li volis diri “Jen alia kat en akvo!”

Kester staris senmove dum minuto ka pezege spiris por retrovi spiron. Poste li prenis rimenojn de Callard metis piedon en ingon ka surseliĝis.

“Volonte” diras Felena softe “m estus sur tisel taŭ vi Teksisto.”

Ankor mi n vidis adoradon kia ti’en ŝiaj verdaj okuloj.

Sed li tutne atentis ŝin.

“Pru!” li diris.

Mi stariĝis.

“Dum rikolto ĉe Sarn ĉu m diris ke dev’s esti alveni aŭ fortenti?”

“Alveni.”

Mi nur povis flustri.

“Do alvenu Pru Woodseaves.”

Li klinis sin. Li metis siajn brakojn ĉirke min. Li levis min al sel. Stis samkiel en mia sonĝo. Ka samkiel en tisonĝo Felena rigardis petege ka l n atentis ŝin ka bru de homoj silentiĝis ridado ka malbenoj de Huglet ka Grimble aplaŭdo de Callard-infanoj k

alta voĉo de Aaĉjo Callard kiu rakontas pri loktokonkurs taŭ preske cent jaroj. Ĉi' silentiĝis en seren'aer. Restis nur vespera vento kiu levis branĉojn kiel amanto levanta longajn harojn de si'amatin.

„Ĵig olda ĉevalaĉ!“ diras Kester ka n'galopadis direkte al blupurpuraj montoj.

“Sed ne!” mi diris. “Dev's esti forteni Kester. Vi dev's edzinigi knabinon kia lili'. Jen m estas leporfrapita!”

Li rifuzis aŭskulti. Li rifuzis displuadi. Nur kiam mi longe displuis kontre min mem l abrupte haltigis sian ĉevalon ka sobrigardante en miajn okulojn li diris—

“Ĉesu titristaj vortoj. Mi jam elektis mian peceton de Paradizo. Ĝ estas sur via brusto mia kara konatin!”

Ka dirinte tivortojn li klinis sian belan kapon ka kisis min trafe sur buŝo.

.

Nun finiĝis rakonto de Prudence Sarn.

LISTO DE DIALEKTAĴOJ

aliol = alia ol	kvaz(e) = kvazaŭ
almen(e) = almenaŭ	lesta = lasta
ambe = ambaŭ	laterno = lanterno
ank(e) = ankaŭ	lokto = lukto
ankor(e) = ankoraŭ	m = mi (kutime antaŭ aŭ post
anstat(e) = anstataŭ	vorto komenciĝanta per
apen(e) = apenaŭ	vokalo)
aŭ n = aŭ ne	malankoli' = melankolio
'bako = tabako	maltaŭ = malantaŭ
bald(e) = baldaŭ	men = malpli
ĉikio(n) = ĉi'(n) kio(n)	mestro = mastro
ĉirk(e) = ĉirkaŭ	morge = morgaŭ
ĉiti = ĉitio (aŭ ĉitio)	n = ne
ĉu n = ĉu ne	n' = ni (kutime antaŭ aŭ post
d = de, da	vorto komenciĝanta per
displui = disputi	vokalo)
domaĉi = domaĝi	nelge = antaŭ/post nelonge
domne = damne	nenj- = neni-
dutri = du aŭ tri	on = oni
Frino = fraŭlino	parsono = pastro
ĝ = ĝi (kutime antaŭ aŭ post	pejtro = patro
vorto komenciĝanta per	pl' = pli
vokalo)	pr' = pri
hajmo = hejmo	prisperi = prosperi
hiere = hieraŭ	rikejo = rikoltejo
hodie = hodiaŭ	s = se
i = ili	Srin = sinjorino
in = ilin	st- = est-
jadi = je Dio	ŝ = ŝi (kutime antaŭ aŭ post
ja's = jes	vorto komenciĝanta per
k(a) = kaj	vokalo)
k' = ke	tal = antaŭ ol
kamrado = kamarado	taŭ = antaŭ
koce = k.c. (kaj cetere)	Tent! = Atentu!
kotope = k.t.p. (kaj tiel plu)	terpo = terpomo

ti... = tiu...
ti'n-kaj-re'n = tien kaj reen
tutne; tut... tutne; tut...

v = vi (kutime antaŭaŭ post
vorto komenciĝanta per
vokalo)

La artikolo “la” ne estas uzata en la dialekto.

Kiam adjektivo antaŭas substantivon komenciĝantan per *a* la adjektivo kaj substantivo kunfandiĝas. Ekzemple: mia avo Æ miavo. Se estiĝus konfuzo apostrofo helpas klarigi: mi'avo. Kelkfoje aliaj kunfandiĝoj okazas, ankaŭ kun apostrofo kiam necesa por klareco.

Ofte vortoj stas iom alie prononcataj (do skribitaj) ol kutimas en Esperanto. Plejofte la signifo estas evidenta per la kunteksto.

Plejparte la aliaj nekutimaj vortoj troviĝas in *PIV* aŭ ĝia *Suplemento*.

PROKSIMUMA PRONONCO DE LA ANGLALINGVAJ NOMOJ
laŭ la Shropshire-dialekto

Anne: an	Nicholas: nɪkəlɪs
Bendigo: bendigo	Outrack: aʊtræk
Blackmere: blækmjə	Plash: plæʃ
Brampton: bræmtən	Polly: poli
Callard: kæləd	Prudence: prudəns
Camperdine: kæmpədajn	Sammy: səmi
Donald Broadribb: danld brOdrɪb. (Usona prononco)	Sarn: san
Dorcas: dokəs	Shopshire: ŝɒpʃɪə
George: ɡoʒ	Staffordshire: stæfədʃɪə
Gideon: ɡɪdʒən	Sukey: suki
Grace Kirkwood: grejs kɪəkʍəd (w estas simila al ŭ)	Timothy: tɪmeθi (θ kiel Hispana c. Varianto de t)
Jancis Beguildy: ʒənsɪs bɜɪldi	Tivvy: tɪvi
John Milton: ʒɒn mɪltən	Tivvyriah: tɪvɪrɪə
Lullingford: lalɪŋfəd (ŋ vidu eksplikon sube)	Toby: tobi
Mary Webb: mari web (w simila al ŭ)	Towser: taʊzə
Moll: mol	Trevor Steele: trevə stil
	Waterloo: wotəlu (w simila al ŭ)
	Worcester: wustə (w simila al ŭ)

La simbolo ə indikas ke oni prononcu duonsilabon sed kun neklara vokalo.

La simbolo æ indikas vokalon meze inter a kaj e (iomete similan al la Franca a).

La simbolo ŋ indikas konsonanton formitan el n sed kun la gorgo duone fermita kvazaŭ sekvus g.

La simbolo ɪ indikas tre mallongan i.

Akcentu ĉiam la unuan silabon.

Nomoj ne en la listo estas prononceblaj kiel normalaj Esperanto-vortoj.

Listo kompilita laŭ konsiloj de Trevor Steele.

PRI LA TRADUKO

La originalo de ĉi tiu romano estis verkita en modifita formo de la dialekto de Shropshire, en Anglio. Ĝi estas iom malfacile legata de ordinara anglalingvulo.

Kiam Grace Kirkwood, tre kompetenta aŭstralia esperantisto, decidis traduki la romanon en Esperanton ŝi uzis la norman formon de Esperanto tiel ke la tradukita romano estis tre facile legebla. Tamen perdiĝis la literatura stilo de la originala verko kaj la karaktero de la romano multe suferis. Ŝi klopodis iom redoni la originalan guston per uzado de la t.n. “poeziaj” neologismoj (frida, olda, kc.) sed kiam ŝi mortis la stilo de la traduko ankoraŭ restis literature tre malkontentiga, kvankam gramatike kaj vortuze ĝenerale akceptebla.

Grace Kirkwood postlasis malgrandan sumon da mono por finpretigi kaj eldoni la tradukitan romanon. Trevor Steele, tre kapabla aŭstralia prozisto, entreprenis profunde revizii la tradukon surbaze de la originala teksto Shropshire-dialekteca. Tiucele li akiris la helpon de tre kapabla aŭstralia poeto esperantista, Niĉjo Nicholas. Kune ili reviziis preskaŭ duonon de la traduko. Sed la tasko montriĝis tro granda kaj temporaba. Trevor do petis min transpreni ĝin.

Necesis ne nur finprepari la duan duonon de la traduko sed ankaŭ plene revizii la unuan duonon por konsekvencigi la stilon. Farante tion mi devis evoluigi “dialektan” stilon kiu almenaŭ parte spegulas tiun de la originalo anglalingva. La rezulto estas teksto kiu estas multe malpli “dialekteca” ol la originalo, tamen relative radikala en la esperanta literaturo.

Por fari la “dialekton” mi ĉefe adoptis metodojn uzitajn de la aŭtoro kaj proponojn de Grace Kirkwood mem. Laŭeble mi strebis konstrui lingvoformon kiu laŭ lingvistikaj principoj estas ebla dialektoformo evoluunta kaj kiu ankaŭ konservas kelkajn karakterizaĵojn de angleca parolmaniero.

Multaj el la “dialektaj” formoj kaj en la originalo kaj en la nun proponata traduko estas efektive nur ŝajnaj kaj konsistas el nekutima skriba reprodukto de la parolata lingvo. En la traduko tion ofte transdonas mia rezigno je ĉia enfraza interpunkcio.

Multaj dialektaspektaj teksteroj en la originalo kaj en la traduko eknormaliĝas tuj kiam oni legas ilin voĉe kaj ne nur okule.

Alia karaktero de la dialektaspekto rezultas el la karaktero de la ĉefrolanto mem en la romano. Pru Sarn, la rolanto kiu pretendas verki la rakonton, estas persono tute ne edukita kvankam ŝi ja lernis skribi kaj legi. Kaj en la originalo kaj en la traduko ŝi nek povas nek volas observi la literaturajn normojn kaj skribas kiel ŝi parolas, ofte forgesante kiel ŝi komencis frazon, intermiksante nekonsekvence—kelkfoje preskaŭ kaose—pronomojn (kaj mankon de pronomoj), verbformojn, eĉ vortuzojn.

Kontribuas al ĉi tiu lingva kaoso ankaŭ la amo de Pru Sarn al bibliaj tekstoj. Ŝi tre ofte uzas bibliajn frazojn, foje ĝuste kaj foje neĝuste. En la originala angla teksto tiuj citaĵoj estas laŭ la anglalingva versio publikigita en la jaro 1611 laŭ ordono de la tiama Reĝo Jakobo. Kelkfoje, precipe rilate al la Psalmoj, ŝi citas laŭ la anglikana Preĝlibro, kiu uzis pli fruan kaj pli arkaikan version. En la traduko Grace Kirkwood kaj mi uzis la tekstojn kiel ili aperas en la esperanta Londona Biblio, kun modifetoj kiam (tre malofte) Pru Sarn miscitas kaj kiam ŝi uzas tekstojn el la Preĝlibro. En la originalo tiuj citaĵoj estis kelkfoje dialektigitaj, kelkfoje ne, kaj mi konservas tiun trajton en la traduko.

Kelkaj rolantoj en la romano (ĉefe Kuracisto, Parsono, kaj Skviro) neniam parolas dialekte sed nur normlingve, kaj en la angla kaj en la traduko. Sed la aliaj rolantoj kutime ne klopodas normigi sian lingvouzon negrave al kiu ili parolas.

Trajto de la originala verkaĵo estas la ripetado de silaboj, ofte kun vokalŝanĝoj, ekzemple “prokristi-prokrasti”, por doni emfazon aŭ por karakterizi individuajn rolantojn. Ili estas plejparte evidentaj kaj mi ne piednotis aŭ eksplikis ilin.

Laŭeble mi strebis pliprofunde dialektigi teksterojn kiam ili estas tiaj en la originalo, kaj plinormigi ilin kiam ili estas plinormaj en la originalo. Sed ne ĉiam eblis dialektigi precize samajn vortojn en la traduko kiel en la originalo. Kaj, kiel mi jam rimarkigis, la traduko konservas nur malgrandan proporcion de la dialekteco de la originalo.

Trevor Steele bonvolis tralegi la finan tradukon kaj tre helpe konsilis pri diversaj dialektigoj. Kune ni ellaboris la pronomuzon

kaj kelkajn variantojn de familiaraj vortoj kiaj “jes”, “kaj”. “ke”, kc. Tamen pri la fina formo de la teksto respondecas nur mi.

Kvankam en la originalo pluraj rolantoj ofte misgramatikas, mi decidis ke estas dezirinde ne reprodukti tiun trajton en la traduko. Do mi strebis resti en la kadro de la ortodoksa esperanta gramatiko. Kelkfoje mi retroiris al gramatika uzado el la unua jardektio (proksimume 1887-1900) de Esperanto, por doni arkaikan karakteron kia estas kutima en dialektoj. Pluraj fruaj zamenhofismoj estas reproduktitaj, eĉ kvankam ili sulkgigas la brovojn de multaj “modernaj” esperantistoj.

Kvankam sendube troviĝas komposteraroj en la ĉipresita romanteksto la leganto prave supozos ke se ŝajne troviĝas gramatika eraro, plejverŝajne tio ŝuldiĝas al mislego de la dialektaĵo. Por helpi ĝustan legadon mi ofte enmetis tradiciajn apostrofojn por indiki ke oni akcentu la lastan silabon de, ekz., la vortoj Sakristian’, region’, kaj aliaj vortoj de kiuj la lasta vokalo, o, estis eliziita. Kiam konfuzo inter akuzativo kaj nominativo ne estas verŝajna mi ne enmetis tiun apostrofon (malgraŭ la ortografia tradicio esperanta) por ne troabundigi la apostrofojn kaj tiel konfuzi la okulojn de la legantoj, ĉar en ĉi tiu dialekto la fina -o kutime ne uziĝas kiam la elizio ne tro malfaciligas prononcon. Kiam aliaj “kontraŭgramatikaj” formoj ŝajnas ekzisti, la leganto bonvolu perŝe legi la tekston kaj rimarki ke mankanta interpunkcio ofte eksplikas la strangan aspekton. Krome bonvolu ĉiam memori (“enmensigi” laŭ la vortuzado de Pru Sarn) ke multaj rolantoj pro diversaj kaŭzoj misprononcas kelkajn vortojn aŭ mislokigas silabojn.

Mi deziras averti ke mi ne prezentas ĉi tiun romanon aŭ “dialekton” kiel modelon por reala lingvouzado. La “dialekto” estis kreita specife por traduki ĉi tiun romanon kaj neniel spegulas efektivan aŭ rekomendatan lingvouzon. Se iun dialektaĵon en la traduko iu opinios konservinda, nu—mi nek rekomendas, nek aprobas tion.

Donald Broadribb
Septembro 1994